

Frederiko Engelso

La origino de la familio,
de la privata proprieto kaj de la ŝtato
Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano

Frederiko Engelso

**La origino de la familio, de la
privata proprieto kaj de la ŝtato**

**Konekse kun la esploraĵoj de
Lewis H. Morgan**

**Elgermanigita de
Vilhelmo Lutermano**

Monda Asembleo Socia (MAS)

Frederiko Engelso

La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato

Konekse kun la esploraĵoj de Lewis H. Morgan

Verkita fine de marto ĝis la 26-a de majo 1884.

Unuafoje publikigita en Hottingen-Zuriko 1884.

Laŭ la kvara, kompletigita eldono, Stutgarto 1892.

Ĉiuj esencaj ŝanĝoj de la unua eldono estas signitaj en piednotoj.

Elgermanigita laŭ Karl Marx/Friedrich Engels – Werke.
(Karl) Dietz Verlag, Berlino. Vol. 21, 5-a eldono 1975, sen-
ŝanĝa represo de la 1-a eldono 1962, Berlino/GDR,
p. 25-173,
el la reta versio, estigita la 20-an de marto 1999:
http://www.mlwerke.de/me/me21/me21_025.htm

Frederiko Engelso: Pri la origino de la familio, de la privata
proprieto kaj de la ŝtato,
elgermanigita de Vilhelmo Lutermano

Monda Asembleo Socia (MAS), 2009

ISBN 978-2-918300-16-8

[Rimarkoj de la tradukinto al Esperanto estas sekvataj de lia siglo: -vl kaj en la teksto metitaj inter rektajn krampojn. -vl]

Enhavo

Pri la unua eldono 1884.....	8
Antaŭparolo al la kvara eldono(1891) de „La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato”	11
I Prahistoriaj kulturŝtupoj.....	26
1. Sovagêco.....	26
2. Barbareco.....	28
II La familio.....	33
1. La sangparenca familio.....	41
2. La punalua familio.....	43
3. La pariĝa familio.....	51
4. La monogamia familio.....	67
III La irokeza gento.....	93
IV La greka gento.....	110
V Estiĝo de la atena ŝtato.....	120
VI Gento kaj ŝtato en Romo.....	133
VII La gento ĉe keltoj kaj ĝermanoj.....	145
VIII La ŝtatigo de la ĝermanoj.....	162
IX Barbareco kaj civilizacio.....	175
Frederiko Engelso: Nove malkovrita kazo de grupedzeco.....	199
Rimarkoj de la tradukinto.....	204

Pri la unua eldono 1884

La postsekvantaj ĉapitroj estas iel la plenumado de testamentaĵo. Estis neniu malpli grava ol Karlo Markso kiu rezervis al si prezenti la rezultojn de la Morganaj¹ esploradoj en kunteksto kun la rezultoj de sia – mi rajtas en certaj limoj diri nia – materiisma historia esplorado kaj per tio klarigi ties tutan gravecon. Morgano ja siamaniere malkovris la materiisman histori-komprenon kiun Markso malkovris antaŭ kvardek jaroj kaj estis kondukata de ĝi, komparante la barbarecon kaj la civilizacion, pri la ĉefaj punktoj al la samaj rezultoj kiel Markso. Kaj same kiel *La kapitalo* estis de la metiaj ekonomikistoj dum jaroj diligente kopiita kaj obstine prisilentigita, tiel same la ĉefaj reprezentantoj de la „prahistoria” scienco en Anglio traktis la *Ancient Society*² de Morgano. Mia laboraĵo povas doni nur malgravan anstataŭaĵon por tio kion fari la sorto jam ne permesis al nia amiko. Sed mi disponas en liaj detalaj eltiraĵoj el Morgano pri kritikaj rimarkoj, kiujn mi ĉi tie kiom eble plej redonas.

Laŭ la materiisma kompreno la lastinstance decida elemento en la historio estas: la produktado kaj la reproduktado de la rekta vivo. Sed tiu mem estas siavice duspeca. Unuflanke la produktado de vivrimedoj, de aĵoj por nutrado, vestaĵo, loĝado kaj de la iloj necesaj por tio; aliflanke la produktado de homoj mem, la generado de la specio. La sociaj institucioj, sub kiuj la homoj de difinita historia epoko kaj de difinita lando vivas, estas kondiĉitaj de ambaŭ specoj de produktado: de la evoluŝtupo unuflanke de la laboro, aliflanke de la familio. Ju malpli la laboro estas ankoraŭ evoluinta, ju pli limigita la kvanto de ĝiaj produktoj, do

1 Morgana: de Morgano, anglalingve *Morgan*. -vl

2 „Ancient Society, or Researches in the Lines of Human Progress from Savagery, through Barbarism to Civilization”. By Lewis H. Morgan, Londono, Macmillan and Co., 1877. La libro estas presita en Usono kaj rimarkinde malfacile havebla en Londono. La verkinto mortis antaŭ kelkaj jaroj.

ankaŭ la riĉaĵo de la socio, des pli grandparte la sociordo ŝajnas dominata de gentaj ligoj³. Sub tiu divido de la socio, bazita sur gentaj ligoj, tamen pli kaj pli evoluas la produktivo de la laboro; kun ĝi privata proprieto kaj interŝanĝo, diferencoj je riĉaĵo, de valorigo de fremda laborforto kaj per tio la bazo de klasaj kontraŭdiroj: novaj sociaj elementoj kiuj dum la paso de generacioj klopodas adapti la malnovan socian staton al la novaj kondiĉoj, ĝis kiam fine la neakordigeblo de ambaŭ kondukas al kompleta ŝanĝego. La malnova socio bazita sur gentaj ligoj krevas en la kolizio de la nove evoluintaj sociaj klasoj; ĝin anstataŭas nova socio, kuntenata en la ŝtato, kies subunuoj jam ne estas gentaj asocioj, sed lokaj asocioj, socio, en kiu la familia ordo estas tute dominata de la proprieta ordo kaj en kiu nun tiuj klasaj kontraŭdiroj kaj klasbataloj libere disvolviĝas, el kiuj konsistas la enhavo de ĉia ĝisnuna *skribita* historio.

Estas la granda merito de Morgano ke li malkovris kaj restarigis tiun prahistorian bazon de nia skribita historio en ĝiaj ĉefaj trajtoj kaj trovis en la gentaj asocioj de la nordamerikaj indianoj la ŝlosilon kiu malfermas al ni la plej gravajn, ĝis nun ne solvitajn enigmojn de la plej malnova greka, roma kaj ĝermana⁴ historio. Sed lia verko ne estas io rapide farita. Dum proksimume kvardek jaroj li luktis kun tiu materialo, ĝis kiam li komplete regis ĝin. Sed pro tio lia libro estas ja unu el la malmultaj epokfaraj verkoj de nia tempo.

En la sekva prezentado la leganto ĝenerale facile disting- as tion kio venas de Morgano de tio kion mi aldonis. En la historiaj sekcioj pri Grekio kaj Romo mi ne limigis min je la Morganaj pruvoj, sed aldonis tion pri kio mi disponis. La sekcioj pri keltoj kaj ĝermanoj apartenas esence al mi; Morgano disponis pri tio preskaŭ nur pri duamanaj fontoj kaj

3 En la originalo: „Geschlechtsbande”. -vl

4 Originale: germana. Engelso, kiel multaj samtempuloj, inkluzive de lingvosciencistoj, uzis la vorton germano(j), germana(j), ankaŭ por ĝermano(j), ĝermana(j). -vl

Pri la unua eldono 1884

por la ĝermanaj kondiĉoj – krom Tacito – nur pri la malbonaj liberalaj falsadoj de s-ro Freeman. La ekonomiaj klarigoj, kiuj estis ĉe Morgano por lia celo sufiĉaj, sed por la mia tute nesufiĉaj, estas tute nove prilaboritaj de mi. Kaj fine mi estas kompreneble respondeca pri ĉiuj konkludoj, pri kiuj Morgano ne estas eksplicite citata.

Antaŭparolo al la kvara eldono(1891) de „La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato”

La antaŭaj altkvantaj eldonoj de tiu ĉi skribaĵo estas de preskaŭ duonjaro elvenditaj, kaj la eldonisto [J. H. W. Dietz] jam de certa tempo deziris ke mi ellaboru novan eldonon. Pli urĝaj taskoj detenis min ĝis nun de tio. De la apero de la unua eldono pasis sep jaroj, en kiuj la kono de la originaj familiformoj grave progresis. Tie necesis do la diligenta aplikado de pliboniga kaj kompletiga mano; kaj tiom pli ĉar la intencita stereotipado de la nuna teksto por certa tempo malebligis al mi pluajn ŝanĝojn.¹

Mi submetis do la tutan tekston al zorgema kontrolado kaj faris serion da aldonoj, per kiuj, kiel mi esperas, la nuna stato de la scienco estas dece konsiderata. Krome mi donas en la plua sekvo de tiu ĉi antaŭparolo mallongan superrigardon de la evoluo de la historio de la familio de Bachofen ĝis Morgano, antaŭ ĉio ĉar la angla ŝovinisme inspirita prahistoria skolo ankoraŭ daŭre faras ĉion eblan prisilenti la ŝanĝegon de la prahistoriaj konceptoj faritan de la Morganaj malkovroj, ĉe kio ĝi tamen tute ne ĝenas sin alproprigi al si la Morganajn rezultojn. Ankaŭ aliloke oni parte tro sekvas tiun anglan modelon.

Mia laboraĵo ricevis diversajn tradukojn al fremdaj lingvoj. Unue italan: „L'origine della famiglia, della proprietà privata e dello stato”. Versione riveduta dall'autore, di Pasquale Martignetti. Benevento 1885. Poste rumanan: „Originea familiei, proprietății ei private și a statului”. Tradukita de Joan Nădejde, en la revuo de Jasi „Contemporanul”, sep-

1 En la „Neue Zeit” la lasta parto de la frazo tekstas: „... ĉar la nova eldono devas ricevi la eldonkvanton hodiaŭ kutiman en la germana socialisma literaturo, sed en aliaj germanaj librofakoj ankoraŭ tre maloftan.”

Antaŭparolo al la kvara eldono(1891) de „La origino de la familio,
de la privata proprieto kaj de la ŝtato”

tembro 1885 ĝis majo 1886. Poste dane: „Familjens, Privat-
ejendommens og Statens Oprindelse”. Dansk af Forfatteren
gennemgaaet Udgave, besorget af Gerson Trier. København
1888. Franca traduko de Henri Ravé, kiu baziĝas sur la
nuna germana eldono, estas presata.

* * *

Ĝis la komenco de la sesdekaj jaroj ne eblas paroli pri
historio de la familio. La historia scienco ĉi-kampe estis
ankoraŭ tute sub la influo de la kvin libroj de Moseo. La
patriarĥa familiformo tie pli detale priskribita ol aliloke
estis ne nur senhezite konsiderata la plej malnova, sed
ankaŭ – kun escepto de la poliginio² – identigata kun la
nuntempa burĝa familio, tiel ke la familio envere tute ne
spertis historian evoluon; maksimume oni koncedis ke en la
pratempo povis ekzisti periodo de seksa senreguleco. –
Tamen oni konis krom la monogamion ankaŭ la orientan
poliginion kaj la hindan-tibetan poliandron³; sed tiuj tri
formoj ne ordigeblis en historian sinsekvon kaj estis konsi-
derataj en senkonteksta apudeco. Ke ĉe kelkaj popoloj de la
malnova historio kaj ĉe kelkaj ankoraŭ ekzistantaj sovaĝuloj
la deveno ne estis konsiderata de la patro, sed de la patri-
no, ke do la virina devenlinio estis konsiderata la sole vali-
da, ke ĉe multaj nuntempaj popoloj la edzeco ene de certaj
pli grandaj, tiam ne detale esploritaj grupoj estas
malpermesata, kaj ke tiu moro troviĝas en ĉiuj mondpartoj
– tiuj faktoj estis ja konataj, kaj oni kolektis ĉiam pli da
ekzemploj de ili. Sed oni sciis nenion fari per tio, kaj eĉ
ankoraŭ en la „Researches into the Early History of Man-

2 Originale: *Vielweiberei*, „plurvirineco”, sistemo en kiu viro hav-
as plurajn virinojn (aŭ edzinojn) samtempe – dum *poligamio*
estas striktasence stato de viro aŭ virino kiu havas plurajn edz-
inojn resp. edzojn samtempe, do aplikiĝas al ambaŭ seksoj (sed
estas ofte ankaŭ uzata en la senco de *poliginio*). -vl

3 Originale: *Vielmännerei*, „plurvireco”, sistemo en kiu virino ha-
vas plurajn virojn samtempe. -vl

Antaŭparolo al la kvara eldono(1891) de „La origino de la familio,
de la privata proprieto kaj de la ŝtato”

kind ktp ktp” de E. B. Tylor (1865) ili aperas nur kiel „strangaj kutimoj” apud la malpermeso valida ĉe kelkaj sovaĝuloj tuŝi per fera ilo brulantan lignon, kaj similaj religiaj strangaĵoj.

La historio de la familio komenciĝas en 1861, per la apero de la „Patrinrajto”⁴ de Bachofen. Tie la aŭtoro faras la jenajn asertojn:

1. ke la homoj vivis komence en senlima seksrilato, kiun li, per neĝusta esprimo, nomas hetajrismo;

2. ke tia rilato ekskludas ĉian certan patrecon, ke pro tio la deveno kalkuleblas nur en la virina linio – laŭ patrinrajto –, kaj ke tio estis origine la kazo ĉe ĉiuj popoloj de la antikveco;

3. ke sekve de tio la virinoj, kiel patrinoj, la sole certe konataj gepatroj de la pli juna generacio, ricevis altan gradon de respekto kaj estimo, kiu, laŭ la imago de Bachofen, kreskis ĝis kompleta virina dominado (gineokratio);

4. ke la transiro al la monogamio⁵, en kiu la virino apartenis ekskluzive al *unu* viro, inkludis rompon de praa religia ordono (t.e. fakte rompo de la praa rajto de la ceteraj viroj je la sama virino), rompon, kiu pente kompensendis aŭ kies tolerado aĉetendis per tempe limigita fordonado de la virino.

Bachofen trovas la pruvojn por tiuj teoremoj en sennombraj teksteroj de la malnovklasika literaturo, kolektitaj per ekstrema diligento. La evoluo de la „heretismo” al monogamio kaj de la patrinrajto al la patrorajto okazas laŭ li, nome ĉe la grekoj, sekve al pluevoluo de la religiaj imagoj, enŝovo

4 Originale: „*Mutterrecht*”; se distingi inter *rajto* kaj *juro*, eble pli konvenus ĉi tie la termino *juro*, do *patrinjuro*; tamen temas pri nocio en kiu temas precize pri *rajtoj*, ĉu de patrino, ĉu de patro. -vl

5 Unuopa edzeco, originale: *Einzelehe*. -vl

Antaŭparolo al la kvara eldono(1891) de „La origino de la familio,
de la privata proprieto kaj de la ŝtato”

de novaj diaĵoj, reprezentantoj de nova pensmaniero, en la tradiciitan diaron, la reprezentanton de la malnova pensmaniero, tiel ke tiu lasta estas pli kaj pli forŝovata de la unua. Laŭ Bachofen estas do ne la evoluo de la faktaj vivkondiĉoj de la homoj, sed la religia speguliĝo de tiuj vivkondiĉoj en la kapoj de la samaj homoj, kiu kaŭzis la historiajn ŝanĝojn en la reciproka pozicio de viro kaj virino. Laŭ tio, Bachofen prezentas la „Orestion” de Eŝilo kiel la dramon priskribon de la batalo inter la pereanta patrinrajto kaj la patrorajto aperanta kaj venkanta en la heroepoko. Klitemnestro, pro sia amanto Egisto, mortigis sian edzon Agamemno⁶ revenintan el la Troja milito; sed Oresto, la filo ŝia kaj de Agamemno, venĝas la murdon per tio ke li mortigas sian patrinon. Pro tio persekutas lin la erinioj, la demonaj protektantoj de la patrinrajto, laŭ kiu la patrinmurdo estas la plej grava, nepentofarebla krimo. Sed Apolo⁷, kiu per sia orakolo estis instiginta Oreston je tiu murdo, kaj Ateno, alvokita kiel juĝistino – ambaŭ dioj kiuj reprezentas ĉi tie la novan patrorajtan ordon –, protektas lin; Ateno aŭskultas ambaŭ partiojn. La tuta disputo mallonge resumiĝas en la nun okazanta debato inter Oresto kaj la erinioj. Oresto apogas sin sur sia aserto ke Klitemnestro faris duoblan krimon: mortigante sian edzon ŝi mortigis samtempe lian patron. Kial la erinioj do persekutas lin kaj ne ŝin, la multe pli kulpan? La respondo estas frapa:

„Al la viro kiun ŝi mortigis ŝi *ne estis sangparenca.*”

La murdo al viro ne sangparenca, eĉ se li estas la edzo de la murdintino, estas pentofarebla, ne koncernas la eriniojn; ilia tasko estas nur persekuti la murdon inter sangeparencaj, kaj en tio, laŭ patrinrajto, la plej grava kaj nepentofarebla estas la patrinmurdo. Nun Apolo aperas por defendi Oreston; Ateno igas voĉdoni la areopaganojn – la

6 Alia Esperanta formo estas *Agamemnono*. -vl

7 En Esperanto ankaŭ nomata Apolono. -vl

Antaŭparolo al la kvara eldono(1891) de „La origino de la familio,
de la privata proprieto kaj de la ŝtato”

juĝistojn en atena tribunalo; la voĉoj samas por liberigo kaj por kondamno; tiam Ateno kiel prezidanto donas sian voĉon por Oresto kaj liberigas lin. La patrorajto venkis super la patrinrajto, la „dioj de juna deveno”⁸, kiel ili estas nomataj de la erinioj mem, venkas super la erinioj, kaj tiuj lasas sin fine persvadi, en la servo de la nova ordo transpreni novan oficon.

Tiu nova, sed decide ĝusta prezento de la „Orestio” estas unu el la plej belaj kaj plej bonaj teksteroj en la tuta libro, sed ĝi pruvas samtempe ke Bachofen kredas almenaŭ same multe je la erinioj, Apolo kaj Ateno kiel siatempe Eŝilo; li ja kredas ke ili en la greka heroepoko plenumis la miraklon renversi la patrinrajton per la patrorajto. Ke tia ideo, laŭ kiu la religio estas la decida levilo de la mondhistorio, fine resumiĝas je pura mistikismo, estas klare. Pro tio estas peniga kaj tute ne ĉiam utila penado tralabori la dikan libregon de Bachofen. Sed ĉio ĉi ne malgrandigas lian pioniran meriton:

- li, kiel unua, anstataŭigis la frazon de nekonata stato kun senregula seksrilato per la pruvo, ke la malnovklasika literaturo montras al ni spurojn laŭ kiuj antaŭ la monogamio efektive ĉe grekoj kaj azianoj ekzistis kondiĉoj en kiuj ne nur viro sekse rilatis kun pluraj virinoj, sed virino kun pluraj viroj sen ofendi la moron;
- ke tiu moro ne malaperis sen postlasi spurojn en limigita fordono, per kiu la virinoj devis aĉeti la rajton je monogamio; ke do la deveno origine kalkuleblis nur je virina linio, de patrino al patrino;
- ke tiu ĝenerala valideco de la virina linio konserviĝis ankoraŭ dum longa tempo ĝis en la tempo de la

8 En la originalo: Die „Götter jungen Stamms”, kie *Stamm* signifas same tribo kaj deveno. -vl

Antaŭparolo al la kvara eldono(1891) de „La origino de la familio,
de la privata proprieto kaj de la ŝtato”

monogamio kun certigita aŭ almenaŭ agnoskata
patreco;

- kaj ke tiu origina pozicio de la patrinoj, kiel la sole certaj gepatroj de siaj infanoj, certigis al ili kaj per tio al la virinoj ĝenerale, pli altan socian rangon ol kian ili iam ajn poste reposedis.

Estas vere ke Bachofen elparolis tiujn frazojn ne en tiu ĉi klareco – lia mistika percepto malebligis tion. Sed li pruvis ilin, kaj tio signifis en la jaro 1861 kompletan revolucion.

La dika libro de Bachofen estis skribita germane, t.e. en la lingvo de tiu nacio kiu tiam plej malmulte interesiĝis pri la prahistorio de la nuntempa familio. Pro tio li restis nekonata. Lia tiukampe plej proksima posteulo aperis 1865, sen esti iam ajn aŭdinta pri Bachofen.

Tiu posteulo estis J. F. McLennan, la rekta malo de sia antaŭulo. Anstataŭ la genia mistikulo ni renkontas ĉi tie la sekan juriston; anstataŭ la superabunda poeta fantazio la evidentajn kombinaĵojn de la plendanta advokato. McLennan trovas ĉe multaj sovaĝaj, barbaraj kaj eĉ civilizitaj popoloj de malnova kaj de nova epoko formon de geedziĝo, ĉe kiu la fianĉo, sole aŭ kun amikoj, devas ŝajne perforte rabi la fianĉinon al ŝiaj parencoj. Tiu moro devas esti la restaĵo de pli frua moro, laŭ kiu la viroj de tribo vere perforte rabis siajn virinojn ekstere, de aliaj triboj. Kiel do estiĝis tiu „rabadzeco”? Tiom longe kiom la viroj povis trovi sufiĉe da virinoj en la propra tribo, tute ne estis kialo por tio. Sed ni trovas same ofte ke ĉe ne evoluintaj popoloj certaj grupoj ekzistis (kiuj ĉirkaŭ 1865 estis ankoraŭ ofte identigitaj kun la triboj mem), ene de kiuj edziĝo estis malpermesata, tiel ke la viroj devis preni siajn virinojn kaj la virinoj siajn virojn ekster la grupo, dum ĉe aliaj ekzistas la moro ke la viroj de certa grupo devas preni siajn virinojn nur ene de sia propra grupo. McLennan nomas la unuajn ekzogamiaj, la duajn

Antaŭparolo al la kvara eldono(1891) de „La origino de la familio,
de la privata proprieto kaj de la ŝtato”

endogamiaj, kaj konstruas nun senhezite rigidan kontraŭecon inter ekzogamiaj kaj endogamiaj „triboj”. Kaj kvankam lia propra esplorado de la ekzogamio montras al li ke tiu kontraŭeco en multaj, se ne en la plej multaj aŭ eĉ ĉiuj kazoj ekzistas nur en lia imago, li faras ĝin tamen la bazo de sia tuta teorio. Ekzogamiaj triboj povas laŭ tio ricevi siajn virinojn nur el aliaj triboj; kaj ĉe la konstanta militŝtato inter la triboj, kiu kongruas kun ilia sovaĝeco, tio povis okazi nur per rabo.

McLennan nun demandas plu: De kie venas tiu moro de ekzogamio? La imago de sangparenceco aŭ incesto ne povas ludi rolon en tio, ĉar tiuj evoluis nur poste. Sed ja la moro, multe disvastiĝinta inter sovaĝuloj, mortigi bebinonj tuĵ post ilia naskiĝo. Per tio estiĝis, laŭ li, troo da viroj en ĉiu unuopa tribo, kies nepra sekvo estas ke pluraj viroj posedas unu virinon komune: plurvireco. La sekvo de tio estas siavice ke oni sciis kiu estas la patrino de la infano, sed ne kiu la patro, sekve: parenceco kalkulata nur laŭ la patrina linio kun ekskludo de la patra – virinrajto. Kaj dua sekvo de manko de virinoj ene de la tribo – manko mildigita sed ne forigita de la plurvireco – estis ja la sistema, perforta forkonduko de virinoj el fremdaj triboj.

„Ĉar ekzogamio kaj poliandrio fontas el unu sama kaŭzo – la manko de samnombreco inter ambaŭ sekvoj –, ni devas *konsideri ĉiujn ekzogamiajn rasojn kiel origine dediĉitan al poliandrio ...* Kaj pro tio ni devas konsideri kiel nerefutebla, ke inter ekzogamiaj rasoj la unua parencecsistemo estis tiu kiu konas sangajn ligojn nur ĉe la patrina flanko.”⁹

Estas la merito de McLennan ke li montris la ĝeneralan disvastiĝon kaj grandan gravecon de tio kion li nomas ekzogamio. Li tute ne *malkovris* la fakton de la ekzogamiaj grupoj, kaj li eĉ malpli komprenis ĝin. Escepte de pli fruaj,

9 McLennan, „Studies in Ancient History”, 1886. „Primitive Marriage”, p. 124.

Antaŭparolo al la kvara eldono(1891) de „La origino de la familio,
de la privata proprieto kaj de la ŝtato”

unuopaj notoj ĉe multaj observantoj – ĝuste la fontoj de McLennan –, Latham¹⁰ precize kaj ĝuste estis priskribinta tiun institucion ĉe la hindaj magaroj kaj dirinta ke ĝi estas ĝenerale disvastiĝinta kaj renkonteblas en ĉiuj mondpartoj – tekstero kiun McLennan mem citas. Kaj nia Morgano estis ankaŭ pruvinta kaj ĝuste priskribinta ĝin jam 1847 en siaj leteroj pri la irokezoj (en la „American Review”) kaj 1851 en „The League of the Iroquois” ĉe tiu tribo, dum, kiel ni vidos, la advokata menso de McLennan kaŭzis ĉi tie multe pli grandan konfuzon ol la mistika fantazio de Bachofen sur la kampo de la patrinrajto. Krome estas la merito de McLennan ke li ekkonis la patrinrajtan devenordon kiel la originan, kvankam Bachofen antaŭis lin, kiel li poste mem agnoskis. Sed ankaŭ ĉi tie li ne vidas klare; li parolas ĉiam pri „parenceco nur en virina linio” (kinship through females only) kaj aplikas tiun esprimon ĝustan por pli frua ŝtupo ankaŭ al postaj evoluŝtupoj, kie deveno kaj heredo estis ja kalkulataj ankoraŭ ekskluzive laŭ virina linio, sed kie parenceco estas agnoskata kaj esprimata ankaŭ laŭ vira flanko. Estas la limigiteco de la juristo kiu kreas al si fiksan juresprimon kaj aplikas tiun senŝanĝe al kondiĉoj kiuj igas ĝin intertempe neaplikebla.

Ŝajnas, ke malgraŭ ĝia tuta kredeblo la teorio de McLennan ne ŝajnis sufiĉe firma al sia propra aŭtoro. Li almenaŭ rimarkas mem, ke estas

„notinde, ke la formo de la” (ŝajna) „virinrabado regas plej elformite kaj plej esprimriĉe ĝuste ĉe la popoloj, kie regas *vira* parenceco” (li celas deveno laŭ vira linio).(p. 140)

Kaj same:

„Estas stranga fakto ke, tiom kiom ni scias, la infanmurdo estas nenie sisteme praktikata, ke la ekzogamio kaj la plej malnova parencecoformo ekzistas unu apud la alia” (p. 146)

10 „Descriptive Ethnology”, 1859.

Antaŭparolo al la kvara eldono(1891) de „La origino de la familio,
de la privata proprieto kaj de la ŝtato”

Ambaŭ estas faktoj kiuj rekte kontraŭdiras lian klarigmanieron kaj al kiuj li povas nur kontraŭmeti novan, eĉ pli komplikan hipotezon.

Malgraŭ tio, lia teorio trovis en Anglio grandan aplaŭdon kaj aliĝon: McLennan estis tie ĝenerale konsiderata kiel fondinto de la historio de la familio kaj tiukampe unua aŭtoritato. Lia kontraŭeco de ekzogamiaj kaj endogamiaj „triboj”, kvankam oni konstatis okazajn esceptojn kaj modifojn, restis tamen la agnoskata bazo de la reganta vidmaniero kaj fariĝis la okulŝirmilo, kiu malebligis ĉian liberan rigardon super la esplorata kampo kaj per tio ĉian decidan progreson. Al la trotaksado de McLennan en Anglio, kaj aliloke laŭ la angla modelo, oni devas kontraŭmeti la fakton ke li per sia vere miskomprenebla kontraŭdiro de ekzogamiaj kaj endogamiaj „triboj” kaŭzis pli da damaĝo ol utilis per siaj esploradoj.

Sed baldaŭ aperis jam pli kaj pli da faktoj kiuj estis tro por lia eta kadro. McLennan konis nur tri formojn de edzeco: poligamion, poliandrion kaj paran edzecon. Sed kiam oni atentis tiun punkton, troviĝis pli kaj pli da pruvoj ke ĉe neevoluintaj popoloj ekzistas formoj de edzeco, en kiu grupo de viroj posedis grupon da virinoj komune; kaj *Lubbock*¹¹ agnoskis tiun grupan edzecon (Communal marriage) kiel historian fakton.

Tuj poste, en 1871, *Morgano* elpaŝis kun nova kaj multriple decida materialo. Li konvinkiĝis ke la aparta parencesistemo valida ĉe la irokezoj estas komuna al ĉiuj praloĝantoj de Usono, do disvastiĝinta tra tuta kontinento¹², kvankam

11 „The origin of Civilisation”, 1870 [Tiel! -v].

12 Tiel en la originalo: „der Vereinigten Staaten [...], also über einen ganzen Kontinent verbreitet” – „de Usono [...], do disvastiĝinta tra tuta kontinento”. Ĝenerale la aŭtoro distingas per nomoj Usonon, Nordamerikon kaj Amerikon, se temas pri substantivoj, dum li uzas „amerikanisch” (amerika) kaj por „usona”

Antaŭparolo al la kvara eldono(1891) de „La origino de la familio,
de la privata proprieto kaj de la ŝtato”

ĝi rekte kontraŭdiras la gradojn de parenceco kiuj fakte rezultas el la tie valida geedzeca sistemo. Li nun instigis la usonan federacian registaron, surbaze de demandiloj kaj tabeloj konceptitaj de li mem, fari enketojn pri la parencecsistemoj de la ceteraj popoloj, kaj trovis el la respondoj,

1-e ke la amerika-indiana parencecsistemo validas ankaŭ en Azio, kaj en iomete modifita formo en Afriko kaj Aŭstralio ĉe multaj popoltriboj;

2-e ke ĝi komplete klariĝas el formo de grupedzeco ĝuste formortanta en Havajo kaj aliaj pacifikaj insuloj¹³; kaj

3-e ke tamen sur tiuj insuloj validas parencecsistemo kiu klarigeblas nur per ankoraŭ pli praa, nun formortinta formo de grupedzeco.

Li publikigis la kolektitajn informojn kun siaj konkludoj en siaj „Systems of Consanguinity and Affinity”, 1871, kaj per tio kondukis la debaton al senfine pli ampleksa kampo. Per tio ke li, surbaze de la parencecsistemoj, rekonstruis la familiajn formojn kiuj kongruis kun ili, li malfermis novan esplorvojon kaj pli malproksiman retrorigardon en la prahistorio de la homaro. Se tiu metodo ekvalidis, tiam la bela konstruaĵo de McLennan forvaporigis.

McLennan defendis sian teorion en la noveldono de „Primitive Marriage”¹⁴. Dum li mem tre artefarite kombinas historion de la familio el puraj hipotezoj, li postulas de Lubbock kaj Morgano ne nur pruvojn por ĉiu iliaj asertoj, sed pruvojn de nerefutebla klareco, kiaj estas allasataj nur en skota tribunalo. Kaj tion faras la sama homo, kiu el la densa rilato inter patrinfrato kaj fratinfilo ĉe la ĝermanoj (Tacitus, „Germania”, ĉ. 20), el la raporto de Cezaro, ke la britoj havas dekope aŭ dekduope siajn virinojn komune, kaj el ĉiuj

kaj „amerika”. -vl

13 En la originalo: „kaj en aliaj aŭstraliaj insuloj.” -vl

14 „Studies in Ancient History”, 1875.

Antaŭparolo al la kvara eldono(1891) de „La origino de la familio,
de la privata proprieto kaj de la ŝtato”

aliaj raportoj de la antikvaj verkistoj konkludas ke ĉe ĉiuj ĉi popoloj regis poliandrio! Oni kredas aŭdi prokuroron, kiu ĉe prilaborado de sia kazo povas permesi al si ĉian liberecon, sed kiu postulas de la defendisto por ĉiu vorto la plej formalan jure validan pruvon.

La grupa edzeco estas pura inventaĵo, asertas li, kaj per tio ege postrestas malantaŭ Bachofen. La parencecsistemoj ĉe Morgano estas, laŭ li, nur preskriboj de socia ĝentileco, pruvitaj de la fakto ke la indianoj alparolas ankaŭ fremdulon, blankulon kiel fraton aŭ patron. Estas kvazaŭ oni volus aserti ke la nomoj patro, patrino, frato, fratino estus nuraj sensencaj alparolaj formoj, ĉar katolikaj pastroj kaj abatinoj estas ankaŭ alparolataj kiel patro kaj patrino, ĉar monaĥoj kaj monaĥinoj, eĉ framasonoj kaj anglaj fakasocioj en solena kunveno estas alparolataj kiel frato kaj fratino. Mallonge, la defendo de McLennan estis mizere malforta.

Tamen restis punkto, ĉe kiu li ankoraŭ ne estis kaptita. La kontraŭeco de ekzogamiaj kaj endogamiaj „triboj”, sur kiu lia tuta sistemo baziĝis, estis ne nur ne pridubata, sed ĝi estis eĉ agnoskata kiel ŝlosilŝtono de la tuta historio de la familio. Oni koncedis ke la provo de McLennan klarigi tiun kontraŭecon estas nesufiĉa kaj kontraŭdiras la faktojn nomitajn de li mem. Sed la kontraŭeco mem, la ekzistado de du malkongruaj specoj de memstaraj kaj sendependaj triboj, el kiuj unu speco prenas siajn virinojn ene de la tribo, dum tio estis absolute malpermesata al la alia – tio estis konsiderata nerefutebla evangelio. Oni komparu ekz-e la „Origines de la famille” (1874) de Giraud-Teulon kaj eĉ ankoraŭ la „Origin of Civilisation” (4-a eldono 1882) de Lubbock.

Tio estas la elirpunkto de la ĉefverko de Morgano: „Ancient Society” (1877), la verko kiu estas la bazo de tiu ĉi laboraĵo. Tio, kion Morgano ankoraŭ malklare antaŭsentis, tio estas ĉi tie disvolvita per plena konscio. Endogamio kaj

Antaŭparolo al la kvara eldono(1891) de „La origino de la familio,
de la privata proprieto kaj de la ŝtato”

ekzogamio ne estas kontraŭeco; ekzogamiaj „triboj” ĝis nun nenie pruvigis. Sed dum la tempo en kiu regis ankoraŭ grupa edzeco – kaj tiu iam regis plej verŝajne ĉie –, la tribo dividiĝis en nombro da grupoj sangparencaj laŭ la patrina flanko, gentoj, ene de kiuj regis strikta geedziĝmalpermeso, tiel ke la viroj de gento ja povis preni siajn virinojn ene de la tribo, kaj ĝenerale ankaŭ faris tion, sed ke ili devis preni ilin ekstere de sia gento. Tiel ke, se la gento estis strikte ekzogamia, la tribo entenanta la tutaĵon de la gentoj estis same endogamia. Per tio la lasta resto de la McLennan-a artifiko estis definitive malmuntita.

Sed Morgano ne kontentiĝis je tio. La gento de la amerikaj indianoj servis al li krome fari la duan decidan progreson sur la kampo kiun li esploris. En tiu gento organizita laŭ patrinrajto li malkovris la praformon el kiu disvolviĝis la posta patrorajta organizita gento, la gento kian ni trovas ĉe la antikvaj kulturpopoloj. La greka kaj la roma gento, enigmo por ĉiuj ĝistiamaj historiografiistoj, estis klarigita surbaze de la indiana, kaj per tio, nova bazo estis trovita por la tuta prahistorio.

Tiu remalkovro de la origina patrinrajta gento kiel antaŭŝtupo de la patrorajta gento de la kulturpopoloj havas por la prahistorio la saman gravecon kiel la evoluteorio de Darvino por la biologio kaj la teorio de plusvaloro de Markso por la politika ekonomio. Ĝi kapabligis Morganon skizi por la unua fojo historion de la familio en kiu almenaŭ la klasikaj evoluŝtupoj en siaj ĝeneralaj trajtoj, tiom kiom la hodiaŭ konata materialo ebligas, estas provizore konstatitaj. Evidentas ke per tio nova epoko de pritraktado de la prahistorio komenciĝas. La patrinrajta gento fariĝis la ĉarniro ĉirkaŭ kiu turniĝas tiu tuta scienco; ekde ĝia malkovro oni scias, en kiu direkto kaj pri kio oni devas esplori kaj kiel grupigi la esploritaĵojn. Kaj laŭ tio oni faras nun tiukampe multe pli rapidajn progresojn ol antaŭ la libro de Morgano.

Antaŭparolo al la kvara eldono(1891) de „La origino de la familio,
de la privata proprieto kaj de la ŝtato”

La malkovroj de Morgano estas nun ĝenerale agnoskitaj, aŭ pli ĝuste dirite: alproprigitaj de la prahistoriistoj ankaŭ en Anglio. Sed ĉe preskaŭ neniuj troviĝas la sincera koncedo ke estas Morgano al kiu ni dankas tiun revolucion de la konceptoj. En Anglio lia libro estas kiom eble plej prisilentata, li mem degne laŭdata pro siaj *antaŭaj* meritoj; oni diligente kaj pene pritraktas detalojn de lia prezentado, sed obstine prisilentas liajn vere grandajn malkovrojn. La originala eldono de „Ancient Society” estas elvendita; en Usono por io tia ne estas profitiga vendo; en Anglio la libro estis ŝajne sisteme subpremata, kaj la sola eldono de tiu epokfara verko kiu ankoraŭ cirkulas en la librokomerco estas – la germana traduko.

Pro kio tiu rezervemo, en kiu malfacilas ne vidi konspiron pri prisilentado, speciale se konsideri la multajn citaĵojn nur pro ĝentileco kaj aliaj komplezatestoj kiuj svarmas en la skribaĵoj de niaj agnoskataj prahistoriistoj? Ĉu eble ĉar Morgano estas usonano kaj ĉar estas tre malagrabla por la anglaj prahistoriistoj ke ili, malgraŭ ilia plej agnoskenda diligento en kolektado de materialo, por la kriterioj de ordigo kaj grupigo de tiu materialo, do por siaj ideoj, dependas de du geniaj eksterlandanoj, de Bachofen kaj Morgano? Oni povis ankoraŭ toleri la germanon, sed la usonanon? Vide al usonano, ĉiu anglo fariĝas patriota, pri tio mi vidis amuzajn ekzemplojn en Usono. Sed aldoniĝas ke McLennan estis la kvazaŭ oficiale nomumita fondinto kaj gvidanto de la angla prahistoria skolo; ke apartenis iel al „prahistoria deco” paroli kun la plej alta omaĝo pri lia artefarita historia konstruaĵo kiu kondukas de infanmurdo pro poliandrio kaj rabadziĝo al patrinrajta familio; ke la plej eta dubo pri la ekzisto de absolute malkongruaj ekzogamiaj kaj endogamiaj „triboj” estis konsiderata profananta herezo; do ke Morgano, per tio ke li forvaporigis ĉiujn ĉi sanktajn dogmojn, faris ian sakrilegion. Kaj krome li forvaporigis ilin en maniero, kiu devis nur esti elparolita por esti tuj

Antaŭparolo al la kvara eldono(1891) de „La origino de la familio,
de la privata proprieto kaj de la ŝtato”

evidenta, tiel ke la adorantoj de McLennan, kiuj ĝis nun erarvagadis inter ekzogamio kaj endogamio, devis frapi al si la kapon kaj elkrii: Kiel ni povis esti tiom stultaj kaj ne trovi tion jam delonge mem!

Kaj kvazaŭ tio ne estus jam sufiĉe da krimoj por malpermesi al la oficiala skolo ĉian alian pritraktadon ol malvarman forŝovon, Morgano spitis ĉian mezuron per tio ke li kritikis ne nur la civilizacion, la socion de varproduktado, la bazon de nia hodiaŭa socio, en maniero kiu memorigas Fourier-on, sed parolas pri estonta transformado de tiu socio per vortoj kiujn Karlo Markso povintus diri. Estis do bone meritite, ke McLennan riproĉis al li indignite, ke „*la historia metodo estas al li tute malsimpatia*”, kaj ke s-ro profesoro Giraud-Teulon en Ĝenefo konfirmas tion ankoraŭ en 1884. Tiu sama s-ro Giraud-Teulon ankoraŭ 1874 („*Origines de la famille*”) erarvagadis senhelpe en la labirinto de la McLennan-a ekzogamio, el kiu nur Morgano fine liberigis lin!

Mi ne bezonas pritrakti la ceterajn progresojn kiujn la prahistorio dankas al Morgano; en mia laboraĵo mem troviĝas la plej necesaj indikoj pri tio. La dek kvar jaroj kiuj pasis post la apero de lia ĉefverko tre riĉigis nian materialon por la historio de la homaj prasocioj; al la antropologoj, vojaĝantaj esploristoj kaj profesiaj prahistoriistoj aliĝis la komparaj juristoj kaj alportis parte novan materialon, parte novajn vidpunktojn. Kelkaj unuopaj hipotezoj de Morgano per tio ŝanceliĝis aŭ eĉ falis. Sed la nove kolektita materialo nenie kondukis al forŝovo de liaj ĉefaj vidpunktoj per aliaj. La ordo kiun li alportis en la prahistorion validas en siaj ĉefaj trajtoj ankoraŭ hodiaŭ. Oni povas eĉ diri ke ĝi trovas pli kaj pli da ĝenerala agnosko en la sama mezuro laŭ kiu lia aŭtoreco de tiu granda progreso estas sekretigata.¹⁵

15 Dum mia revenvojaĝo de Novjorko en septembro 1888 mi renkontis iaman deputiton de la Kongreso por la elektodistrikto de

Antaŭparolo al la kvara eldono(1891) de „La origino de la familio,
de la privata proprieto kaj de la ŝtato”

Rochester, kiu estis koninta *Lewis Morgan*. Bedaŭrinde li ne sciis multe rakonti pri li, nur ke Morgano vivis en Rochester kiel privatulo, okupiĝanta nur pri siaj studoj; ke lia frato estis kolonelo en Vaŝingtono ĉe la militministrejo; ke pere de sia frato li sukcesis interesi la registaron pri siaj esploradoj kaj igi ĝin eldoni plurajn el liaj verkoj je publikaj kostoj; ke li, la rakontanto, dum sia kongresa tempo ankaŭ plurfoje apogis tion.

I Prahistoriaj kulturŝtupoj

Morgano estas la unua kiu provas meti certan ordon en la homa prahistorio; tiom longe kiom ne grave pli ampleksa materialo devigas al ŝanĝoj, lia grupado certe restos valida.

El la tri ĉefaj epokoj: sovaĝeco, barbareco, civilizacio, kompreneble nur la du unuaj kaj la transiro al la tria okupis lin. Ĉiun el la du li dividis en malsupran, mezan kaj supran ŝtupojn, laŭ la progresoj de la produktado de vivrimedoj; ĉar, diras li,

„La lerteco en tiu produktado estas decida por la grado de homa supereco kaj naturdominado; el ĉiuj estaĵoj nur la homo atingis preskaŭ senkondiĉan dominadon de produktado de nutraĵoj. Ĉiuj grandaj epokoj de homa progreso samas, pli aŭ malpli rekte, kun la epokoj de etendado de la vivrimedaj fontoj.”

La evoluo de la familio iras apude, sed ne donas same evidentajn trajtojn por distingi la periodojn.

1. Sovaĝeco

1. *Malsupra ŝtupo.* Infaneco de la homa specio, kiu, almenaŭ parte, vivante sur arboj, per kio sole klarigeblas ĝia transvivo fronte al grandaj rabobestoj, ankoraŭ restadis en siaj originaj lokoj, la tropikaj aŭ subtropikaj arbaroj. Fruktoj, nuksoj, radikoj servis kiel nutraĵo; la elformiĝo de artikulacia lingvo estas la ĉefrezulto de tiu epoko. El ĉiuj popoloj, kiuj konatiĝis ene de la historia periodo, jam neniu apartenis al tiu prastato. Kiom ajn multajn jarmilojn ĝi eble daŭris, ni tamen ne povas pruvi ĝin el rektaj atestiloj; sed surbaze de la tezo de la deveno de la homo el la animala regno, la supozo de tiu transiro estas ne ĉirkaŭirebla.

2. *Meza ŝtupo.* Ĝi komenciĝas per la uzado de fiŝoj (al kiuj ni kalkulas ankaŭ kankrojn, konkajojn kaj aliajn akvobestojn) kiel nutraĵo kaj per la uzado de fajro. Ambaŭ iras kune, ĉar fiŝnutraĵo plene eluzeblas nur per fajro. Sed per tiu nova nutraĵo la homoj fariĝis sendependaj de klimato kaj

1. Sovaĝeco

loko; sekvante la riverojn kaj marbordojn, ili povis disvastiĝi eĉ en sovaĝa stato tra la plej granda parto de la Tero. La krude prilaboritaj, neŝlifitaj ŝtoniloj de la frua ŝtonepoko, la tiel nomata paleolitika, kiuj troveblas ĉiuj aŭ plejgrandparte en tiu periodo, estas en sia disvastiĝo tra ĉiuj mondpartoj pruviloj por tiuj migradoj. La nove okupataj zonoj kaj la seninterrompa trovinstinkto, ligitaj kun la posedo de la frot-fajro, venigis novajn nutraĵojn; ekz-e la radikojn kaj tuberojn kun sia amelo, bakitajn en varmega cindro aŭ en bakfosoj (terfornoj); ekz-e ĉasaĵojn kiuj, pere de la invento de la unuaj armiloj, klabo kaj lanco, fariĝis okaza aldono al la manĝaĵo. Ekskluzivaj ĉasistpopoloj, tiaj kiaj ili troviĝas en la libroj, t.e. tiaj kiuj vivas *nur* per ĉasado, neniam ekzistis; por tio la rezulto de ĉasado estas multe tro malforta. Pro longdaŭra malforteco de la nutraĵfontoj ŝajnas sur tiu ŝtupo aperi la hommanĝado, kiu de tiu momento daŭras longe. La aŭstralianoj kaj multaj polinezianoj troviĝas ankoraŭ hodiaŭ sur tiu ŝtupo de sovaĝeco.

3. *Supera ŝtupo.* Ĝi komenciĝas per la invento de arko kaj sago, per kiuj ĉasaĵo fariĝas regula nutraĵo, ĉasado unu el la normalaj laborbranĉoj. Arko, ŝnuro kaj sago konsistigas jam tre kunmetitan instrumenton, kies invento antaŭkondiĉas longan, akumulitan sperton kaj akriĝintajn spiritajn fortojn, do ankaŭ samtempan konatiĝon kun multaj aliaj inventaĵoj. Se ni komparas la popolojn kiuj ja konas arkon kaj sagon, sed ankoraŭ ne la potfaran arton (laŭ kiu Morgano difinas la transiron al barbareco), ni trovas efektive jam kelkajn komencojn de setlado en vilaĝoj, certan regadon de produktado de vivrimedoj, lignajn ujojn kaj ilojn, perfingran teksadon (do sen teksilo) per fibroj el basto aŭ kano, ŝlifitajn (neolitikajn) ŝtonilojn. Plej ofte ankaŭ fajro kaj ŝtonhakilo liveris jam la unutrunkan boaton kaj kelkloke trabojn kaj tabulojn por domkonstruado. Ĉiujn ĉi progresojn ni trovas ekz-e ĉe la nordokcidentaj indianoj de Ameriko, kiuj konas ja arkon kaj sagon, sed ne la ceramikan potfaradon. Por la

sovaĝeco, arko kaj sago estis kio la fera spado estis por la barbareco kaj la pulvopafililo por la civilizacio: la decida armilo.

2. *Barbareco*

1. *Malsupra ŝtupo*. Ĝi komenciĝas kun la enkonduko de ceramiko. Tiu estiĝis pruvite kaj en multaj okazoj kaj verŝajne ĉie el la kovrado de plektitaj aŭ lignaj ujoj per tero, por igi ilin fajrorezistaj; ĉe kio oni baldaŭ trovis ke la formita tero faras la servon ankaŭ sen la interna ujo.

Ĝis nun ni povis konsideri la iron de la evoluo tute ĝenerale, kiel validan por difinita periodo de ĉiuj popoloj, ajne. Sed kun la apero de la barbareco ni atingis ŝtupon ĉe kiu montriĝas la diversa natura talento de la du grandaj mondpartoj de la Tero. La karakteriza momento de la barbareca periodo estas la malsovaĝigo kaj bredado de animaloj kaj la kultivado de plantoj. Nun la orienta mondparto, la tiel nomata Malnova Mondo, posedis preskaŭ ĉiujn bestojn taŭgajn por malsovaĝigo kaj ĉiujn kultiveblajn grenspecojn, escepte de unu; la okcidenta, Ameriko, el la malsovaĝigeblaj nur la lamaon, kaj ankaŭ tiun nur en la suda parto, kaj el ĉiuj kulturgrenoj nur unu, sed la plej bonan: maizon. Tiuj diversaj naturkondiĉoj kaŭzas, ke ekde nun la loĝantaro de ĉiu duonsfero iras sian apartan iron, kaj ke la markiloj ĉe la limoj de ĉiuj unuopaj ŝtupoj en ĉiu el la du okazoj estas diversaj.

2. *Meza ŝtupo*. Ĝi komenciĝas en la oriento per la malsovaĝigo de dombestoj, en la okcidento per la kultivado de nutraj plantoj helpe de akvumado kaj per la uzado de adoboj (brikoj sune sekigitaj) kaj ŝtonoj por konstruaĵoj.

Ni komencu per la okcidento, ĉar ĉi tie tiu ŝtupo estis neniam superita ĝis la eŭropa konkero.

Ĉe la indianoj de la malsupera ŝtupo de barbareco (al kiu

2. Barbareco

apartenis ĉiuj trovitaj oriente de la rivero Misisipo), tempe de ilia malkovro ekzistis jam certa ĝardenkulturo de maizo kaj eble ankaŭ de kukurboj, melonoj kaj aliaj ĝardenplantoj, kiuj liveris tre esencan parton de ilia nutraĵo; ili loĝis en lignaj domoj, en vilaĝoj ŝirmataj per palisaroj. La nordokcidentaj triboj, speciale tiuj en la regiono de la rivero Kolumbio, troviĝis ankoraŭ en la supera ŝtupo de sovaĝeco kaj konis nek ceramikon nek ian ajn plantkulturon. Male, la indianoj de la tiel nomataj *pueblos* en Nov-Meksiko, la meksikanoj, centr-amerikanoj kaj peruanoj tempe de la konkero troviĝis sur la meza ŝtupo de barbereco; ili loĝis en fortikaĵecaj domoj el adoboj aŭ ŝtonoj, kultivis maizon kaj aliajn nutraĵplantojn diversajn laŭ situo kaj klimato en artefarite akvumataj ĝardenoj, kiuj konsistigis la ĉefan fonton de nutraĵo, kaj ili estis eĉ malsovaĝigintaj kelkajn animalojn – la meksikanoj la meleagron kaj aliajn birdojn, la peruanoj la lamaon. Krome ili konis la prilaboradon de metaloj – kun escepto de fero, pro kio ili daŭre ne povis rezigni ŝtonarmilojn kaj ŝtonilojn. La hispana konkero tiam fortranĉis ĉian memstaran evoluon.

En la oriento la meza ŝtupo de barbereco komenciĝis per malsovaĝigo de lakto- kaj viando-donaj bestoj, dum plantkulturado ŝajnas esti ankoraŭ nekonata ĝis profunde en tiu periodo. La malsovaĝigo kaj bredado de brutaro kaj la formado de pli grandaj gregoj ŝajnas esti impulsintaj la apartiĝon de la arjoj kaj ŝemidoj el la cetera amaso de la barbaroj. La eŭropaj kaj aziaj arjoj havas ankoraŭ komunajn brutnomojn, sed preskaŭ tute ne komunajn nomojn de kulturplantoj.

La konsistigo de gregoj kondukis ĉe taŭgaj lokoj al paŝtista vivo; ĉe la ŝemidoj en la herbaj ebenaĵoj de Eŭfrato kaj Tigriso, ĉe la arjojn tiuj de Hindio, de la Oksuso¹ kaj

1 En la originalo: „Oxus”, do Esperantigebla ankaŭ – kaj eble eĉ prefera – per *Okso*. -vl

Jaksarto², de Dono kaj Dnepro. Ĉe la limoj de tiaj paŝtaj regionoj certe okazis unue la malsovaĝigo de la brutoj. Tiel la paŝtistaj popoloj ŝajnis al postaj generacioj devenaj kvazaŭ el regionoj kiuj, male al esti la lulilo de la homa specio, estis preskaŭ ne priloĝeblaj por iliaj sovaĝaj antaŭuloj kaj eĉ por homoj de la malsupra ŝtupo de barbareco. Inverse, ekde kiam tiuj barbaroj de la meza ŝtupo kutimiĝis al la paŝtista vivo, ili neniam povintus kaprici reveni libervole el la herboriĉaj riverebenaĵoj en la arbarajn regionojn, en kiuj iliaj antaŭuloj hejmis. Eĉ kiam ili estis pelitaj pli norden kaj okcidenten, la ŝemidoj kaj arjoj ne kapablis iri en la okcidentaziajn kaj eŭropajn arbarajn regionojn antaŭ ol kapabli per grenkultivado nutri siajn brutarojn sur tiuj malpli favoraj grundoj kaj ĉefe por travintri. Estas pli ol verŝajne ke la grenkultivado estiĝis ĉi tie unue el la bezono nutri la brutaron kaj nur poste graviĝis por homa nutriĝo.

Al la abunda vianda kaj lakta nutrado ĉe arjoj kaj ŝemidoj, kaj speciale al la favora efiko sur la evoluo de iliaj infanoj eble atribueblas la supera evoluo de ambaŭ rasoj. Efektive la pueblo-indianoj de Nov-Meksiko, kiuj estas reduktitaj al preskaŭ pura plantnutraĵo, havas pli malgrandan cerbon ol la pli viand- kaj fiŝ-manĝantaj indianoj de la malsupra ŝtupo de barbareco. Ĉiukaze sur tiu ŝtupo malaperas iom post iom la hommanĝado kaj konserviĝas nur kiel religia akto aŭ, kio estas ĉi tie preskaŭ identa, kiel sorĉilo.

3. *Supera ŝtupo.* Ĝi komenciĝas per fandado de ferferco kaj transiras en la civilizacion per la invento de la litera skribo kaj ĝia aplikado por literatura registrado. Tiu ŝtupo kiu, kiel dirite, estis memstare farita nur en la orienta duonsfero, estas pli riĉa je progresoj en produktado ol ĉiuj antaŭaj kune. Al ĝi apartenas la grekoj de la erao de la herojoj, la italaj triboj mallonge antaŭ la fondado de Romo, la ĝermanoj de Tacito, la normanoj de la vikinga erao.³

2 En la originalo: „Jaxartes”. -vl

3 En la eldono de 1884, (anstataŭ „la germanoj de Tacito, la nor-

2. Barbareco

Ĉi tie ni ĉefe renkontas la feran, de brutoj tirata plugilo, kiu ebligis la grandskalan ĝardenkulturon, la *kampkulturon*, kaj per tio pliigon de la vivrimedoj praktike senliman por tiamaj kondiĉoj; per tio ankaŭ la senarbarigon de arbaro kaj ĝian transformadon en kampon kaj herbejon – kiuj siavice, grandskale, estus neebla sen la fera hakilo kaj la fera ŝpato. Sed per tio aperis ankaŭ rapida pliiĝo de la loĝantaro kaj densa priloĝado de malgranda regiono. Antaŭ la kampkulturo necesis certe esceptaj kondiĉoj, por ke duona miliono da homoj lasis sin unuigi sub unu solan centran gvidadon; verŝajne tio neniam okazis.

La plej altan prosperon de la supra ŝtupo de barbereco ni renkontas en la homeraj poemoj, nome en la „Iliado”. Evoluintaj feraj iloj; la blovilo; la manmuelilo; la potfara turnilo; la farado de oleo kaj vino; evoluinta metalprilaborado kiu transiras en artmetion; la ĉaro kaj militĉaro; la ŝipkonstruado per traboj kaj tabuloj; la komencoj de arĥitekturo kiel arto; ĉirkaŭmuritaj urboj kun turoj kaj kreneloj; la homera eposo kaj la tuta mitologio – jen la ĉefaj heredaĵoj kiujn la grekoj transprenis en la civilizacion. Se ni komparas kun tio la priskribon de la ĝermanoj ĉe Cezaro aŭ eĉ ĉe Tacito, kiuj staris ĉe la komenco de la sama kulturŝtupo, el kiu la homeraj grekoj estis transirontaj al pli alta, tiam ni vidas, kian riĉon de produktado la supera ŝtupo de barbereco entenas.

La bildo, kiun mi ĉi tie skizis pri la evoluo de la homaro tra sovaĝeco kaj barbereco ĝis la komencoj de la civilizacio laŭ Morgano, estas jam sufiĉe riĉa je novaj trajtoj kaj, kio pli gravas, trajtoj nekontestebaj, ĉar prenitaj rekte el la produktado. Tamen ĝi aperos kiel malforta kaj malriĉa kompare kun la bildo kiu montriĝos fine de nia migrado; nur tiam eblos plene prilumi la transiron el la barbereco en la civilizacion kaj la frapantan kontraŭecon de la du. Jam nun

manoj de la erao de la vikingoj”): „la germanoj de Cezaro (aŭ, kiel ni ŝatus prefere diri, de Tacito)”.

I Prahistoriaj kulturŝtupoj

ni povas ĝeneraliĝi la disdividon de Morgano jene:

sovaĝeco: epoko de la precipa alproprigo de pretaj naturproduktoj; la artefaritaj produktoj de la homo estas precipe helpiloj de tiu alproprigo.

barbareco: epoko de akiro de bredado kaj kampkulturo, lernado de metodoj de pli granda produktado de naturproduktoj pere de homa agado.

civilizacio: epoko de lernado de plua prilaborado de naturproduktoj, de la vera industrio kaj de arto.

II La familio

Morgano, kiu pasigis sian vivon precipe inter la irokezoj, kiuj vivas ankoraŭ nun en la ŝtato Novjorko, kaj estis adoptita en unu el iliaj triboj (tiu de la senekoj), trovis ĉe ili validan parencecsistemon, kiu estas en kontraŭdiro kun iliaj realaj familiaj rilatoj. Ĉe ili regis tiu ambaŭflanke facile nuligebla monogamio, kiun Morgano nomas „pariĝa familio”¹. La idaro de tia geedza paro estis do de ĉiuj konata kaj agnoskata; ne povis esti dubo al kiu aplikeblis la nomo patro, patrino, filo, filino, frato, fratino. Sed la fakta uzado de tiuj esprimoj kontraŭdiras tion. La irokezo nomas ne nur siajn proprajn infanojn, sed ankaŭ tiujn de siaj fratoj siajn filojn kaj siajn filinojn; kaj tiuj nomas lin patro. Male, la idojn de liaj fratinoj li nomas siajn nevojn kaj nevinojn, kaj tiuj lin onklo. Inverse la irokezino nomas, apud siajn proprajn infanojn, tiujn de siaj fratinoj siajn filojn kaj filinojn, kaj tiuj nomas ŝin patrino. La infanojn de siaj fratoj ŝi male nomas siaj nevoj kaj nevinoj, kaj tiuj nomas ŝin onklino. Same la infanoj de fratoj nomas sin inter si fratoj kaj fratinoj, same la infanoj de fratinoj. La infanoj de virino kaj tiuj de ŝia frato nomas sin reciproke kuzoj kaj kuzinoj. Kaj tio estas ne nur malplenaj nomoj, sed esprimoj de efektive validaj konceptoj de proksimeco kaj malproksimeco, sameco kaj malsameco de la sangpareneco; kaj tiuj konceptoj servas kiel bazo de komplete ellaborita parencecsistemo kiu kapablas esprimi plurcentojn da diversaj parencecrilatojn de la unuopa individuo. Eĉ pli. Tiu sistemo ne nur plene validas ĉe ĉiuj amerikaj indianoj (ĝis nun troviĝis nenia escepto), sed validas ankaŭ preskaŭ senŝanĝe ĉe la praloĝantoj de Hindio, ĉe la dravidaj triboj en Dekano kaj la gaŭraj triboj en Hindustano. La esprimoj de parencecrilatoj de la sudhindiaj tamiloj kaj de la seneko-indianoj en la ŝtato Novjorko ankoraŭ hodiaŭ kongruas por pli ol ducent diversaj parencecrilatoj. Kaj ankaŭ ĉe tiuj hindiaj triboj, kiel ĉe ĉiuj amerikaj indianoj, la parencecrilatoj devenaj el la valida familiformo

1 En la germana originalo: „Paarungsfamilie”, en la angla „pairing family”, ambaŭ laŭvorte *pariga familio* aŭ *pariĝa familio*. -vl

II La familio

estas en kontraŭdiro kun la parencecsistemo.

Kiel tio klarigeblas? Ĉe la decida rolo kiun la parenceco ludas ĉe ĉiuj sovaĝaj kaj barbaraj popoloj en la sociordo, oni ne povas forigi tiun tiom disvastiĝintan sistemon per diroj. Sistemo kiu validas en Ameriko ĝenerale, en Azio ankaŭ ekzistas ĉe popoloj de tute alia raso, amase troviĝas en pli aŭ malpli ŝanĝita formo ĉie en Afriko kaj Aŭstralio, tia sistemo klarigendas historie, kaj ne fordireblas, kiel provis ekz-e McLennan. La nomoj patro, infano, frato, fratino ne estas nur honoraj titoloj, sed entenas tute precizajn, tre seriozajn reciprokajn devojn, kies tutaĵo konsistigas esencan parton de la socia konstitucio de tiuj popoloj. Kaj la klarigo troviĝis. Sur la Sandviĉ-Insuloj (Havajo) ekzistis ankoraŭ en la unua duono de tiu ĉi jarcento formo de familio kiu liveris precize tiajn patrojn kaj patrinojn, fratojn kaj fratinojn, filojn kaj filinojn, onklojn kaj onkloinojn, nevojn kaj nevinojn, kiel la malnovhindia parencecsistemo postulas. Sed strange! La parencecsistemo valida en Havajo siavice ne kongruis kun la tie fakte ekzistanta familiformo. Tie ĉiuj gefratinfanoj estas senescepte fratoj kaj fratinoj kaj estas konsiderataj komunaj infanoj, ne nur de sia patrino kaj de ties fratinoj, aŭ de sia patro kaj ties fratoj, sed de ĉiuj gefratoj de siaj gepatroj sendistinge. Do, se la amerika parencecsistemo antaŭkondiĉas pli primitivan formon de familio kiu jam ne ekzistas en Ameriko, kiun ni en Havajo efektive ankoraŭ trovas, tiam la havaja parencecsistemo siavice resendas nin al ankoraŭ pli praa familiformo, kiun ni, estas vere, jam nenie povas pruvi kiel ekzistanta, kiu tamen *devas* esti ekzistinta, ĉar alie la koncerna parencecsistemo ne povintus estiĝi.

„La familio”, diras Morgano, „estas la aktiva elemento; ĝi estas neniam stata, sed antaŭen iras de pli malalta al pli alta formo, en la mezuro en kiu la socio evoluas de pli malalta al pli alta ŝtupo. La parencecsistemoj, male, estas pasivaj; nur en longaj interspacoj ili registras progresojn, kiujn la familio faris en la fluo de la tempo, kaj ricevas nur tiam radikan ŝanĝon, kiam la

II La familio

familio radikale ŝanĝiĝis.”

„Kaj”, aldonas Markso, „same okazas pri la politikaj, juraj, religiaj, filozofiaj sistemoj entute”. Dum la familio pluvivas, la parencecsistemo rigidiĝas, kaj dum tiu kutimece pluekzistas, la familio elkreskas el ĝi. Sed kun la sama certeco, kun kiu Cuvier povis konkludi el la marsupiulaj ostoj de animalskeleto trovita apud Parizo ke tiu apartenis al marsupiulo kaj ke tie iam vivis formortintaj marsupiuloj, kun la sama certeco ni povas konkludi el historie tradiciita parencecsistemo ke la familiformo kongrua kun ĝi, formortinta, ekzistis.

La ĵus menciitaj parencecsistemoj kaj familiformoj distingiĝas de la nun regantaj per tio ke ĉiu infano havas plurajn patrojn kaj patrinojn. Ĉe la amerika parencecsistemo, kiu kongruas kun la havaja familio, frato kaj fratino ne povas esti patro kaj patrino de la sama infano; sed la havaja parencecsistemo antaŭkondiĉas familion ĉe kiu tio, male, estis la regulo. Ni vidas ĉi tie serion da familiformoj kiuj rekte kontraŭdiras la ĝis nun kutime konsideratajn kiel sole validajn. La tradiciita koncepto konas nur la monogamion, apud tiu la poligamion de la viro, maksimume ankoraŭ poliandriion de virino, kaj ĉe tio prisilentas, kiel decas al moralumanta filistro, ke la praktiko mute sed senĝene malatentas tiujn limojn ordonitajn de la oficiala socio. La studado de la prahistorio, male, prezentas al ni kondiĉojn, en kiuj viroj vivas en poligamio kaj iliaj virinoj samtempe en poliandrio kaj iliaj komunaj infanoj do estas ankaŭ konsiderataj kiel de ili ĉiuj komunaj; kondiĉoj kiuj siavice ĝis sia fina transformiĝo en la monogamion spertas tutan serion da ŝanĝiĝoj. Tiuj ŝanĝiĝoj estas tiaj ke la rondo kiu entenas la komunan geedzan ligon kaj kiu estis origine tre larĝa, pli kaj pli mallarĝiĝas, ĝis kiam ĝi restigas nur la unuopan paron kiu hodiaŭ antaŭregas.

Per tio ke Morgano tiel konstruas la historion de la familio retropaŝe, li venas konforme kun la plimulto de siaj

II La familio

kolegoj al prakondiĉo, kie regis senlima seksrilato ene de tribo, tiel ke ĉiu virino apartenis al ĉiu viro kaj ĉiu viro al ĉiu virino egalece.² Pri tia prakondiĉo oni parolis jam ekde la lasta jarcento, sed nur en ĝeneralaj diroj; nur Bachofen, kaj tio estas unu el liaj grandaj meritoj, prenis ĝin serioze kaj serĉis pri spuroj de tiu kondiĉo en la historiaj kaj religiaj tradicioj. Ni scias hodiaŭ ke el tiuj spuroj trovitaj de li tute ne kondukas nin al socia ŝtupo de senregula seksrilato, sed al multe pli posta formo, la grupa edzeco³. Tiu primitiva socia ŝtupo, se ĝi reale ekzistis, apartenas al tiom multe pli frua epoko, ke ni apenaŭ rajtas atendi trovi en sociaj fosiliaĵoj, ĉe postrestintaj sovaĝuloj, *rektajn* pruvojn de ĝia iama ekzisto. La merito de Bachofen konsistis en tio ke li metis tiun demandon en la unuan rangon de sia esplorado.⁴

Lastatempe modiĝis fornei tiun komencan ŝtupon de la homa seksa vivo. Oni volas ŝpari tiun „honton” al la homaro. Kaj pli precize oni bazas sin, krom sur la mankon de ĉia rekta pruvo, speciale sur la ekzemplon de la cetera animala

-
- 2 La sekvanta teksto ĝis la paragrafo 1. *La sangparenca familio ...* (p. 43) estas la versio ampleksigita de Engelso en 1892. Ĝi tekstis en 1884: „La malkovro de tiu prakondiĉo estas la unua granda merito de Bachofen. El tiu prakondiĉo evoluis verŝajne tre frue:”
 - 3 En la sekvo, en la Esperanta versio, la termino *grupedzeco* estas uzata kun la signifo de *grupa edzeco*. -vl
 - 4 Kiom malmulte Bachofen komprenis tion kion li malkovris aŭ pli ĝuste divenis, tion li pravas per la nomado de tiu prakondiĉo kiel *hetajrismo*. *hetajrismo* signis ĉe la grekoj, kiam ili enkondukis la vorton, rilaton de viroj, fraŭlaj aŭ monogamie edzaj, kun fraŭlinoj, ĉiam antaŭkondiĉas certan formon de edzeco, ekster kiu la rilato okazas, kaj jam inkludas almenaŭ kiel eblecon la prostituadon. En alia senco la vorto estas neniam uzita, kaj en tiu senco mi uzas ĝin kun Morgano. La malkovroj de Bachofen, plej gravaj, estas ĉie mistifikataj ĝis nekredoblo per lia fantaziaĵo ke historie estiĝintaj rilatoj de viro kaj virino fontas en la respektivaj religiaj imagoj de la homoj, ne en iliaj realaj vivkondiĉoj.

II La familio

mondo; el tiu Letourneau („L'évolution du mariage et de la famille”, 1888) kunmetis multajn faktojn, laŭ kiuj ankaŭ tie tute nereguligita seksrilato apartenas al pli malalta ŝtupo. Sed el ĉiuj tiuj faktoj mi povas nur konkludi ke ili, por la homo kaj liaj pratempaj vivkondiĉoj, pravas absolute nenion. La pariĝoj por iom longa tempo ĉe vertebruloj sufiĉe klarigeblas el fiziologiaj kialoj, ekz-e ĉe birdoj per la helpbezono de la ino dum kovado; la ĉe birdoj troviĝantaj ekzemploj de fidela monogamio pravas nenion por la homo, ĉar tiu ĝuste ne devenas de birdoj. Kaj se strikta monogamio estas la pinto de ĉia virto, tiam la krono apartenas al la tenio, kiu posedas en ĉiu de siaj 50 ĝis 200 proglotidoj aŭ korpsegmentoj kompletan inan kaj masklan seksaparaton kaj pasigas sian tutan vivtempon per tio ke ĝi en ĉiu el tiuj segmentoj seksumas kun si mem. Sed se ni limigas nin al la mamuloj, tiam ni trovas tie ĉiajn formojn de seksa vivo, senregulecon, similaĵojn al grupedzeco, poligamion, monogamion; nur poliandrio mankas, tiun povis fari nur homoj. Eĉ niaj plej proksimaj parencoj, la kvarmanuloj, liveras al ni ĉiujn eblajn diversecojn en la grupiĝo de maskloj kaj inoj; kaj se ni faras ankoraŭ pli densajn limojn kaj konsideras nur la homsimilajn simiojn, tiam Letourneau scias diri al ni ke ili estas jen monogamiaj, jen poligamiaj, dum Saussure ĉe Giraud-Teulon asertas ke ili estas monogamiaj. Ankaŭ la asertoj de monogamio de la homsimilaj simioj, nove asertitaj de Westermarck („The History of Human Marriage”, Londono, 1891) ankoraŭ tute ne estas pruvoj. Mallonge, la novaĵoj estas tiaj, ke la sincera Letourneau koncedas:

„Cetere ĉe la mamuloj tute ne ekzistas strikta rilato inter la grado de intelekta evoluo kaj la formo de seksrilato.”

Kaj Espinas („Des sociétés animales”, 1877) diras rekte:

„La hordo estas la plej alta socia grupo kiun ni povas observi ĉe la animaloj. Ĝi estas, *tiel ŝajnas*, esti kunmetita el familioj, sed jam dekomence *la familio kaj la hordo estas en kontraŭdiro*, ili evoluas en inversa rilato.”

II La familio

Kiel la supre dirito montras, ni scias pri la familiaj kaj aliaj sociaj grupoj de la homsimilaj simioj kvazaŭ neniom; la novaĵoj rekte kontraŭdiras unu la alian. Tio ankaŭ ne mirigas. Kiom kontraŭdiraj, kiom bezonaj je kritika kontrolado kaj kribrado estas jam la novaĵoj kiujn ni posedas pri sovaĝaj homtriboj; sed simiaj socioj estas ankoraŭ multe pli malfacile observeblaj ol homaj. Provizore ni devas do rifuzi ĉian konkludon el tiaj absolute nefidindaj raportoj.

Male, la citita frazo de Espinas donas pli bonan apogpunkton. Hordo kaj familio estas ĉe pli altaj animaloj ne reciprokaj kompletigoj, sed kontraŭecoj. Espinas tre bele klarigas kiel la ĵaluzo de la maskloj dum la seksarda sezono malstrikigas ĉian socieman hordon aŭ provizore nuligas ĝin.

„Tie, kie la familio estas dense fermita, hordoj formiĝas nur en tre maloftaj esceptoj. Male tie, kie regas libera seksrilato aŭ poligamio, la hordo estiĝas preskaŭ per si mem. ... Por ke hordo povu estiĝi, la familiaj ligoj devas esti malstrikigitaj kaj la individuo refariĝinta libera. Pro tio ni trovas tiel malofte hordojn ĉe la birdoj. ... Male, ĉe la mamuloj ni trovas iom organizitajn sociojn, ĝuste ĉar ĉi tie la individuo ne malaperas en la familio ... La komunsento de la hordo povas do ĉe sia estiĝo ne havi pli grandan malamikon ol la komunsenton de la familio. Ni ne hezitu eldiri tion: Se evoluis pli alta socia formo ol la familio, tio povis okazi nur per tio ke ĝi enprenis familiojn kiuj suferis ĝisfundan ŝanĝon; kio ne ekskludas ke tiuj familioj trovis ĝuste per tio poste la eblecon nove konsistiĝi sub senfine pli favoraj cirkonstancoj.”⁵

Ĉi tie montriĝas ke la animalaj socioj havas ja ian valoron por konkludoj al la homaj – sed nur negativan. La pli alta vertebrulo konas, kiom ni scias, nur du familiformojn: poligamion aŭ unuopan pariĝon; en ambaŭ estas nur unu plenkreska masklo, nur unu edzo permesata. La ĵaluzo de la masklo, samtempe ligo kaj limo de la familio, metas la ani-

5 Espinas, l.c., citita ĉe Giraud-Teulon, „Origines du mariage et de la famille”, 1884, p. 518-520.

II La familio

malfamilion en kontraŭdiron al la hordo; la hordo, la pli alta sociiĝa formo, estas jen malebligita, jen malstriktigita aŭ dum la seksarda epoko nuligita, en plej bona okazo en sia pluevoluo malhelpata de la ĵaluzo de la maskloj. Sole tio sufiĉas por pruvi ke bestfamilio kaj homa prasocio estas malkongruaj aferoj; ke la prahomoj kiuj ellaboris sin el la besteco aŭ tute ne konis familion aŭ maksimume iun kiu ne ekzistas ĉe la bestoj. Tiom senarma animalo kiel la estiĝanta homo povis malgrandope tratabi sin eĉ izolite, kies plej alta sociiĝa formo estas la unuopa pariĝo, kiun Westermarck laŭ ĉasistaj raportoj atribuas al gorilo kaj ĉimpanzo. Por forevolui el la besteco, por plenumi la plej grandan progreson kiun havas la naturo, necesis kroma elemento: la anstataŭigo de la defendkapablo mankanta al la individuo per la kunigita forto kaj la kunagado de la hordo. El kondiĉoj en kiuj la homsimilaj simioj hodiaŭ vivas, la transiro al la homeco estus simple neklarigebla; tiuj simioj donas pli la impreson de devojiĝintaj flanklinioj, survoje al iom-post-ioma formortiĝo kaj ĉiukaze en situacio de dekadenco. Tio sole sufiĉas por rifuzi ĉian paralelkonkludon el iliaj familiformoj al tiuj de la prahomo. Sed reciproka tolero de la plenkreskaj maskloj, libero de ĵaluzo, estis la unua kondiĉo por estiĝo de tiaj pli grandaj kaj daŭremaj grupoj, en kies sino la homiĝo de la animalo sole nur povis plenumiĝi. Kaj efektive, kion ni trovas kiel la plej malnova, plej praa formo de familio, kiun ni povas en la historio nerefuteble pruvi kaj ankoraŭ hodiaŭ ie kaj tie pristudi? La grupedzeco, la formo, en kiu tutaj grupoj da viroj kaj tutaj grupoj da virinoj posedas sin reciproke kaj kiu lasas nur malmultan spacon por ĵaluzo. Kaj krome ni trovas sur posta evoluŝtupo la esceptan formon de poliandrio, kiu eĉ pli kontraŭas ĉiajn sentojn de ĵaluzo kaj pro tio estas nekonata ĉe la bestoj. Sed ĉar la de ni konataj formoj de grupedzeco estas akompanataj de tiom strange komplikaj kondiĉoj ke ili nepre resendatas al pli fruaj, pli simplaj formoj de seksa interrilato kaj do lastinstance al periodo de senregula rilato kongrua kun la transiro el la

II La familio

besteco en la homecon, tial la indikoj de bestaj edzecoj rekondukas nin ĝuste al tiu punkto el kiu ili devis nin forkonduki.

Kion signifas: senregula seksrilato? Ke la nun aŭ en pli frua tempo validaj limoj de malpermeso ne validis. Ni jam vidis fali la barilon de ĵaluzo. Se io estas fakto, tiam tio ke la ĵaluzo estas relative malfrue evoluinta sento. La samo validas por la koncepto de incesto. Ne nur gefratoj estis origine paro, ankaŭ la seksrilato inter gepatroj kaj infanoj estas ankoraŭ hodiaŭ permesata ĉe multaj popoloj. Bancroft⁶ atestas tion pri la kaviatoj ĉe la Beringa Markolo, pri la kadiakoj ĉe Alasko, pri la tinnehoj en la interno de la brita Nordameriko; Letourneau kunmetas raportojn pri la sama fakto pri la Ĉipevejo-indianoj⁷, pri la kukuoj en Ĉilio, la kariboj, la karenoj en la Transganga Hindio; por eĉ ne mencii la rakontojn de la malnovaj grekoj kaj romanoj pri partoj, persoj, skitoj, hunnoj ktp. Antaŭ ol la incesto estis inventita (kaj ĝi estas invento, kaj pli eĉ ege valora), la seksrilato inter gepatroj kaj infanoj ne povis esti pli abomena ol tiu inter aliaj personoj apartenantaj al diversaj generacioj, kaj tio ja okazas eĉ en la plej filistraj landoj sen vekaj grandan hororon; eĉ maljunulinoj pli ol sesdekjaraj jen kaj jen edzigas, se ili estas sufiĉe riĉaj, junajn virojn ekzemple tridekjarajn. Sed se ni forprenis de la plej praaĵ familiformoj kiujn ni konas la kun ili ligitajn ideojn de incesto – ideoj kiuj estas totale malsamaj de la niaj kaj tre ofte rekte kontraŭdiras ilin –, tiam ni venas al formo de seksrilato kiu nomeblas nur senregula. Senregula en tio ke la limigoj faritaj poste per la moro ankoraŭ ne ekzistis. Sed el tio ne nepre sekvas por la ĉiutaga praktiko pelmela intermiksiĝo. Unuopaj pariĝoj dumtempaj tute ne estas ekskluditaj, kiuj konsistigas eĉ en la grupedzeco nun la plej multajn rilatojn. Kaj se la plej nova neanto

6 „The Native Races of the Pacific States of North America”, 1875, vol. I.

7 En la germana originalo: „... von den Chippeway-Indianern”. -vl

II La familio

de tia praa stato, Westermarck, nomas ĉiun staton edzeco, en kiu ambaŭ seksoj restas paro ĝis la nasko de la ido, tiam necesas diri ke tiu speco de edzeco tre bone povis okazi en la stato de senregula rilato, sen kontraŭdiri la senregulecon, t.e. la foreston de limigoj de la seksrilato starigitaj de la moro. Sed Westermarck eliras el la premiso ke

„senreguleco inkludas la subpremadon de la individuaj emoj”, tiel ke „la prostituado estas ĝia plej aŭtenta formo”.

Ŝajnas al mi, male, ke ĉia kompreno de la praa kondiĉoj restas malebla, tiom longe kiom oni rigardas ilin tra la okulvitroj de la bordelo. Ni revenos ĉe la grupedzeco al tiu punkto.

Laŭ Morgano, el tiu praa stato de senregula rilato evoluas, verŝajne tre frue:

1. La *sangparenca familio*

– la unua ŝtupo de la familio. Ĉi tie la geedzaj grupoj estas apartigitaj laŭ generacioj: Ĉiuj avoj kaj avinoj ene de la limoj de la familio estas ĉiuj inter si kunaj geedzoj, same ties idoj, do la patroj kaj patrinoj, kiel ties idoj siavice formas trian rondon da komunaj geedzoj, la pranepoj kvaran. En tiu familiformo do nur antaŭuloj kaj posteuloj, gepatroj kaj idoj estas ekskluditaj el la rajtoj kaj devoj (kiel ni dirus) de la komuna edzeco. Fratoj kaj fratinoj, kuzoj kaj kuzinoj de unua, dua kaj pli malproksima grado, estas ĉiuj gefratoj inter si kaj ĝuste *pro tio* ĉiuj geedzoj unu de la alia. La rilato de frato kaj fratino inkludas sur tiu ŝtupo la plenumadon de reciproka seksrilato per si mem.⁸ La tipa formo de tia

8 En letero de printempo de 1882 Markso esprimas sin per la plej fortaj esprimoj pri la totala falsado de la pratempo kiun montras la teksto de la Nibelungoj de Vagnero. „Ĉu estis iam dece ke la frato brakumis la fratinton fianĉe?” Al tiuj „voluptodioj” kiuj en tute moderna maniero pli spicas siajn amrilatojn

II La familio

familio konsistus el la idoj de paro, en kiuj la idaro de ĉiu grado estas inter si fratoj kaj fratinoj kaj ĝuste pro tio gedzoj inter si.

La sangparenca familio estis formortinta. Eĉ la plej krudaj popoloj, pri kiuj la historio rakontas, ne liveras proveblan ekzemplon pri ĝi. Sed ke ĝi *devas* esti ekzistinta, tiun supozon trudas al ni la havaĵa parencecsistemo valida ankoraŭ nun en tuta Polinezio, kiu esprimas gradojn de sangpareneco kiuj povas estiĝi nur sub tiu familiformo, al tiu supozo devigas nin la tuta plua evoluo de la familio kiu antaŭkondiĉas tiun formon kiel necesan antaŭŝupon.

per iomete da incesto, Markso respondas: „En la pratempo la fratino *estis* la edzino, kaj tio *estis* *moral*a.” [En la eldono de 1884 la piednoto finiĝas ĉi tie.] [Piednoto al la kvara eldono:] Franca amiko kaj ŝatanto de Vagnero ne konsentas kun tiu noto kaj rimarkigas, ke jam en la „pli malnova Eddo”, kiun Vagnero prenis kiel bazon, en la „Ögisdrecka”, Lokio riproĉas al Frajja: „Antaŭ la dioj vi brakumis la propran fraton.” La gefrata edzeco estis do jam tiam abomenata, laŭ li. La „Ögisdrecka” estas esprimo de erao en kiu la kredo je la malnovaj mitoj estis jam komplete rompita; ĝi estas pura lukianeca mokkanto pri la dioj. Se Lokio kiel la diablo [orig.: „Mefisto” -vl] faras en ĝi al Frajja tian riproĉon, tiam tio pledas ĝuste kontraŭ Vagnero. Lokio diras ankaŭ, kelkajn versojn poste, al Niördhr: „Kun via fratino vi generis (tian) filon” (vidh systur thinni gaztu slikan mög). Niördhr ja ne estas azo, sed vanao, kaj diras en la „Ynglinga” sagao ke gefrataj edzeco estis kutimaj en Vanaolando, kio ne estas tia ĉe la azoj. Tio povus esti pruvo ke la vanaoj estas pli malnovaj dioj ol la azoj. Ĉiukaze Niördhr vivas inter la azoj kiel ilia samspeculo, kaj tial la „Ögisdrecka” estas pli ĝuste pruvo ke dum la tempo de estiĝo de la norvegaj di-sagaoj la gefrata edzeco, almenaŭ inter la dioj, ankoraŭ ne abomenigis. Se oni volas senkulpigi Vagneron, oni eble farus pli bone citi, anstataŭ la „Eddo-n”, Goeton, kiu en la balado pri la dio kaj la bajadero faras similan eraron koncerne la religian virinfordonon kaj proksimigas ŝin multe tro al moderna prostituado.

2. La punalua familio

Se la unua progreso de la organiziĝo konsistis en tio, ekskludi gepatrojn kaj gefilojn el reciproka seksrilato, tiam la dua en la ekskludo de gefratoj. Tiu progreso estis, pro la pli granda aĝa sameco de la koncernatoj, senfine pli grava, sed ankaŭ pli malfacila ol la unua. Ĝi okazis iom post iom, komencante verŝajne⁹ per ekskludo de la korpaj gefratoj (t.e. de la patrina flanko) el la seksrilato, unue je izolitaj okazoj, iom post iom fariĝante regulo (en Havajo ankoraŭ en tiu ĉi jarcentoj okazis esceptoj) kaj finiĝante per malpermeso de geedziĝo eĉ inter flankparencaj gefratoj, t.e. laŭ nia nomado gefrat-infanoj, -nepoj kaj -pranepoj; ĝi donas, laŭ Morgano,

„bonegan ilustraĵon de tio, kiel la principo de natura selekto efikas”.

Nenia dubo, ke triboj, ĉe kiuj la incesto estis per tiu progreso limigita, devis pli rapide kaj pli plene evolui ol tiuj, ĉe kiuj la gefrata edzeco restis ankoraŭ regulo kaj ordono. Kaj kiom potence la efiko de tiu progreso estis sentata, tion pruvas la starigo de la gento, kiu rekte devenas de tiu progreso kaj multe transiris la celon, kaj kiu konsistigas la bazon de la socia ordo de la plej multaj, se ne de ĉiuj barbaraj popoloj de la Tero kaj el kiu ni en Grekio kaj en Romo rekte transiras en la civilizacion.

Ĉiu prafamilio devis plej malfrue post kelkaj generacioj dividiĝi. La origina komunisma ĉiommastrumado, kiu regas ĝis profunde en la meza barbareco senescepte, kondiĉas maksimuman grandon de la familia komunumo, ŝanĝiĝanta laŭ la kondiĉoj, sed ĉiuloke difinita. Ekde kiam la ideo de maldeco de seksrilato inter idoj de unu patrino aperis, ĝi devis montriĝi efika ĉe tiaj dividiĝoj de malnovaj kaj fondo de novaj domkomunumoj (kiuj tamen ne nepre samis kun la

9 En la eldono de 1884 mankas: „verŝajne”.

II La familio

familia grupo). Unu aŭ pluraj serioj de fratinoj fariĝis la kerno de la unua, iliaj korpaj fratoj la kerno de la alia. Tiel aŭ simile el la sangparenca familio fariĝis la formo kiun Morgano nomas la punalua familio. Laŭ la havaja moro, nombro da fratinoj, korpaj aŭ pli malproksimaj (t.e. kuzinoj de unua, dua aŭ pli malproksima grado) estis la komunaj virinoj de iliaj komunaj viroj, el kiuj tamen iliaj fratoj estis ekskluditaj; tiuj viroj nomis sin inter si jam ne fratoj, kiuj ili ja ankaŭ ne plu bezonis esti, sed punalua, t.e. intima kamarado, kvazaŭ asocio. Same serio de korpaj aŭ pli malproksimaj fratoj havis siron da virinoj, ne siajn fratinojn, en komuna edzeco, kaj tiuj virinoj nomis sin inter si punalua. Jen la klasika formo de familia formo kiu poste allasis serion da variaĵoj kaj kies esenca trajto estis: reciproka komuneco de la viroj kaj virinoj ene de difinita familirondo, el kiu tamen la fratoj de la virinoj, unue la korpaj, poste ankaŭ la pli malproksimaj, kaj inverse do ankaŭ la fratinoj de la viroj, estis ekskluditaj.

Tiu ĉi familiformo liveras al ni nun en la plej kompleta precizeco la parencegradojn, kiujn la amerika sistemo esprimas. La idoj de la fratinoj de mia patrino estas daŭre ties idoj, same la idoj de la fratoj de mia patro ankaŭ liaj idoj, kaj ili ĉiuj estas miaj gefratoj; sed la idoj de la fratoj de mia patrino estas nun ŝiaj genevoj, la idoj de la fratinoj de mia patro liaj genevoj, kaj ili ĉiuj miaj gekuzoj. Ĉar dum la viroj de la fratinoj de mia patrino estas daŭre ties viroj, kaj same la virinoj de la fratoj de mia patro ankaŭ ankoraŭ liaj virinoj – jure, kvankam ne ĉiam fakte –, la socia proskribo de seksrilato inter gefratoj dividis la ĝis tiam sendistinge kiel gefratoj traktitajn gefratinfanojn en du klasojn: La *unuaj* restas daŭre (pli malproksimaj) gefratoj inter si, la *aliaj*, la idoj jen de la frato, jen de la fratino, jam ne povas pli longe esti gefratoj, ili jam *ne povas* havi komunajn gepatrojn, nek patron kaj patrinon nek ambaŭ, kaj pro tio ĉi tie la klaso de nevo kaj nevinoj, kuzoj kaj kuzinoj fariĝas

2. La punalua familio

unufoje necesa, kiu sub la antaŭa familiordo estus sensenca. La amerika parencecsistemo, kiu ŝajnas pure sensenca ĉe ĉia familiformo kiu baziĝas sur ia ajn monogamio, estas per la punalua familio racie kaj per la naturo klarigita. Tie, kie tiu parencecsistemo estis disvastiĝinta, ankaŭ la punalua familio devas esti ekzistinta aŭ formo simila al ĝi¹⁰.

Tiu familiformo, kies reala ekzisto en Havajo estis pruvita, estus al ni verŝajne el tuta Polinezio transigita, se la piaj misiistoj, kiuj iam kiel la hispanaj monaĥoj en Ameriko, en tiaj kontraŭkristanaj kondiĉoj kapablintus vidi ion alian ol la simplan „hororon”.¹¹ Se Cezaro rakontas al ni pri la britoj, kiuj tiam troviĝis sur la meza ŝtupo de barbareco, ke „ili havas siajn virinojn dekope aŭ dekduope inter si, kaj tio plej ofte fratoj kun fratoj kaj gepatroj kun infanoj” – tio klariĝas plej bone kiel grupedzeco.¹² Barbaraj patrinoj ne havas dek ĝis dek du filojn sufiĉe aĝajn por havi komunajn virinojn, sed la amerika parencecsistemo, kiu kongruas kun la punalua familio, liveras multajn fratojn, ĉar ĉiuj proksimaj kaj malproksimaj kuzoj de viro estas liaj fratoj. Tiu esprimo „gepatroj kun infanoj” povas esti erara kompreno de Cezaro; tamen ke patro kaj filo, aŭ patrino kaj filino povus troviĝi en la sama geedza grupo, estas ĉe tiu sistemo ne absolute ekskludita, sed jes ja patro kaj filino, aŭ patrino kaj filo. Tiu aŭ simila formo de grupedzeco liveras ankaŭ la plej facilan klarigon de la raportoj de Herodoto kaj de aliaj malnovaj verkistoj pri oficiala komuna posedo de virinoj ĉe sovaĝaj kaj barbaraj popoloj. La samo direblas pri tio kion

10 En la eldono de 1884 mankas: „aŭ formo simila al ĝi”.

11 La spuroj de sendistinga seksrilato, de ĝia tiel nomata „marĉgenerado”, kiun Bachofen kredas esti trovinta, estas kontribu-eblaj, kio nun jam ne pridubindas, al la grupedzeco. „*Se Bachofen trovas tiujn punalua-edzecojn 'senleĝaj', homo el tiu periodo trovas la plej multajn nunajn edzecojn inter proksimaj kaj malproksimaj kuzoj de patra aŭ patrina flanko incestaj, ĉar kiel edzecoj inter sangparencaj gefratoj.*” (Markso)

12 En la eldono de 1884: punalua familio.

II La familio

Watson kaj Kaye¹³ rakontas pri la tikuroj en Audh (norde de la rivero Gango):

„Ili vivas kune” (t.e. sekse) „preskaŭ sendistinge en grandaj komunumoj, kaj se du homoj estas konsiderataj edziĝintaj, tiam tiu ligo estas tamen nur nominala.”

Rekte devena el la punalua familio ŝajnas en la granda plimulto de la kazoj la institucio de la *gento*. Kvankam ankaŭ la aŭstralia klassistemo donas elirpunkton por tio, la aŭstralianoj havas ja gentojn, sed ankoraŭ ne punaluan familion, nome pli krudan formon de grupedzeco.¹⁴

Ĉe ĉiuj formoj de grupa familio estas ne certa kiu estas la patro de infano, sed certas kiu estas ĝia patrino. Eĉ se ŝi nomas ĉiujn infanojn de la ĉiomfamilio siaj infanoj kaj havas patrinajn devojn por ili, ŝi tamen konas siajn korpajn infanojn inter la aliaj. Estas do klare ke, se grupedzeco ekzistas, la deveno pruveblas nur de la *patrina* flanko, do ke estas agnoskata nur la *virina linio*. Tio estas efektive la kazo ĉe ĉiuj sovaĝaj popoloj kaj tiuj apartenantaj al la malalta barbara ŝtupo; kaj esti malkovrinta tion la unua, estas la dua granda merito de Bachofen. Li nomas tiun ekskluzivan agnoskon de la devensekvo laŭ la patrino kaj la heredrilatojn rezultantajn kun la fluo de la tempo el tio: patrinrajto; mi konservas tiun nomon, pro ĝia mallongeco. Sed ĝi ne estas tute ĝusta, ĉar sur tiu socia ŝtupo ankoraŭ ne temas pri rajto en la jura senco.

Se ni prenas nun el la punalua familio unu el la du modelgrupoj, nome tiun de serio da korpaj kaj pli malproksimaj (t.e. en la unua, dua aŭ pli malproksima grado devenantaj de korpaj fratinoj) fratinoj, kune kun ties infanoj kaj iliajn korpajn aŭ pli malproksimajn fratojn de

13 „The People of India”.

14 En la eldono de 1884: „Ilia organizaĵo estas tamen tro sporada ol ke ni povus konsideri ĝin” (anstataŭ: „sed pli krudan formon de grupedzeco”).

2. La punalua familio

patrina flanko (kiuj laŭ nia premiso ne estas iliaj viroj), ni havas precize la rondon da personoj kiuj poste aperas kiel membroj de gento en la praformo de tiu institucio. Ili havas ĉiuj komunan prapatrinon, pro la deveno, de kiuj la inaj posteuloj estas pogeneracie fratinoj. Sed la viroj de tiuj fratinoj jam ne povas esti iliaj fratoj, do ne devenaj de tiu prapatrino, do ne apartenas al la sangparenca grupo, la posta gento; sed iliaj idoj apartenas al tiu grupo, ĉar deveno nur de patrina flanko estas decida, ĉar sole ĝi certa. Ekde kiam la proskribo de seksrilato inter ĉiuj gefratoj, ankaŭ inter la plej malproksimaj flankparencoj de patrina flanko, fiksiĝis, ankaŭ la supra grupo transformiĝis en gento, t.e. ĝi konstituigis sin kiel fiksa rondo de sangparencoj de patrina linio, kiuj inter si ne rajtas geedziĝi, kaj kiu de nun pli kaj pli firmiĝas per aliaj komunaj institucioj de socia kaj religia speco kaj distingiĝas de la aliaj gentoj de la sama tribo. Pri tio poste pli detale. Sed se ni trovas kiom ne nur necese, sed eĉ memkompreneble la gento evoluas el la punalua familio, tiam evidentas supozi la iaman ekziston de tiu familiformo kiel preskaŭ certa por ĉiuj popoloj, ĉe kiuj gentaj institucioj pruveblas, t.e. por preskaŭ ĉiuj barbaraj kaj kulturaj popoloj.¹⁵

Kiam Morgano verkis sian libron, nia kono de la grupedzeco estis ankoraŭ tre limigita. Oni sciis iom malmultan pri la grupaj edzeco de la aŭstralianoj organizitaj en klasoj, kaj krome Morgano estis jam publikiginta en 1871 la novaĵojn kiujn li ricevis pri la havaja punalua familio. La punalua familio liveris unuflanke la kompletan klarigon por la parencecsistemo reganta inter la amerikaj indianoj, kiu estis por Morgano la elirpunkto por ĉiuj liaj esploradoj; ĝi konsistigis aliflanke la pretan elirpunkton por deduktado de la patrinaranta gento; ĝi prezentis fine multe pli altan evoluŝtupon ol la aŭstraliaj klasoj. Estis do kompreneble ke Morgano kom-

15 En la eldono de 1884 mankas la sekva teksto ĝis la paragrafo:
3. La pariĝa familio ... (p. 51)

II La familio

prenis ĝin kiel la evoluŝtupo necese antaŭanta la parigan edzecon kaj atribuis al ĝi ĝeneralan disvastiĝecon en pli frua tempo. Post tio ni ekkonis serion da aliaj formoj de grupedzeco kaj scias nun ke Morgano ĉi tie iris tro antaŭen. Sed li havis ja la bonŝancon trafi en sia punalua familio sur la plej altan, la klasikan formon de la grupedzeco, sur tiun formon, el kiu la transiro al pli alta formo plej simple klariĝas.

La plej gravan riĉigon de niaj konoj pri la grupedzeco ni dankas al la angla misiisto Lorimer Fison, kiu studis dum jaroj tiun familiformon sur ĝia klasika grundo, Aŭstralio. La plej malaltan evoluŝtupon li trovis ĉe la aŭstraliaj nigruloj ĉe la Monto Gambier en suda Aŭstralio. Tie la tuta tribo estas dividita en du grandaj klasoj; *kroki* kaj *kumite*. La seksrilato ene de ĉiu tia klaso estas severe malŝatata; male ĉiu viro de unu klaso estas la ennaskita edzo de ĉiu virino de la alia klaso, kaj tiu estas lia ennaskita edzino. Ne la individuoj, la tutaj grupoj estas geedzigitaj unu al la alia, klaso kun klaso. Kaj notu bone, ĉi tie ekzistas nenia rezervo pri aĝa diferenco aŭ specifa sangparenceco, krom tiu kondiĉita per la divido en du ekzogamiaj klasoj. Krokio havas kiel rajtan edzinon ĉiun kumitean virinon; sed ĉar lia propra filino, kiel filino de kumitea virino, laŭ patrinrajto estas ankaŭ kumiteo, ŝi estas per tio la ennaskita edzino de ĉiu krokio, do ankaŭ de sia patro. Almenaŭ la klasa organizo, tia kian ni konas ĝin, ne malhelpas tion. Do, aŭ tiu organizo estiĝis en tempo dum kiu, malgraŭ ĉia malklara deziro limigi la inceston, oni ankoraŭ ne trovis ion teruran en la seksrilato inter gepatroj kaj iliaj idoj – kaj tiukaze la klassistemo estiĝis rekte el stato de senregula seksa rilato. Aŭ la rilato inter gepatroj kaj idoj *estis* jam malŝatata per la moro, kiam la klasoj estiĝis, kaj tiukaze la nuna stato montras sian devenon el la sangparenca familio kaj estas la unua paŝo el ĝi. Tiu lasta hipotezo estas la pli verŝajna. Ekzemploj de seksa rilato inter gepatroj kaj ties idoj miascie ne estas menciataj

2. La punalua familio

el Aŭstralio, kaj ankaŭ la posta formo de ekzogamio, la patrinrajtaj gento, ĝenerale antaŭkondiĉas silente la malpermeson de tiu rilato, ekzemple kiel io jam ekzistantan ĉe ĝia estiĝo.

La duklasa sistemo troviĝas, krom ĉe la Monto Gambier en Sudaŭstralio, ankaŭ ĉe la rivero Darlingo pli oriente kaj en Queensland nordoriente, estas do tre disvastiĝinta. Ĝi ekskludas nur la edzecon inter gefratoj, inter fratidoj kaj inter fratinidoj de patrina flanko, ĉar tiuj apartenas al la sama klaso; la idoj de fratino kaj de frato, male, povas geedziĝi. Plian paŝon por malhelpi inceston ni trovas ĉe la kamlaroj¹⁶ ĉe la rivero Darlingo en Nova Sud-Kimrio, kie la du originaj klasoj estas dividitaj en kvar kaj kie ĉiu de tiuj kvar klasoj estas same kolektive edziĝinta al difinita alia. La unuaj du klasoj estas ennaskitaj geedzoj unu de la alia; laŭ tio ĉu la patrino apartenis al la unua aŭ al la dua, la idoj falas en la trian aŭ kvaran; la idoj de tiuj du, same geedzigitaj klasoj unu al la alia, apartenas siavice al la unua aŭ al la dua. Tiel ĉiam generacio apartenas al la unua kaj dua, la sekva al la tria kaj kvara, la postsekva ree al la unua kaj dua klasoj. Laŭ tio, gefratidoj (de patrina flanko) ne povas esti geedzoj, sed genepoj de gefratoj jes ja povas. Tiu aparte komplika ordo fariĝas ankoraŭ pli implikita per la – ĉiukaze pli posta – algrefito de patrinrajtaj gentoj, sed ni ne povas pritrakti tion. Oni ĉiukaze vidas, ke la deziro malhelpi inceston iel kaj alie realiĝas, sed tute nature palpante, sen klara konscio pri la celo.

La grupedzeco, kiu ĉi tie en Aŭstralio estas ankoraŭ klasa geedzeco, amasa edzeco de tuta klaso de viroj dissemita tra la tuta kontinento kun same disvastiĝinta klaso de virinoj – tiu grupedzeco de proksime ne aspektas tiom terura kiom imagas la filistra fantazio kutimiĝinta al la bordelreĝimo. Male, daŭris longajn jarojn ĝis kiam oni nur antaŭsupozis ĝian ekzistadon, kaj eĉ nun denove oni kontestas ĝin. Al

16 En la originalo: „Kamlaroj”. -vl

II La familio

la supraĵa observanto ĝi prezentiĝas kiel malstrikta monogamio kaj kelkloke poligamio apud okaza malfideleco. Oni devas ja dediĉi jarojn, kiel faris Fison kaj Howitt, por malkovri en tiuj geedzaj kondiĉoj, kiuj en sia praktiko donas al la ordinara eŭropano eĉ iom hejmecan senton, la reguligan leĝon, la leĝon laŭ kiu la fremda aŭstralia nigrulo, milojn da kilometroj for de sia hejmregiono, inter homoj kies lingvon li ne komprenas, tamen ne malofte de tendaro al tendaro, de tribo al tribo, trovas virinojn, kiuj senreziste kaj fideme donas sin al li, kaj laŭ kiu tiu kiu havas plurajn virinojn, cedas unu el ili por la nokto al la gasto. Kie la eŭropano vidas senmoralecon kaj senleĝecon, fakte regas severa leĝo. La virinoj apartenas al la geedza klaso de la fremdulo kaj estas sekve liaj ennaskitaj edzinoj; la sama morleĝo kiu atribuas ilin reciproke, malpermesas je puno de proskribo ĉian seksrilaton ekster la geedzaj klasoj apartenantaj al si reciproke. Eĉ tie kie virinoj estas rabataj, kio okazas ofte kaj estas la regulo en kelkaj regionoj, oni zorge respektas la klasleĝon.

Ĉe virinrabado montriĝas cetere jam ĉi tie spuro de la transiro al monogamio, almenaŭ en la formo de pariĝa geedzeco: Kiam la junulo kun helpo de siaj amikoj estas rabinta aŭ forkondukinta la knabinon, ŝi estas laŭvice sekse uzata de ili ĉiuj, sed poste estas ankaŭ konsiderata edzino de la junulo kiu instigis al la rabo. Kaj inverse, se la rabita virino forkuras de la viro kaj estas kaptita de iu alia, tiam ŝi fariĝas ties edzino, kaj la unua perdis sian rajton. Apud kaj ene de la ĝenerale plu ekzistanta grupedzeco fariĝas do ekskluzivaj rilatoj, pariĝoj je pli aŭ malpli longa tempo, apud poligamio, tiel ke la grupedzeco estas ankaŭ ĉi tie formortanta, kaj stariĝas nur la demando, kiu sub la eŭropa influo malaperos unue el la scenejo: ĉu la grupedzeco aŭ la ĝin praktikanta aŭstralia nigrulo.

Edzeco laŭ tutaj klasoj, kia ĝi regas en Aŭstralio, estas ĉiukaze tre malalta kaj origina formo de la grupedzeco,

2. La punalua familio

dum la punalua familio, tiom kiom ni scias, estas ĝia plej alta evoluŝtupo. La unua ŝajnas esti la formo kiu respondas al la socia stato de la vaganta sovaĝulo, la dua antaŭkondiĉas jam relative fiksjajn setlejojn de komunismaj socioj kaj kondukas rekte en la pli altan evoluŝtupon. Inter ambaŭ ni certe trovos ankoraŭ diversajn mezajn ŝtupojn; ĉi tie kuŝas antaŭ ni esplorkampo ĝis nun nur malfermita, ankoraŭ apenaŭ enirita.

3. La *pariĝa familio*

Certa pariĝo, por pli aŭ malpli longa tempo, okazis jam sub la grupedzeco aŭ ankoraŭ pli frue; la viro havis ĉefedzinon (ankoraŭ eblas apenaŭ diri preferata edzino) inter la multaj virinoj, kaj li estis por ŝi la precipa edzo inter la aliaj. Tiu cirkonstanco ne malmulte kontribuis al la konfuzo ĉe la misiistoj, kiuj vidas en la grupedzeco¹⁷ jen senregulan oficialan komunan posedon de la virinoj, jen intencan adulton. Sed tia kutima pariĝo devis pli kaj pli firmiĝi, ju pli la gento elformiĝis kaj ju pli la klasoj de „fratoj” kaj „fratinoj” fariĝis multnombraj, inter kiuj geedziĝo estis nun malebla. La impulso de la gento por malebligi geedziĝon inter sangparencoj efikis eĉ pli antaŭen. Ni trovas ekzemple ke ĉe la irokezoj kaj ĉe la plej multaj aliaj indianoj troviĝantaj sur la malsupra ŝtupo de barbareco la edzeco estas malpermesata inter ĉiuj parencoj kiun ilia sistemo nombras, kaj tio estas plurcent specoj. Ĉe tiu kreskanta komplikiĝo de edziĝ-malpermesoj, grupedziĝoj fariĝis ĉiam pli maleblaj; ili estis anstataŭigitaj de la *pariĝa familio*. Sur tiu ŝtupo unu viro kunvivis kun unu virino, sed tiel ke poligamio kaj okaza malfidelo restis rajto de la viroj, kvankam la unua pro ekonomiaj kialoj okazas malofte; dum oni postulis de la virinoj por la daŭro de la kunvivado plej ofte plej severan fidelon kaj kruele punis ŝian adulton. Sed la geedza ligo estas faci-

17 En la eldono de 1884: punalua familio.

II La familio

le malligebla de ĉiu parto, kaj la infanoj apartenas nun kiel antaŭe sole al la patrino.

Ankaŭ en tiu ĉi ĉiam pli etendigita ekskludo de sangparencoj el edzeco la natura selekto plu efikas. Per la vortoj de Morgano:

„La edzeco inter ne sangparencaj gentoj produktis pli fortan rason, korpe kiel spirite; du progresantaj triboj intermiksiĝis, kaj la novaj kranioj kaj cerboj ampleksiĝis nature, ĝis kiam ili entenis la kapablojn de *ambau*.”

Triboj kun genta reĝimo devis tiel akiri superecon super la postrestintaj aŭ sekvigi ilin per sia modelo.

La evoluo de la familio en la prahistorio konsistas do en la konstanta striktigo de la rondo origine entenanta la tutan tribon, ene de kiu regas geedza komuneco inter la du seksoj. Per konstanta ekskludado de unue proksimaj, poste ĉiam pli malproksimaj parencoj, fine de nur aledzigitaj, fine ĉia speco de grupedzeco fariĝas malebla, kaj restas fine nur la sola, provizore ankoraŭ malfikse ligita paro, la molekulo, per kies malestigo la edzeco entute ĉesas. Jam el tio montriĝas, kiom malmulte la individua seksa amo en la hodiaŭa senco de la vorto havis por fari kun la estiĝo de la monogamio. Tion pravas ankoraŭ pli la praktiko de ĉiuj popoloj kiuj staras sur tiu ŝtupo. Dum en pli antaŭaj familiformoj al la viroj neniam mankis virinoj, ili male havis pli ol sufiĉe da ili, virinoj fariĝis nun maloftaj kaj serĉataj. Pro tio komenciĝas ekde la edzeco rabo kaj aĉeto de virinoj – tre vastiĝintaj *simptomoj*, sed neniom pli, de okazinta pli profunda ŝanĝo; tiujn simptomojn, nurajn metodojn akiri virinojn, la pedanta skoto McLennan tamen levis fantazie al apartaj familiklasoj nomante ilin „rabeledzeco” kaj „aĉetedzeco”. Ankaŭ alie, ĉe la amerikaj indianoj kaj aliloke (sur sama ŝtupo) la geedziĝo ne estas afero de la koncernatoj, kiuj ofte estas tute ne demandataj, sed de iliaj patrinoj. Tiel du homoj kiuj tute ne konas sin estas ofte fianĉigitaj kaj sciigataj pri la afero nur

3. La pariĝa familio

kiam la tempo de geedziĝo proksimiĝas. Antaŭ la edziĝo la fianĉo faras al la gentparencoj de la fianĉino (do al la patri-na parenkaro, ne al la patro kaj ties parencoj) donacojn konsideratajn kiel aĉetaj kompensaĵoj por la cedita knabino. La edzeco restas nuligebla laŭ la plaĉo de ĉiu el la du geed-zoj: Tamen iom post iom formiĝis ĉe multaj triboj, ekz-e ĉe la irokezoj, publika opinio kontraŭa al tiaj disiĝoj; ĉe kverel-oj la gentparencoj de ambaŭ partoj intervenas perante, kaj nur kiam tio ne efikas, okazas disiĝo, ĉe kiu la infanoj rest-as ĉe la virino kaj post kiu ĉiu rajtas alie edziĝi.

La pariĝa familio, mem tro malforta kaj tro malstabila por bezoni aŭ eĉ nur deziri propran mastrumadon, tute ne forigas la komunisman mastrumadon hereditan el pli frua tempo. Sed komunisma mastrumado signifas regado de la virinoj en la domo, kaj ekskluzivan agnoskon de la korpa virino ĉe maleblo koni kun certeco la korpan patron, altan respektadon de la virinoj, t.e. de la patrinoj. Estas unu el la plej absurdaj ideoj, sed devenaj el la klerismo de la 18-a jarcento, ke la virino estis ĉe la origino de la socio sklavino de la viro. La virino havas ĉe ĉiuj sovaĝuloj kaj ĉiuj barbaroj de la malsupra kaj meza ŝtupoj, parte ankoraŭ de la supra ŝtupo, pozicion ne nur liberan, sed alte respektatan. Kion ŝi estas ankoraŭ en la edzeco, tion atestu Arthur Wright, long-jara misiisto inter la seneko-irokezoj:

„Koncerne iliajn familiojn, en la tempo kiam ili loĝis ankoraŭ en la malnovaj longaj domoj,” (komunismaj mastrumadoj de pluraj familioj) „... tie ĉiam antaŭregis klano” (gento) „tiel ke la virin-oj prenis siajn virojn el la aliaj klanoj” (gentoj) „... Ĝenerale la virina parto regis la domon; la provizoj estis komunaj; sed ve al la malfeliĉa edzo aŭ amanto kiu estis tro pigra aŭ tro mallerta kontribui sian parton al la komuna provizo. Egale kiom da infanoj aŭ kiom da propra posedaĵo li havis en la domo, ĉiumomen-te li povis atendi la ordonon paki sian havaĵon kaj foriri. Kaj li ne provu rezisti al tio; la domo fariĝis al li tro neeltenebla, res-tis al li nenio alia ol reveni en sian propran klanon” (genton) „aŭ, kio okazis plej ofte, serĉi novan edzecon en alia klano. La

II La familio

virinoj estis la granda potenco en la klanoj” (gentoj) „kaj ankaŭ ĉie aliie. Okaze ili ne hezitis malnomumi tribestron kaj degradi lin al ordinara militisto.”

La komunisma mastrumado, en kiu la virinoj apartenis plejmulte aŭ ĉiuj al unu sama gento, sed la viroj al diversaj gentoj, estas la fakta bazo de tiu en la pratempo ĝenerale disvastiĝinta dominado de la virinoj, kies malkovro estas tria merito de Bachofen. – Aldone mi rimarkigu ke la raportoj de vojaĝantoj kaj misiistoj pri ŝarĝo de la virinoj per troa laboro ĉe la sovaĝuloj kaj barbaroj tute ne kontraŭdiras la supre diriton. La divido de la laboro inter ambaŭ seksoj obeas al tute aliaj kaŭzoj ol al la pozicio de la virino en la socio. Popoloj, ĉe kiuj la virinoj devas labori multe pli ol decas laŭ nia ideo, havas por la virinoj ofte multe pli da vera estimo ol niaj eŭropanoj. La sinjorino de la civilizacio, ĉirkaŭata de ŝajnamaĝoj kaj fremdigita je ĉia reala laboro, havas senfine pli malaltan socian pozicion ol la forte laboranta virino de la barbareco, kiu estis en sia popolo konsiderata kiel vera sinjorino (*lady, frowa*, virino = sinjorino) kaj ankaŭ estis tia laŭ sia karaktero.

Ĉu la edzeco en Ameriko hodiaŭ komplete anstataŭis la grupedzeco¹⁸, tion devas decidi pli detalaj esploradoj pri la nordokcidentaj kaj speciale pri la sudamerikaj popoloj, kiuj staras ankoraŭ sur la supra ŝtupo de sovaĝeco. Pri tiuj lastaj oni rakontas tiom multajn ekzemplojn de seksa nelimito, ke komplementa superado de la malnova grupedzeco ĉi tie apenaŭ supozeblas.¹⁹ Ĉiukaze ankoraŭ ne malaperis ĉiaj ĝiaj spuroj. Ĉe almenaŭ kvardek nordamerikaj triboj la viro kiu edzinigas plej aĝan fratinojn, havas la rajton alpreni kiel virinojn ankaŭ ĉiujn ties fratinojn ekde kiam ili atingas la preskribitan aĝon: resto de la komuneco de la viroj por la tuta serio da fratinoj. Kaj pri la duoninsulaj kalifornianoj (supra ŝtupo de sovaĝeco) Bancroft rakontas ke ili havas

18 En la eldono de 1884: punaluan familion.

19 En la eldono de 1884 la lasta frazo mankas.

3. La pariĝa familio

certajn festajn okazojn ĉe kiuj pluraj „triboj” kunvenas cele al sendistinga seksumado. Ili estas evidente gentoj, kiuj en tiuj festoj konservas la malklaran memoron de la tempo kiam la virinoj de *unu* gento havis ĉiujn virojn de la alia kiel sian komunan edzaron kaj inverse.²⁰ La sama moro regas ankoraŭ en Aŭstralio. Ĉe kelkaj popoloj okazas ke la pli maljunaj viroj, la tribestroj kaj sorĉpastroj ekspluatas por si la komunan posedon de la virinoj kaj monopoligas la plej multajn virinojn por si; sed kompanse ili devas, ĉe certaj festoj kaj grandaj popolkunvenoj, lasi la malnovan komunekon ree realiĝi kaj la virinojn ĝui la junajn virojn. Tuta serio da ekzemploj de tiaj periodaj saturnalaj festoj, kie la malnova libera seksumado por mallonga tempo ree validas, estas raportata de Westermarck, p. 28/29: ĉe la hosoj, la santaloj, la panĝoj kaj kotaroj en Hindio, ĉe kelkaj afrikaj popoloj ktp. Strange, Westermarck konkludas el tio ke tio estas restaĵo ne de la grupedzeco, kiun li neas, sed – de la seksarda periodo kiun la prahomo dividas kun la aliaj animaloj.

Ĉi tie ni trafas sur la kvara granda malkovro de Bachofen, la malkovro de la tre vastiĝinta transira formo de la grupedzeco al la pariĝo. Tio, kion Bachofen prezentas kiel pentofaro por rompo de la malnovaj di-ordonoj: la pentofaro per kiu la virino aĉetas la rajton je ĉasteco, estas fakte nur mistika esprimo por la pentofaro per kiu la virino elaĉetas

20 La sekva teksto ĝis la paragrafo: La pariĝa familio ... (p. 57) estas la versio ampleksigita de Engelso en 1892. Ĝi tekstis en 1884: „Similaj restaĵoj el la malnova mondo estas sufiĉe konataj, ekz-e la fordonoj de la fenicaj knabinoj en la templo dum la festoj de Aŝtaroto; eĉ la mezepoka *rajto je la unua nokto*, kiu havis malgraŭ la novromantikaj germanaj blankigoj tre palpeblan ekzistadon, estas supozeble resto de la punalua familio heredita tra la kelta gento (la klano).” – Kursivigo de la tradukinto. „Rajto je la unua nokto” estis tiu de feŭda sinjoro, okaze de edziĝo de subulino, igi ŝin pasigi la unuan nokton de sia edzineco kun li. -vl

II La familio

sin el la malnova virkomuneco kaj akiras la rajton fordoni sin al nur *unu* viro. Tiu pentofaro konsistas el limigita fordoniĝo: La babilonaj virinoj devis unufoje jare fordoni sin en la templo de la Militto; aliaj proksimorientaj popoloj sendis siajn knabinojn dum jaroj en la templon de la Anaito, kie ili devis okupiĝi pri libera amo kun mem elektitaj favoratoj antaŭ ol rajti edziniĝi; similaj religie vestitaj moroj estas komunaj al preskaŭ ĉiuj aziaj popoloj inter Mediteraneo kaj Gango. La pentofero por la elaĉeto fariĝas kun la fluo de la tempo ĉiam pli facila, kiel jam Bachofen rimarkigas:

„La ĉiujare ripetata fordoniĝo cedas al unufoja faro, al la hetajrismo de la matronoj sekvas tiu de la knabinoj, al la dumedzeca plenumado tiu antaŭedzeca, al la sendistinga transcedo al ĉiuj tiu al certaj personoj.”²¹

Ĉe aliaj popoloj mankas ĉia religia maskado; ĉe kelkaj – trakoj, keltoj ktp en la antikveco, ĉe multaj praloĝantoj de Hindio, ĉe malajaj popoloj, ĉe pacifikaj insulanoj kaj multaj amerikaj indianoj ankoraŭ hodiaŭ – la knabinoj ĝuas ĝis sia edziniĝo la plej grandan seksan liberecon. Speciale preskaŭ ĉie en Sudameriko, pri kio ĉiu povas atesti, kiu venis iomete en la internon. Ekz-e Agassiz²² rakontas pri riĉa indiandevena familio; kiam li estis konatigata kun la filino, li demandis pri ŝia patro, pensante ke tiu estas la edzo de la patrino, kiu kiel oficiro estis militanta en la milito kontraŭ Paragvajo; sed la patrino respondis ridete: Naŭ tem pai, é filha da fortuna, ŝi ne havas patron, ŝi estas hazarda infano.

„En tiu maniero indianaj aŭ duonsangaj virinoj parolas ĉiam sen honto aŭ mallaŭdo pri siaj eksteredzecaj infanoj; kaj tio estas tute ne malkutima, pli ĝuste la malo ŝajnas esti escepto. La infanoj ... konas ofte nur sian patrinon, ĉar ĉia zorgado kaj respondeco falas sur ŝin; pri sia patro ili scias neniom; ankaŭ la virino ne ŝajnas havi la ideon ke ŝi aŭ ŝiaj infanoj havas ian ajn pretendon je li.”

21 „Mutterrecht”, p. XIX.

22 „A Journey in Brazil”, Bostono kaj Novjorko, 1868, p. 266.

3. La pariĝa familio

Tio, kio ĉi tie al la civilizito ŝajnas stranga, estas simple la regulo laŭ patrinrajto kaj en la grupedzeco.

Ĉe ankoraŭ aliaj popoloj la amikoj kaj parencoj de la fianĉo aŭ la edziĝfestaj gastoj dum la edziĝfesto mem transprenas la malnove hereditan rajton je la fianĉino, kaj la vico de la fianĉo estas nur la lasta; ekz-e sur la Balearoj kaj ĉe la afrikaj aŭgiloj²³ en la antikveco, ĉe la bareoj en Abesinio ankoraŭ nun. Ĉe ankoraŭ aliaj, oficiala persono, la tribo aŭ genta prezidanto, tribestro, ŝamano, pastro, princo aŭ kiel ajn li nomiĝas, reprezentas la komunumon kaj uzas ĉe la fianĉino la rajton je la unua nokto. Malgraŭ ĉiaj novromantikaj blankigadoj tiu ĉi *jus primae noctis* ekzistas kiel resto de la grupedzeco ankoraŭ nuntempe ĉe la plej multaj loĝantoj de la alaska regiono²⁴, ĉe la tahoj²⁵ en norda Meksiko²⁶ kaj aliaj popoloj; kaj ĝi ekzistis almenaŭ en origine keltaj landoj, kie ĝi estis tradiciita rekte el la grupedzeco, dum la tuta mezepoko, ekz-e en Aragonio. Dum en Kastilio la kampkulturisto estis neniam servuta, en Aragonio regis la plej honta servuteco ĝis la verdikto de Ferdinando la Katolika de 1486. En tiu akto legeblas:

„Ni juĝas kaj deklaras ke la supre menciitaj sinjoroj” (*senyors*, baronoj) „... ankaŭ ne povas en la unua nokto, kiam la kampulo prenas virinon, kuŝi ĉe ŝi, aŭ kiel signo de la sinjoreco, en la edziĝnokto, post kiam la virino iris en la liton, paŝi super tiu aŭ super la menciita virino; nek povas la supre menciitaj sinjoroj uzi la filinon aŭ la filon de la kampulo, kun pago aŭ sen pago, kontraŭ ilia volo.”²⁷

Bachofen krome tute pravas kiam li ĉie asertas ke la transiro de tio kion li nomas „hetajrismo” aŭ „marĉgenera-

23 En la originalo: „bei den afrikanischen Augilern ...”. -vl

24 Bancroft, „Native Races”, I, 81.

25 En la originalo: „bei den Tahus ...”. -vl

26 saml., p. 584.

27 Citita en la kataluna originalo ĉe Sugenheim, „Leibeigenschaft” Peterburgo, 1861, p. 35.

II La familio

do”, al la monogamio okazis esence per la virinoj. Ju pli kun la evoluo de la ekonomiaj vivkondiĉoj, do kun la subfosado de la malnova komunismo kaj kun la kreskanta denseco de la loĝantaro la malnove tradiciitaj seksrilatoj perdis sian arbare natur-naivan karakteron, des pli ili devas ŝajni al la virinoj humiligaj kaj premaj; des pli urĝe ili devis deziri kiel elsaviĝon la rajton je ĉasteco, je portempa aŭ je konstanta edzineco kun nur unu viro. Tiu progreso ne povis veni de la viroj jam pro tio ke ili entute neniam, ankaŭ ne ĝis hodiaŭ havis la ideon rezigni pri la agrablecoj de la fakta grupedzeco. Nur post kiam la transiro al la edzeco estis farita de la virinoj, la viroj povis enkonduki la striktan monogamion – tamen nur por la virinoj.

La pariĝa familio fontis ĉe la limo inter sovaĝeco kaj barbareco, plej ofte jam sur la supra ŝtupo de la sovaĝeco, ie kaj tie nur sur la malsupra ŝtupo de barbareco. Ĝi estas la karakteriza familiformo por la barbareco, kiel la grupedzeco por la sovaĝeco kaj la monogamio por la civilizacio. Por plu disvolvi ĝin al fiksa monogamio, necesis aliaj kaŭzoj ol tiuj kiujn ni trovis efikantaj ĝis ĉi tie. La grupo estis en la pariĝo jam reduktita al sia lasta unuo, ĝia duatoma molekulo: al unu viro kaj unu virino. La natura selekto plenumis sian verkon per la ĉiam pli granda ekskludado el la edzeca komunumo; en tiu direkto jam restis nenio por fari. Do, se ne novaj, *sociaj* movfortoj aperis kiel efikantaj, tiam ne estis kaŭzo por estiĝo de nova familiformo el la pariĝo. Sed tiuj movfortoj ekagis.

Ni forlasas nun Amerikon, la klasikan grundon de la pariĝa familio. Nenia signo konkludigas ke tie evoluis pli alta familiformo, ke tie antaŭ la malkovro kaj konkero iam ie ekzistis fiksa monogamio. Alie statas la afero en la malnova mondo.

Ĉi tie la malsovaĝigo de la dombestoj kaj la bredado de gregoj estis disvolvintaj ĝis tiam ne supozitan fonton de

3. La pariĝa familio

riĉaĝo kaj kreintaj tute novajn sociajn kondiĉojn. Ĝis la malsupra ŝtupo de barbareco la konstanta riĉaĝo konsistis preskaŭ nur el la domo, la vestaĝo, kruda ornamaĝo kaj la iloj por akiro kaj preparado de la nutraĝo: boato, armiloj, plej simpla meblaro. La nutraĝo estis tagon post tago denove akirenda. Nun, kun la gregoj de ĉevaloj, kameloj, azenoj, bovoj, ŝafoj, kaproj kaj porkoj la antaŭen irantaj paŝtistaj popoloj – la arjoj en la hindia kvinrivera lando kaj en la ganga regiono kaj en la tiam ankoraŭ multe pli akvoriĉaj stepoj ĉe la riveroj Okso kaj Jaksarto, la ŝemidoj ĉe Eŭfrato kaj Tigriso – estis akirintaj posedaĝon kiu bezonis nur kontroladon kaj plej krudan flegadon por pliiĝi en ĉiam pli multe kaj liveri la plej riĉan nutraĝon el lakto kaj viando. Ĉiuj antaŭaj rimedoj de nutraĝakiro nun malgraviĝis; la ĉasado, antaŭe neceso, fariĝis nun lukso.

Sed al kiu apartenis tiu nova riĉaĝo? Origine sendube al la gento. Sed certe jam frue estiĝis privata proprieto je la gregoj. Malfacilas diri ĉu al la aŭtoro de la tiel nomata unua libro de Moseo la patro Abrahamo aperis kiel posedanto de siaj gregoj kaŭze de propra rajto kiel prezidanto de familia komunumo aŭ kaŭze de lia eco kiel fakte hereda prezidanto de gento. Certas nur ke ni ne devas vidi lin kiel proprieto en la moderna senco. Kaj krome certas ke ĉe la sojlo de la atestata historio ni trovas jam ĉie la gregojn kiel apartan proprieton de familioj, same kiel la artaj produktoj de la barbareco, metalaj iloj, luksaj artikloj kaj fine la hombrutaron – la sklavojn.

Ĉar nun inventiĝis ankaŭ la sklaveco. Al la barbaro de la malsupra ŝtupo la sklavo estis senvalora. Pro tio la amerikaj indianoj traktis la venkitan malamikon tute alie ol tio okazis sur pli alta ŝtupo. La viroj estis mortigitaj aŭ akceptitaj en la tribo de la venkintoj kiel fratoj; la virinoj estis edzinigitaj aŭ alie ankaŭ adoptitaj kun siaj transvivintaj infanoj. La homa laborforto liveris sur tiu ŝtupo ankoraŭ ne konsiderindan kromaĝon super siaj vivtenaj kostoj. Kun la enkonduko

II La familio

de bredado, de metalprilaborado, de teksado kaj fine de kampkulturo tio ŝanĝiĝis. Kiel la antaŭe tiom facile alireblaj edzinoj akiris nun interŝanĝvaloron²⁸ kaj estis aĉetataj, tiel okazis kun la laborfortoj, speciale post kiam la gregoj transiris definitive en familian posedon.²⁹ La familio ne pliiĝis same rapide kiel la brutaro. Necesis pli da homoj por super-rigardi tiun; por tio uzeblis la militkaptita malamiko, kiu krome same bone bredeblis kiel la brutaro mem.

Tiaj riĉaĵoj, ekde kiam ili transiris en privatan posedon de familioj³⁰ kaj rapide pliiĝis, donis fortan baton al la edzeco kaj al la socio bazita sur patrinrajta gento. La edzeco estis enkondukinta novan elementon en la familion. Apud la korpa patrino ĝi metis la atestitan korpan patron, kiu estis krome verŝajne pli bone atestita ol multaj „patroj” niatempe. Laŭ la tiama labordivido en la familio la viro havis la taskon de akiri de la nutraĵo kaj de la laboriloj por tio, do li ricevis ankaŭ la proprieton je ili; en kazo de disiĝo li kunprenis ilin, kiel la virino konservis sian meblaron. Laŭ la kutimoj de la tiama socio la viro estis do ankaŭ proprietulo de la nova nutraĵfonto, de la brutaro, kaj poste de la nova laborinstrumento, de la sklavoj. Sed laŭ la kutimo de la sama socio liaj idoj ne povis heredi de li, ĉar pri tio statis jene:

Laŭ patrinrajto, do tiom longe kiom deveno estis kalkulata nur laŭ virina linio, kaj laŭ la origina hered-uzo en la gento, komence la gentaj parencoj heredis de sia mortinta gentano. La havaĵo devis do resti en la gento. Pro la malgraveco de la aĵoj ĝi eble estis, en la praktiko de ĉiam, heredata de la plej proksimaj gentaj parencoj, do de la sangparencoj de patrina flanko. Sed la idoj de la mortinta viro ne apartenis al lia gento, sed al tiu de sia patrino; ili heredis,

28 En la eldono de 1884: „multaj edzinoj nun valoron (anstataŭ: facile alireblaj edzinoj nun interŝanĝvaloron).

29 En la eldono de 1884: privatan posedon.

30 En la eldono de 1884 mankas: de familioj.

3. La pariĝa familio

unue kun la ceteraj sangparencoj de la patrino, poste eble en unua linio, de ŝi; sed ili ne povis heredi de sia patro, ĉar ili ne apartenis al lia gento, sed lia havaĵo devis resti en tiu. Ĉe la morto de la gregposedanto liaj gregoj do transiris unua al liaj fratoj kaj fratinoj kaj al la idoj de liaj fratinoj aŭ al la posteuloj de la fratinoj de lia patrino. Sed liaj propraj infanoj restis senheredaj.

En la proporcio do, en kiu la riĉaĵoj pliiĝis, ili donis do unuflanke al la viro pli gravan pozicion en la familio ol al la virino kaj produktis aliflanke la motivon uzi tiun fortigitan pozicion por renversi la tradiciitan heredrajton favore al la propraj infanoj. Sed tio ne eblis, tiom longe kiom la deveno validis laŭ la patrinrajto. Tiu estis do renversenda, kaj ĝi estis renversata. Tio ne estis tiom malfacila kiom ŝajnas al ni hodiaŭ. Ĉar tiu revolucio – unu el la plej gravaj kiujn la homoj iam ajn spertis – ne bezonis tuŝi eĉ unu solan vivantan membron de iu gento. Ĉiuj anoj povis resti poste tio kio ili estis antaŭe. La simpla decido sufiĉis ke estonte la posteuloj de la viraj gentanoj restu en la gento, sed tiuj de la inaj estu ekskluditaj, per tio ke ili transiru en la genton de sia patro. Per tio la devenkalkulado laŭ virina linio kaj la patrina heredrajto estis renversitaj, vira devenlinio kaj patra heredrajto ekvalida. Kiel tiu revolucio fariĝis ĉe la kulturpopoloj, kaj kiam, pri tio ni scias nenion. Ĝi okazis komplete en antaŭhistoria tempo. Sed ke ĝi okazis, estas pli ol necese pruvita per la multaj spuroj de patrinrajto kolektitaj ĉefe de Bachofen; kiom facile ĝi okazas, tion ni vidas ĉe tuta serio da indianaj triboj, kie ĝi fariĝis nur lastatempe kaj ankoraŭ fariĝas sub la influo parte de kreskanta riĉaĵo kaj ŝanĝita vivmaniero (translokado el la arbaroj en la prerion), parte pro moralaj influoj de la civilizacio kaj de la misiistoj. El ok misuriaj triboj ses havas viran, sed du ankoraŭ virinan devenlinion kaj heredordon. Ĉe la ŝaŭneoj, miamioj kaj delavaroj estiĝis la kutimo transigi la idojn per gentnomo de gento de la patro en ties genton, por ke ili povu heredi

II La familio

de la patro. „*Ennaskita kazuistiko de la homo, ŝanĝi la aferojn per tio ke oni ŝanĝas iliajn nomojn! Kaj trovi englitejojn por rompi la tradicion ene de la tradicio, kie rekta intereso donis sufiĉan impulson!*” (Markso) Per tio estiĝis senelira konfuzo, kiu forigeblis nur, kaj kiu estis parte ankaŭ forigita, per transiro al la patrorajto. „*Tio ŝajnas entute la plej natura transiro.*” (Markso) – Kion la komparaj juristoj scias diri al ni pri la maniero en kiu tiu transiro okazis ĉe la kulturpopoloj de la antikva mondo – tamen preskaŭ nur hipotezoj –, pri tio komparu M. Kowalewski, „*Tableau des origines de l'évolution de la famille et de la propriété*”, Stokholmo, 1890.³¹

La renverso de la patrinrajto estis la *mondhistoria malvenko de la virina sekso*. La viro ekkaptis la stirilon ankaŭ en la domo, la virino estis humiligita, servutigita, sklavino de lia volupto kaj nura ilo de infanproduktado. Tiu malaltigita pozicio de la virino, kiel ĝi speciale ĉe la grekoj de la heroa kaj eĉ pli de la klasika epoko malkaŝe aperas, estas iom post iom belŝajnigita kaj forhipokritigita, ankaŭ diversloke vestita en pli mildan formon; forigita ĝi tute ne estas.

La unua efiko de la nun fondita solregado de la viroj montriĝas nun en la nun aperanta intera formo de la patriarĥa familio. Tio, kio karakterizas ĝin ĉefe, ne estas la poligamio, pri tiu pli poste, sed

„la organizado de certa kvanto de liberaj kaj neliberaj personoj al familio sub la patra potenco de familiĉefo. En la ŝemida formo tiu familiĉefo vivas en poligamio, la neliberuloj havas edzinon kaj idojn, kaj la celo de la tuta organizaĵo estas la prizorgado de gregoj sur limigita tereno.”

La plej esenca trajto estas la enigo de neliberuloj en la patran potencon; pro tio la kompleta tipo de tiu familiformo estas la roma familio. La vorto *familia* signifas origine ne la el sentimentaleco kaj hejma disputo kunmetita idealo de la

31 En la eldono de 1884 la lasta frazo mankas.

3. La pariĝa familio

hodiaŭa filistro; ĝi koncernis ĉe la romanoj komence eĉ ne la geedzan paron kaj ties idojn, sed nur la sklavojn. *Famulus* signifas domsklavo, kaj *familia* estas la sklavaro apartenantaj al viro. Ankoraŭ tempe de Gajo la *familia, id est patrimonium* (t.e. la heredaĵo) estis testamente heredata. La esprimo estis inventita de la romanoj por signi novan socialan organismon, kies ĉefo havis sub si edzinon kaj infanojn kaj nombron da sklavoj sub roma, patreca potenco, kun la rajto je morto kaj vivo de ĉiuj.

„La vorto estas do ne pli malnova ol la ferblendita familisistemo de la latinaj triboj, kiu aperis post enkonduko de la kampkulturo kaj de la laŭleĝa sklavisimo kaj post la disiĝo de la arjaj italoj disde la grekoj.”³²

Markso aldonas:

„La moderna familio entenas ĝerme ne nur sklavismon (*servitus*), sed ankaŭ servutecon, ĉar ĝi havas dekomence rilaton al servoj por kampkulturo. Ĝi entenas *miniature* ĉiujn kontraŭdirojn en si kiuj poste larĝe disvolviĝas en la socio kaj en ties ŝtato.”

Tia familiformo montras la transiron de la pariĝa geedzeco en la monogamion. Por certigi la fidelon de la edzino, do la patrecon de la infanoj, la edzino estas senkondiĉe transdonita al la potenco de la viro: Se li mortigas ŝin, li uzas nur sian rajton.³³

Kun la patriarĥa familio ni eniras la kampon de la skribita historio, kaj do kampon kie la kompara jurscienco povas doni al ni konsiderindan helpon. Kaj efektive ĝi donis al ni esencan progreson. Ni dankas al Maxim Kowalewski³⁴ la pruvon ke la patriarĥa samdomanaro, tia kian ni hodiaŭ

32 Morgano, saml., p. 470. [fr. eld.]

33 En la eldono de 1884 la sekva teksto mankas ĝis la paragrafo: Edzeco ... (p. 64)

34 „Tableau etc. de la famille et de la propriété”, Stokholmo, 1890, p. 60-100.

II La familio

ankoraŭ trovas ĉe serboj kaj bulgaroj sub la nomo *zádruga* (tradukebla proksimume kiel amikiĝo) aŭ *bratstvo* (frateco), kaj en modifita formo ĉe orientalaj popoloj, estis la transira ŝtupo inter la patrinrajta familio devena el la grupedzeco kaj la monogamia familio de la moderna mondo. Almenaŭ por la kulturpopoloj de la antikva mondo, por arjoj kaj ŝemidoj, tio ŝajnas esti pruvita.

La sudslava *zádruga* donas la plej bonan ankoraŭ vivantan ekzemplon de tia familia komunumo. Ĝi entenas plurajn generaciojn de la patraj idoj kune kun ties virinoj, kiuj ĉiuj loĝas kune en unu bieno, kulturas siajn kampojn kune, nutras kaj vestas sin el komuna provizo kaj posedas komune la pluson de la rikolto. La komunumo estas sub plej supra mastrumado de la dommastro (domaĉin), kiu reprezentas ĝin ekstere, rajtas vendi malgrandajn aĵojn, mastrumas la kason kaj respondecas pri ĝi kaj pri la regula irado de la aferoj. Li estas elektata kaj tute ne bezonas esti la plej maljuna. La virinoj kaj iliaj laboroj estas sub gvido de la dommastrino (domaĉica), kiu estas kutime la edzino de la domaĉin. Ŝi havas ankaŭ pri la elekto de edzoj por la knabinoj gravan, ofte la decidan voĉon. Sed la plej supra potenco kuŝas en la familia konsilantaro, la kunveno de ĉiuj plenkreskaj domanoj, viroj kiel virinoj. Al tiu kunveno la dommastro raportas pri sia agado; ĝi faras la gravajn decidojn, plenumas juĝopovon super la membroj, decidas pri iom gravaj aĉetoj kaj vendoj, ĉefe de terposedo ktp.

Nur de proksimume dek jaroj la plua ekzistado de tiaj grandaj familianaroj estas pruvita ankaŭ en Ruslando; ili estas nun ĝenerale agnoskitaj kiel radikantaj en la rusa popolmoro same kiel la *obŝĉina* aŭ vilaĝkomunumo. Ili estas nomataj en la plej malnova rusa leĝaro, la *pravda* de Jaroslavo, sub la sama nomo (*vervj*) kiel en la dalmatiaj leĝoj, kaj pruveblas ankaŭ en polaj kaj ĉeĥaj historiaj fontoj.

3. La pariĝa familio

Ankaŭ ĉe la ĝermanoj, laŭ Heusler³⁵, la ekonomia unuo estis origine ne la unuopa familio en la moderna senco, sed la „domanaro”, kiu konsistas el pluraj generacioj respektive el unuopaj familioj kaj krome sufiĉe ofte entenas neliberulojn. Ankaŭ la roma familio estas deduktata el tiu tipo, kaj la absoluta potenco de la dommastro, kiel la senrajteco de la ceteraj familianoj fronte al li, estas pro tio lastatempe forte kontestata. Ĉe la keltoj laŭ raportoj ekzistis en Irlando similaj familiaj domanaroj; en Francio ili konserviĝis en la *Nivernais* sub la nomo *parçonneries* ĝis la franca revolucio, kaj en la *Franche Comté* ili estas eĉ hodiaŭ ne tute formortintaj. En la regiono de *Louhans (Saône et Loire)* oni vidas grandajn biendomojn kun komuna, ĝis la tegmento alta centra salonego kaj ĉirkaŭe la dormĉambroj, kiuj atingebblas tra ŝtuparoj de ses aŭ ok ŝtupoj kaj en kiuj loĝas pluraj generacioj de la sama familio.

En Hindio la domanaro kun komuna terkulturado estas menciita jam de Nearko³⁶, dum la tempo de Aleksandro la Granda, kaj ekzistas en la sama regiono, en Panĝabo kaj en la tuta nordokcidento de la lando ankoraŭ hodiaŭ. En Kaŭkaz-regiono Kowalewski povis mem dokumenti ilin. En Alĝerio ĝi ekzistas ankoraŭ ĉe la kabiloj. Ĝi troviĝis laŭdire eĉ en Ameriko, oni pretendas esti malkovrinta ĝin ĉe la kalpuloj³⁷, kiujn Zurita priskribas en la malnova Meksiko; male, Cunow³⁸ sufiĉe klare pruvis ke en Peruo dum la tempo de la konkero ekzistis ia markia konstitucio (ĉe kio la markio strange nomiĝis *marca*) kun perioda divido de la kulturata lando, do kun individua kultivado.

Ĉiukaze la patriarĥa domanaro kun komuna terposedo kaj komuna kultivado ricevas nun tute alian gravecon ol antaŭe. Ni ne povas pli longe dubi pri la grava transira rolo

35 „Institutionen des deutschen Rechts”.

36 En la originalo: „Nearchos”. -vl

37 En la originalo: „Calpullis”. -vl

38 „Ausland”, 1890, n-ro 42-44.

II La familio

kiun ĝi ludis ĉe la kulturpopoloj kaj pluraj aliaj popoloj de la antikva mondo inter la patrinrajta kaj la individua familio. Pli poste ni revenos al la konkludo kiun faris Kowalewski, laŭ kiu ĝi estis ankaŭ la transira ŝtupo el kiu la vilaĝa aŭ markia komunumo kun individua kultivado kaj unue perioda, poste definitiva divido de kamp- kaj herb-lando disvolviĝis.

Koncerne la familian vivon ene de tiuj domanaroj notindas ke almenaŭ en Ruslando la domestro havas la fifamon ke li forte misuzas sian pozicion rilate al la pli junaj virinoj de la anaro, speciale al la bofilinoj, kaj faras el ili haremon; pri tio la rusaj popolkantoj estas sufiĉe elokventaj.

Antaŭ ol transiri al la monogamio, kiu kun la renverso de la patrinrajto rapide evoluas, ankoraŭ kelkajn vortojn pri poligamio kaj poliandrio. Ambaŭ geedzecformoj povas esti nur esceptoj, iaj historiaj luksaj produktoj, se ili ne aperas en iu lando unu apud la alia, kio, kiel konate, ne okazas. Ĉar do la viroj ekskluditaj de la poligamio ne povas konsolidiĝi ĉe la virinoj restintaj ekster la poliandrio, sed la nombro da viroj kaj virinoj sendepende de sociaj institucioj ĝis nun estis sufiĉe sama, ne eblas ke unu aŭ la alia de tiuj edzecformoj ĝeneraliĝis. Fakte la poligamio de viro estis evidente la produkto de sklavismo kaj limigita al individuaj esceptaj pozicioj. En la ŝemida patriarĥa familio vivas nur la patriarĥo mem en poligamio, kaj maksimume kelkaj liaj filoj, la ceteraj devas kontentiĝi per unu virino. Tiel statas ankoraŭ hodiaŭ en la tuta Oriento; la poligamio estas privilegio de la riĉuloj kaj eminentuloj kaj rekrutiĝas ĉefe el aĉeto de sklavinoj; la amaso de la popolo vivas en monogamio. Sama escepto estas la poliandrio en Hindio kaj Tibeto, kies certe ne seninteresa deveno el la grupedzeco³⁹ estas ankoraŭ pli detale explorenda. En sia praktiko ili ŝajnas cetere pli toleremaj ol la ĵaluza haremreĝimo de la islamanoj. Almenaŭ ĉe la nairoj en Hindio po tri, kvar aŭ pli da viroj havas ja unu

39 En la eldono de 1884: punalua familio.

3. La pariĝa familio

komunan edzinon; sed ĉiu el ili povas apude havi kun tri aŭ pli aliaj viroj duan edzinon komune, kaj tiel trian, kvaran ktp. Estas miraklo ke MacLannan en tiuj edzeckluboĵ, en kies pluraj oni povas membriĝi kaj kiujn li mem priskribas, ne malkovris la novan klason de *klubedzeco*. Tiu edzecklub-reĝimo estas cetere tute ne vera poliandrio; ĝi estas, male, kiel jam Giraud-Teulon rimarkigas, specialiĝinta formo de grupedzeco; la viroj vivas en poligamio, la virinoj en polian-drio.⁴⁰

4. La monogamia familio

Ĝi estiĝas el la pariĝa familio, kiel montrite, en la limtempa erao inter la meza kaj la supra ŝtupo de barbareco; ĝia definitiva venko estas unu el la trajtoj de la komencanta civilizacio. Ĝi baziĝas sur la regado de la viro, kun la eksplacita celo de produktado de idoj kun nekontestebla patreco, kaj tiu patreco estas postulata, ĉar tiuj infanoj devas iam kiel korpaj heredantoj transpreni la patran havaĵon. Ĝi distingiĝas de la pariĝa geedzeco per multe pli granda firmeco de la geedza ligo, kiu nun jam ne estas ĉesigebla laŭ plaĉo de unu aŭ de la alia flanko. Estas nun ĝenerale jam nur la viro kiu povas malligi ĝin kaj repudii sian edzinon. La rajto je edza malfidelo estas al li ankaŭ nun ankoraŭ permesata almenaŭ laŭ la moralo (la Napoleona leĝaro (*Code Napoléon*) eksplicite atribuas ĝin al la viro, se li ne venigas la konkubinon en la geedzan domon) kaj estas kun kreskanta socia evoluo ĉiam pli praktikata; se la virino memoras la malnovan seksan praktikon kaj volas novigi ĝin, ŝi estas pli severe punata ol iam ajn antaŭe.

Ni renkontas la novan familiformon en ĝia tuta rigoreco ĉe la grekoj. Dum, kiel Markso rimarkigas, la pozicio de la diinoj en la mitologio prezentas al ni pli fruan periodon, kie la virinoj havis ankoraŭ pli liberan, pli respektatan pozicion,

40 En la eldono de 1884 mankas la lasta frazo.

II La familio

ni trovas dum la heroa epoko la virinon⁴¹ jam humiligita per la dominado de la viro kaj la konkurenco de la sklavinoj. Oni legu en la „Odiseado”, kiel Telemaho riproĉas kaj silentigas sian patrinon. La preditaj junaj virinoj forfalas ĉe Homero al la volupto de la venkintoj; la militestroj elektas laŭ vico kaj rango la plej belajn; la tuta „Iliado” temas kiel konate pri la disputo inter Aĥilo kaj Agamemno pro tia sklavino. Ĉe ĉiu iom grava homera heroo menciigas la militkaptita knabino kun kiu li dividas tendon kaj liton. Tiuj knabinoj estas ankaŭ kunportataj en la hejmlandon kaj en la gepatran domon, kiel Kasandro de Agamemno ĉe Eŝilo; la filoj generitaj kun tiaj sklavinoj ricevas malgrandan parton de la patra heredaĵo kaj estas konsiderataj kiel plene liberaj; Teŭkroso estas tia ekstergeedza filo de Telamono kaj rajtas esti nomata laŭ lia patro. Oni atendas de la edzino ke ŝi toleras ĉion ĉi, sed mem observas striktan ĉastecon kaj fidelon al sia edzo. La greka virino de la heroa epoko estas ja pli estimata ol tiu de la civilizita periodo, sed ŝi estas tamen por la viro fine nur la patrino de liaj geedzaj heredinfanoj, lia plej supra dommastrino kaj la ĉefino de la sklavinoj, kiujn li povas laŭplaĉe fari siaj konkubinoj kaj ankaŭ faras. Estas la ekzisto de la sklaveco apud la monogamio, la ekzisto de junaj belaj sklavinoj, kiuj apartenas al la *viro* kun ĉio kion ili havas ĉe si, kio stampas al la monogamio dekomence sian specifan karakteron esti monogamio *nur por la*

41 La sekva teksto ĝis la vortoj: „Sed spite al ĉia enfermo kaj priĝardado ...” (p. 70) estas la versio ampleksigita de Engelso en 1892. Ĝi tekstis en 1884: „en duone mallibereja enfermiteco, por certigi la ĝustan patrecon de la infanoj. La viro, male, amuziĝas kun militkaptitaj sklavinoj, kun siaj tendaninoj en milito. Apenaŭ pli bone en la klasika periodo. Oni povas pli detale legi en 'Charikles' de Becker, kiel la grekoj traktis siajn virinojn. Se ne vere enfermitaj, tamen disigitaj de la mondo, ili estis fariĝintaj la plej supraj domservistinoj de siaj edzoj, limigitaj ĉefe al la rilatoj kun la ceteraj domservistinoj. La knabinoj estis rekte enfermitaj, la virinoj eliris nur en akompano de sklavinoj. Se venis vira vizito, la virino retiriĝis en sian ĉambron.”

4. La monogamia familio

virino, sed ne por la viro. Kaj tiun karakteron ĝi havas ankoraŭ hodiaŭ.

Pri la postaj grekoj ni devas distingi inter doroj kaj jonoj. La unuaj, kies klasika ekzemplo estas Sparto, havas plurriplate ankoraŭ pli malnovajn geedzecrilatojn ol tiuj kiujn eĉ Homero montras. En Sparto validas pariĝa geedzeco modifita de la ŝtato laŭ la tieaj opinioj, kiuj montras ankoraŭ plurajn memorojn pri la grupedzeco. Seninfanaj geedzeco estas disigataj; la reĝo Anaksandrido (je 560 antaŭ nia eraro) prenis aldone al sia seninfana edzino duan kaj havis du masturbatojn; je la sama tempo la reĝo Aristono prenis aldone al du seninfanaj edzinoj trian, sed kompanse liberigis unu el la unuaj. Aliflanke pluraj fratoj rajtis havi komunan edzinon, la amiko, al kiu la edzino de la amiko plaĉis pli, rajtis dividi ŝin kun li, kaj oni opiniis deca disponigi la edzinon al seksfortulo⁴², eĉ se tiu ne estis civitano. El tekstero ĉe Plutarĥo, kie spartano resendas la amanton, kiu persekutas ŝin per petoj, al ŝia edzo, ŝajnas – laŭ Schoemann – montriĝi eĉ pli granda libereco de la moro. Reala adulto, malfidelo de la virino malantaŭ la dorso de la viro, estis pro tio ankaŭ skandala. Aliflanke en Sparto la domsklaveco estis almenaŭ en la plej bona tempo nekonata, la servutaj helotoj⁴³ loĝis aparte en la bienoj; la tento de la spartanoj aliri ties virinojn estis pro tio malpli granda. Ke en ĉiuj ĉi cirkonstancoj la virinoj en Sparto havis tute pli respektatan pozicion ol ĉe la ceteraj grekoj, tio tute ne povis esti alie. La spartaj virinoj kaj la elito de la atenaj hetajroj estas la solaj grekaj virinoj pri kiuj la antikvuloj parolas kun respekto, kies esprimojn ili konsideras notindaj.

Tute alie ĉe la jonoj, por kiuj Ateno estas karakteriza. La knabinoj lernis nur ŝpini, teksu kaj kudri, maksimume iom

42 Engelso aludas kutimon en situacio, kie la edzo ial ne povas generi idojn, seksumigi la edzinon kun alia viro por gravedigi ŝin.
-vl

43 Spartaj ŝtatsklavoj. -vl

II La familio

legi kaj skribi. Ili estis praktike enfermitaj, rilatis nur kun aliaj virinoj. La virinĉambro estis aparta peco de la domo, en la supra etaĝo aŭ en la malantaŭa domo, kien viroj, ĉefe fremduloj, ne facile aliris kaj kien la virinoj retiriĝis ĉe vira vizito. La virinoj ne eliris sen akompano de sklavino; hejme ili estis efektive prigardataj; Aristofano parolas pri hundegoj kiujn oni tenis por fortimigi la adultulojn, kaj almenaŭ en la aziaj urboj, por prigardi la virinojn, oni tenis eŭnuĥojn, kiuj en Ĥio⁴⁴ jam dum la tempo de Herodoto estis produktataj por la komerco, kaj laŭ Wachsmuth ne nur por la barbaroj. Ĉe Eŭripido la virino estas nomata kiel *oikurema*, kiel aĵo por domprizorgado (la vorto estas neŭtra), kaj krom por la infanproduktado ŝi estis por la atenano nenio alia ol la plej supra domservistino. La viro havis siajn gimnastikajn ekzercojn, siajn publikajn intertraktadojn, el kiuj la virino estis ekskludita; li havis krome ofte ankaŭ sklavinojn je sia dispono kaj dum la prospera tempo de Ateno etenditan kaj de la ŝtato almenaŭ subtenatan prostituadon. Ĝuste surbaze de tiu prostituado disvolviĝis la solaj grekaj virinkarakteroj kiuj elstaras je spirito kaj arta gustformiĝo same super la ĝenerala nivelo de la antikva virineco kiel la spartaninoj per sia karaktero. Sed ke oni devis fariĝi unue hetajroj por fariĝi virino, tio estas la plej severa kondamno de la atena familio.

Tiu atena familio fariĝis en la fluo de la tempo la modelo, laŭ kiu ne nur la ceteraj jonoj, sed ankaŭ pli kaj pli ĉiuj grekoj de la ĉeflando kaj de la kolonioj formis siajn hejmajn kondiĉojn. Sed spite al ĉia enfermado kaj kontrolado la grekinoj trovis sufiĉe ofte okazon trompi siajn edzojn. Tiuj, kiuj hontus konfesi ian ajn amon por siaj edzinoj, amuziĝis per diversaj amaferoj kun hetajroj; sed la humiligo de la virinoj venĝis sin ĉe la viroj kaj humiligis ankaŭ ilin, ĝis kiam ili dronis en la abomeno de amo al knaboj kaj humilig-

44 En la originalo: Chios, en la franca versio: Chio. -vl

4. La monogamia familio

is siajn diojn kiel sin mem per la mito de Ganimedo⁴⁵.

Jen la origino de la monogamio, tia kian ni povas sekvi ĝin ĉe la plej civilizita kaj plej alte evoluinta popolo de la antikveco. Ĝi tute ne estis frukto de la individua seksamo, kun kiu ĝi havis absolute nenian por fari, ĉar la geedzecoj restis kiel antaŭe konvenciaj geedzecoj⁴⁶. Ĝi estis la unua familiformo, kiu estis bazita ne sur naturaj, sed sur ekonomiaj⁴⁷ kondiĉoj, nome sur la venko de la privata proprieto super la origina natura komunproprieto. Dominado de la viro en la familio kaj produktado de infanoj kiuj povis esti nur liaj kaj heredontoj de lia riĉaĵo – tio sole estis la ekskluzivaj celoj de la monogamio, de la grekoj malkaŝe eldiritaj. Cetere ĝi estis por ili ŝarĝo, devo al la dioj, al la ŝtato kaj al la propraj antaŭuloj, kiuj estis simple plenumenda. En Ateno la leĝo trudis ne nur edziĝon, sed ankaŭ la plenumadon de minimumo da tiel nomataj edzecaj devoj flanke de la viro.⁴⁸

Do, la monogamio eniras la historion ne kiel la paciĝo de viro kaj virino, eĉ malpli kiel ties plej alta formo. Male. Ĝi aperas kiel subjugado de unu sekso fare de la alia, kiel proklamo de ĝis tiam en la tuta antaŭhistorio ne konata kontraŭeco de la seksoj. En malnova, en 1846 de Markso kaj mi ellaborita, nepresita manuskripto⁴⁹ mi trovas: „La

45 Troja belega reĝido, rabita de la aglo de Zeŭso por anstataŭi Hebon kiel vinverŝiston. [laŭ PIV] -vl

46 Originale: Konvenienzehen, edzecoj laŭ ekonomia taŭgeco. -vl

47 En la eldono de 1884: sociaj.

48 En la eldono de 1884 mankas la lasta frazo.

49 „Oni vidas ĉi tie tuj: Tiu naturreligio aŭ tiu specifa sinteno al la naturo estas kondiĉita de la sociformo kaj inverse. Ĉi tie kiel ĉie la identeco de naturo kaj homo aperas ankaŭ tiel ke la fermitkapa sinteno de la homoj al la naturo kondiĉas ilian fermitkapan interrilaton inter si, kaj ilia fermitkapa interrilato inter si kondiĉas ilian fermitkapan rilaton al la naturo, ĝuste ĉar la naturo estas apenaŭ historie modifita, kaj aliflanke la konscio pri la neceso interrilati kun la ĉirkaŭantaj individuoj, la komenco

II La familio

unua labordivido estas tiu de viro kaj virino por infanproduktado.” Kaj hodiaŭ mi povas aldoni: La unua klaskontraŭdiro, kiu aperas en la historio, koincidas kun la evoluo de la antagonismo de viro kaj virino en la monogamio, kaj la unua klaskontrasto kun tiu de la virina sekso fare de la vira. La monogamio estis granda historia progreso, sed samtempe ĝi malfermis apud la sklaveco kaj la privata proprieto tiun ĝis hodiaŭ daŭrantan epokon, en kiu ĉia progreso estas samtempe relativa malprogreso, en kiu la

de la konscio pri tio ke li entute vivas en socio. Tiu komenco estas tiom animaleca kiel la socia vivo sur tiu ŝtupo mem, ĝi estas nura gregkonscio, kaj la homo distingiĝas ĉi tie disde la ŝafo nur per tio ke lia konscio reprezentas la instinkton, aŭ ke lia instinkto estas konscia. Tiu ŝaf- aŭ trib-konscio ricevas pluan disvolviĝon kaj elformiĝon per la kreskanta produktiveco, la pliiĝo de la bezonoj kaj la sur ili ambaŭ baziĝanta pliiĝo de la loĝantaro. Per tio evoluas la labordivido, kiu estis origine nenio alia ol la laboro en la sekskuniĝo, poste divido de la laboro, kiu per natura kapablo (ekz-e korpa forto), bezonoj, hazardoj ktp ktp fariĝas per si mem aŭ „nature”. La labordivido fariĝas vera divido nur ekde la momento en kiu divido de la materia kaj spirita laboro aperas. [Marĝenoto de Markso: „Unua formo de la ideologoj, *pastroj*, koincidas.] Ekde tiu momento la konscio *povas* vere imagi esti io alia ol la konscio de la ekzistanta praktiko, prezenti *reale* ion sen prezenti ion realan – ekde tiu momento la konscio kapablas emancipiĝi de la mondo kaj transiri al formado de la „pura” teorio, teologio, filozofio, moralo ktp. Sed eĉ se tiu teorio, teologio, filozofio, moralo ktp eniras en kontraŭdiron kun la ekzistantaj kondiĉoj, tio povas okazi nur per tio ke la ekzistantaj sociaj kondiĉoj eniris en kontraŭdiron kun la ekzistanta produktadforto – kio cetere en certa nacia perimetro de kondiĉoj povas okazi ankaŭ per tio ke la kontraŭdiro aperas ne en tiu nacia perimetro, sed inter tiu nacia konscio kaj la praktiko de la aliaj nacioj, [Marĝenoto de Markso: „Religio. La germanoj kun la *ideologio* kiel tia.”] t.e. inter la nacia kaj la ĝenerala konscio de nacio.” [El:Karl Marx; Friedrich Engels: „Die deutsche Ideologie”, I Feuerbach - Kontraŭdiro de materiisma kaj idealisma percepto, p. 31, 32.] -vl

4. La monogamia familio

prospero kaj la evoluo de iuj trudiĝas per la malfeliĉo kaj la flankenŝovo de la aliaj. Ĝi estas la ĉela formo de la civilizita socio, ĉe kiu ni povas jam studi la naturon de la en ĝi disvolviĝantaj kontraŭecoj kaj kontraŭdiroj.

La malnova relativa libereco de la seksrilato tute ne malaperis kun la venko de la pariĝedzeco aŭ eĉ de la monogamio.

„La malnova edzecsistemo, reduktita al pli striktaj limoj per la iom-post-ioma formortiĝo de la punalvaj grupoj, daŭre ĉirkaŭis la plu evoluantan familion kaj pendis ĉe ĝiaj baskoj ĝis en la alvenanta civilizacio ... ĝi malaperis fine en la nova formo de hetajrismo, kiu sekvas la homojn ĝis en la civilizacion, kvazaŭ malluma ombro kiu kuŝas sur la familio.”⁵⁰

Sub hetajrismo Morgano komprenas la *apud la monogamio* ekzistantan eksteredzecan seksrilaton de la viroj kun ne edziniĝintaj virinoj, kiu, kiel konate, floras dum la tuta periodo de civilizacio en plej diversaj formoj kaj pli kaj pli fariĝas malkaŝa prostituado.⁵¹ Tiu hetajrismo deduktiĝas tute rekte el la grupedzeco, el la fordonofero de la virinoj, per kiu ili aĉetis la rajton je ĉasteco. La fordono por mono estis unue religa ago, ĝi okazis en la templo de la amdiino, kaj la mono fluis origine en la templan trezoron. La hieroduloj⁵² de la Anaito en Armenio, de la Afrodito en Korinto, kiel la religiaj dancknabinoj de Hindio ligitaj kun la temploj, la tiel nomataj bajaderoj (la vorto estas kripligita el la portugala *bailadeira*, dancistino), estis la unuaj prostituitinoj. La fordono, origine devo de ĉiu virino, estis poste plenumata sole de tiuj pastrinoj, en reprezentiĝo de ĉiuj aliaj. Ĉe aliaj popoloj la hetajrismo deduktiĝas el la seksa libereco

50 Morgano, saml., p. 504. [fr. eld.]

51 En la eldono de 1884, en tiu ĉi paragrafo mankas la sekva teksto ĝis la vortoj: „La hetajrismo estas simple socia institucio ...”

52 La *hieroduloj* estis sklavoj ligitaj kun temploj. Kiam ili estis ineksaj, ili estis sanktaj amoristinoj. Anaito estis en la iama persa religio la diino de amo kaj de fekundeco. [fr. eld.]

II La familio

permesata al la knabino antaŭ la edziniĝo – do ankaŭ restaĵo de la grupedzeco, nur tradiciita al ni sur alia vojo. Kun la apero de la diferenco je proprieto, do jam sur la supra ŝtupo de barbareco, dunglaboro⁵³ aperas sporade apud sklavlaboro kaj samtempe, kiel ĝia necesa respondaĵo, la profesia prostituĝo de liberaj virinoj apud la trudata fordoniĝo de la sklavino. Tiel, la heredaĵo kiun la grupedzeco postlasis al la civilizacio, estas duflanka, kiel ĉiu kion la civilizacio produktas, duflanka, dulanga, en si fendita, kontraŭeca: jen la monogamio, jen la hetajrismo kun sia plej ekstrema formo, la prostituado. La hetajrismo estas simple socia institucio kiel ĉiu alia; ĝi daŭrigas la malnovan seksliberecon – favore al la viroj. En la realeco ne nur tolerata, sed ĉefe de la regantaj klasoj subtenata, ĝi estas kondamnata en paroloj. Sed en la realo tiu kondamno tute ne trafas la en tio partoprenantajn virojn, sed nur la virinojn: Ili estas proskribataj kaj elpelataj, por tiel ree proklami la senkondiĉan dominadon de la viroj super la virina sekso kiel socian bazleĝon.

Sed per tio evoluas dua kontraŭdiro ene de la monogamio mem. Apud la edzo, kiu plibeligas sian ekzistadon per la hetajrismo, staras la neglektata edzino. Kaj oni ne povas havi la unuan flankon de la kontraŭdiro sen la alia, same kiel oni ne havas tutan pomon en la mano post manĝi unu duonon. Malgraŭ tio, la viroj ŝajnis opinii tion, ĝis kiam iliaj edzinoj instruis al ili ion alian. Kun la monogamio aperas du konstantaj sociaj karakterfiguroj, kiuj antaŭe estis nekonataj: la konstanta amanto de la edzino kaj la kokrito. La viroj venkis super la virinoj, sed la kronadon⁵⁴ transprenis grandanime la venkitoj. Apud la monogamio kaj la hetajrismo la adulto fariĝis neevitebla socia institucio – abomenata, akre punata, sed ne subpremebla. La certa patreco de la infanoj baziĝis kiel antaŭe maksimume sur morala konvinko, kaj

53 Laŭvorte: salajrolaboro, ĉi tie kaj en la sekvo: dunglaboro. -vl

54 Aludo al la popoldiro, ke la edzino metas per sia adulto kornojn al la edzo (kvazaŭ kronon). -vl

4. La monogamia familio

por solvi la nesolveblan kontraŭdiron, la Napoleona Leĝo dekretis en Art. 312:

„La infano koncipita havas kiel patron la edzon.”⁵⁵

Jen la lasta rezulto de tri mil jaroj da monogamio.

Tiel, en la monogamia familio, en la kazoj kiuj restas fidelaj al ĝia historia evoluo kaj kiuj klare aperigas la kontraŭecon de viro kaj virino per la ekskluziva dominado de la viro, ni havas miniaturan bildon de la samaj kontraŭecoj kaj kontraŭdiroj en kiuj la socio dividita en klasojn ekde la komenco de la civilizacio moviĝas sen povi solvi kaj superi ilin. Mi parolas ĉi tie kompreneble nur pri tiuj kazoj de monogamio, kie la geedzeca vivo okazas en la realo laŭ preskribo de la origina karaktero de la tuta institucio, kie la virino tamen ribelas kontraŭ la dominado de la viro. Ke ne ĉiuj geedzecoj praktikiĝas tiel, tion scias neniu pli bone ol la germana filistro, kiu ne scias same malbone konservi sian regadon en la hejmo kiel en la ŝtato kaj kies edzino pro tio plenrajte portas la pantalonon⁵⁶ kiun li ne meritas. Sed kompanse li iluzias esti multe pli supera al sia franca kun-suferanto, al kiu, pli ofte ol al li, okazas multe pli malbonaj misaventuroj.

La monogamia familio aperis cetere tute ne ĉie en la klasika kruda formo, kiun ĝi havis ĉe la grekoj. Ĉe la romanoj, kiuj kiel mondkonkerontoj havis pli longan, kvankam malpli fajnan vidon ol la grekoj, la virino estis pli libera kaj pli respektata. La romano kredis la edzinan fidelecon sufiĉe garantiita per la povo pri vivo kaj morto de sia edzino. La virino povis ĉi tie same kiel la viro libervole ĉesigi la geedzecon. Sed la plej granda progreso en la evoluo de la monogamio okazis decide kun la eniro de la ĝermanoj en la histo-

55 Code Napoléon, art. 312: „L'enfant conçu pendant le mariage a pour père le mari.”

56 „Porti la pantalonon”, germana esprimo por „regi hejme kiel viro”, do kiel ĉefo. -vl

II La familio

rion, kaj pli precize ĉar ĉe ili, supozeble pro ilia malriĉeco, la monogamio ŝajnas ankoraŭ ne komplete evoluinta el la pariĝa geedzeco. Ni konkludas tion el tri cirkonstancoj, kiujn Tacito mencias: Unue ekzistis ĉe granda sanktigo de la geedzeco – „ili kontentiĝas per *unu* virino, la virinoj vivas ŝirmataj de sia ĉasteco” – tamen poligamio por la eminentuloj kaj tribgvidantoj, do stato simila al tiu de la amerikanoj, ĉe kiuj ekzistis la pariĝa geedzeco. Kaj due, la transiro de patrinrajto al patrorajto povis esti okazinta nur mallonge antaŭe, ĉar la patrinfrato – la plej proksima vira gentparenco laŭ patrinrajto – estis ankoraŭ konsiderata preskaŭ pli proksima parenco ol la propra patro, same kongrue kun la vidpunkto de la amerikaj indianoj, ĉe kiuj Markso, kiel li ofte diris, trovis la ŝlosilon por kompreni nian propran pratempon. Kaj trie la virinoj estis ĉe la ĝermanoj alte respektataj kaj influhavaj ankaŭ pri publikaj aferoj, kio rekte kontraŭdiras la monogamian virregadon. Ĉio ĉi estas aferoj en kiuj la ĝermanoj samas kun la spartanoj, ĉe kiuj ankaŭ, kiel ni vidis, la pariĝa geedzeco ankoraŭ ne estis komplete superigita.⁵⁷ Kun la ĝermanoj do ankaŭ tiurilate tute nova elemento atingis mondregadon. La nova monogamio, kiu evoluis sur la ruinoj de la romia mondo el la popola miksiĝo, vestis la virregadon en pli mildajn formojn kaj lasis al la virinoj almenaŭ ekstere multe pli respektatan kaj pli liberan pozicion ol la klasika antikveco iam ajn konis ĝin. Nur per tio estiĝis la ebleco, per kiu povis evolui el la monogamio – en ĝi, apud ĝi kaj kontraŭ ĝi, laŭ la cirkonstanco – la plej granda morala progreso kiun ni dankas al ĝi: la moderna individua seksamo, kiu estis nekonata al la tuta antaŭa mondo.

Sed tiu progreso fontis klare el la cirkonstanco ke la ĝermanoj vivis ankoraŭ en la pariĝa familio kaj ke ili greftis la respondan pozicion de la virino, tiom kiom eble, sur la monogamion, sed tute ne pro la mita, mirige moralpura

57 En la eldono de 1884 mankas la lasta frazo.

4. La monogamia familio

natura dispozicio de la ĝermanoj, kiuj limiĝas al tio ke la pariĝa geedzeco efektive ne moviĝas en la akraj moralaj kontraŭdiroj kiel la monogamio. Male, la ĝermanoj estis dum siaj migradoj, speciale al sudoriento al la stepnomadoj ĉe la Nigra Maro, forte senmoraligintaj kaj alprenintaj de ili krom iliajn rajdistajn artojn ankaŭ krudajn kontraŭnaturajn malvirtojn, kion Ammiano eksplicite atestas pri la tajfaloj kaj Prokopo pri la heruloj.

Sed se la monogamio estis el ĉiuj konataj familiformoj tiu sub kiu sole povis evolui la moderna seksamo, tio ne signifas ke ĝi evoluis ekskluzive aŭ nur precipe en ĝi, kiel amo de la geedzoj inter si. La tuta naturo de la fiksa unuopa geedzeco sub vira regado ekskludis tion. Ĉe ĉiuj historie aktivaj, t.e. ĉe ĉiuj regantaj klasoj la geedziĝo restis tio kio ĝi estis ĉe la pariĝa geedzeco, afero de konveneco, aranĝita de la gepatroj. Kaj la unua historie aperanta formo de seksamo kiel pasio, kaj kiel pasio atribuebla al ĉiu homo (almenaŭ de la regantaj klasoj), kiel plej alta formo de la seksinstinkto – kio ĝuste faras ĝian specifecon –, tiu ĝia unua formo, la kavalira amo de la mezepoko, tute ne estis geedza amo, male. En ĝia klasika formo, ĉe la provencanoj, ĝi plenevele stiras al adulto, kaj ĝiaj poetoj feste prikantas ĝin. La floro de la provenca ampoezio estas la *albas*, tagkantoj⁵⁸. Ili pri-skribas per ardaj koloroj, kiel la kavaliro ĉe sia belulino – la edzino de iu alia – kuŝas en la lito, dum ekstere staras la gardisto, kiu vokas lin ekde kiam la unua matenlumo leviĝas (*alba*), por ke li povu ankoraŭ nekonate malaperi; la disiĝa scenejo estas tiam la kulmino. La nordaj francoj kaj ankaŭ la bravaj germanoj alprenis tiun manieron verki ankaŭ en la kongrua maniero de kavaliramo, kaj nia antikva Volframo de Eŝenbaĥo⁵⁹ postlasis pri tiu sama maldeca temo tri mire belajn tagkantojn, kiujn mi preferas ol liajn tri longajn heropoemojn.

58 Germane: Tagelieder. -vl

59 Germane: Wolfram von Eschenbach. -vl

II La familio

La burĝa geedziĝo de nia tempo estas duspeca. En katolikaj landoj daŭre la gepatroj akiras por la juna burĝido taŭgan edzinon, kaj la sekvo de tio estas kompreneble la plej plena evoluo de la kontraŭdiro entenata en la monogamio: prospera hetajrismo flanke de la viro, prospera adulto flanke de la virino. La katolika eklezio eble ankaŭ nur pro tio forigis la divorcon, ĉar ĝi konvinkigis ke kontraŭ la adulto kiel kontraŭ la morto ne ekzistas rimedo. En protestantaj landoj, male, estas regulo ke al la burĝido estas permesate elekti el sia klaso edzinon kun pli aŭ malpli granda libereco, pro kio certa grado de amo povas esti la bazo de la geedziĝo, kio estas krome pro deco ĉiam supozata, kio kongruas kun la protestanta hipokriteco. Ĉi tie la hetajrismo de la viro estas praktikata malpli vigle, kaj la adulto de la virino estas malpli la regulo. Sed ĉar en ĉiu speco de geedzeco la homoj restas tiaj kiaj ili estis antaŭ la geedzeco, kaj ĉar la civitanoj de protestantaj landoj estas plej ofte filistroj, tial tiu protestanta monogamio en la mezumo de la plej bonaj kazoj atingas nur geedzan komunecon de plumba enuo, al kiu oni donas la nomon familia feliĉo. La plej bona spegulo de tiuj du geedziĝmetodoj estas la romano, por la katolika maniero la franca, por la protestanta la germana⁶⁰. En ambaŭ versioj „li akiras“: en la germana la junulo la knabinon, en la franca la edzo la kornojn⁶¹. Ne ĉiam klaras, kiu el ambaŭ fartas pli bone. Ĝuste pro tio la enuo de la germana romano donas al la franca burĝo la saman hororon kiel la „malmoraleco“ de la franca romano al la germana filistro. Tamen lastatempe, ekde kiam „Berlino fariĝas mondurbo“, la germana romano komencas aperigi iom malpli timeme la tie delonge praktikatan hetajrismen kaj adulton.

Sed en ambaŭ kazoj la geedziĝo estas kondiĉita de la klasa pozicio de la koncernatoj kaj estas laŭ tio ĉiam kon-

60 En la eldono de 1884 sekvas: kaj sveda.

61 Laŭ popoldiro, la edzino per adulto almetas kornojn al la edzo.

4. La monogamia familio

ven-geedzeco.⁶² Tiu konvengeedzeco en ambaŭ kazoj sufiĉe ofte transformiĝas en plej krudan prostituadon – kelkfoje de ambaŭ partoj, multe pli kutime de la virino, kiu distingiĝas de la ordinara kurtizano nur per tio ke ŝi luas sian korpon ne kiel dungsalajrulino por popeca laboro, sed vendas ĝin unufoje por ĉiam en sklavecon. Kaj pri ĉiuj konvengeedzeco validas la vorto de Fouriero:

„Kiel en la gramatiko du neadoj signifas *unu* jeson, tiel en la edziĝmoralo du prostituadoj signifas *unu* virton.”

La seksamo fariĝas reala regulo en la rilato al la virino, kaj povas nur fariĝi tie, inter la subpremataj klasoj, do nia tempe en la proletaro – egale ĉu tiu rilato estas oficiale agnoskita aŭ ne. Sed tie ankaŭ ĉiuj bazoj de la klasika monogamio estas forigitaj. Ĉi tie mankas ĉia proprieto, por kies konservado kaj heredado la monogamio kaj la virregado ĝuste kreiĝis, kaj ĉi tie mankas per tio ankaŭ ĉia impulso efektiviĝi la virregadon. Eĉ pli, ankaŭ la rimedoj mankas por tio; la burĝa juro, kiu protektas tiun dominadon, ekzistas nur por la posedantoj kaj ties rilatoj kun la proletoj; ĝi kostas monon kaj pro tio, kaŭze de malriĉeco, ne validas por la pozicio de la laboristo rilate al lia virino. Tie tute aliaj personaj kaj sociaj kondiĉoj estas decidaj. Kaj, ekde kiam la granda industrio translokis la virinon el la hejmo sur la labormerkaton kaj en la fabrikon, la lasta resto de virregado en la proleta hejmo komplete perdis ĉian bazon – escepte de ebla peco de la brutaleco kontraŭ virinoj, kiu estiĝis ekde la enkonduko de la monogamio. Do, la familio de la proleto jam ne estas monogamia en strikta senco, eĉ ĉe la plej pasia amo kaj la plej firma fidelo de *ambaŭ* kaj spite al ĉia religia kaj profana oficialiĝo. Pro tio ankaŭ la eternaj akompanantoj de la monogamio, hetajrismo kaj adulto, ludas ĉi tie nur tre malgrandan rolon; la edzino fakte ricevis la rajton je eksedziĝo, kaj se oni ne povas

62 En la eldono de 1884 mankas la sekva teksto ĝis la paragrafo: „Ni revenu nun al Morgano ...”.

II La familio

vivi pace unu kun la alia, oni prefere disiĝas. Mallonge, la proleta edzeco estas monogamia en la etimologia senco de la vorto, sed tute ne en sia historia senco.⁶³

Niaj juristoj tamen trovas ke la progreso de la leĝdonado forigas en kreskanta mezuro al la virino ĉian kaŭzon por plendi. La modernaj civilizitaj leĝsistemoj agnoskas pli kaj pli, unue, ke la geedzeco, por esti valida, devas esti kontrakto farita de ambaŭ partoj libervole, kaj due, ke ankaŭ dum la geedzeco ambaŭ partoj devas interrilati kun la samaj rajtoj kaj devoj. Sed se tiuj du postuloj estas konsekvence plenumataj, tiam la virinoj havas, laŭ ili, ĉion kion ili povas postuli.

Tiu pure jurista argumentado estas precize la sama, per kiu la radikala republikana burĝo malpravigas kaj silentigas la proleton. La laborkontrakto devas esti libere farita de ambaŭ partoj. Sed ĝi validas kiel libervole kontraktita, ekde kiam la leĝo samigas ambaŭ partojn *sur la papero*. La povo, kiun la diversa klasa pozicio donas al unu parto, la premo kiun ĝi efikas sur la alia parto – la reala ekonomia pozicio de *ambaŭ* –, tio ne koncernas la leĝon. Kaj dum la daŭro de la laborkontrakto ambaŭ partoj devas ree esti samrajtaj, se ne unu aŭ la alia eksplicite rezignis. Ke la ekonomia situacio devigas la laboriston rezigni eĉ pri la lasta ŝajno de rajtegaleco, pro tio ree ne kulpas la leĝo.

Koncerne la geedzecon la leĝo, eĉ la plej progresema, estas komplete kontentigita, ekde kiam la koncernatoj formale donis al la protokolo sian libervolecon. Kio okazas malantaŭ la juraj kulisoj, kie okazas la reala vivo, kiel tiu libervoleco estiĝas, pri tio la leĝo kaj la juristo ne povas zorgi. Kaj tamen la plej simpla jurkomparo devus montri al la juristo, kio reale okazas kun tiu libervoleco. En la landoj, kie al la infanoj deviga parto de la gepatra heredaĵo estas

63 En la eldono de 1884, la sekva teksto mankas ĝis la paragrafo:
„Ni revenu nun al Morgano ...”.

4. La monogamia familio

leĝe garantiata, kie ili do ne senheredigeblas – en Germanio, en la landoj de la franca juro ktp, la infanoj ĉe edziĝo estas ligitaj al la konsento de la gepatroj. En la landoj de angla juro, kie la gepatra konsento ne estas leĝa postulo de geedziĝo, la gepatroj havas ankaŭ plenan testamentan liberecon pri sia havaĵo, ili povas laŭplaĉe senheredigi siajn infanojn. Ke spite al tio kaj ĝuste pro tio la libereco de geedziĝo en la klasoj kie ekzistas io heredebla, estas fakte neniel pli granda ol en Francio aŭ en Germanio, tio ja klaras.

La afero ne pli bonas ĉe la jura rajtegaleco de viro kaj virino en geedzeco. La jura malegaleco de la du, kiun ni heredis el antaŭaj sociaj statoj, ne estas la kaŭzo, sed la efiko de la ekonomia subpremo de la virino. En la malnova komunisma mastrumado, kiu entenis multajn geedzojn kaj iliajn idojn, la gvidado de la mastrumado transdonita al la virinoj estis same publika, socie necesa industrio kiel la akirado de nutraĵo fare de la viroj. Kun la patriarĥa familio kaj eĉ pli kun la monogamia unuopa familio tio ŝanĝiĝis. La gvidado de la mastrumado perdis sian publikan karakteron. Ĝi jam ne koncernis la socion. Ĝi fariĝis *privata servo*; la virino fariĝis la unua servistino, forŝovita el la partopreno en la socia produktado. Ne pli frue ol la niatempa granda industrio remalfermis al ŝi – kaj ankaŭ nur al la proletino – la vojon al socia produktado. Sed tiel ke, se ŝi plenumas siajn devojn en la privata servo de la familio, ŝi restas ekskludita el la publika produktado kaj povas nenion akiri; kaj ke, se ŝi volas partopreni en la publika industrio kaj memstare akiri, ŝi ne kapablas plenumi familiajn devojn. Kaj kiel en la fabriko, tiel okazas al la virino en ĉiuj komercaj branĉoj, eĉ en medicino kaj advokatejo. La moderna familio estas bazita sur la malkaŝa aŭ vualita domsklaveco de la virino, kaj la moderna socio estas maso kunmetita el multaj unuopaj familioj kiel ties molekuloj. La viro devas nuntempe en la granda plimulto de la kazo esti la akiranto,

II La familio

la nutranto de la familio, almenaŭ en la posedaj klasoj, kaj tio donas al li dominantan pozicion kiu ne bezonas juran kromprivilegion. Li estas en la familio la burĝo, la virino reprezentas la proletaron. Sed en la industria mondo la specifa karaktero de la ekonomia subpremo kiu pezas sur la proletaro aperas nur tiam en sia plena akreco, post kiam ĉiuj leĝaj privilegioj de la kapitalista klaso estas forigitaj kaj la plena jura egalrajteco de ambaŭ klasoj starigita; la demokratia respubliko ne forigas la kontraŭdiron de ambaŭ klasoj, ĝi donas male la terenon sur kiu ĝi elbataliĝas. Kaj same ankaŭ la specifa karaktero de la dominado de la viro super la virino en la moderna familio kaj la neceso kiel la maniero de starigo de reala socia egaleco de ambaŭ aperos nur tiam en hela taglumo, ekde kiam ambaŭ estas jure komplete egalrajtaj. Tiam montriĝos ke la liberigo de la virino havas kiel unuan antaŭkondiĉon la reenkondukon de la tuta virina sekso en la publikan industrion, kaj ke tio siavice bezonas la forigon de la eco de la unuopa familio kiel ekonomia unuo de la socio.

Laŭ tio ni havas tri ĉefajn formojn de geedzeco, kiuj ĝenerale respondas al la tri ĉefaj stadioj de la homa evoluo. Por la sovaĝeco la grupedzeco, por la barbareco la pariĝa geedzeco, por la civilizacio la monogamio, kompletigita de adulto kaj prostituado. Inter pariĝa geedzeco kaj monogamio enŝoviĝas, sur la supra ŝtupo de barbareco, la komando de la viroj super sklavinoj kaj la poligamio.

Kiel nia tuta prezentado pruvis, la progreso, kiu montriĝas en tiu vico, estas ligita kun la aparteco ke al la virinoj la seksa libereco de la grupedzeco estas pli kaj pli forprenata, sed ne al la viroj. Kaj efektive la grupedzeco plu ekzistas fakte por la viroj ĝis hodiaŭ. Kio por la virino estas krimo kaj sekvigas gravajn leĝajn kaj sociajn konsekvencojn, tio

4. La monogamia familio

estas por la viro konsiderata kiel honora aŭ plej malbonkaze kiel malgrava morala makulo kiun oni portas kun plezuro. Sed ju pli la malnove tradiciita hetajrismo estas niatempes ŝanĝita de la kapitalisma varproduktado kaj adaptita al ĝi, ju pli ĝi transformiĝas en malkaŝan prostituadon, des pli senmoralige ĝi efikas. Kaj pli precize ĝi senmoraligas la virojn multe pli ol la virinojn. La prostituado degradas inter la virinoj nur la malfeliĉulinojn kiuj perdiĝas al ĝi, kaj eĉ tiujn ne en la sama grado kiun oni kutime kredas. Aliflanke ĝi humiligas la tutan viraron. Ekzemple longa fianĉeco estas en naŭ kazoj el dek vera lernejo de edza malfidelo.

Ni estas nun survoje al socia ŝanĝego, kie la ĝisnunaj ekonomiaj bazoj de la monogamio malaperos same certe kiel tiuj de ĝia kompletigo, de la prostituado. La monogamio estiĝis el la socia koncentriĝo de pli grandaj riĉaĵoj en unu mano – kaj tiu de viro – kaj el la bezono herediĝi tiujn riĉaĵojn al la idoj de tiu viro kaj al nenies alia. Por tio necesis la monogamio de la virino, ne tiu de la viro, tiel ke tiu monogamio de la virino tute ne malhelpis la malkaŝan aŭ kaŝitan poligamion de la viro. Sed la estonta socia ŝanĝego, per transformado almenaŭ de la plej granda parto de la konstantaj, heredeblaj riĉaĵoj – de la produktadrimedoj – en publikan havaĵon reduktos tiun tutan heredo-zorgon al minimumo. Ĉar la monogamio estiĝis el ekonomiaj kaŭzoj, ĉu ĝi malaperos kun la malapero de tiuj kaŭzoj?

Oni povus respondi ne malprave: Ĝi malaperos tiom malmulte ke ĝi male nur plene realiĝos. Ĉar kun la transformado de la produktadrimedoj en socian proprieton malaperas ankaŭ la dunglaboro, la proletaro, do ankaŭ la neceso por certa – statistike kalkulebla – nombro da virinoj fordoni sin kontraŭ mono. La prostituado malaperos, la monogamio, anstataŭ pere, fariĝos fine realo – ankaŭ por la viroj.

La situacio de la viroj ĉiukaze tre ŝanĝiĝos. Sed ankaŭ tiu de la virinoj, de ĉiuj virinoj, grave ŝanĝiĝos. Kun la

II La familio

transiro de la produktadrimedoj en publikan proprieton la unuopa familio ĉesas esti ekonomia unuo de la socio. La privata mastrumado transformiĝas en socian industrion. La flegado kaj edukado de la infanoj fariĝas publika afero; la socio zorgos por ĉiuj infanoj egale, ĉu edzecaj aŭ eksteredzecaĵ. Per tio forfalas la zorgo pro la „sekvoj”, kiuj hodiaŭ estas la ĉefa socia – morala kiel ekonomia – elemento kiu malhelpas la senretenan sindonon de knabino al la amata viro. Ĉu tio ne estas sufiĉa kaŭzo por iom-post-ioma apero de senĝena seksrilato kaj per tio ankaŭ de pli malstrikta publika opinio pri virga honoro kaj virina honto? Kaj fine, ĉu ni ne vidis, ke en la moderna mondo monogamio kaj prostituado estas ja kontraŭdiroj, sed nedisigeblaj kontraŭdiroj, polusoj de unu sama socia stato? Ĉu la prostituado povas malaperi sen tiri la monogamio kun si en la abismon?

Ĉi tie ekefikas nova elemento, elemento kiu dum la tempo, kiam la monogamio elformiĝis, ekzistis ne pli ol ĝerme: la individua seksamo.

Antaŭ la mezepoko ne temas pri individua seksamo. Ke persona beleco, intimeco, samaj gustoj ktp ĉe homoj de diversa sekso vekis la deziron je seksa rilato, ke la viroj kiel la virinoj ne komplete indiferentis kun kiu ili eniris tiun plej intiman rilaton, tio estas memkomprenebla. Sed de tie ĝis nia seksamo estas ankoraŭ longa vojo. En la tuta antikveco la geedzoj estas faritaj de la gepatroj por la koncernatoj, kaj tiuj trankvile akceptas tion. La iometo da geedzeca amo kiun la antikveco konas, tute ne estas subjektiva emo, sed objektiva devo, ne kaŭzo, sed korelativo de la edzeco. Amrilatoj en la moderna senco okazas en la antikveco nur ekster la oficiala socio. La paŝtistoj, kies amplezuroj kaj suferoj prikantas Teokrito kaj Moŝo, de la Dafno kaj Kloeo de Longo, estas ĉiuj sklavoĵ, kiuj ne partoprenas en la ŝtato, la vivmedio de la libera civitano. Sed krom ĉe sklavoĵ ni trovas amaferojn nur kiel disfalproduktojn de la pereanta antikva mondo kaj kun virinoĵ kiuj ankaŭ staras ekster la oficiala

4. La monogamia familio

socio, kun hetajroj, do kun fremdulinoj aŭ kun liberigitinoj: en Ateno ekde la tempo antaŭ ĝia pereco, en Romo dum la imperia tempo. Se amaferoj vere okazis inter liberaj gecivitanoj, tiam nur per adulto. Kaj la klasika ampoeto de la antikveco, la malnova Anakreono, tiom fajfis pri la seksamo en nia senco, ke li fajfis eĉ pri la sekso de la amata estulo.

Nia seksamo distingiĝas esence de la simpla seksa deziro, la eroto⁶⁴, de la antikvuloj. Unue ĝi antaŭkondiĉas ĉe la amata estulo reciprokan amon; en tio la virino havas egalecon kun la viro, dum ĉe la antikva eroto ŝi tute ne estas ĉiam demandata pri tio. Due la seksamo havas gradon de intenseco kaj daŭro, kiuj aperigas al ambaŭ partoj neposedon kaj disiĝon granda, se ne la plej granda malfeliĉo; por povi reciproke posedi sin, ili ludas altan ludon, ĝis veto de sia vivo, kio en la antikveco povis okazi maksimume ĉe adulto. Kaj fine estiĝas nova morala mezuro por la prijuĝo de la seksa interrilato; oni demandas ne nur: ĉu ĝi estis geedzeca aŭ eksteredzeca, sed ankaŭ: ĉu ĝi fontis aŭ ne el amo kaj reciproka amo? Estas memkompreneble ke tiu nova normo en la feŭda aŭ en la burĝa praktiko ne estis pli bone respektata ol ĉiuj aliaj normoj de moralo – oni simple malatentis ĝin. Sed al ĝi estas ankaŭ ne pli malbone respektata. Ĝi estas agnoskata same kiel la aliaj – en la teorio, sur la papero. Kaj provizore ĝi ne povas postuli pli.

Kie la antikveco ĉesis kun siaj komencoj de seksamo, tie la mezepoko daŭrigas: ĉe la adulto. Ni jam priskribis la kavaliran amon kiu inventis la tagkantojn. De tiu amo, kiu volas rompi la geedzecon, ĝis tiu kiu volas fondi ĝin, estas ankoraŭ longa vojo, kiun la kavalira mondo neniam plene trairis. Eĉ se ni transiras de la frivolaĵoj romanoj al la virtaj ĝermanoj, ni trovas en la „Nibelunga poemo”, ke Krimhildo estas kaŝe ne malpli enamiĝinta en Sigfridon ol tiu en ŝin, ke ŝi tamen al la anonco de Guntero, ke li alĵuris ŝin al kavaliro, kiun li ne nomas, simple respondas:

64 En la originalo: dem Eros. -vl

II La familio

„Vi ne bezonas peti min; kiel vi ordonas al mi, tia mi volas ĉiam esti; tiu, kiun vi, sinjoro, donas al mi kiel edzon, al tiu mi volonte fianĉiĝos.”

Ŝi tute ne eĉ pensas pri tio ke ŝia amo povus ĉi tie esti konsiderata. Guntero⁶⁵ svatas pri Brunhildo, Ecelo pri Krimhildo, sen eĉ esti iam vidinta ilin; same en la poemo „Gutrun”, Sigebanto de Irlando svatas pri la norvega Uto, Hetelo de Hegelingo pri Hildo de Irlando, fine Sigfrido de Morlando, Hartmuto de Ormanio kaj Hervigo de Zelando pri Gutruno; kaj nur ĉi tie okazas ke tiu ĉi decidiĝas por la lasta. Ĝenerale la fianĉino de la juna princo estas elektata de ties gepatroj, se ili ankoraŭ vivas, alie de li mem sub konsilo de la grandaj feŭdestroj, kies opinio en ĉiuj kazoj estas gravaj. Tio ja ne povas esti alie. Por la kavaliro aŭ barono kiel por la landa princo mem la edzigo estas politika ago, okazo por ampleksigi la potencon per novaj aliancoj; la intereso de la domo devas decidi, ne la plaĉo de la individuo. Kiel la amo tie povus trovi la okazon diri la decidan vorton pri la geedziĝo?

Ne alie statas pri la gilda civitano de la mezepokaj urboj. Ĝuste la privilegioj kiuj protektas lin, la multklaŭzaj gildordoj, la artefaritaj limlinioj kiuj leĝe disigis lin jen de aliaj gildoj, jen de liaj propraj gildanoj, jen de liaj submajstroj kaj metilernantoj, jam sufiĉe mallarĝigis la rondon el kiu li povis serĉi taŭgan edzinon. Kaj kiu inter ili estis la plej taŭga, tion decidis en tiu komplika sistemo nepre ne lia individua emo, sed la familiintereso.

Tiel en la granda plimulto de la kazo la geedziĝo restis do ĝis fine de la mezepoko tio kio ĝi estis dekomence: afero decidata ne de la koncernatoj. Komence oni enmondiĝis jam edz(in)iĝinta – edz(in)iĝita kun tuta grupo de la alia sekso.

65 Originale respektive: Günther, Brunhild, Etzel, Krimhild, „Gutrun”, Siegebant von Irland, Ute, Hetel von Hegelingen, Hilde von Irland, Siegfried von Morland, Hartmut von Ormanien, Herwig von Seeland, Gutrun. -vl

4. La monogamia familio

En la postaj formoj de la grupedzeco okazis verŝajne simila rilato, nur sub konstante kreskanta mallarĝiĝo de la grupo. En la pariĝa geedzeco estas regulo ke la patrinoj interkonsentas pri la geedzeco de siaj infanoj; ankaŭ tie decidas konsideroj pri novaj parencecligoj kiuj devis doni al la nova paro pli fortan pozicion en la gento kaj tribo. Kaj kiam kun la supereco de la privata proprieto super la komunproprieto kaj kun la intereso pri heredo ekregis la patrorajto kaj la monogamio, tiam la geedziĝo fariĝis des pli dependa de ekonomiaj konsideroj. La *formo* de aĉeta geedzeco malaperas, sed la fenomeno mem estas plenumata en ĉiam kreskanta mezuro, tiel ke ne nur la virino, sed ankaŭ la viro ricevas prezon – ne laŭ siaj personaj kvalitoj, sed laŭ sia posedaĵo. Ke la reciproka emo de la koncernatoj estu la ĉion alian superanta kaŭzo de la geedziĝo, tio estis en la praktiko de la regantaj klasoj dekomence ne konsiderata; io tia okazis, se entute, en la romantiko aŭ – ĉe la subpremataj klasoj, kiuj ne estis konsiderataj.

Tio estis la stato, kiun la kapitalisma produktado trovis, kiam ĝi, ekde la epoko de la geografiaj malkovroj, per la mondkomerc kaj la manufakturo, pretiĝis al mondregado. Oni povus pensi ke tiu reĝimo de geedziĝo bonege sidis al ĝi, kaj efektive estis tiel. Tamen – la ironio de la mondhistorio estas senfunda – estis ĝuste la kapitalisma produktado kiu estis faronta la decidan breĉon en ĝin. Per tio ke ĝi transformis ĉiujn aferojn en varojn, ĝi dissolvis ĉiujn malnove tradiciitajn rilatojn, metis sur la lokon de la heredita moralo, de la historia rajto, la aĉeton kaj vendon, la „liberan“ kontrakton; kiel do la angla juristo H. S. Maine kredis esti farinta gigantan malkovron kiam li diris, ke nia tuta progreso kompare kun antaŭaj epokoj konsistas en tio ke ni venis „de stato al kontrakto“, de herede tradiciitaj al libervole kontraktitaj kondiĉoj, kio staris tamen jam en la „Komunista Manifesto“⁶⁶, en ties ĝustaj partoj.

66 „Manifesto de la komunista partio“, trad. [el la germana] de

II La familio

Sed por fari kontrakton necesas homoj kiuj povas libere disponi pri sia persono, agoj kaj proprietajoj kaj kiuj staras egalrajte unu kontraŭ la alia. Krei tiujn „liberajn” kaj „egalajn” homojn estis ĝuste unu el la ĉefaj laboroj de la kapitalisma produktado. Kvankam tio okazis komence ankoraŭ en nur duonkonscia, krome religie vualita maniero, tamen ekde la lutera kaj kalvina reformacio la teoremo akceptiĝis ke la homo plene respondecas pri siaj agoj se li faris ilin en plena libereco de sia volo, kaj ke estas morala devo rezisti al ĉia devigo al malmorala ago. Sed kiel tio kongruis kun la ĝisnuna praktiko de geedziĝo? La edzeco estis laŭ burĝa kompreno kontrakto, jura ago, kaj pli precize la plej grava inter ĉiuj, ĉar ĝi faras decidojn pri korpo kaj spirito de du homoj por la tuta vivtempo. Tiam ĝi estis kontraktata ja libervole; sen la jeso de la koncernatoj ĝi ne povis okazi. Sed oni sciis ja tro bone kiel la jeso estiĝis kaj kiuj estis la veraj kontraktantoj. Sed se por ĉiuj aliaj kontraktoj postuliĝis reala libereco de decido, kial ne al tiu? Ĉu la du kunigotaj junuloj ne havis ankaŭ la rajton libere disponi pri si mem, pri sia korpo kaj ties organoj? Ĉu la seksamo ne enmodiĝis per la kavalira mondo, kaj ĉu, kontraŭ la kavalira adulta amo, la amo de la geedzoj ne estis ĝia ĝusta burĝa formo? Sed se estas devo de la geedzoj ami unu la alian, ĉu ne estis same devo de la amantoj geedziĝi inter si kaj al neniu alia? Ĉu tiu ĉi rajto de la amantoj ne staris pli alte ol la rajto de la gepatroj, parencoj kaj ceteraj tradiciitaj edziĝmakleristoj kaj svatantoj? Se la rajto je libera persona esplorado senĝene enrompiĝis en eklezion kaj religion, kiel ĝi devis halti antaŭ la neeltenebla pretendo de la pli aĝa generacio disponi pri korpo, animo, havaĵo, feliĉo kaj malfeliĉo de la juna?

Tiuj demandoj estis nepraj en tempo kiu malstreĉis ĉiujn malnovajn ligojn de la socio kaj ŝancelis ĉiujn hereditajn ideojn. La mondo fariĝis subite dekoble pli granda; ansta-

Detlev Blanke, Progreso, Moskvo, 1991, sekcio I. Ĝi aperis unue en la jaro 1848. -vl

4. La monogamia familio

taŭ kvadranto de duonglobo, nun la tuta terglobo kuŝis antaŭ la vido de la okcidentaj eŭropanoj, kiuj urĝe okupiĝis pri ekposedi la aliajn sep kvadrantojn. Kaj kiel la malnovaj striktaj limoj de la patrujo, tiel falis ankaŭ la miljaraj baroj de la mezepoka preskribita pensmaniero. Al la ekstera kiel al la interna okulo de la homo malfermiĝis senfine pli ampleksa horizonto. Kiom validis la bonpensado de respektindeco, kiom la honora gild-privilegio heredita tra generacioj, al la junulo kiun allogis la riĉaĵoj de Hindio, la or- kaj arĝent-minejo de Meksiko kaj de *Potosi*. Ĝi estis la epoko de vagantaj kavaliroj de la burĝaro; ankaŭ ĝi havis sian romantikon kaj siajn amsopirojn, sed sur burĝa bazo kaj kun last- instance burĝaj celoj.

Tiel okazis ke la supreniranta burĝaro, precipe en la protestantaj landoj, kie oni pleje skuis la tradiciojn, agnoskis pli kaj pli ankaŭ por la geedzeco la liberecon de kontraktiĝo kaj realigis ĝin en la supre priskribita maniero. La geedzeco restis klasa geedzeco, sed ene de la klaso oni atribuis al la koncernatoj certan gradon de elektlibereco. Kaj sur la papero, en la moralteorio kiel en la poeta priskribo, nenio estis tiom neskueble firma ol la principo ke ĉiu geedzeco estas malmorala kiu ne baziĝas sur reciproka seksamo kaj reale libera interkonsento de la geedzoj. Mallonge, la amgeedzeco estis proklamita kiel homrajto, kaj ne nur kiel virrajto, sed esceptokaze ankaŭ kiel virinrajto.⁶⁷

Sed tiu ĉi homrajto distingiĝis en unu punkto de ĉiuj ceteraj tiel nomataj homrajtoj. Dum tiuj en la praktiko restis limigitaj al la reganta klaso, la burĝaro, kaj estis rekte aŭ malrekte kripligitaj por la subpremata klaso, la proletaro, ĉi tie ree la ironio de la historio montriĝas taŭga. La reganta klaso restas dominata de la konataj ekonomiaj influoj, kaj pro tio okazas en ĝi nur en esceptaj kazoj vere libere kontraktitaj geedzeco, dum tiuj ĉe la regata klaso, kiel ni vidis,

67 En la originalo jene: „... nicht nur als droit de l'homme, sondern auch ausnahmsweise als droit de la femme.“ -v1

II La familio

estas la regulo.

La plena libereco de geedziĝo plenumebblas ĝenerale do nur tiam, kiam la forigo de la kapitalisma produktado kaj de la proprietrilatoj kreitaj de ĝi forigis ĉiujn ekonomiajn kromkonsiderojn, kiuj nun ankoraŭ potence efikas sur la elekto de la geedzpartneroj. Tiam ne restos plu alia motivo ol la reciproka simpatio.

Ĉar la seksamo estas laŭ sia naturo ekskluziva – kvankam tiu ekskluziveco ĝenerale realiĝas nuntempe nur en la virino – tial la geedzeco bazita sur la seksamo estas laŭ sia naturo unuopa geedzeco. Ni vidis, kiom Bachofen pravis, kiam li vidis en la progreso de la grupedzeco al la unuopa edzeco precipe la faron de la virinoj; nur la progreso de la pariĝa geedzeco al monogamio dankiĝas al la viroj; kaj tiu konsistis, historie, esence en malboniĝo de la pozicio de la virinoj kaj en faciligo de la malfidelo de la viroj. Se nun ankaŭ falas la ekonomiaj konsideroj, pro kiuj la virinoj toleris tiun kutiman malfidelon de la viroj – la zorgo pri sia propra ekzistado kaj eĉ pli pri la estonteco de la infanoj –, tiam la per tio atingita egaleco de la virino havos la efikon, laŭ ĉia ĝisnuna sperto, en multe pli granda proporcio, ke la viroj fariĝas vere monogamiaj ol ke la virinoj fariĝas polian-driaj.

Sed tio, kio tute klare foriĝos el la monogamio, tio estas ĉiuj trajtoj, kiuj estas truditaj al ĝi per ĝia estiĝo el la proprietrilatoj, kaj ili estas unue la dominado de la viro kaj due la neeblo malfari la geedzecon. La dominado de la viro en la geedzeco estas simpla sekvo de lia ekonomia dominado kaj falas kun tiu per si mem. La neeblo malfari la geedzecon estas parte sekvo de la ekonomia situacio, sub kiu la monogamio estiĝis, parte tradicio el la tempo kiam la kunteksto de tiu ekonomia situacio kun la monogamio ankoraŭ ne estis bone komprenita kaj suferis religian deformiĝon. Ĝi estas jam hodiaŭ miloble rompata. Se nur sur amo bazita

4. La monogamia familio

geedzeco estas morala, tiam ankaŭ nur tiu, en kiu la amo persistas. Sed la daŭro de la impeto de individua seksamo estas laŭ la individuoj tre diversaj, precipe ĉe la viroj, kaj pozitiva ĉeso de la korinklino aŭ ĝia deŝovo de nova pasia amo igas la disigon bonfaro por ambaŭ partoj kiel por la socio. Oni nur devas ŝpari al la homoj paŝi tra la senutila koto de divorca proceso.

Do, tio kion ni nuntempe povas supozi pri la ordo de la seksrilatoj post la estonta forbalaado de la kapitalisma produktado estas ĉefe negativa, limiĝas plej ofte al tio kio forfalas. Sed kio aldoniĝos? Tio montriĝos, kiam nova generacio estos elkreskinta: generacio de viroj kiuj neniam en sia vivo havis okazon aĉeti, per mono aŭ aliaj potencrimedoj, la fordoniĝon de virino, kaj de virinoj, kiuj neniam venis en la okazon doni sin al viro pro iaj aliaj konsideroj ol vera amo, nek rifuzi al la amanto la sindonon pro timo antaŭ la ekonomiaj sekvoj. Kiam tiuj homoj ekzistos, ili fajfos pri tio kion oni hodiaŭ kredas ke ili faru; ili faros al si mem sian propran praktikon kaj la laŭ tio mezuritan publikan opinion pri la praktiko de ĉiu individuo – punkto.

Sed ni tamen revenu al Morgano, de kiu ni konsiderinde malproksimiĝis. La historia esplorado de la sociaj institucioj evoluintaj dum la civilizacia periodo transiras la kadron de lia libro. La sortoj de la monogamio dum tiu epoko okupas lin do nur mallonge. Ankaŭ li vidas en la pluformiĝo de la monogamia familio progreson, proksimiĝon al la plena rajtegaleco de la seksoj, sen ke li tamen konsideras tiun celon atingita. Sed, diras li,

„se la fakto agnoskiĝas, ke la familio trairis sinsekve kvar formojn kaj troviĝas nun en la kvina, tiam leviĝas la demando, ĉu tiu formo povas esti por la estonteco daŭrema. La sole ebla respondo estas tiu, ke ĝi devas plu evolui, kiel la socio plu evoluas, ŝanĝiĝas en la mezuro kiel la socio ŝanĝiĝas, tute kiel ĝis nun. Ĝi estas la kreitaĵo de la socia sistemo kaj respeguliĝos en ĝia nivelo de formiĝo. Ĉar la monogamia familio pliboniĝis ek-

II La familio

de la komenco de la civilizacio, kaj tre rimarkinde en la moderna tempo, tial eblas almenaŭ supozi, ke ĝi kapablas je plua perfektigo, ĝis kiam la egaleco de ambaŭ seksoj estos atingita. Se en malproksima estonteco la monogamia familio ne kapablos plenumi la postulojn de la socio, tiam maleblas antaŭdiri kia estos ĝia posteulo.”

III La irokeza gento

Ni venas nun al alia malkovro de Morgano, kiu estas almenaŭ same grava kiel la rekonstruado de la familia prafarmo el la parencecsistemoj. Li pruvis ke la gentasocioj¹, nomataj per bestnomoj, ene de tribo de amerikaj indianoj, estas esence identaj kun la *genea*² de la grekoj, la *gentes* de la romanoj; ke la amerika formo estas la origina, la grekaro la posta, derivita; ke la tuta sociorganizo de la grekoj kaj romanoj de la pratempo en *gens*, gentaro³ kaj tribo trovas sian paralelon en la amerika-indiana; ke la gento estas institucio komuna al ĉiuj barbaroj ĝis la eniro en la civilizacion kaj eĉ ankoraŭ poste (laŭ tio kion niaj ĝisnunaj fontoj ebligas juĝi pri tio). Kaj tiu pruvo klarigis unufrape la plej malfacilajn partojn de la plej malnova greka kaj roma historio kaj donis al ni samtempe neatenditajn klarigojn pri la bazaj trajtoj de la socia konstitucio de la pratempo – antaŭ la enkonduko de la *ŝtato*. Kvankam la afero aspektas tiom simpla, se oni jam konas ĝin, Morgano malkovris ĝin nur en la lasta tempo; en la antaŭa verko aperinta en 1871⁴ li ankoraŭ ne sciis tiun sekreton, kies malkaŝo de tiam dum certa tempo tute silentigis⁵ la alie tre optimismajn anglajn prahistoriistojn

La latina vorto *gens*, kiun Morgano aplikas ĝenerale por tia gentasocio, devenas kiel la greka samsignifa *genos* de la ĝenerale arja radiko *gan* (germane *kan*, kie laŭ la regulo *k* anstataŭigas la arjan *g*), kiu signifas produkti. *Gens*, *genos*, sanskrite *ĝanas*⁶, gote (laŭ la supra regulo) *kuni*, malnovnorde kaj anglasakse *kyn*, angle *kin*, mezaltgermane *künne*

1 En la originalo: „Geschlechtsverbände”, en la franca versio „groupes de consanguins” (sangparencaj grupoj). -vl

2 La kursivigo de tiuj ĉi fremdlingvaj vortoj estas de la tradukinto. -vl

3 Ekzistas neoficiala vorto *fratrio* por gentaro. -vl

4 Morgan: *Systems of consanguinity and affinity of the human family*. Vaŝingtono, 1871. [fr. eld.]

5 En la eldono de 1881 mankas: „dum certa tempo”.

6 En la originalo: „dschanas”. -vl

III La irokeza gento

signifas same sekso⁷, gento, generacio, deveno. Sed *gens* en la latina, *genos* en la greka estas uzataj speciale por tiu gentasocio kiu fieras pri komuna deveno (kaj ĉi tie de komuna prapatro) kaj estas ligita per certaj sociaj kaj religiaj institucioj al aparta komuneco, kies estiĝo kaj naturo tamen restis ĝis nun malklara al ĉiuj niaj historiistoj.

Ni vidis jam supre, ĉe la punalua familio, kia estas la konsisto de gento en la origina formo. Ĝi konsistas el ĉiuj personoj kiuj per la punalua geedzeco kaj laŭ la ideoj nepre regantaj en ĝi konsistigas la agnoskitan posteularon de certa individua prapatrino, la fondinto de la gento. Ĉar en tiu familiformo la patreco malcertas, validas nur la ina linio. Ĉar la fratoj ne rajtas edzinigi siajn fratinojn, sed nur virinojn alidevenajn, tial la infanoj generitaj kun tiuj fremdaj virinoj elfalas laŭ patrinrajto el la gento eksteren. Restas do nur la posteuloj de la *filinoj* de ĉiu generacio ene de la gentasocio; tiuj de la filoj transiras en la gentojn de siaj patrinoj. Kio fariĝas tiu sangparenca grupo, ekde kiam ĝi konstituigas kiel aparta grupo fronte al similaj grupoj ene de tribo?

Morgano prenas kiel klasikan formon de tiu origina gento la irokezojn, speciale tiujn de la tribo seneko⁸. Ĉe tiu ekzistas ok gentoj, nomataj laŭ bestoj: 1. lupoj, 2. ursoj, 3. testudoj, 4. kastoroj, 5. cervoj, 6. skolopoj, 7. ardeoj, 8. falkoj. En ĉiu gento regas jena kutimo:

1. Ĝi elektas sian *saĥem* (pacprezidanton) kaj gentestron (militestron). La *saĥem* devas esti elektita el la gento mem, kaj lia ofico estis en ĝi heredebla en tiu senco ke en kazo de vakeco ĝi estis tiel tuj reokupenda; la militestro elektoblis ankaŭ ekster la gento kaj povis portempe tute manki. Oni neniam elektis *saĥem* filon de la antaŭa, ĉar ĉe la irokezoj

7 En la originalo: „Geschlecht” signifas sekso, gento, generacio (kaj krome: genro). Pro tio, la kromaj aperoj de la vorto estas en la traduko ne ĉiam absolute trafaj interpretoj. -vl

8 En la originalo: „Seneka”. -vl

III La irokeza gento

regis patrinrajto, la filo do apartenis al alia gento; sed ja kaj ofte la frato aŭ fratinfilo. Ĉe la voĉdono *ĉiuj* voĉdonis, viroj kaj virinoj. Sed la rezulto estis konfirmenda de la ceteraj sep gentoj, kaj nur tiam la elektito estis ceremonie enoficigata, kaj pli precize per la komuna konsilantaro de la tuta irokeza ligo. La signifo de tio montriĝos poste. La potenco de la *saĥem* ene de la gento estis patreca, pure morala; li ne havis devigajn rimedojn. Apud tio li estis, kaŭze de lia ofico, membro de la triba konsilantaro de la senekoj kaj de la liga konsilantaro de ĉiuj irokezoj. La militestro rajtis ordoni nur dum militiroj.

2. Ĝi laŭ bontrovo eksoficigas la *saĥem*-on kaj la militestron. Tio okazas ankaŭ de viroj kaj virinoj komune. La eksoficigitoj estas poste simplaj militistoj kiel la aliaj, privatpersonoj. La triba konsilantaro povas cetere eksoficigi ankaŭ *saĥem*-ojn, eĉ kontraŭ la volo de la gento.

3. Neniu membro rajtas edziĝi ene de la gento. Tio estas la baza regulo de la gento, ligo, kiu kuntenas ĝin; ĝi estas la negativa esprimo de la tre pozitiva sangparenceco, kiu sole kaŭzas ke la en ĝi entenataj individuoj fariĝas gento. Per la malkovro de tiu simpla fakto Morgano por la unua fojo senvaligis la naturon de la gento. Kiom malmulte la gento estis ĝis tiam komprenata, tion pruvas la pli fruaj raportoj pri sovaĝuloj kaj barbaroj, kie la diversaj korporacioj el kiuj la genta ordo konsistas, estas ne komprenitaj kaj pelmele kunmiksitaj kiel tribo, klano, tumo⁹ ktp kaj kelkfoje pri ili dirita ke edziĝo ene de tia korporacio estas malpermesata. Per tio estiĝis la senelira konfuzo, en kiu s-ro McLennan povis aperi kiel Napoleono kaj fari ordon, per la ordono: Ĉiuj triboj dividiĝas en tiaj, ene de kiuj la edzeco estas malpermesata (ekzogamiaj) kaj tiaj, en kiuj ĝi estas permesata (endogamiaj). Kaj post kiam li tiumaniere des pli profunde enkaĉigis la aferon, li povis multvorte dediĉi sin al la plej profundpensaj esploradoj pri la demando kiu el liaj du ab-

9 En la originalo: „Thum”, en la franca versio: „thum”. -vl

III La irokeza gento

surdaj klasoj estas la pli malnova: ĉu la ekzogamio aŭ la endogamio. Per la malkovro de la gento bazita sur sangparenceco kaj de la konsekvenca maleblo de edzeco inter ĝiaj membroj, tiu sensencaĵo ĉesis per si mem. – Estas memkompreneble ke sur la ŝtupo, sur kiu ni trovas la irokezojn, la edziĝ-malpermeso de la gento estas nerompeble observata.

4. La havaĵo de mortintoj falis al la ceteraj gentanoj, ĝi devis resti ene de la gento. Ĉe la malgraveco de la aĵoj, kiujn irokezo povis postlasi, la plej proksimaj gentparencoj dividis la heredaĵon inter si; kiam mortis viro, tiam liaj korpaj gefratoj kaj la patrinfrato; kiam mortis virino, tiam ŝiaj infanoj kaj korpaj fratinoj, sed ne ŝiaj fratoj. Ĝuste pro tio viro kaj virino ne povis heredi unu de la alia, aŭ la infanoj de patro.

5. La gentanoj estis devigataj je helpo, protekto kaj ĉefe helpo por venĝo pro ofendo fare de fremduloj. La *unuopulo* fidis por sia sekureco la protekton de la gento kaj povis tion; kiu ofendis lin, ofendis la tutan genton. El tio, el la sangligoj de la gento, fontis la devo je sangvenĝo, kiu estis nepre agnoskata de la irokezoj. Se gent-fremdulo mortigis gentanon, tiam la tuta gento de la mortigito estis devigata je sangvenĝo. Unue oni provis peradon; la gento de la mortiginto faris konsilan kunvenon kaj faris al la konsilantaro de la gento de la mortigito proponojn por regulado, plej ofte proponante esprimojn de bedaŭro kaj gravajn donacojn. Se tiuj estis akceptataj, la afero estis finita. Alikaze la ofendita gento nomumis unu aŭ plurajn venĝantojn, kiuj estis devigitaj persekuti kaj mortigi la mortiginton. Se tio okazis, la gento de la mortiginto havis nenian rajton plendi, la kazo estis kompensita.

6. La gento havas certajn nomojn aŭ seriojn da nomoj, kiujn en la tuta tribo nur ĝi rajtas nomi, tiel ke la nomo de la unuopulo samtempe diras al kiu gento li apartenas. Tia

III La irokeza gento

genta nomo entenas apriorie gentajn rajtojn.

7. La gento povas adopti fremdulojn kaj per tio akcepti ilin en la tutan tribon. La militkaptitojn, kiujn oni ne mortigis, fariĝas tiel per adoptado en gento tribanoj de la senekoj kaj ricevas per tio la plenajn gentajn kaj tribajn rajtojn. La adopto okazis laŭ peto de individuaj gentanoj, viroj, kiuj akceptis la fremdulon kiel fraton respektive fratino, virinoj, kiuj akceptis lin kiel infanon; la ceremonia akcepto en la gento necesis por konfirmo. Ofte iaj gentoj, kies anoj estis esceptokaze ŝrumpintaj, estis tiel nove fortigitaj per amasa adoptado el alia gento, kun konsento de tiu. Ĉe la irokezoj la ceremonia akcepto en la genton okazis en publika kunveno de la triba konsilantaro, per kiu ĝi faris fakte religia ceremonio.

8. Oni povas apenaŭ prui ĉe la indianaj gentoj specifajn religiajn festaĵojn; sed la religiaj ceremonioj de la indianoj estas pli aŭ malpli ligitaj kun la gentoj. Ĉe la ses jaraj religiaj festoj de la irokezoj, la *saĥem*-oj kaj militestroj de la unuopaj gentoj estis pro sia ofico konsiderataj membroj de la „kredgardistoj” kaj havis pastrajn funkciojn.

9. La gento havis komunan tombejon. Tiu, ĉe la irokezoj kunpremitaj meze de la blankuloj en la ŝtato Novjorko, estas nun malaperinta, sed ĝi antaŭe ekzistis. Ĉe aliaj indianoj ĝi ankoraŭ ekzistas; ekzemple ĉe la tuskaroroj¹⁰, proksimaj parencoj de la irokezoj, kiuj, kvankam kristanoj, havas por ĉiu gento certan vicon en la tombejo, tiel ke ja la patrino estas entombigata en la sama vico kiel la infanoj, sed ne la patro. Kaj ankaŭ ĉe la irokezoj la tuta gento de mortinto iras al la entombigo, prizorgas la tombon, la entombigajn paroladojn ktp.

10. La gento havas konsilistaron, la demokratian kunvenon de ĉiuj viraj kaj virinaj plenkreskaj gentanoj, ĉiuj kun sama voĉdonrajto. Tiu konsilantaro elektis *saĥem*-ojn kaj

10 En la originalo: Tuskaroras. -vl

III La irokeza gento

militestrojn kaj eksoficigis ilin; same la ceterajn „kredgard-istojn”; ĝi decidis pri pentfaraj donoj¹¹ aŭ sangvenĝo por murditaj gentanoj; ĝi adoptis fremdulojn en la genton. Mal-longe, ĝi estis la suverena potenco en la gento.

Jen la rajtoj de tipa indiana gento.

„Ĉiuj ĝiaj membroj estas liberaj homoj, devigataj protekti *ĉiu ĉies* liberecon; egalaj en personaj rajtoj – nek *sahem*-oj nek militestroj pretendas ian ajn privilegion; ili konsistigas frataron, ligitan per sangligoj. Libereco, egaleco, frateco, kvankam neniam formulitaj, estis la bazaj principoj de la gento, kaj tiuj siavice estis la unueco de tuta socia sistemo, la bazo de la organizita indiana socio. Tio klarigas la neflekseblan senton je sendependeco kaj la personan dignon de la sinteno, kiun ĉiu agnoskas ĉe la indianoj.”

Dum la epoko de la malkovro, ĉiuj indianoj de tuta Nord-ameriko estis organizitaj en gentoj, laŭ patrinrajto. Nur en kelkaj triboj, kiel tiuj de la dakotoj, la gentoj estis pereintaj, kaj en kelkaj aliaj, ojibvoj, omahoj, ili estis organizitaj laŭ patroraĵto.

Ĉe tre multaj indianaj triboj kun pli ol kvin aŭ ses gentoj ni trovas tri, kvar aŭ pli da gentoj unuiĝintaj en aparta grupo, kiun Morgano nomas, per fidela traduko de la indiana nomo laŭ sia greka ekvivalento *gentaro*¹² (fratrararo). Ekze la senekoj havas du gentarojn; la unua entenas la gentojn 1-4, la dua la gentojn 5-8. Pli detala esploro montras, ke tiuj gentaroj prezentas plej ofte la originajn gentojn, en kiuj la tribo komence dividiĝis; ĉar ĉe la edziĝ-malpermeso ene de la gento ĉiu tribo devis enteni nepre du gentojn por povi sendepende plu ekzisti. Laŭ la mezuro en kiu la tribo pli-grandiĝis, ĉiu gento dividiĝis siavice en du aŭ plurajn, kiuj nun aperas ĉiu kiel aparta gento, dum la origina gento, kiu entenas ĉiujn filinajn gentojn, plu vivas kiel gentaro. Ĉe la

11 En la originalo: „Bußgaben (Wergeld)” -vl

12 En la senco de *gentaro*. -vl

III La irokeza gento

senekoj kaj la plej multaj aliaj indianoj, la gentoj de la propra gentaro estas fratgentoj, dum tiuj de la aliaj estas iliaj kuzgentoj – nomoj, kiuj en la amerika parencecsistemo, kiel ni vidis, havas tre realan esprimplenan sencon. Origine neniu seneko rajtis geedziĝi ene de sia gentaro, sed tio estas jam delonge eksteruza kaj limigita al la gento. Estis tradicio de la senekoj ke urso kaj cervo estas la du originaj gentoj, de kiuj la aliaj debranĉiĝas. Post kiam tiu nova institucio estis enradikiĝinta, ĝi estis laŭbezone modifita; se gentoj de gentaro formortis, tiam kelkfoje por kompensado tutaj gentoj el aliaj gentaroj estis en tiu transigitaj. Pro tio ni trovas ĉe diversaj triboj la samnomajn gentojn diverse grupitaj en la gentaroj.

La funkcioj de la gentaro ĉe la irokezoj estas parte sociaj, parte religiaj.

1. La pilkludon la gentaro ludas unu kontraŭ la alia; ĉiu sendas siajn plej bonajn ludantojn en la ludon, la ceteraj spektas, en gentaroj grupitaj aparte, kaj vetas unu kontraŭ la alia pri la gajno de la siaj.

2. En la triba konsilantaro sidas la *saĥem*-oj kaj militestroj de ĉiu gentaro kune, la du grupoj unu vid-al-vid de la alia, ĉiu parolanto parolas al la reprezentantoj de ĉiu gentaro kiel al aparta korporacio.

3. Se okazis mortigo en la tribo, kie mortiginto kaj mortigito ne apartenas al la sama gentaro, tiam la ofendita gento ofte alvokis siajn fratgentojn; tiuj kunvokis gentaran konsilantaron kaj direktis sin al la alia gentaro kiel tutaĵo, por ke tiu ankaŭ kunvoku konsilantaron por solvi la aferon. Ĉi tie do reaperas la gentaro kiel origina gento kaj kun pli granda ŝanco je sukceso ol la pli malforta unuopa gento, ĝia filino.

4. Ĉe mortoj de eminentuloj la kontraŭa gentaro transprenis la prizorgadon de la entombigo kaj la entombigajn ceremoniojn, dum la gentaro de la mortinto kuniris kiel

III La irokeza gento

funebranto. Se mortis *saĥem*-o, la kontraŭa gentaro anoncis la ĉesigon de la ofico ĉe la liga konsilantaro de la irokezoj.

5. Ĉe la elekto de *saĥem*-o kunludis ankaŭ la fratri-konsilantaro. Konfirmo fare de la fratgentoj estis konsiderata kiel sufiĉe memkomprenebla, sed la gentoj de la alia gentaro povis oponi. En tia kazo la konsilantaro de tiu gentaro kunvenis; se ĝi konfirmis la opozicion, tiam la elekto estis senefika.

6. Antaŭe la irokezoj havis apartajn religiajn misteraĵojn, kiujn la blankuloj nomis *medicine-lodges*. Tiuj estis celebraĵoj ĉe la senekoj fare de du religiaj komunumoj, kun oficiala inicado por novaj membroj; ĉiu el la du gentaroj havis unu el tiuj du komunumoj.

7. Se, kiel preskaŭ certe, la kvar *linages* (etnoj)¹³, kiuj priloĝis la kvar kvartalojn de Tlaskalo¹⁴ dum la tempo de la konkero, estis kvar gentaroj, tiam estas per tio pruvite ke la gentaroj estis kiel ĉe la grekoj kaj similaj gentligoj ĉe la ĝermanoj ankaŭ konsiderataj kiel militaj unuoj: tiuj kvar *linages* iris en la batalon, ĉiu kiel aparta aro, kun propra uniformo kaj flago kaj sub propra gvidanto.

Kiel pluraj gentoj konsistigis gentaron, tiel, en la klasika formo, pluraj gentaroj konsistigis tribon; kelkfoje mankas ĉe tre malfortiĝintaj triboj la intera membro, la gentaro. Kion signifas indiana tribo en Ameriko?

1. Propran teritorion kaj propran nomon. Ĉiu tribo posedis krom la lokon de sia reala loĝado ankoraŭ konsiderindan teritorion por ĉasado kaj fiŝkaptado. Krome estis plia, neŭtrala terstrio, kiu entendiĝis ĝis la teritorio de la proksima tribo, kiu estis ĉe parenclingvaj triboj malpli granda, ĉe neparenclingvaj triboj pli granda. Tiu estas la limarbaro de

13 En la originalo: „*linages* (Geschlechter)”, rasoj, etnoj, familioj.
-vl

14 En la originalo: „*Tlascalá*”. -vl

III La irokeza gento

la ĝermanoj, la dezerto kiujn la suevoj de Cezaro kreis ĉirkaŭ sia teritorio, la *îsarnholt* (dane *jarnved*, *limes Dani-cus*) inter danoj kaj germanoj, la Saksa Arbaro kaj la *brani-bor* (slave = protektarbaro), de kiu Brandenburgo havas sian nomon, inter germanoj kaj slavoĵ. La tiel per malcertaj limoj elmetita teritorio estis komuna posedaĵo de la tribo, de najbaraj triboj agnoskata kiel tia, de ĝi mem defendata kontraŭ entrudiĝoj. La malcerteco de la limoj montriĝis malavantaĝa nur kiam la loĝantaro estis forte pliiĝinta. – La tribnomoj ŝajnas esti plej ofte pli hazarde ol intence elektitaj; kun la fluo de la tempo okazis ofte ke tribo estis de najbaraj triboj nomata per alia nomo ol tiu uzata de ĝi mem; simile kiel la ĝermanoj ricevis sian unuan historian ĉiomnon, ĝermanoj, de la keltoj.

2. Apartan, nur al tiu tribo propran *dialekton*. Efektive tribo kaj dialekto fakte kongruas; novformado de triboj kaj de dialektoj per divido okazis ankoraŭ antaŭ nelonge en Ameriko kaj ankaŭ nun certe ne tute ĉesis. Kie du malfortiĝintaj triboj kunfandiĝis al unu, okazas esceptokaze ke en la sama tribo du proksime parencaj dialektoj estas parolataj. La mezuma grandeco de amerikaj triboj estas malpli ol 2.000 anoj; la ĉerokezoj tamen havas 26.000, la plej granda nombro da indianoj en Usono kiu parolas la saman dialekton.

3. La rajton ceremonie enoficigi la *saĥem*-ojn kaj milites-trojn elektitajn de la gentoj kaj

4. la rajton eksoficigi ilin, ankaŭ kontraŭ la volo de ilia gento. Ĉar tiuj *saĥem*-oj kaj milites-troj estas membroj de la triba konsilistaro, tiuj rajtoj de la tribo klariĝas per si mem. Kie estiĝis ligo de triboj kaj kie la tutaĵo de la triboj estis reprezentata en liga konsilistaro, la supraj rajtoj transiris al tiu.

5. La posedon de komunaj religiaj imagaroj (mitaro) kaj kultaj agadoj.

III La irokeza gento

„La indianoj estis en sia barbara maniero religia popolo.”¹⁵

Ilia mitaro estas ankoraŭ tute ne kritike esplorita; ili prezentis al si la enkorpiĝojn de siaj religiaj imagoj – ĉiaj spiritoj – jam en homa formo, sed la malsupra ŝtupo de barbareco, sur kiu ili troviĝis, ankoraŭ ne konis bildajn prezentadojn, tiel nomatajn idolojn. Ĝi estas natur- kaj element-kulto evoluanta al plurdiismo. La diversaj triboj havis siajn regulajn festojn, kun difinitaj kultformoj, ĉefe dancado kaj ludado; speciale la danco estis esenca parto de ĉiaj religiaj festaĵoj; ĉiu tribo celebris la siajn aparte.

6. Triban konsilistaron por komunaj aferoj. Ĝi konsistis el ĉiuj *sahem*-oj kaj militestroj de la unuopaj gentoj, el iliaj realaj, ĉar ĉiam eksoficigeblaj reprezentantoj; ĝi diskutis publike, ĉirkaŭate de la ceteraj tribanoj, kiuj havis la rajton interveni kaj esti aŭskultataj; la konsilistaro decidis. Ĝenerale ĉiu ĉeestanto estis laŭ ties deziro aŭskultata, ankaŭ la virinoj povis prezentigi sian aferon per parolanto de ilia elekto. Ĉe la irokezoj la fina decido estis farenda unuvoĉe, kio okazas ankaŭ ĉe kelkaj decidoj de germanaj markiaj komunumoj. La triba konsilistaro estis taskita ĉefe pri regulado de la rilatoj al fremdaj triboj; ĝi akceptis senditojn kaj elsendis tiajn, ĝi deklaris militon kaj kontraktis pacon. Se okazis milito, tiu estis farata plej ofte de volontuloj. Principe ĉiu tribo estis konsiderata en milita stato kun ĉiu alia tribo kun kiu ĝi ne estis eksplicite kontraktinta packontrakton. Militiroj kontraŭ tiaj malamikoj estis plej ofte organizitaj de unuopaj elstaraj militistoj; ili donis militdancon, kiu kundancis deklaris per tio sian partoprenon en la militiro. La kolono konsistiĝis kaj ekmoviĝis. Same la defendo de atakita triba teritorio estis farata plej ofte de libervoluloj. La eliro kaj la reveno de tiaj kolonoj donis ĉiam okazon por publikaj festaĵoj. Permeso de la triba konsilistaro por tiaj eliroj ne necesis kaj estis nek postulata nek donata. Estas tute same kiel la privataj militiroj de ĝermanaj sekvantaroj,

15 Morgano, saml., p. 113.

III La irokeza gento

kiajn Tacito priskribas ilin, nur ke ĉe la ĝermanoj la sekvantaroj estis jam alprenintaj konstantecon, konsistigis firman kernon, kiu organiziĝis jam en pactempoj kaj ĉirkaŭ kiuj la ceteraj libervoluloj grupiĝis en kazo de milito. Tiaj militkolonoj estis malofte multnombraj; la plej gravaj ekspedicioj de la indianoj, ankaŭ por grandaj distancoj, estis farataj de malgrandaj militfortoj. Se pluraj tiaj sekvantaroj kuniĝis por granda entrepreno, ĉiu obeis nur al sia propra gvidanto; la unueco de la militplano estis pli aŭ malpli bone certigita de konsilistaro el tiuj gvidantoj. Tio estas la maniero de militado de la alemanoj en la kvara jarcento ĉe la supra Rejno, tia kian Amiano Marcelino¹⁶ priskribis ĝin.

7. En kelkaj triboj ni trovas supertribestron, kies rajtoj estas tamen tre malgravaj. Li estas unu el la *sahem*-oj, kiu en kazoj kiam necesas rapida ago, devas fari provizorajn disponojn ĝis kiam la konsilistaro povas kunveni kaj definitive decidi. Tiu institucio estas malforta, sed en la plua evoluo plej ofte senfrukta komenco de oficisto kun plenuma potenco; tiu evoluis tamen, kiel montriĝos, plej ofte, se ne ĉie, el la plej supera militestro.

La granda plimulto de la amerikaj indianoj ne transiris la unuiĝon en la tribo. En malmultaj triboj, disigitaj de vastaj limregionoj, malfortiĝintaj de eternaj militoj, ili okupis je malmultaj homoj gigantan teritorion. Ligoj inter parencaj triboj fariĝis ie kaj tie pro momenta urĝo kaj disfalis kun ĝi. Sed en kelkaj regionoj origine parencaj triboj rekuniĝis el diseco por daŭraj ligoj kaj tiel faris la unuan paŝon por formiĝo de nacioj. En Usono ni trovas la plej evoluintan formon de tia ligo ĉe la irokezoj. Elirante el siaj sidejoj okcidente de la rivero Misisipo, kie ili verŝajne fariĝis branĉo de la granda dakoto-familio, setlis post longa migrado en la nuna ŝtato Novjorko, dividita en kvin triboj: senekoj, kajugoj, onondagoj, oneidoj kaj mohauĝoj¹⁷. Ili vivis de fiŝoj, ĉasaĵoj

16 En la originalo: „Ammianus Marcellinus”. -vI

17 En la originalo, respektive: „Senekas, Cayugas, Onondagas,

III La irokeza gento

kaj kruda ĝardenkulturado, loĝis en vilaĝoj plej ofte ŝirmataj de palisaroj. Neniam pli ol 20.000 anoj, ili havis en ĉiuj kvin triboj komunan nombron da gentoj, parolis proksime parencajn dialektojn de la sama lingvo kaj nun okupis kuntenan teritorion dividitan inter la kvin triboj. Ĉar tiu teritorio estis nove konkerita, kutima kunteniĝo de tiuj triboj kontraŭ la forŝovitoj estis natura kaj evoluis, plej malfrue komence de la 15-a jarcento, al formala „eterna ligo”, al konfederacio, kiu tiam tuj, en la sento de sia nova forto alprenis agreseman karakteron kaj, sur la pinto de sia potenco, ĉirkaŭ 1675, estis konkerinta grandajn landpecojn ĉirkaŭe kaj parte forpelinta, parte tributigita la loĝantojn. La irokeza ligo estas la plej progresinta socia organizaĵo kiun la indianoj atingis, kiuj ne transiris la malsupran ŝtupon de barbareco (do kun la escepto de la meksikanoj, novmeksikanoj kaj peruanoj). La bazaj principoj de la ligo estis jenaj:

1. Eterna ligo de la kvin sangparencaj triboj surbaze de kompleta egaleco kaj memstareco en ĉiuj internaj tribaferoj. Tiu sangparenceco estis la vera bazo de la ligo. El la kvin triboj tri nomiĝis la patrotriboj kaj estis fratoj inter si; la du aliaj nomiĝis filotriboj kaj estis ankaŭ frattriboj inter si. Tri gentoj – la plej malnovaj – estis ankoraŭ vive reprezentataj en ĉiuj kvin, aliaj tri en tri triboj, la membroj de ĉiu el tiuj gentoj estis fratoj tra ĉiuj kvin triboj. La komuna, nur dialekte malsama lingvo estis esprimo kaj pruvo de la komuna deveno.

2. La organo de la ligo estis liga konsilistaro el 50 *saĥem*-oj, ĉiuj egalaj laŭ rango kaj aŭtoritato; tiu konsilistaro decidis definitive pri ĉiaj aferoj de la ligo.

3. Tiuj 50 *saĥem*-oj, ĉe la fondiĝo de la ligo, elektiĝis en la triboj kaj gentoj kiel portantoj de novaj oficoj, eksplicite starigitaj por ligaj celoj. Ĉe ĉiu vakaĵo ili estis nove elektitaj

Oneidas und Mohawks”. -vl

III La irokeza gento

de la *koncernataj gentoj* kaj estis ĉiumomente eksoficigeblaj de ili; sed la rajto je ilia enoficigo apartenis al la liga konsilistaro.

4. Tiuj ligaj *saĥem*-oj estis ankaŭ *saĥem*-oj en siaj respektivaj triboj kaj estis membroj de la triba konsilistaro.

5. Ĉiuj decidoj de la liga konsilistaro estis farendaj unuvoĉe.

6. La voĉdonado okazis laŭ triboj, tiel ke ĉiu tribo kaj en ĉiu tribo ĉiuj konsilistoj devis konsenti por fari validan decidon.

7. Ĉiu el la kvin tribaj konsilistaroj povis kunvoki la ligan konsilistaron, sed tiu ne sin mem.

8. La kunsidoj okazis antaŭ la kunveninta popolo; ĉiu irokezo rajtis paroli; nur la konsilistaro decidi.

9. La ligo ne havis personan reprezentanton, nenian ĉefon de plenuma potenco.

10. Male, ĝi havis du plej suprajn militestrojn, kun egalaj rajtoj kaj egala potenco (la du „reĝoj” de la spartanoj, la du konsulojn en Romo).

Tio estis la tuta publika konstitucio, sub kiu la irokezoj pli ol kvarcent jarojn vivis kaj ankoraŭ vivas. Mi priskribis ilin pli detale laŭ Morgano, ĉar ni havas ĉi tie okazon studi la organizaĵon de socio kiu ankoraŭ ne konas *ŝtaton*. La ŝtato antaŭkondiĉas apartan publikan potencon, disigitan de la tutaĵo de la ĉiufoje koncernatoj, kaj Maurer, kiu kun ĝusta instinkto ekkonas la germanan markio-konstitucion kiel per si mem pure socian institucion esence alian ol la ŝtato, kvankam poste grandparte ties bazo – Maurer pro tio esploras en ĉiuj siaj skribaĵoj la iom-post-ioman estiĝon de la publika potenco el kaj apud la originaj konstitucioj de la markioj, vilaĝoj, kortegoj kaj urboj. Ni vidas ĉe la nordamerikaj indianoj, kiel origine unueca popoltribo disvastiĝas tra

III La irokeza gento

giganta kontinento, kiel triboj per divido fariĝas popoloj, tutaj grupoj da triboj, la lingvoj ŝanĝiĝas, ĝis kiam ne nur ili fariĝas nekompreneblaj unu al la alia, sed ankaŭ ĉia spuro de la origina unueco malaperas; kiel apud tio en la triboj la unuopaj gentoj dividiĝas en pluraj, la malnovaj patringentoj konserviĝas kiel gentaroj kaj tamen la nomoj de tiuj plej malnovaj gentoj ĉe tre malproksimaj kaj longtempe disiĝintaj triboj restas samaj – la lupoj kaj la urso estas gentnomoj ankoraŭ ĉe plimulto de ĉiuj indianaj triboj. Kaj por ili aplikiĝas pli aŭ malpli la supre priskribita konstitucio – kun la escepto ke multaj ne atingis la staton de ligo de parencaj triboj.

Sed ni vidas ankaŭ, kiom – surbaze de la gento kiel socia unuo – la tuta konstitucio de gentoj, gentaroj kaj tribo evoluas per preskaŭ nepra neceso – ĉar natureco – el tiu unueco. Ĉiuj tri estas grupoj de diversaj gradoj de sangparenceco, ĉiu fermita en si kaj ordiganta siajn proprajn aferojn, sed ĉiu ankaŭ kompletiganta la alian. Kaj la amplekso de iliaj aferoj entenas la tutajon de la publikaj aferoj de la barbaro sur la malsupra ŝtupo. Do, kie ni trovas ĉe popolo la genton kiel socian unuon, ni rajtas serĉi ankaŭ organizitecon de la tribo kiu similas al la ĉi tie priskribita; kaj kie ni havas sufiĉajn fontojn, kiel ĉe la grekoj kaj romanoj, ni ne nur trovos ĝin, sed konvinkiĝas ankaŭ ke, kie la fontoj mankas, la komparo de la amerika socia konstitucio helpas nin trans la plej malfacilaj duboj kaj enigmoj.

Kaj ĝi estas mirinda konstitucio ĉe ĉia naiveco kaj simpleco, tiu gentkonstitucio! Sen soldatoj, ĝendarmoj kaj policistoj, sen nobelaro, reĝoj, guberniestroj, prefektoj aŭ juĝistoj, sen malliberejoj, sen procesoj ĉio iras sian regulan iron. Ĉian kverelon kaj disputon decidas la tutajo de tiuj kiuj estas koncernataj, la gento aŭ la tribo, aŭ la unuopaj gentoj inter si – nur kiel plej ekstrema, malofte uzata rimedo minacas la sangvenĝo, de kiu nia mortpuno estas nur la

III La irokeza gento

civilizita formo, kun ĉiuj avantaĝoj kaj malavantaĝoj de la civilizacio. Kvankam multe pli da komunaj aferoj ekzistas ol nun – la dommastrumado estas komuna kaj komunisma al serio da familioj, la grundo estas triba proprieto, nur la ĝardenetoj estas provizore atribuitaj al la dommastrumadoj –, oni tamen ne bezonas eĉ eron da nia vasta kaj implikita administracia aparato. La koncernatoj decidas, kaj en la plej multaj kazoj jarcentojn longa uzado jam ĉion reguligis. Malriĉuloj kaj manksuferantaj homoj ne povas ekzisti – la komunisma mastrumado kaj la gento konas siajn devojn al maljunuloj, malsanuloj kaj en milito lamigitaj. Ĉiuj estas egalaj kaj liberaj – ankaŭ la virinoj. Por sklavoj ankoraŭ ne estas spaco, ĝenerale ankaŭ ne por subjugado de fremdaj triboj. Kiam la irokezoj ĉirkaŭ 1651 venkis super la erioj kaj la „neŭtrala nacio”, ili proponis al ili eniri kiel egalrajtaj en la ligon; nur kiam la venkitoj rifuzis tion, ili estis forpelitaj el sia regiono. Kaj kiajn virojn kaj virinojn tia socio produktis, tion atestas kiom ĉiuj blankuloj, kiuj renkontis purajn indianojn, admiras la personan dignon, rekteman, karakteran forton kaj bravecon de tiuj barbaroj.

Pri la braveco ni spertis ĵus en Afriko ekzemplojn. La uzulaj kafroj antaŭ kelkaj jaroj kaj la nubioj antaŭ kelkaj monatoj – ambaŭ estas triboj, ĉe kiuj gentaj institucioj ankoraŭ ne estas formortintaj – faris, kion nenia eŭropa armeo povas fari. Armitaj nur per lancoj kaj ĵetlancoj, sen fusilo, ili en la kuglopluvo de la kulasŝargaj pafiloj de la angla infanterio – la agnoskite plej bona de la mondo por densa batalo – avancis ĝis la bajonetoj kaj pli ol unufoje taŭzis kaj eĉ batis ilin, spite al la kolosa supereco de la armiloj kaj malgraŭ tio ke ili tute ne havas militservon kaj ne scias kio estas ekzercado. Kion ili povas elteni kaj fari, tion pruvas la plendo de la angloj ke kafro en 24 horoj kuras vojon pli rapide ol ĉevalo – la plej eta muskolo elsaltas, malmola kaj hardita, kiel vipŝnuro, diras angla pentristo.

Tiaj aspektis la homoj kaj la homa socio, antaŭ ol la divi-

III La irokeza gento

do en diversaj klasoj okazis. Kaj se ni komparas ilian kondiĉon kun la grandega plimulto de la nuntempaj civilizitaj homoj, tiam ni vidas la eksterordinaran distancon inter la nuna proleto kaj etkampulo kaj la malnova libera gentano.

Tio estas unu flanko. Sed ni ne forgesu ke tiu organizaĵo estis pereonta. Ĝi ne transiris la tribon; la ligo de triboj signifas jam la komencon de ĝia subfosado, kiel montriĝos kaj kiel jam montriĝis en la subjug-provoj de la irokezoj. Kio estis ekster la tribo, estis ekster la rajto. Kie ne ekzistis eksplicita packontrakto, regis milito de tribo al tribo, kaj la milito estis farata kun la krueleco kiu distingas la homon antaŭ la ceteraj animaloj kaj kiu estis nur poste mildigita per la intereso. La genta konstitucio en sia prospero, kian ni vidis en Ameriko, antaŭkondiĉis ekstreme neevoluintan produktadon, do ekstreme maldensan loĝantaron sur vasta teritorio; do situacion en kiu la homo estis preskaŭ komplete dominata de la ekstera naturo, kiu prezentiĝis al li fremda kaj ne komprenata. La tribo restis la limo por la homo, same fronte al la tribfremdulo kiel ankaŭ fronte al si mem: La tribo, la gento kaj iliaj institucioj estis sanktaj kaj netuŝeblaj, estis pli alta potenco donita de la naturo, al kiu la unuopulo restis nepre submetita en sia sentado, pensado kaj agado. Tiom, kiom la homoj de tiu epoko ŝajnas al ni imponaj, tiom ili ne distingiĝas unu de la alia, ili ankoraŭ pendas, kiel Markso diras, ĉe la umbilika ŝnuro de la natureca komunumo. La potenco de tiu natureca komunumo devis esti rompita – ĝi estis rompita. Sed ĝi estis rompita de influoj kiuj dekomence ŝajnas al ni degradado, kvazaŭ prapeka falo el la simpla morala alteco de la malnova genta socio. Estas la plej malaltaj interesoj – malnobla avido, brutala ĝuavido, malpura avareco, egoisma rabo de komuna posedaĵo –, kiuj inaŭguras la novan, civilizitan, la klasan socion; estas la plej hontindaj rimedoj – ŝtelo, perforto, insido, perfido, kiuj subfosas la malnovan senklasan socion kaj faligas ĝin. Kaj tiu nova socio mem, dum la tutaj du

III La irokeza gento

jarmiloj kaj duono da ĝia ekzisto, estis neniam io alia ol la evoluo de la malgranda malplimulto surkoste de la ekspluatata kaj subpremata granda plimulto, kaj ĝi estas tia pli ol iam ajn antaŭe.

IV La greka gento

La grekoj kiel la pelasgoj kaj aliaj tribparencaj popoloj estis jam ekde antaŭhistoria tempo orditaj laŭ la sama organa vico kiel la amerikanoj: gento, gentaro, tribo, ligo de triboj. La gentaro povis manki kiel ĉe la doroj, la ligo de la triboj ne devis esti elformita ĉie, sed en ĉiuj kazoj la gento estis la unuo. En la tempo kiam la grekoj eniras la historion, ili staras ĉe la sojlo de la civilizacio; inter ili kaj la amerikaj triboj, pri kiuj temis supre, kuŝas preskaŭ du tutaj grandaj evoluperiodoj je kiuj la grekoj de la heroa tempo antaŭas la irokezojn. La gento de la grekoj estas do tute ne plu la arĥaika de la irokezoj, la stampo de la grupedzeco¹ komencas konsiderinde malklariĝi. La patrinrajto estas cedinta al la patrorajto; per tio la aperanta privata riĉaĵo faris unuan breĉon en la genta konstitucio. Dua breĉo estis la natura sekvo de la unua: Ĉar post enkonduko de la patrorajto la havaĵo de riĉa heredantino per edziniĝo al sia viro transirintus do en alian genton, oni rompis la bazon de ĉia genta juro kaj ne nur permesis, sed devigis ĉi-kaze ke la knabino edziniĝu ene de la gento, por konservi la havaĵon al ĝi.

Laŭ la greka historio de Grote, speciale la atena gento estis kuntenata per:

1. komunaj religiaj festoj kaj ekskluziva rajto de la pastraro honore al certa dio, de la laŭdira prapatro de la gento, kiu en tiu eco estis nomata per aparta kromnomo.
2. Komuna tombejo (komparu „*Ebulides*” de Demosteno).
3. Reciproka heredrajto.
4. Reciproka devo je helpo, protekto kaj subteno okaze de perforto.
5. Reciproka rajto kaj devo je geedziĝo ene de la gento en certaj kazoj, speciale koncerne orfajn filinojn aŭ heredantinojn.

1 En la eldono de 1884: „punalua familio”.

IV La greka gento

6. Posedo, almenaŭ en kelkaj okazoj, de komuna proprieto kun propra *arĥon* (prezidanto) kaj trezoristo.

Krome, la unuiĝo en gentaro kunligis plurajn gentojn, sed malpli dense; sed ankaŭ ĉi tie ni trovas similajn reciprokajn rajtojn kaj devojn, speciale komunecon de certaj religiaj agoj kaj la rajton je persekutado, se gentarano estis mortigita. La tutaĵo de la gentaroj de tribo havis siavice komunajn, regule ripetiĝantajn sanktajn festojn sub prezido de *phylobasileus* (tribprezidanto) elektita el inter la nobeloj (*Eupatride*).

Tion laŭ Grote. Kaj Markso aldonas: „Tra la greka gento videblas la sovaĝulo (la irokezo ekz-e) ja bone rekoneble.” Li fariĝas ankoraŭ pli bone rekonebla, kiam ni esploras iom pli.

Ĉar al la greka gento atribuiĝas krome:

7. Deveno laŭ patroraĵto.

8. Malpermeso de geedziĝo en la gento escepte en kazo de heredantinoj. Tiu escepto kaj ĝia formo kiel ordono pruvigas la validon de la malnova regulo. Tiu sekvas ankaŭ el la ĝenerale valida regulo ke la virino per edziniĝo rezignas pri la religiaj ritoj de sia gento kaj transiras en tiujn de sia edzo, en kies gentaro ŝi krome estis enskribita. Edziĝo ekster la gento estis laŭ tio kaj laŭ fama tekstero de la Dikearĥo la regulo, kaj Becker en „Charikles” rekte supozas ke neniu rajtis edziĝi ene de sia propra gento.

9. La rajto je adopto en la genton; ĝi okazis per adoptado en la familion, sed kun publikaj formalajtoj kaj nur esceptokaze.

10. La rajto elekti kaj eksoficigi la prezidantojn. Ke ĉiu gento havis sian *arĥon*, tion ni scias; ke tiu ofico estas hereda en certaj familioj, tio estas nenie dirita. Oni supozas ke

IV La greka gento

ĝis la fino de la barbareco ne ekzistis strikta² heredeblo, kiu estas tute malkongrua kun la kondiĉoj, en kiuj riĉuloj kaj malriĉuloj ene de la gento havis komplete egalajn rajtojn.

Ne nur Grote, sed ankaŭ Niebuhr, Mommsen kaj ĉiuj aliaj ĝisnunaj historiistoj pri klasika antikveco fiaskis pri la gento. Ili ja notis multajn ĝustajn trajtojn, sed ili vidis en ili ĉiam grupon de *familioj* kaj per tio malebligis kompreni la naturon kaj la originon de la gento. La familio estas sub la genta konstitucio neniam organiza unuo kaj ne povis esti tia, ĉar edzo kaj edzino apartenis nepre al du diversaj gentoj. La gento eniris tuta en la gentaron, la gentaro en la tribon; la familio estis duone gento de la edzo kaj duone tiu de la edzino. Ankaŭ la ŝtato agnoskas en la publika juro nenian familion; ĝi ekzistas ĝis hodiaŭ nur por la privata juro. Kaj tamen nia tuta ĝisnuna historiografio ekiras de la absurda supozo, kiu aparte en la dekoka jarcento fariĝis ne tenebla, ke la monogamia unuopa familio, kiu estas apenaŭ pli malnova ol la civilizacio, estas la kristaliĝa kerno, ĉirkaŭ kiu socio kaj ŝtato iom post iom aldoniĝis.

„Por krome rimarkigi al s-ro Grote”, enmetas Markso, „ke, kvankam la grekoj devenigas siajn gentojn el la mitologio, tiuj gentoj estas pli malnovaj ol la de ili mem kreita mitologio kun ĝiaj dioj kaj duondioj.”

Morgan ŝatas citi Grote-n, ĉar tiu estas agnoskata kaj tamen tute malsuspekta atestanto. Li rakontas plue, ke ĉiu atena gento havis nomon derivitan de ĝia supozata prapatro, ke antaŭ Solono ĝenerale, kaj ankoraŭ post Solono ĉe foresto de testamento, la gentanoj (*gennêtes*) de la mortinto herdis ties havaĵon, kaj ke en kazo de mortigo unue la parencoj, poste la gentanoj kaj fine la gentaranoj de la mortigito havis la rajton kaj la devon persekuti la krimulon antaŭ la tribunaloj:

„Ĉio, kion ni aŭdas pri la plej malnovaj atenaĵoj, baziĝas sur

2 En la eldono de 1884 mankas: „strikta”.

IV La greka gento

la divido en gentoj kaj gentaroj.”

La deveno de la gentoj de komunaj prauloj faris al la „lernejkleraj filistroj” (Markso) gravan kaprompiĝon. Ĉar ili prezentas ilin kiel pure mitajn, ili do tutsimple ne povas kompreni la estiĝon de gento el apudaj, origine tute ne parencaj familioj, kaj tamen ili devas klarigi tion, nur por klarigi la ekziston de la gentoj. Do oni prezentas inundon da vortoj kiu ne atingas pli ol la frazon: La geneologio estas ja fabelo, sed la gento estas realaĵo, kaj fine ĉe Grote tekstas – kun enŝovo de Markso – jene:

„Ni aŭdas pri tiu geneologio nur malofte, ĉar ĝi estas nur en certaj, nur en aparte ceremoniaj okazoj portata antaŭ la publikon. Sed la malpli famaj gentoj havis siajn komunajn religiajn kultojn” (strange tio, s-ro Grote!) „kaj komunan superhoman prapatron kaj geneologion tute kiel la pli famaj” (kiom tute strange tio, s-ro Grote, ĉe *malpli famaj* gentoj!); „la baza plano kaj la ideala bazo” (estimata s-ro, ne *ideala*, sed karna, germane *fleischlich*³!) „estis ĉe ĉiuj la sama.”

Markso resumas la respondon de Morgano al tio jene: „La sangparenca sistemo kongrua al la gento en ties praformo – kaj la grekoj iam posedis tiun kiel aliaj mortidevuloj – konservis la konon de la parencoj de ĉiuj membroj de la gentoj inter si. Ili lernis tion por ili decide gravan per la praktiko de sia infanaĝo. Ĉe la monogamia familio tio forgesiĝis. La gentnomo kreis geneologion, apud kiu tiu de la unuopa familio ŝajnis malgrava. Estis nun tiu nomo kiu devis gardi la fakton de la komuna deveno de ĝiaj portantoj; sed la geneologio de la gento iris tiom malantaŭen ke la membroj ne povis plu prui sian reciprokan realan parencecon, krom en limigita nombro da okazoj ĉe pli novaj, komunaj antaŭuloj. La nomo mem estis pruvo de komuna deveno, kaj definitiva pruvo, escepte de kazoj de adopto. Aliflanke la fakta neado de ĉia parenceco inter gentanoj laŭ Grote kaj Niebuhr, kiu transformis la genton en pure elpen-

3 *Fleischlich*: karna, karneca. -vl

IV La greka gento

sitan kaj elfantaziitan kreaĵon, indan je 'idealaj', t.e. hejmsidulaj skribistoj. Ĉar la interligiteco de la generacioj, speciale dum la apero de monogamio, malproksimiĝis kaj la pasinta realeco ŝajnas spegulita en la mita fantazibildo, la filistoj konkludis kaj konkludas, ke la fantazia genealogio kreis realajn gentojn!”

La gentaro estis, kiel ĉe la amerikanoj, patringento dividita en plurajn filingentojn⁴ kaj unuiganta ilin, kaj ofte devenigis ilin ĉiujn ankoraŭ de la komuna prapatro. Tiel, laŭ Grote,

„ĉiuj samtempaj membroj de la gentaro de Hekateo havis unu saman dion kiel prapatron en la dekseca generacio”⁵;

ĉiuj gentoj de tiu gentaro estis do laŭlitere fratgentoj⁶. La gentaro aperas ankoraŭ ĉe Homero kiel milita unuo, en la fama tekstero, kie Nestoro konsilas al Agamemno: „Ordigu la virojn laŭ triboj kaj laŭ gentaroj, ke la gentaro helpu la gentaron kaj la tribo la tribon”⁷. – Cetere ĝi havas la rajton kaj la devon persekuti sangkrimon faritan al gentarano, do en pli frua tempo ankaŭ la devon je sangvenĝo. Ĝi havas krome komunajn sanktaĵojn kaj festojn, kiel ja la elformiĝo de la tuta greka mitaro el la kunportita malnov-arja naturkulto estis esence kondiĉita de la gentoj kaj gentaroj kaj okazis ene de ili. Krome ĝi havas prezidanton (*phratriarchos*) kaj laŭ de Coulange ankaŭ kunvenojn kaj devigajn decidojn, juĝsistemon kaj administracion. Eĉ la pli posta ŝtato, kiu ignoris la genton, lasis al la gentaro certajn publikajn administraciajn taskojn.

4 *Patringento, filingento* estas esprimoj kiuj montras nur la idecon; anstataŭ *patringento* eblus diri *gepatra* aŭ *patra* gento, anstataŭ *filingento* eblus diri *idgento*; same *fratgento, fratiningento* estas samsignifaj. -vl

5 GROTE, saml., vol. 2, p. 58-59. [fr. eld.]

6 Vd la rimarkon 4. -vl

7 Iliado, kanto II. [fr. eld.]

IV La greka gento

La tribo konsistas el pluraj parencaj gentaroj. En Atiko ekzistis kvar triboj, de po tri gentaroj, el kiuj ĉiu havis tridek gentojn. Tia ordigo de la grupoj antaŭkondiĉas konscian laŭplanan intervenon en la nature estiĝintan ordon. Kiel, kiam kaj kial tio okazis, pri tio silentas la greka historio, pri kiu la grekoj mem memoris nur ĝis la heroa epoko.

Dialekta disiĝo estis malpli evoluinta ĉe la grekoj kunpremitaj sur relative malgranda teritorio ol en la vastaj amerikaj arbaroj; sed ankaŭ ĉi tie ni trovas nur tribojn de la sama ĉeflingvo unuiĝintaj al pli granda tutaĵo kaj eĉ en la malgranda Atiko apartan dialekton, kiu fariĝis poste dominantanta kiel ĝenerala proza lingvo.

En la homeraj poemoj ni trovas la grekajn tribojn plej ofte jam kunigitaj al malgrandaj popoloj, ene de kiuj gentoj, gentaroj kaj triboj tamen ankoraŭ komplete konservis sian sendependecon. Ili loĝis jam en urboj protektataj de muregoj; la nombro de la loĝantaro kreskis kun la etendiĝo de la gregoj, de la kampkulturo kaj la komencoj de metio; per tio kreskis la riĉdiferencoj kaj kun ili la aristokrata elemento ene de la malnova, natureca demokratio. La unuopaj popoloj faris senĉesajn militojn pri la posedo de la plej bonaj landpartoj kaj verŝajne ankaŭ pro predo; sklavigo de la militkaptitoj estis jam agnoskita institucio.

La konstitucio de tiuj triboj kaj popoloj estis jena:

1. Konstanta ofico estis la *konsilistaro*, *bulê*, origine verŝajne konsistanta el la prezidantoj de la gentoj, poste, kiam ties nombro fariĝis tro granda, el selektita grupo, kiu donis la okazon por elformado kaj fortikado de la aristokrata elemento; kongrue al tio, laŭ Dionizo⁸ la konsilistaro de la heroa epoko konsistas el la eminentuloj (*kratistoi*)⁹. La

8 En la originalo: Dionysios. -vl

9 Dionizo de Halikarnaso: Romaj antikvaĵoj, libro II, ĉap. 12 [fr. eld., Denys d'Halicarnasse: Antiquités romaines, liv. II, chap. 12]

IV La greka gento

konsilistaro decidis definitive pri gravaj aferoj; ekz-e ĉe Eŝilo, la konsilistaro de Tebo decidis, la por la donita situacio decide, honore enterigi Eteoklon, sed elĵeti la kadavron de Poliniko kiel predon al la hundoj. Kun starigo de la ŝtato tiu konsilistaro transformiĝis en la postan senaton.

2. la *popolkunveno* (*agora*). Ĉe la irokezoj ni trovis la popolon, virojn kaj virinojn, kiu ĉirkaŭis la kunvenon de la konsilistaro, intervenante parole en orda maniero kaj tiel influanta la decidojn. Ĉe la homeraj grekoj tiu „ĉirkaŭantaro“, por uzi malaltgermanan tribunalan esprimon¹⁰, jam evoluis al kompleta popolkunveno, kiu estis la regulo ankaŭ ĉe la ĝermanoj de la pratempo. Ĝi estis kunvokata de la konsilistaro por decido de gravaj aferoj; ĉiu viro povis ekparoli. La decido okazis per manlevado (Eŝilo en la „Protekt-petantoj“) aŭ per aklamado. Ĝi estis suverena en lasta instanco, ĉar, diras Schoenmann („Grekaj antikvaĵoj“),

„se temas pri afero, por kies plenumado la kunlaborado de la popolo necesas, Homero diras al ni nenian rimedon per kiu la popolo devigeblas al tio kontraŭ sia volo“¹¹.

En tiu tempo, en kiu ĉiu plenkreska vira tribano estis militisto, ankoraŭ ne ekzistis publika potenco disigita de la popolo, kiu uzeblus kontraŭ ĝi. La natureca demokratio staris ankoraŭ en sia prospero, kaj tio devas esti la ekirpunkto por taksu la potencon kaj la pozicion de la konsilantaro kaj de la *basileus*.

3. La *armeestro* (*basileus*). Pri tio Markso notas: „La eŭropaj kleruloj, plej ofte naskitaj lakeoj de princoj, faras el la *basileus* monarĥon en moderna senco. Kontraŭ tio protestas la jankia respublikano Morgano. Li diras tre ironie, sed vere, pri la oleeca Gladstone kaj ties '*Juventus Mundi*':

'S-ro Gladstone prezentas al ni la grekajn tribestrojn de la

10 En la originalo tiu esprimo estas: „*Umstand*“ („ĉirkaŭstarantaro“, moderna signifo: cirkonstanco). -vl

11 Schoenmann, saml., vol. I, Berlino, 1855, p. 27.

IV La greka gento

heroa epoko kiel reĝojn kaj princojn, kun la aldono ke ili estas ankaŭ ĝentlemanoj; sed li mem devas koncedi: Ĝenerale ni ŝajnas trovi la moron aŭ la leĝon de la rajto de unuenaskito sufiĉe determinita, sed ne tre rigora.”

Certe ŝajnas ankaŭ al s-ro Gladstone mem, ke tiom klaŭzoplena rajto de unuenaskito sufiĉe determinita, sed ne tre rigora, valoras ĝuste tiom kiom neniu rajto.

Ni vidis, kiel statis pri la heredeco de la ĉefaj funkcioj ĉe la irokezoj kaj aliaj indianoj. Ĉiuj oficoj estis elektaj oficoj plej ofte ene de la gento kaj en tiu mezuro heredebraj. Ĉe vakecoj oni iom post iom preferis la plej proksiman gentparencon – fraton aŭ fratinfilon –, se ne estis kaŭzoj eviti lin. Se ĉe la grekoj sub regado de patrorajto la ofico de armeestro (*basileus*) transiris ĝenerale al la filo aŭ al unu el la filoj, tio do pruvas nur ke la filoj havis por si la verŝajnecon de postsekvo per popola elekto, sed tute ne jure validan heredon sen popolelekto. Temas ĉi tie, ĉe la irokezoj kaj la grekoj, pri la unua ĝermo de estonta hereda gvidanteco aŭ monarĥio. La supozo favoras do la hipotezon ke ĉe la grekoj la armeestro estas aŭ elektata de la popolo aŭ almenaŭ konfirmenda de ties agnoskataj organoj – konsilistaro aŭ *agora*, same kiel la procezo por la roma „reĝo” (*rex*).

En la „Iliado” la ĉefo de la militantaj viroj, Agamemno, aperas ne kiel plej supra reĝo de la grekoj, sed kiel plej supra armeestro de liga armeo antaŭ sieĝata urbo. Kaj Odiseo indikas tiun lian econ, kiam estiĝis kverelo inter la grekoj, en la fama teksto: „*Ne bonas la multa komando, unu estu ordonanto*”¹² ktp (ĉe kiu la fama verso kun la sceptro estas posta aldono).

„Odiseo ĉi tie ne faras prelegon pri regformo, sed postulas obeon al la plej supra armeestro dum milito. Por la grekoj, kiuj aperas antaŭ Trojo nur kiel armeo, la agado en la *agora* estas sufiĉe demokratia. Ĥילו, kiam li parolas pri donacoj, t.e. distri-

12 *Iliado*, kanto II. [fr. eld.]

IV La greka gento

buado de la predo, nomas ĉiam kiel distribuanton nek Agamemnon nek alian armeestron, sed 'la filojn de la aĥajoj', t.e. la popolon. La epitetoj 'de Zeŭso kreita, de Zeŭso nutrita' pravas nenion, ĉar ĉiu gento devenas de iu dio, tiu de la tribestro jam de 'pli eminenta' dio – ĉi tie Zeŭso. Eĉ tiuj kiuj ne ĝuas personan neliberecon, kiel la porkpaŝtisto Eŭmeo¹³ kaj aliaj, estas 'diaj' (*dioi* kaj *theioi*), kaj tio en la Odiseado, do en multe pli posta tempo ol la Iliado; en la sama Odiseado la nomo heroo estas ankoraŭ atribuita al la heroldo Mulio¹⁴ kiel al la blinda kantisto Demodoko¹⁵. Mallonge, la vorto *basileia*, kion la grekaj verkistoj uzas por la homera pseŭdoreĝeco (ĉar la armeestrecio estas ĝia ĉefa trajto), kun konsilistaro kaj popolkunveno apud si, signifas nur – armean demokration.” (Markso)

La *basileus* havis krom la armeajn ankaŭ pastrajn kaj juĝajn oficrajtojn; la lastaj ne estis detale determinitaj, la unuaj estis laŭ lia funkcio kiel plej supra reprezentanto de la tribo aŭ de la ligo de triboj. Neniam temas pri civitanaj, administraj rajtoj; sed li ŝajnas esti per sia ofico esti membro de la konsilistaro. Traduki [al la germana] *basileus* per *König* [reĝo] estas do etimologie tute ĝusta, ĉar *König* (*Kuning*) [reĝo] devenas de *Kuni*, *Künne* kaj signifas prezidanto de gento. Sed al la hodiaŭa signifo de la vorto *König* [reĝo] neniel respondas la malnovgreka *basileus*. Tukidido¹⁶ nomas la malnovan *basileia* eksplicite *patrikê*, t.e. 'devena de gento', kaj diras, ke ĝi havas klare determinitajn, do limigitajn rajtojn.¹⁷ Kaj Aristotelo diras, ke la *basileia* de la heroo tempo estis gvidanteco super liberuloj, kaj la *basileus* armeestro, juĝisto kaj supra pastro.¹⁸ Li do ne havis regpovon en la posta senco.¹⁹

13 En la originalo: Eumäus. -vl

14 En la originalo: Mulios. -vl

15 En la originalo: Demodokos. -v.

16 En la originalo: Thukydidēs. -vl

17 Tukidido: *Peloponeza milito*, libro I, ĉap. 13. [fr. eld.]

18 Aristotelo: *Politiko*, libro III, ĉap. 10. [fr. eld.]

19 Kiel al la greka *basileus*, tiel ankaŭ al la azteka armeestro *subŝoviĝis moderna princo*. Morgano submetas la unue miskompren-

IV La greka gento

Ni vidas do en la greka konstitucio de la heroa tempo la malnovan gentan organizaĵon ankoraŭ plene vigla, sed ankaŭ jam la komencon de ĝia subfosiĝo: patrorajto kun heredo de la havaĵoj al la idoj, kio favoris la akumuladon de riĉaĵoj en la familio, per kio la familio fariĝis potenco fronte al la gento; reefiko de la riĉecdiferenco sur la konstitucion per estiĝo de la unuaj ĝermoj de hereda nobeleco kaj reĝeco; sklaveco, unue ankoraŭ nur de militkaptitoj, sed jam kun la perspektivo de sklavigo de la propraj tribanoj kaj eĉ gentanoj; la malnova milito inter triboj jam degeneranta en sisteman rabadon tere kaj mare, por konkeri brutarojn, sklavojn, trezorojn, do en regulan enspezfonton; mallonge, riĉaĵo laŭdata kaj respektata kiel plej alta bonaĵo kaj la malnovaj gentordoj misuzataj por pravigi la perfortan rabadon de riĉaĵoj. Mankis ankoraŭ nur unu afero: institucio kiu sekurigis la nove akiritajn riĉaĵojn de la unuopuloj ne nur kontraŭ la komunismaj tradicioj de la genta ordo, institucio kiu ne nur sanktigis la antaŭe tiom malalte taksatan privatan proprieton kaj deklaris tiun sanktigon kiel la plej altan celon de ĉia homa komunumo, sed kiu donis ankaŭ al la sinsekve evoluantaj novaj formoj de proprietakiro, do de la ĉiam pli rapidiĝanta pliigo de riĉaĵo la stampon de ĝenerala socia agnosko; institucio kiu ne nur eternigis la komenciĝantan dividon de la socio en klasojn, sed ankaŭ la rajton de la posedanta klaso je ekspluatado de la neposedantaj kaj la regadon super tiuj. Kaj tiu institucio venis. Inventiĝis la *ŝtato*.

eblajn kaj troigitajn, poste rekte mensogajn raportojn de la hispanoj unuafoje al historia kritiko kaj pravas, ke la meksikanoj staris sur la meza ŝtupo de barbareco, sed pli alte ol la nov-meksikiaj pueblo-indianoj, kaj ke ilia konstitucio, tiom kiom la misaj raportoj lasas ekkoni, kongruis al jeno: ligo de tri triboj, kiu estis submetinta nombron da aliaj al tributo kaj kiu estis regata de liga konsilistaro kaj ligo militestro, el kiu la hispano faris „imperiestron”.

V Estiĝo de la atena ŝtato

Nenie ni povas pli bone ol en la malnova Ateno – almenaŭ en ĝia unua fazo – sekvi kiel la ŝtato disvolviĝis, per tio ke la organoj de la genta ordo estis parte transformitaj, parte forŝovitaj per enŝovo de novaj organoj kaj fine komplete anstataŭigita per realaj ŝtatoficoj, dum la reala „armita popolo”, kiu defendis sin mem en siaj gentoj, gentaroj kaj triboj, estis anstataŭigita de armita „publika forto”, servanta al tiuj ŝtataj oficoj, do uzebla ankaŭ kontraŭ la popolo. La formŝanĝiĝoj estas en sia esenco prezentitaj de Morgano, la ekonomian enhavon, kiun ili kreis, mi devas grandparte aldoni.

Je la tempo de la herooj la kvar triboj de la atenanaj loĝis en Atiko ankoraŭ sur disigitaj teritorioj; eĉ la dek du gentaroj, kiujn ili konsistigis, havis verŝajne en la dek du urboj de Kekropso¹ ankoraŭ apartajn sidejojn. La konstitucio estis tiu de la heroa tempo: popolkunveno, popol-konsilantaro, *basileus*. Tiom longe, kiom la skribita historio atingas, la grundo estis jam dividita kaj transirinta en privatan proprieton, kio kongruas kun la jam relative evoluinta varproduktado je fino de la supra ŝtupo de barbareco kaj kun la varkomerco kiu respondas al ĝi. Apud greno oni produktis vinon kaj oleon; la markomerco sur la Egea Maro graviĝis pli kaj pli surkoste de la fenikoj kaj estis grandparte estrata de atikanoj. Per aĉeto kaj vendo de grundproprietato, per la progresanta labordivido inter kampkulturo kaj metio, komerco kaj ŝipveturado, la membroj de la gentoj, gentaroj kaj triboj devis tre baldaŭ konfuziĝi, la distrikto de la gentaro kaj de la tribo devis ricevi loĝantojn kiuj, kvankam popolanoj, tamen ne apartenis al tiuj grupoj, estis do fremduloj en sia propra loĝloko. Ĉar ĉiu gentaro kaj ĉiu tribo administris dum trankvilaj tempoj siajn aferojn mem, sen sendi komisio-

1 En la originalo: Kekrops. -vl

non al Ateno al la popolkonsilantaro aŭ al la *basileus*. Sed kiu loĝis en la teritorio de la gentaro aŭ de la tribo sen aparteni al ĝi, kompreneble ne povis partopreni en tiu administrado.

La reguligita ludo de la organoj de la genta konstitucio per tio malordiĝis tiom, ke jam dum la heroa tempo necesis solvo. La konstitucio atribuita al Teseo² estis enkondukita. La ŝanĝo konsistis ĉefe en tio ke oni starigis centran administracion en Ateno, do ke oni deklaris komuna afero parton de la aferoj ĝis nun memstare mastrumatajn de la triboj kaj transigis ĝin al la komuna konsilistaro kun sidejo en Ateno. Per tio la atenoj faris paŝon pli antaŭen ol ia ajn indiĝena popolo en Ameriko iam ajn faris: Anstataŭ la nura ligo de apudloĝantaj triboj venis ilia kunfandiĝo al unu sola popolo. Per tio estiĝis atena ĝenerala popoljuro, kiu staris super la juraj kutimoj de la triboj kaj gentoj; la atena civitano ricevis kiel tia certajn rajtojn kaj novan juran protekton ankaŭ sur la teritorio sur kiu li estis tribfremda. Sed per tio la unua paŝo estis farita por subfosado de la genta konstitucio; ĉar ĝi estis la unua paŝo por posta allaso de civitanoj kiuj estis popolfremdaj en tuta Atiko kaj kiuj estis kaj restis tute ekster la atena gent-konstitucio. Dua institucio atribuita al Teseo estis la grupigo de la tuta popolo, sen konsidero al gento, gentaro aŭ tribo, en tri klasojn: *eŭpatidoj* aŭ nobeloj, *geomoroj* aŭ kampkulturistoj kaj *демиurgoj* aŭ metiistoj, kaj la transdono al la nobeloj la ekskluzivan rajton okupi oficojn. Tiu grupigo restis senefika, kun escepto de la oficokupo de la nobeloj, ĉar ĝi alie faris neniam jurajn diferencojn inter la klasoj.³ Sed ĝi gravas, ĉar ĝi prezentas al ni la novajn sociajn elementojn, kiuj nerimarkite evoluis. Ĝi montras ke la kutima okupado de la gentaj oficoj el certaj familioj

2 En la originalo: Theseus. -vl

3 En la eldono de 1884: „ĉar la du aliaj klasoj ne ricevis apartajn rajtojn” (anstataŭ: „ĉar ĝi alie faris neniam jurajn diferencojn inter la klasoj”).

V Estiĝo de la atena ŝtato

elformiĝis jam al malmulte kontestata rajto de tiuj familioj je la oficoj, ke tiuj familioj, sen tio potencaj pro riĉeco, komencis kuniĝi ekster siaj gentoj en propran privilegiitan klason, kaj ke la ĵus nur ĝermanta ŝtato sanktigis tiun pretendon. Ĝi montras krome, ke la labordivido inter kampkulturistoj kaj metiistoj estis jam sufiĉe forta por kontesti la socian gravecon de la malnova grupiĝo laŭ gentoj kaj triboj. Ĝi fine proklamas la neakordigeblan kontraŭdiron inter genta socio kaj ŝtato; la unua provo de ŝtatigo konsistas en disŝirado de la gentoj, per tio ke ĝi disigas la membrojn de ĉiu en privilegiitajn kaj malprivilegiitajn kaj tiujn siavice en du klasojn de profesia agado kaj tiel kontraŭmetas ilin reciproke.

La posta politika historio de Ateno ĝis Solono estas nur malperfekte konata. La ofico de la *basileus* malaperis; al la pinto de la ŝtato venis *arĥontoj*⁴ elektitaj el la nobelaro. La dominado de la nobelaro kreskis pli kaj pli, ĝis kiam ĝi ĉirkaŭ la jaro 600 antaŭ nia erao fariĝis neeltenebla. La ĉefrimedo por subpremo de la ĝenerala libereco estis – mono kaj uzuro. La ĉefsidejo de la nobelaro estis en kaj ĉirkaŭ Ateno, kie la markomerco, apud daŭre okaze tolerata marrabado, riĉigis ĝin kaj koncentris la riĉaĵon en ĝiajn manojn. De tie la evoluanta monekonomio penetris kvazaŭ diseriga acido en la malnove tradiciita estmaniero de la kamparaj komunumoj bazitaj sur naturajekonomio. La genta konstitucio estas absolute neakordigebla kun monekonomio; la ruiniĝo de la atikaj parcelkulturistoj koincidis kun la malstrikto de la malnovaj gentaj ligoj kiuj protekte ĉirkaŭligis ilin. La ŝuldatesto kaj la hipotekado de bienoj (ĉar ankaŭ la hipotekon la atenanaj jam inventis) respektis nek genton nek gentaron. Kaj la malnova genta konstitucio konis nek monon, nek antaŭpagon, nek monŝuldon. Pro tio la ĉiam pli amplekse etendiĝanta monregado de la nobelaro estigis ankaŭ novan kutimrajton el la sekurigo de la kredi-

4 En la originalo Archonten. -vl

V Estiĝo de la atena ŝtato

toro kontraŭ la ŝuldanto, al sanktigo de la ekspluatado de la etkampulo fare de la monposedanto. Ĉiuj kampoj de Atiko estis plenaj de hipotekkolonoj, ĉe kiuj estis notite, ke la koncerna grundo estas hipotekigita je tiom aŭ tiom da mono al tiu aŭ tiu. La kampoj sen tiaj kolonoj estis grandparte jam venditaj pro nepagitaj hipotekoj aŭ interezoj kaj transirintaj en la proprieton de la nobela uzuristo; la kampulo povis kontenti se oni permesis al li resti kiel farmisto sur ĝi kaj vivi per *sesono* de la rezulto de sia laboro, dum li devis pagi *kvin sesonojn* al la nova mastro kiel farmpagon. Eĉ pli. Se la enspezo de la vendita parcelo ne sufiĉis por kovri la ŝuldon, aŭ se tiu ŝuldo estis kontraktita sen sekurigo per hipoteko, tiam la ŝuldanto devis vendi siajn infanojn al eksterlando en sklavecon por kovri la kreditoron. Vendo de la infano fare de la patro – tio estis la unua frukto de la patrorajto kaj de la monogamio! Kaj se la sangsuĉulo tiam ankoraŭ ne estis kontentigita, li povis vendi la ŝuldanton mem kiel sklavon. Jen la agrabla matenkrepusko de la civilizacio ĉe la atena popolo.

Antaŭe, kiam la vivkondiĉoj de la popolo ankoraŭ kongruis kun la genta konstitucio, tia ŝanĝego maleblis; kaj jen ĝi alvenis, oni ne sciis kiel. Ni reiru momenton al niaj irokezoj. Tie maleblis situacio tia kia ĝi estis nun trudiĝinta al la atenananoj, sen ke ili entreprenis ion por tio kaj certe kontraŭ ilia volo. Ĉe la irokezoj la jaron post jaro sama maniero produkti la vivtenadon neniam povis produkti tiajn konfliktojn kvazaŭ truditajn deekstere, kaj nenian kontraŭecon de riĉuloj kaj malriĉuloj, de ekspluatantoj kaj ekspluatatoj. La irokezoj estis ankoraŭ malproksimaj de dominado de la naturo, sed ene de la por ili validaj naturlimoj ili regis sian propran produktadon. Escepte malbonajn rikoltojn en iliaj ĝardenetoj, elĉerpigon de fiŝprovizo en iliaj lagoj kaj riveroj, de la ĉasaĵo en iliaj arbaroj, ili sciis kio rezultis el ilia maniero perlabori sian vivtenadon. Rezulti devis la vivtenado, ĉu pli malabunda aŭ pli abunda; sed neniam povis rezul-

V Estiĝo de la atena ŝtato

ti neintencitaj sociaj ŝanĝegoj, disŝiro de la gentaj ligoj, divido de la gentanoj kaj tribanoj en kontraŭajn klasojn kiuj kontraŭbatalas unu la alian. La produktado moviĝis en la plej striktaj limoj; sed – la produktantoj regis sian propran produkton. Tio estis la grandega avantaĝo de la barbara produktado, kiu perdiĝis kun la eniro en la civilizacion; la tasko de la venontaj generacioj estos rekonkeri ĝin, sed surbaze de la nun atingita potenco dominado de la homo super la naturo kaj de la nun ebla libera asociado,.

Alie statis ĉe la grekoj. La progresanta privata proprieto je gregoj kaj luksaĵoj kondukis al interŝanĝo inter individuoj, al transformado de la produktoj en varojn. Kaj tie estas la ĝermo de la tuta sekvanta ŝanĝego. Ekde kiam la produktantoj jam ne konsumis sian produkton rekte mem, sed cedis ĝin el la mano, ili perdis la regadon pri ĝi. Ili jam ne sciis kio ĝi fariĝis, kaj la ebleco estis donita ke la produkto estis iam uzota kontraŭ la produktantoj, por ilia ekspluatado kaj subpremado. Pro tio neniam socio povas por la daŭro konservi la regadon super sia propra produktaĵo kaj la kontroladon de la sociaj efikoj de sia produktadprocezo, kiu ne forigas la interŝanĝon inter individuoj.

Sed la atenanoj spertis, kun kia rapideco, post la estiĝo de la interŝanĝo inter la unuopuloj kaj kun la transformiĝo de la produktoj en varojn, la produkto trudiĝis sian regadon super la produktantoj. Kun la varproduktado venis la sendependa kulturado de la grundo fare de unuopuloj, kaj kun tio baldaŭ la grundproprieto de unuopuloj. Krome venis la mono, la ĝenerala varo, kontraŭ kiuj aliaj estis interŝanĝeblaj; sed per tio ke la homoj inventis la monon, ili ne pensis pri tio ke ili kreis per tio novan socian potencon, la unikan ĝeneralan potencon, antaŭ kiu la tuta socio devis sin klini. Kaj tiu nova, sen scio kaj volo de siaj propraj kreintoj subite supren saltinta potenco estis tiu, kiu en la tuta brutaleco de sia juneco sentigis sian regadon al la atenanoj.

V Estiĝo de la atena ŝtato

Kion fari? La malnova genta konstitucio montriĝis ne nur senpova kontraŭ la venkado de la mono; ĝi estis ankaŭ absolute nekapabla trovi ene de sia kadro spacon por io kiel mono, kreditoro kaj ŝuldanto, perforta repagigo de ŝuldoj. Sed la nova socia potenco nun ja ekzistis, kaj vanaj deziroj, sopiro je reveno de la bona malnova tempo ne repelis monon kaj interez-uzurpadon el la mondo. Kaj intertempe serio de aliaj, subordigitaj breĉoj malfermiĝis. La miksiĝo de la gentanoj kaj gentaranoj sur la tuta atika teritorio, precipe en la urbo Ateno mem, grandiĝis de generacio al generacio, malgraŭ ke ankaŭ nun atenano ja ankoraŭ rajtis vendi parcelojn ekster sia gento, sed ne sian loĝdomon. La labordivido inter la diversaj produktadbranĉoj: kampkulturo, metio, en la metio siavice sennombraj subspecoj, komerco, ŝipveturado ktp, kun la progresoj de la industrio ĉiam pli komplete evoluis; la loĝantaro dividiĝis nun laŭ sia okupiĝo en sufiĉe fiksjajn grupojn, kies ĉiu havis serion da novaj, komunaj interesoj, por kiuj en la gento aŭ en la gentaro ne estis loko, kiuj do por ilia prizorgado necesigis novajn oficojn. La nombro da sklavoj konsiderinde pliiĝis kaj certe jam tiam multe superis tiun de la liberaj atenanoj; la genta konstitucio origine ne konis sklavecon, do ankaŭ nenian rimedon obeigi tiun amason da neliberuloj. Kaj fine la komerco venigis al Ateno amason da fremduloj, kiuj tie ekloĝis pro la pli facila monakiro kaj kiuj ankaŭ laŭ la malnova konsitucio restis senrajtaj kaj senprotektaj kaj kiuj malgraŭ tradicia toleremo restis ĝena fremda elemento en la popolo.

Mallonge, tio estis la pereco de la genta konstitucio. La socio ĉiutage pli elkreskis el ĝi; ĝi povis nek malhelpi nek ĉesigi eĉ la plej grandajn malbonaĵojn estiĝintajn sub ĝiaj okuloj. Sed la ŝtato estis intertempe evoluinta. La novaj grupoj estigitaj unue de la labordivido inter urbo kaj kamparo, poste inter la diversaj urbaj laborbranĉoj, estis kreintaj novajn organojn por certigi siajn interesojn; ĉiaj oficoj estis starigitaj. Kaj krome la juna ŝtato bezonis antaŭ ĉio potenc-

V Estiĝo de la atena ŝtato

on, kiu ĉe la marveturantaj atenanoj povis esti unue nur marpotenco, por diversaj malgrandaj militoj kaj por protekti la komercajn ŝipojn. En nekonata tempo antaŭ Solono oni difinis la naukrariojn⁵, malgrandajn teritoriajn distriktojn, dek du en ĉiu tribo; ĉiu naukrario devis disponigi militŝipon, ekipi ĝin per aĵoj kaj per ŝipanaro kaj krome disponigi dek du rajdistojn. Tiu institucio atakis la gentan konstitucion duoble. Unue, per tio ke ĝi kreis publikan potencon kiu jam ne rekte kongruis kun la tutaĵo de la armita popolo; kaj due per tio, ke ĝi por la unua fojo dividis la popolon por publikaj celoj ne laŭ parenccgrupoj, sed laŭ *loka kunloĝado*. Kion tio signifis, tio montriĝos.

Se la genta konstitucio ne povis helpi la ekspluatatan popolon, tiam restis nur la estiĝanta ŝtato. Kaj tiu donis ĝin en la solona konstitucio, per tio ke ĝi samtempe denove fortiĝis surkoste de la malnova konstitucio. Solono – la maniero, kiel lia reformo de la jaro 594 antaŭ nia erao estis trudita, ne koncernas nin ĉi tie – Solono malfermis serion da tiel nomataj politikaj revolucioj, kaj pli precize per interveno en la proprieton. Ĉiuj ĝisnunaj revolucioj estis revolucioj por protekti unu specon de proprieto kontraŭ alia speco de proprieto. Ili ne povas protekti ion sen tuŝi la alian. En la granda franca revolucio la feŭda proprieto estis oferita por savi la burĝan; en la solona la proprieto de la kreditoroj devis servi por konservi la proprieton de la ŝuldanto. La ŝuldoj estis simple deklaritaj nevalidaj. Ni ne konas precize la detalojn, sed Solono gloras sin en siaj poeziaĵoj ke li forigis la hipotekajn kolonojn el la ŝuldaj parceloj kaj revenigis la homojn pro ŝuldoj venditajn kaj fuĝintajn. Tio eblis nur per malkaŝa rompo de la proprieto. Kaj efektive, de la unua ĝis la lasta tiel nomata politika revolucio ili estas ĉiuj faritaj por protekti la proprieton – de *unu* speco kaj realigitaj per konfiskado, ankaŭ nomata ŝtelo de la proprieto – de *alia* speco. Tio estas tiom vera, ke de du mil jaroj kaj duono la

5 En la originalo: „Naukrarien”. -vi

privata proprieto konserveblis nur per rompo de proprieto.

Sed nun necesis malhelpi la revenon de tia sklavigo de liberaj atenanaj. Tio okazis unue per ĝeneralaj disponoj, ekz-e per la malpermeso de ŝuldkontraktoj, en kiu la persono de la ŝuldanto estis hipotekigita. Krome oni difinis plej grandan mezuron de grundproprieto kiun unuopulo rajtas posedi, por starigi almenaŭ kelkajn barojn kontraŭ la malŝatego de la nobelaro je kampula grundo. Sed poste venis ŝanĝoj de la konstitucioj; la por ni plej gravaj estas jenaj:

La konsilistaro estis grandigita al kvarcent membroj, cent el ĉiu tribo; ĉi tie la tribo do restis la bazo. Sed tio estis la sola flanko laŭ kiu la malnova konstitucio estis enprenita en la novan ŝtatkorpon. Ĉar cetere Solono dividis la civitanojn en kvar klasojn laŭ ilia grundposedo kaj je ties rikolto; 500, 300 kaj 150 *medimnoj* da greno (1 medimno – proksimume 41 litroj) estis la minimumaj rikoltoj por la unuaj tri klasoj; kiu havis malpli aŭ neniom da grundproprieto, falis en la kvaran klason. Ĉiuj oficoj okupeblis nur el la plej supraj tri, la plej altaj nur el la unua klaso; la kvara klaso havis nur la rajton paroli kaj voĉdoni en la popolkunveno, sed tie oni elektis ĉiujn oficistojn, tie ili devis raporti pri sia agado, tie ĉiuj leĝoj estis farataj, kaj tie la kvara klaso estis la plimulto. La aristokrataj privilegioj estis parte renovigitaj en formo de privilegioj de riĉeco, sed la popolo konservis la decidan potencon. Krome la kvar klasoj estis la bazo de nova armea organizo. La du unuaj klasoj disponigis la rajdistaron; la tria devis servi kiel peza infanterio; la kvara kiel malpeza, senkirasa piedmilitistoj aŭ sur la ŝiparo kaj estis tiam verŝajne ankaŭ pagata.

Ĉi tie oni do enkondukis tute novan elementon en la konstitucion: la privatan proprieton. Laŭ la grandeco de ilia grundproprieto oni mezuris la rajtojn kaj devojn de la ŝtatcivitanoj, kaj laŭ la mezuro en kiu la havaĵklasoj gajnas influon, laŭ tio la malnovaj sangparencaj organizaĵoj estis

V Estiĝo de la atena ŝtato

forŝovitaj; la genta konstitucio suferis novan malvenkon.

La mezurado de la politikaj rajtoj laŭ la havaĵo tamen ne estis institucio tia ke la ŝtato sen ĝi ne povus ekzisti. Eĉ se ĝi ludis grandan rolon en la konstitucia historio de la ŝtatoj, tamen tre multaj ŝtatoj, kaj ĝuste la plej evoluintaj, ne bezonis ĝin. Ankaŭ en Ateno ĝi ludis nur provizoran rolon; ekde Aristido ĉiuj oficoj estis alireblaj al ĉiu civitano.

Dum la sekvaj okdek jaroj la atena socio moviĝis iom post iom en tiu direkto, en kiun ĝi plu evoluis en la postaj jarcentoj. Al la abunda uzurpado je grundo de la antaŭsolona tempo estis metita barilo, same al la senmezura koncentriĝo de la grundproprietato. La komerco kaj la metio kaj artmetio, praktikataj per sklavlaboro en ĉiam pli granda dimensio, fariĝis dominantaj metiaj branĉoj. Oni pli kleriĝis. Anstataŭ en la komenca brutala maniero ekspluati la proprajn kuncivitanojn, oni ekspluatis precipe la sklavojn kaj la eksteratenan klientaron. La movebla havaĵo, la monriĉaĵo kaj la riĉaĵo je sklavoj kaj ŝipoj kreskis ĉiam pli, sed ĝi nun jam estis ne nur rimedo por akiri grundproprietaton kiel en la unua, limigita tempo, ĝi fariĝis memcelo. Per tio unue kun la nova klaso de industria kaj komercaj riĉuloj estis elkreskinta venka konkurenco de la malnova nobelpotenco, sed aliflanke ankaŭ ŝancelis la restojn de la malnova genta konstitucio. La gentoj, gentaroj kaj triboj, kies anoj estis nun dissemataj tra la tuta Atiko kaj loĝis komplete miksitaj, estis per tio fariĝintaj tute netaŭgaj por politikaj organizaĵoj; multaj atenaj civitanoj apartenis al nenia gento, ili estis enmigrintoj, kiuj estis enprenintaj ja en la civitanan juron, sed ne en unu el la malnovaj gentaj organizaĵoj; apud ili ekzistis ankoraŭ la ĉiam kreskanta nombro da nur „protekt-parencaj” fremdaj enmigrintoj.

Dume progresis la partiaj bataloj; la nobelaro provis rekonkeri siajn antaŭajn privilegiojn kaj por momento ree

V Estiĝo de la atena ŝtato

gajnis superecon, ĝis kiam la revolucio de Klejsteno⁶ (509 antaŭ nia erao) definitive renversis ĝin; sed kun ĝi ankaŭ la lastan reston de la genta konstitucio.

Klejsteno, en sia nova konstitucio, ignoris la kvar malnovajn tribojn bazitajn sur gentoj kaj gentaroj. Ilin anstataŭis tute nova organizaĵo surbaze de nura loka loĝanteco, laŭ kiu jam la naŭkrarioj provis ordigi la civitanojn. Nun decidis jam ne la aparteno al la gentaj organizaĵoj, sed nur la loĝloko; ne la popolo, sed la teritorio estis ordigita, la loĝantoj fariĝis politike nura apartenaĵo de la teritorio.

La tuta Atiko estis ordigita en cent komunumajn distriktojn, la *demoj*⁷, kiuj ĉiu mastrumis sin mem. La civitanoj loĝantaj en ĉiu *demo* (la *demanoj*⁸), elektis sian prezidanton (*demarĥ*) kaj trezoriston kaj tridek juĝistojn kun juĝpovo pri malgrandaj disputoj. Ili ricevis ankaŭ propran templon kaj protektdion aŭ heroojn, kies pastrojn ili elektis. La plej altan povon en la *demo* havis la kunveno de la *demanoj*. Ĝi estas, kiel Morgano ĝuste rimarkas, la pratipo de la memreganta amerika urba komunumo.⁹ Per la sama unuo, kiun la moderna ŝtato atingas en sia plej alta elformiĝo, la estiĝanta ŝtato komenciĝis en Ateno.

Dek el tiuj unuoj, *demoj*, konsistigis tribon, kiu tamen, malsame ol la malnova genta tribo, estis nun nomata loktribo. La loktribo estis ne nur memmastrumanta politika, ĝi estis ankaŭ armea organizaĵo; ĝi elektis la *filarĥon*¹⁰ aŭ tribprezidanton, kiu komandis la rajdistaron, la *taksiarĥon*¹¹,

6 En la originalo: „des Kleisthenes”. -vl

7 En la originalo: „Demen”. -vl

8 En la originalo: „Demoten”. La kursivigoj de la vortoj aperantaj unuafoje en tiu ĉi kaj la sekvaj du paragrafoj estas de la tradukinto. -vl

9 Morgan, saml., p. 271. [fr. eld.]

10 En la originalo: „den Phylarchen”. -vl

11 En la originalo: „den Taxiarchen”. -vl

V Estiĝo de la atena ŝtato

kiu komandis la piedmilitistaron, kaj la *strategon*¹², kiu komandis la tutan militistaron disponigitan de la triba teritorio. Ĝi krome disponigis kvin militŝipojn kun ŝipanaro kaj komandanto kaj ricevis atikan heroon, laŭ kiu ĝi nomis sin, kiel protektsanktulon. Fine ĝi elektis kvindek konsilistojn en la atenan konsilistaron.

La plej supra instanco estis la atena ŝtato, regata de la konsilistaro konsistanta el la kvindek elektitoj de la dek triboj kaj lastinstance de la popolkunveno, ĉe kiu ĉiuj atena civitano havis aliron kaj voĉdonrajton; apud tio *arĥontoj*¹³ kaj aliaj oficistoj prizorgis la diversajn administraciajn branĉojn kaj juĝpovojn. En Ateno ne ekzistis plej supra oficisto de plenuma potenco.

Per tiu nova konstitucio kaj per la allaso de tre granda nombro da fremduloj kun restadrajto¹⁴, parte enmigrintoj, parte liberigitaj sklavoj, la organoj de la genta konstitucio estis elŝovitaj el la publikaj aferoj; ili degradiĝis al privataj kaj religiaj asocioj. Sed la morala influo, la tradiciita percept- kaj pens-maniero de la malnova genta epoko ankoraŭ longan tempon plu herediĝis kaj nur iom post iom formortadis. Tio montriĝis ĉe kroma ŝtata institucio.

Ni vidis ke esenca trajto de la ŝtato konsistas en publika potenco disigita de la popolamaso. Ateno havis tiam ankoraŭ nur popolarmeon kaj ŝiparon rekte disponigitan de la popolo; tiuj protektis ĝin kontraŭ la ekstero kaj bridis la sklavojn, kiuj jam tiam estis la granda plimulto de la loĝantaro. Fronte al la civitanoj la publika potenco konsistis unue nur en formo de polico, kiu estas same malnova kiel la ŝtato, pro kio la naivaj francoj de la 18-a jarcento ankaŭ ne parolis pri *civilizitaj* popoloj sed pri *policitaj* (*nations policiées*). La atenananoj do samtempe kun sian ŝtaton starigis

12 En la originalo: „den Strategen”. -vl

13 En la originalo: „Archonten”. -vl

14 La fidela ekvivalento estas „protektparencoj”. -vl

V Estiĝo de la atena ŝtato

policon, veran ĝendarmaron de piediraj kaj ĉevalrajdaj ark-pafistoj – „landĉasistoj”¹⁵, kiel oni diras en suda Germanio kaj en Svislando. Sed tiu ĝendarmaro konsistis – el *sklavoj*. Al la libera atenano tia krudpolica servo aperis tiom humili-ga ke li preferis arestiĝi de armita sklavoj ol disponigi sin mem al tia hontindaĵo. Tio estis ankoraŭ la malnova genta pensmaniero. La ŝtato ne povis ekzisti sen polico, sed ĝi estis ankoraŭ juna kaj ankoraŭ ne havis sufiĉan moralan respekton por respektigi metion kiu ŝajnis al la malnovaj gentanoj nepre fia.

Kiom la nun en siaj ĉefaj trajtoj kompleta ŝtato kongruis kun la socia situacio de la atenanoj, montriĝis en la rapida ekflorado de la riĉeco, de la komerco kaj de la industrio. La klaskontraŭeco, sur kiu la sociaj kaj politikaj institucioj baziĝis, estis jam ne tiu de nobelaro kaj popolo, sed tiu de sklavoj kaj liberuloj, fremduloj kun restadpermeso kaj civitanoj. Tempe de la plej alta prospero la tuta atena libera civitanaro, inkluzive de virinoj kaj infanoj, konsistis el 90.000 loĝantoj, apud 365.000 sklavoj de ambaŭ seksoj kaj 45.000 fremduloj kun restadpermeso – fremduloj kaj liberigitoj. Je ĉiu plenkreska vira civitano estis do almenaŭ 18 sklavoj kaj pli ol du fremduloj. La granda sklavnumero klariĝas per tio ke multaj da ili laboris kune en manufakturoj, grandaj ĉambregoj, sub gardistoj. Sed kun la evoluo de la komerco kaj de la industrio venis la akumulado kaj koncentriĝo de la riĉaĵoj en malmultaj manoj, kaj malriĉiĝo de la amaso de liberaj civitanoj, al kiuj restis nur la elekto: aŭ konkurenci la sklavlaboron per propra metia laboro, kio estis konsiderata hontinda, beota,¹⁶ kaj ankaŭ promesis malmultan sukceson – aŭ mizeriĝi. Ili faris, laŭ la cirkonstancoj necese, la lastan, kaj ĉar ili konsistigis la amason, ili per tio pereigis la tutan atenan ŝtaton. Ne la demokratio

15 En la originalo: „ – Landjäger –”. -vl

16 beota: de beoto, loĝanto de Beotio (regiono en Grekio), konsiderata de la atenanoj kiel malsprita. -vl

V Estiĝo de la atena ŝtato

pereigis Atenon, kiel asertas la eŭropaj profesoroj vostsvingantaj antaŭ la princo, sed la sklavismo, kiu malŝatigis la laboron de libera civitano.

La estiĝo de la ŝtato ĉe la atenanoj estas aparte tipa modelo de ŝtatiĝo entute, ĉar ĝi okazas unuflanke tute pure, sen enmiksiĝo de ekstera aŭ interna perforto – la uzurpado de Psistrato ne postlasis spuron de sia mallonga daŭro –, ĉar ĝi aliflanke estigis ŝtaton de tre alta formevoluo, la demokratian respublikon, rekte el la genta socio, kaj fine ĉar ni sufiĉe konas ĉiujn esencajn detalojn.

VI Gento kaj ŝtato en Romo

El la mito de la fondiĝo de Romo montriĝas ke la unua setlado estis farita de certa nombro da latiaj¹ gentoj (cent, laŭ la mito) kuniĝintaj al tribo, al kiuj baldaŭ aliĝis sabela tribo kiu laŭdire ankaŭ konsistis el cent gentoj, kaj fine tria tribo konsistanta el diversaj elementoj, ree de laŭdire cent gentoj. La tuta rakonto montras unuavice ke ĉi tie estis malmulte natura krom la gentoj kaj eĉ tiuj kelkfoje nur „markoto” de patrino gento plu ekzistanta en la malnova hejmlando. La triboj montras evidentan artefaritan konsiston, sed plej ofte el parencaj elementoj kaj laŭ la modelo de la malnova, kreskinta, ne farita tribo; ĉe tio ne ekskludeblas ke la kerno de ĉiu el la tri triboj eble estis reala malnova tribo. La meza organismo, la gentaro, konsistis el dek gentoj kaj nomiĝis kurio; da tiu ekzistis do tridek.

Ke la roma gento estis la sama institucio kiel la greka, estas agnoskita; se la greka estas pluformiĝo de tiu socia unuo kies praformojn la amerikaj ruĝhaŭtuloj montras al ni, tiam la samo validas rekte ankaŭ por la roma. Ni povas ĉi tie do esti koncizaj.

La roma gento havis almenaŭ en la plej malnova tempo de la urbo jenan konstitucion:

1. Reciproka heredrajto de la gentanoj; la havaĝo restis en la gento. Ĉar en la roma gento kiel en la greka jam regis patrorajto, la posteuloj de la virino linio estis ekskluditaj. Laŭ la leĝo de la dek du tabuloj², la plej malnova skribita roma juro kiun ni konas, unue la idoj heredis kiel korpaj heredantoj; se ili mankis, la agnatoj (parencoj en *patra* linio); kaj ĉe ties manko la gentanoj. Ĉiukaze la havaĝo restis en la gento. Ni vidas ĉi tie la iom-post-ioman enpenetriĝon de novaj juraj principoj, kaŭzitan de pliiĝanta riĉaĝo kaj mono-

1 Latio: antikva teritorio inter la Albaj kaj Sabinaj Montoj, la riveroj Anio kaj Tibero kaj la Tirena Maro. -vl

2 La Leĝo de la Dek Du Tabuloj datiĝas de la 5-a jarcento antaŭ nia erao, sekve al la batalo de la plebanoj kontraŭ la patricioj. Ĝi fiksas nur la kutiman juron tiam uzata en Romo. [fr. eld.]

VI Gento kaj ŝtato en Romo

gamio, en la gentajn kutimojn: La origina egala heredrajto de la gentanoj estas unue – verŝajne jam frue, kiel supre menciite – en la praktiko limigita al la agnatoj, fine al la idoj kaj posteuloj en la vira tribo; en la dek du tabuloj tio aperas kompreneble en inversa ordo.

2. Posedo de komuna tombejo. Al la patricia gento *Claudia*³ oni atribuis ĉe ŝia enmigrado el *Regili* al Romo pecon da tero por ĝi, krome komunan tombejon, en la urbo mem. Ankoraŭ sub Aŭgusto, la kapo de Varo⁴, falinta en la Teŭtoburga Arbaro⁵, venigita al Romo, estis entombigita en la *gentilitius tumulus*⁶; la gento (*Quinctilia*) havis do ankoraŭ apartan tombmonteton.⁷

3. Komunaj religiaj festoj. Tiuj, la *sacra gentilitia*, estas konataj.

4. Devigo geedziĝi ne ene de la gento. Tio ŝajnas en Romo esti neniam transformita en skribitan leĝon, sed la moro restis. El la amasego da romaj geedzoj, kies nomojn ni konas, eĉ ne unu havas saman gentnomon por edzo kaj edzino. La heredrajto montras tiun regulon ankaŭ. La edzino perdas per sia edziniĝo siajn agnatajn rajtojn, forlasas sian genton, nek ŝi nek ŝiaj idoj povas heredi de ŝia patro aŭ de ties fratoj, ĉar alie la heredaĵo perdiĝus por la patra gento. Tio havas sencon nur kondiĉe ke la virino ne povas edziniĝi al sia gentano.

3 Elparolu: Klaŭdia. -vl

4 En la originalo: „Varus”. -vl

5 Mortinta en la batalo de la Teŭtoburga Arbaro (Vestfalia, en norda Germanio), kie lia armeo estis venkita de ĝermanoj sub la komando de Hermano la Ĉerusko (latine: Arminius). -vl

6 Do, en la 9-a jaro de nia erao. [fr. eld.]

7 En la eldono de 1884, la lasta frazo tekstis: „Ankoraŭ sub Aŭgusto la kapo de Varo falinta en la Teŭtoburga Arbaro estis entombigita en la tomb-lokooo de la gento *Quinctilia* (*gentilitius tumulus*).

VI Gento kaj ŝtato en Romo

5. Komuna grundproprieto. Tiu en la pratempo ĉiam ekzistis, ekde kiam oni komencis disdividi la triban teritorion. Ĉe la latiaj triboj ni trovas la grundon parte en posedo de la tribo, parte de la gento, parte de la mastrumejoj, kiuj tiam plej verŝajne⁸ ne estis unuopaj familioj. Romulo laŭdire faris la unuajn terdividojn al unuopuloj, proksimume po unu hektaron (du *iugera*⁹) por ĉiu. Sed ni trovas ankoraŭ pli poste grundposedon en la manoj de la gentoj, por ne paroli pri ŝtata tero, ĉirkaŭ kiu la tuta interna historio de la respubliko turniĝas.

6. Devo de la gentanoj je reciproka protekto kaj helpo. Pri tio la skribita historio montras al ni jam nur pecojn; la roma ŝtato tuj komence aperis kun tia superpovo ke la rajto je protekto kontraŭ maljustaĵoj transiris al ĝi. Kiam Appius Claudius estis arestita, lia tuta gento montris funebron, eĉ tiuj kiuj estis liaj personaj malamikoj.¹⁰ En la tempo de la dua Punika Milito la gentoj alianciĝis por elaçeti siajn militkaptitajn gentanojn; la senato *malpermesis* tion al ili.

7. Rajto porti la gentnomon. Ĝi restis ĝis en la imperia epoko; oni permesis al la liberigitaj alpreni la gentnomon de siaj iamaj mastroj, sed sen gentaj rajtoj.

8. Rajto je adopto de fremduloj en la genton. Tio okazis per adoptado en familion (kiel ĉe la indianoj), kiu signifis aliĝon al la gento.

9. La rajto elekti kaj eksigi la prezidanton estas nenie menciita. Sed ĉar en la unua tempo de Romo ĉiuj oficoj

8 En la eldono de 1884: „ne nepre” (anstataŭ: tiam plej verŝajne ne).

9 En la originalo: „(zwei Jugera)”. -vl

10 Appius Claudius, unu el la dekopo (*decem viri*) por 451-450 antaŭ nia erao estis provinta, per uzurpado de la povo de la kolegio longigi la validecon de sia mandato por la posta jaro; li estis arestita kaj metita en malliberejon, kie li mallonge poste mortis. [fr. eld.]

VI Gento kaj ŝtato en Romo

estis okupataj per elekto aŭ per nomumo, de la elektita reĝo malsupren, kaj ankaŭ la pastroj de la kurioj elektataj de tiuj, ni rajtas supozi la samon por la prezidantoj (*principes*) de la gentoj – eĉ se la elekto el unu sama familio en la gento jam povis esti la regulo.

Jen la rajtoj de roma gento. Kun la escepto de la jam okazinta transiro al patroraĵo ili estas la preciza spegumbildo de la rajtoj kaj devoj de irokeza gento; ankaŭ ĉi tie „la irokezo klare trarigardas”¹¹.

Kia konfuzo, ankaŭ ĉe niaj plej agnoskataj historiistoj, regas ankoraŭ hodiaŭ pri la roma gentordo, pri tio nur unu ekzemplon. En la traktaĵo pri la romaj propraj nomoj de la respublika kaj aŭgusta epoko de Mommsen¹²:

„Krom al ĉiuj viraj gentanoj, kompreneble kun ekskludo de la sklavoj, sed kun inkludo de la almigrintoj kaj protektatoj, la gentnomo atribuiĝas ankaŭ al la virinoj ... La tribo” (kiel Mommsen tradukas ĉi tie *gens*) „estas ... komuna organizaĵo, estiĝinta el komuna – reala aŭ supozata aŭ eĉ ŝajnigita – deveno, kunigita per festa, tomba kaj hereda komuneco, al kiu rajtas kaj devas konsideri sin membroj ĉiuj persone liberaj individuoj, do ankaŭ la virinoj. Sed malfacilon kaŭzas la determinado de la gentnomo de la edziniĝintaj virinoj. Tiu kompreneble ne ekzistas tiom longe kiom la virino ne rajtis edziniĝi alie ol al samgentano; kaj estas pruvite ke dum longa tempo por virino estis sufiĉe malfacile edziniĝi ekstere ol interne de la gento, kiel ja tiu rajto, la *gentis enuptio*, estis atribuita ankoraŭ en la 6-a jarcento kiel persona privilegio, kiel rekompenco ... Sed kiam nun okazis tiaj eksteraj edziniĝoj, la virino en la plej malnova tempo devis per tio transiri en la tribon de la viro. Nenio estas pli certa ol ke la virino en la malnova religia edzeco komplete eniras en la juran kaj religian komunumon de la viro kaj eliras el la sia. Kiu ne scias ke la edziniĝinta virino perdas akti-

11 En la eldono de 1884 mankas la sekva teksto ĝis la paragrafo: Ankoraŭ preskaŭ tricent jaroj ... (p. 122)

12 [Theodor] Mommsen: „Römische Forschungen”, Berlino, 1864, 1-a volumo).

VI Gento kaj ŝtato en Romo

ve kaj pasive la heredrajton je siaj gentanoj, kaj aliflanke eniras kun sia edzo, siaj idoj kaj ties gentanoj entute en heredkomunecon? Kaj se ŝi estas kvazaŭ infano adoptita al sia edzo kaj aliĝas al lia familio, kiel ŝi povas resti for de lia gento?" (p. 8-11)

Mommsen asertas do, ke la romaninoj kiuj apartenis al gento, rajtis edziniĝi origine nur *ene* de sia gento, ke la roma gento estis do endogamia, ne ekzogamia. Tiu opinio, kiu kontraŭas ĉiajn spertojn ĉe aliaj popoloj, baziĝas ĉefe, se ne ekskluzive, sur unu sola tre disputita tekstero de Livio¹³ (libro XXXIX, c. 19), laŭ kiu la senato en la urba jaro 568, antaŭ nia erao 186, decidis *uti Feceniae Hispalae datio, diminutio, gentis enuptio, tutoris optio item esset quasi ei vir testamento dedisset; utique ei ingenuo nubere liceret, neu quid ei qui eam duxisset, ob id fraudi ignominiaeve esset* – ke *Fecenia Hispala* havu la rajton disponi pri sia havaĵo, malpliigi ĝin, edziniĝi ekster la gento kaj elekti kuratoron, tute kvazaŭ ŝia (mortinta) edzo donintus al ŝi tiun rajton per testamento; ke ŝi rajtas edzigi plenliberulon kaj al tiu, kiu ŝin edzinigos, tio ne estu konsiderata malbona ago aŭ honto.

Sendube oni do donas ĉi tie al *Fecenia*, liberigitino, la rajton edziniĝi ekster la gento. Kaj same sendube laŭ tio la edzo havis la rajton testamente transdoni al sia edzino la rajton post lia morto edziniĝi ekster la gento. Sed ekster kiu gento?

Se la virino devis edziniĝi ene de sia gento, kiel Mommsen supozas, tiam ŝi restis ankaŭ post la edziniĝo en tiu gento. Sed unue tiu asertata endogamio de la gento estas ĝuste tio kio estas pruvenda. Kaj due, se la virino devis edziniĝi ene de la gento, tiam kompreneble ankaŭ la viro devis edziĝi ene de la sia, kiu alie ja ne ricevintus virinon. Tiam ni alvenas al tio ke la edzo povis testamente heredigi al sia edzino rajton kiun li mem ne posedis por si; ni venas

13 En la originalo: „Livius”. -vl

VI Gento kaj ŝtato en Romo

al jura kontraŭsenco. Mommsen sentas tion ankaŭ kaj pro tio supozas:

„Ŝajnas ke, por edziniĝo eksteren el la gento, jure necesis ne nur la konsento de la potenculo, sed de ĉiuj gentanoj.” (p. 10, noto)

Tio estas unue tre aŭdaca supozo, kaj due ĝi kontraŭdiras la klaran vortigon de la tekstero; la senato donas al ŝi tiun rajton *anstataŭ la edzo*, ĝi donas al ŝi eksplicite ne pli kaj ne malpli ol ŝia edzo povintus doni al ŝi, sed tio, kion ĝi donas al ŝi, estas absoluta rajto dependa de nenialia limigo; tiel ke, se ŝi uzas ĝin, ankaŭ ŝia nova edzo ne suferu pro tio; ĝi taskas eĉ la nunajn kaj estontajn konsulojn kaj preto-rojn zorgi pri tio ke al ŝi ne okazu maljustaĵo el tio. La supozo de Mommsen ŝajnas do tute neallasebla.

Aŭ: La virino edzigis viron el alia gento, sed restis mem en sia ennaskita gento. Tiam, laŭ la supra tekstero, ŝia edzo havintus la rajton permesi al la edzino edziniĝi ekster sia propra gento. Tio signifas ke li havis la rajton fari disponojn pri aferoj de gento al kiu li tute ne apartenis. La afero estas tiom absurda ke ne necesas perdi plian vorton pri tio.

Restas do nur la supozo ke la virino estis je unua edzeco edziniĝita al viro el alia gento kaj per la edzeco senpere eniris la genton de la viro, kiel Mommsen por tiaj okazoj ja ankaŭ koncedas. Tiam la tuta kunteksto tuj klariĝas. La edzino, per la edzeco disigita de sia malnova gento kaj aniĝinta al la nova gento de la edzo, havas en tiu tute apartan pozicion. Ŝi estas ja gentanino, sed ne parenca; la maniero de ŝia aniĝo dekomence ekskludas ŝin el ĉia malpermeso edziniĝi ene de la gento, en kiun ŝi ja ĵus venis per edziniĝo; ŝi estas krome akceptita en la edzec-komunumo de la gento, ŝi heredas ĉe la morto de sia edzo el lia havaĵo, do havaĵo de gentano. Kio estas pli natura ol ke tiu havaĵo restu en la gento, ke ŝi estu do devigata edziĝi gentanon de sia unua edzo kaj nenian alian? Kaj se necesas fari escepton,

VI Gento kaj ŝtato en Romo

kiu estas tiom kompetenta rajtigi ŝin kiel tiu kiu heredigis al ŝi tiun havaĵon, ŝia unua edzo? En la momento, dum kiu li heredigas al ŝi parton de sia havaĵo kaj samtempe permesas al ŝi transigi tiun havaĵparton per edziniĝo aŭ sekve de edziniĝo en fremdan genton, tiu havaĵo ankoraŭ apartenas al li, li do disponas verdire nur pri sia propio. Koncerne la virinon mem kaj ŝian rilaton al la gento de ŝia edzo, estas li kiu enkondukis ŝin en tiun genton per libera vol-ago, la edzinigo; ŝajnas do ankaŭ nature ke li estas la taŭga persono permesi al ŝi eliron el tiu gento per dua edziniĝo. Mallonge, la afero ŝajnas simpla kaj memkomprenebla, ekde kiam ni forlasas la fantazian ideon de endogamia roma gento kaj komprenas ĝin kun Morgano kiel origine ekzogamia.

Restas ankoraŭ lasta supozo kiu ankaŭ trovis siajn defendantojn, kaj verŝajne la plej multajn: Tiu tekstero, laŭ ili, signifas nur

„ke liberigitinoj (*libertae*) ne rajtis sen aparta permeso *e gente enubere*“ (edziniĝi ekster la gento) „aŭ fari ian alian agon kiu, ligita kun *capitis deminutio minima* [perdo de la familiaj rajtoj], kaŭzintus la eliron de la *liberta* [liberigitino] el la gentaj ligoj“.¹⁴

Se tiu supozo ĝustas, tiam la tekstero des malpli pruvas ion pri al kondiĉoj de plenliberaj romaninoj kaj des malpli eblas paroli pri ilia devo edziniĝi ene de la gento.

La esprimo *enuptio gentis* aperas nur en tiu ĉi loko kaj nenie alie en la tuta roma literaturo; la vorto *enubere*, el-edziniĝi, nur trifoje, ankaŭ ĉe Livio, kaj tiam ne en rilato al gento. La fantazio ke romaninoj rajtis edziniĝi nur ene de la gento dankas sian ekziston nur al tiu ĉi tekstero. Sed ĝi estas absolute ne tenebla. Ĉar la tekstero aŭ rilatas al apartaj limigoj por liberigitinoj, kaj tiam ĝi pruvas nenion por plenliberuloj (*ingenuae*); aŭ ĝi validas ankaŭ por plenliber-

14 Lange, „Römische Alterthümer“, Berlino, 1856, I, p. 196, kie oni referencas Huschke pri nia livia tekstero.)

VI Gento kaj ŝtato en Romo

uloj, kaj tiam ĝi pruvas, male, ke la virino ĝenerale edziniĝas ekster sia gento, sed transiras per la edziniĝo en la genton de la edzo; do atestas kontraŭ Mommsen kaj por Morgano.

Ankoraŭ preskaŭ tricent jarojn post la fondiĝo de Romo, la gentaj ligoj estis tiom fortaj, ke patricia gento, tiu de la Fabioj, kun konsento de la senato povis entrepreni militiron kontraŭ la najbara urbo *Veji*, proprainiciate kaj sen helpo de aliaj. 306 fabianoj laŭdire ekiris milite kaj estis ĉiuj en insido mortigitaj; unu sola hejme restinta knabo plu generis la genton.

Dek gentoj konsistigis, kiel dirite, gentaron, kiu nomiĝis ĉi tie kurio kaj havis pli gravajn publikajn rajtojn ol la greka gentaro¹⁵. Ĉiu kurio havis siajn proprajn religiajn kultojn, sanktaĵojn kaj pastrojn; tiuj, en sia tutaĵo, konsistigis unu el la romaj pastro-kolegioj. Dek kurioj konsistigis tribon, kiu verŝajne, kiel la ceteraj latiaj triboj, havis elektitan prezidanton – armeestron kaj ĉefpastron. La ĉioma de la tri triboj konsistigis la roman popolon, la *Populus Romanus*.

Al la roma popolo povis do aparteni nur tiu kiu estis membro de gento kaj per ĝi de kurio kaj de tribo. La unua konsititucio de tiu popolo estis la jena. La publikaj aferoj estis prizorgataj unue de la senato, kiu, kiel Niebuhr vidis la unua tute ĝuste, konsistis el la prezidantoj de la tricent gentoj; ĝuste pro tio, kiel gent-plejaĝuloj, ili nomiĝis patroj, *patres*, kaj ilia tutaĵo senato (konsilantaro de la plejaĝuloj, de *senex*, maljuna). La kutima elekto el la ĉiam sama familio de ĉiu gento estigis ankaŭ ĉi tie la unuan herednobelaron; tiuj familioj nomiĝis patricioj kaj pretendis ekskluzivan rajton je eniro en la senaton kaj en ĉiujn aliajn oficojn. La fakton ke la popolo kun la fluo de la tempo toleris tiun pretendon kaj ke tiu transformiĝis en realan rajton, la mito esprimas tiel, ke Romulo donis al la unuaj senatanoj kaj ties

15 Fratris. -vl

VI Gento kaj ŝtato en Romo

posteularo la patriciecon kun ties privilegioj. La senato, kiel la atena *bulê*, havis la decidon pri multaj aferoj, la antaŭ-konsiladon pri pli gravaj aferoj kaj ĉefe pri novaj leĝoj. Tiuj estis decidataj de la popolkunveno, nomata *comitia curiata* (kunveno de la kurioj). La popolo kunvenis, grupite laŭ kurioj, ene de ĉiu kurio verŝajne laŭ gentoj, sed ĉe la decido ĉiu el la tridek kurioj havis unu voĉon. La kunveno de la kurioj akceptis aŭ malakceptis ĉiujn leĝojn, elektis ĉiujn pli altajn oficistojn inkluzive de la *rex* (la tiel nomata reĝo), deklaris militon (sed la senato kontraktis pacon) kaj decidis kiel plej alta tribunalo, laŭ alvoko de koncernatoj, en ĉiuj kazoj kie temis pri mortpuno kontraŭ roma civitano. – Fine apud la senato kaj la popolkunveno estis la *rex*, la preciza ekvivalento de la greka *basileus*, kiu tute ne estis la preskaŭ absoluta reĝo, kia Mommsen prezentas lin.¹⁶ Ankaŭ li estis armeestro, ĉefpastro kaj prezidanto en diversaj tribunaloj. Li tute ne havis civilajn povojn aŭ povon pri vivo, libereco kaj proprieto de la civitanoj, se tiuj ne devenis el la disciplina potenco de la armeestro aŭ de la verdiktezekuta potenco de la tribunalo. La ofico de la *rex* ne estis heredebila; ĝi estis, male, verŝajne laŭ propono de la antaŭulo, unue elektita en la kunveno de la kurioj kaj poste en dua kunveno ceremonie enoficigata. Ke li estis ankaŭ eksigebila, montras la sorto de *Tarquinius Superbus*.

Kiel la grekoj en la epoko de la herooj, la romanoj en la tempo de la tiel nomataj reĝoj vivis do en armea demokra-

¹⁶ La latina *rex* estas la ira-kelta *righ* (tribprezidanto) kaj la gota *reiks*; ke tio signifis ankaŭ, kiel origine ankaŭ la germana *Fürst* (t.e. kiel angla *first*, dane *forste*, la unua), gent- aŭ trib-prezidanto, vidiĝas el tio ke la gotoj jam en la 4-a jarcento posedis apartan vorton por la posta reĝo, la armeestro de tuta popolo: *thiudans*. Artakserkso kaj Herodo nomiĝas en la gota traduko de la Biblio de Ulfilas neniam *reiki*, sed *thiudinassus*. En la nomo de la gota *Thiudans*, aŭ, kiel ni malprecize tradukas, reĝo *Thiudareiks*, *Theodorich*, t.e. *Dietrich*, ambaŭ nomiĝoj kunfluas.

VI Gento kaj ŝtato en Romo

tio bazita sur gentoj, gentaroj kaj triboj kaj evoluinta el ili. Eĉ se la kurioj kaj triboj estis parte artefaritaĵoj, ili estis formitaj laŭ la veraj, naturaj¹⁷ modeloj de la socio el kiu ili estiĝis kaj kiu ilin ankoraŭ ĉiuflanke ĉirkaŭis. Kvankam la nature estiĝinta patricia nobelaro jam graviĝis, kaj la *reges*¹⁸ provis iom post iom etendi siajn povojn – tio ne ŝanĝas la originan bazan karakteron de la konstitucio, kaj nur tiu gravas.

Intertempe pliiĝis la loĝantaro de la urbo Romo kaj de la romia teritorio ampleksigita per konkeroj, parte per enmiĝado, parte per la loĝantoj de la submetitaj, plej ofte latiaj distriktoj. Ĉiuj ĉi novaj ŝtatanoj (ni preterlasu ĉi tie la demandon pri la klientoj) troviĝis ekster la malnovaj gentoj, kurioj kaj triboj, do ne konsistigis parton de la *populus romanus*, de la vera roma popolo. Ili estis persone liberuloj, rajtis posedi grundproprieton, devis pagi impostojn kaj fari militservojn. Sed ili ne rajtis okupi oficojn nek partopreni en la kunveno de la kurioj nek en la disdivido de la konkertaj ŝtatteritorioj. Ili konsistigis la plebon, ekskluditan de ĉiaj publikaj rajtoj. Pro sia ĉiam kreskanta nombro, sia milita trejniĝo kaj armiteco ili fariĝis minaca povo kontraŭ la malnova *populus* nun firme fermita kontraŭ ĉia elekstera pliiĝo. Aldoniĝis ke la grundposedo estis sufiĉe egale disdividita inter *populus* kaj plebo, dum la – kvankam ankoraŭ ne tre evoluinta – komerca kaj industria riĉaĵo troviĝis verŝajne pli ĉe la plebo.

Ĉe la granda mallumo en kiu la tute mita prahistorio de Romo estas vualita – mallumo ankoraŭ konsiderinde fortigita de la raciisme-pragmataj interpret-provoj kaj raportoj de la postaj jure formitaj fontverkistoj –, maleblas diri ion certan pri la tempo nek evoluo nek kaŭzo de la revolucio kiu ĉesigis la malnovan gentan konstitucion. Certas nur ke ĝia kaŭzo troviĝas en la bataloj inter plebo kaj *populus*.

17 La franca versio tradukas „naturaj” per „spontanaj”. -vl

18 *Reges*, pluralo de *rex*. -vl

VI Gento kaj ŝtato en Romo

La nova konstitucio, atribuita al la *rex Servius Tullius*, kiu apogis sin sur la greka modelo, ĉefe de Solono, kreis novan popolkunvenon kiu sendistinge in- aŭ eks-kludis la *populus* kaj plebanojn, laŭ tio ĉu aŭ ne ili faris militservojn. La tuta armilporta loĝantaro estis dividita laŭ la havaĵo en ses klasojn. La minimuma posedo en ĉiu el la kvin klasoj estis: I. 100.000 *as*; II. 75.000; III. 50.000; IV. 25.000; V. 11.000 *as*; laŭ Dureau de la Malle tio ekvivalentas al proksimume 14.000, 10.500¹⁹, 7.000, 3.600 kaj 1.570 markoj. La sesa klaso, la proletoj, konsistis el la malpli havantoj, liberaj je militservoj kaj impostoj. En la nova popolkunveno de la centurioj²⁰ (*comitia centuriata*) la civitanoj aperis armee, laŭ kompanioj en siaj centurioj de po cent homoj, kaj ĉiu centurio havis unu voĉon. Sed la unua klaso havis 80 centuriojn; la dua 22, la tria 20, la kvara 22, la kvina 30, la sesa pro deco ankaŭ unu. Aldoniĝis la rajdistoj konsistantaj el la plejriĉuloj kun 18 centurioj; kune 193; plimulto de la voĉoj: 97. Sed la rajdistoj kaj la unua klaso havis sole kune 98 voĉojn, do la plimulton; se ili estis interkonsentaj, la aliaj tute ne estis demanditaj; la valida decido estis farita.

Ĉiuj politikaj rajtoj de la antaŭa kunveno de la kurioj (escepte de kelkaj nominalaj) transiris al tiu nova kunveno de la centurioj; la kurioj kaj la gentoj el kiuj ili konsistis, estis per tio, kiel en Ateno, degraditaj al nur privataj kaj religiaj organizaĵoj, kaj kiel tiaj ili ankoraŭ longan tempon plu vegetis, dum la kunveno de la kurioj baldaŭ tute endormiĝis. Por elŝovi el la ŝtato ankaŭ la malnovajn tri tribojn, oni enkondukis kvar lokajn tribojn, el kiuj po kvarono prilokiĝis kvarono de la urbo, kun serio da politikaj rajtoj.

Per tio ankaŭ en Romo, jam antaŭ la forigo de la tiel nomata reĝeco, la malnova sociordo bazita sur personaj

19 Ph. E. Huschke estas la aŭtoro de disertaĵo: *De privilegiis Federniae Hispalae senatus consulto concessis* (lib. XXXIX, 19), Göttingen, 1822. [fr. eld.]

20 En la originalo: „Centurien”. -vl

VI Gento kaj ŝtato en Romo

sangligoj estis detruita kaj anstataŭigita per nova vera ŝtatkonstitucio bazita sur teritoria divido kaj havaĵdiferenco. La publika potenco konsistis ĉi tie en la militservodeva civitanaro kontraŭ ne nur la sklavoj, sed ankaŭ la tiel nomataj proletaroj ekskluditaj el militservo kaj armiteco.

Ene de tiu nova konstitucio, kiu estis nur pli elformita okaze de la forpelo de la lasta, vere reĝan povon uzurpanta *rex Tarquinius Superbus* kaj lia anstataŭigo per du armeestroj (konsuloj) kun egala ofica povo (kiel ĉe la irokezoj) – ene de tiu konstitucio la tuta historio de la roma respubliko moviĝas kun ĉiuj siaj bataloj de la patricioj kaj plebanoj pri la aliro al la oficoj kaj pri la partopreno en la ŝtataj terenoj, kun la fina transformiĝo de la patricia nobelaro en la novan klason de la grandaj grund- kaj mon-proprietuloj, kiuj iom post iom sorbis la tutan grundproprieton de la kamparanoj ruinigitaj per la militservo, senpopoligis Italion kaj per tio ne nur malfermis la pordon al la imperio, sed ankaŭ al ties posteuloj, la ĝermanaj barbaroj.

VII La gento ĉe keltoj kaj ĝermanoj

La spaco malpermesas al ni pritrakti la gentajn instituciojn kiuj ankoraŭ nun ekzistas ĉe la diversaj sovaĝaj kaj barbaraj popoloj en pura aŭ miksita formo aŭ la spurojn de ili en la malnova historio de la aziaj kulturpopoloj.¹ La unuaj aŭ la aliaj troviĝas ĉie. Jen nur kelkaj ekzemploj: Antaŭ ol la gento estis konata, la homo kiu faris al si la plej grandan penon miskompreni ĝin, McLennan, pruvis ĝian ekziston kaj ĝenerale ĝuste priskribis ĝin ĉe la kalmukoj, ĉerkesoj, samojedoj kaj ĉe tri hindaj popoloj: la varaloj², la magaroj kaj la municurioj. Novdate M. Kowalewski malkovris kaj priskribis ĝin ĉe la paŝavojoj, ŝevsuroj, svanetoj kaj aliaj kaŭkaziaj triboj. Jen nur kelkaj mallongaj notoj pri la apero de la gento ĉe keltoj kaj ĝermanoj.

La plej malnovaj konservitaj keltaj leĝoj montras al ni la genton ankoraŭ plene vigla; en Irlando ĝi vivas almenaŭ instinkte en la popolkonscio ankoraŭ hodiaŭ, post kiam la angloj detruis ĝin perforte; en Skotlando ĝi plene floris ankoraŭ en la mezo de la dekoka jarcento kaj ankaŭ ĉi tie subiĝis nur al la armiloj, la leĝaro kaj la tribunaloj de la angloj.

La malnovkimriaj leĝoj, kiuj estis skribitaj plurajn jarcentojn antaŭ la angla konkero, plej malfrue en la 11-a jarcento³, montras ankoraŭ komunan kampkulturon de tutaj vilaĝoj, kvankam nur kiel esceptan reston de antaŭe ĝenerala kutimo; ĉiu familio havis kvin akreojn⁴ por propra kultura-

1 En la eldono de 1884 mankas la sekva teksto ĝis la vortoj: Jen nur kelkaj mallongaj notoj ...

2 En la originalo respektive: „den Waralls, den Magars und den Munnipuris”. -vl

3 La angloj finkonkeris Kimrion en la jaro 1284. Sed ĝi konservis ankoraŭ certan aŭtonomecon ĝis la definitiva unuiĝo kun Anglio je la mezo de la 16-a jarcento (Statutoj de Henriko la 8-a, 1536 kaj 1542). [fr. eld.]

4 1 akreo estas en Britio 0,405 hektaro, laŭ Peter Benson: Comprehensive English-Esperanto Dictionary, The Esperanto Lea-

VII La gento ĉe keltoj kaj ĝermanoj

do; apud tio, terpeco komune kulturata kaj ties rikolto distribuata. Ke tiuj vilaĝaj komunumoj reprezentas gentojn aŭ subdividojn de gentoj, estas ĉe la analogio de Irlando kaj Skotlando ekster dubo, eĉ se denova kontrolado de la kimraj leĝoj, por kio mankas al mi la tempo (miaj eltiraĵoj estas el la jaro 1869)⁵, ne rekte pruvus tion. Sed tio, kion la kimraj fontoj, kaj kun ili la irlandaj, rekte pravas, estas ke ĉe la keltoj la para geedzeco en la 11-a jarcento ankoraŭ tute ne estis forŝovita de la monogamio. En Kimrio geedzeco fariĝis nedisigebla, aŭ pli ĝuste nerevokebla, nur post sep jaroj. Se mankis nur tri noktoj de la sep jaroj, la geedzoj povis disiĝi. Tiam oni disdividis: la virino dividis, la viro elektis sian parton. La mebloj estis dividataj laŭ certaj tre humuraj reguloj. Se la viro disiĝis, li devis redoni al la virino ŝian dotaĵon kaj iom da aliaj aĵoj; se disiĝis la virino, ŝi ricevis malpli. El la infanoj la viro ricevis du, la virino unu, kaj pli precize la plej mezan. Se la virino post la disiĝo prenis alian viron kaj la unua viro reprenis ŝin, tiam ŝi devis sekvi lin, eĉ se ŝi jam havis unu piedon en la edziĝa lito. Sed se la du estis kune dum sep jaroj, tiam ili estis ĝeedzoj, ankaŭ sen formala geedziĝo. Ĉasteco de knabinoj antaŭ edziniĝo tute ne estis severe obeata aŭ postulata; la tiurilataj teksteroj estas ekstreme frivolaj kaj tute ne respondas al la burĝa moralo. Se virino faris adulton, la viro rajtis bati ŝin (unu el la tri okazoj ĉe kiuj li rajtis tion, alie li estis punota), sed krome ne postuli plian kontentigon, ĉar

„por la sama delikto estu aŭ pentofaro aŭ venĝo, sed ne ambaŭ samtempe“.⁶

La kialoj, laŭ kiuj la virino rajtis postuli disiĝon sen perdon ĉe la disdivido, estis tre ampleksaj: Malbona spirodoro

gue for North America, El Cerrito, 1995. -vl

5 Engelso aludas ĉi tie siajn studojn pri irlanda historio kiuj igis lin okupiĝi ankaŭ pri la leĝaro de Kimrio. [fr. eld.]

6 *Ancient laws and institutes of Wales*, volumo I, s.l., 1841, p. 93. [fr. eld.]

VII La gento ĉe keltoj kaj ĝermanoj

de la viro sufiĉis. La elaĉetmono pagenda al la tribestro aŭ al la reĝo por liberiĝi el la rajto je la unua nokto (*gobr merch*, pro tio la mezepoka nomo *marcheta*, france *marquette*) ludas grandan rolon en la leĝaro. La virinoj havis voĉdonrajton en la popolkunvenoj. Ni aldonu ke en Irlando estas atestitaj similaj kondiĉoj; ke ankaŭ tie portempaj geedzeco estis tute kutimaj kaj al la virino ĉe disiĝo estis asertitaj precize reguligitaj, grandaj favoroj, eĉ kompenso de ĉiaj domaj servoj; ke tie „unua virino” aperas apud aliaj virinoj kaj ĉe heredaj dividoj ne estas distingo inter geedzaj kaj ekstergeedzaj infanoj – do ni havas bildon de la para geedzeco, kompare kun kiu la edzecformo valida en Nordameriko ŝajnas severa, kio tamen en la 11-a jarcento ne povas mirigi ĉe popolo, kiu dum la tempo de Cezaro vivis ankoraŭ en grupedzeco.

La irlanda gento (*sept*, la tribo nomiĝas *clainne*, klano) estas ne nur konfirmita kaj priskribita de la malnovaj jurlibroj, sed ankaŭ de la anglaj juristoj de la 17-a jarcento senditaj por transformi la klanlandon en bienojn de la angla reĝo. La grundo estis ĝis tiu lasta tempo komuna proprieto de la klano aŭ de la gento, se ĝi ne estis jam de la tribestroj transformita en ties privatan bienon. Se gentano mortis, do mastrumejo malaperis, tiam la prezidanto (la anglaj juristoj nomis lin *caput cognationis*) faris novan disdividon de la tuta teritorio inter la ceteraj mastrumejoj. Tio okazis certe ĝenerale laŭ la reguloj validaj en Ĝermanujo⁷. Ankoraŭ nuntempe troviĝis kelkaj – antaŭ kvardek aŭ kvindek jaroj tre multaj – vilaĝaj kampoj en tiel nomataj *rundale*. La terkulturistoj, unuopaj farmistoj de la grundo kiu antaŭe apartenis komune al la gento, rabita de la angla konkerinto, ĉiu pagis farmpagon por sia peco, sed kunmetas la kamp- kaj herbej-grundojn de ĉiuj pecoj, dividas ĝin laŭ situo kaj kva-

⁷ Mi sekvas la konsilon de parto de la prizorgantoj de la *Reta Vortaro (ReVo)*, uzi la finaĵon -io, se temas pri ŝtatoj, -ujo, se temas pri regiono priloĝata de sama popolo. -vl

VII La gento ĉe keltoj kaj ĝermanoj

lito en *Gewanne*, kiel oni diras ĉe la rivero Mozelo, kaj donas al ĉiu lian parton en ĉiu *Gewann*; marĉa kaj herbeja grundo estas komune uzata. Ankoraŭ antaŭ kvindek jaroj oni de tempo al tempo, kelkfoje jare, nove distribuis. La kampmapo de tia *rundale*-vilaĝo aspektas tute same kiel tiu de germana bienaro⁸ ĉe Mozelo aŭ de la *Hochwald*. Ankaŭ en la „factions” [„partioj”] pluvidas la gento. La irlandaj kampuloj ofte dividiĝas en partiojn kiuj baziĝas sur ŝajne tute absurdaj aŭ sensencaj diferencoj, estas al la angloj tute nekompreneblaj kaj ŝajnas havi nenian alian celon ol la ŝatatajn solenajn interbatiĝojn de unu partio kontraŭ la alia. Ili estas artefaritaj revivigaĵoj, postnaskitaj anstataŭoj de la detruitaj gentoj, kiuj prezentas siamaniere la pluan daŭron de la heredita gentinstinkto. Cetere en kelkaj regionoj la gentanoj estas ankoraŭ sufiĉe kunaj sur la malnova teritorio; ekz-e en la tridekaj jaroj la granda plimulto de la loĝantoj de la distrikto Monaghan havis nur kvar familinomojn, t.e. devenis el kvar gentoj aŭ klanoj.⁹

8 En la originalo: „Gehöferschaft”. -vl

9 *Pri la kvara eldono*: Dum kelkaj en Irlando pasigitaj tagoj mi freŝe rekonsciiĝis kiom la kampara popolo tie vivas ankoraŭ en la ideoj de la gentepoko. La grundproprietulo, kies farmisto estas la kampkulturisto, estas de tiu daŭre komprenata kiel ia klanĉefo kiu devas mastrumi la grundon en ĉies intereso, al kiu la kampulo pagas tributon en formo de farmpago, sed de kiu li ankaŭ devas ricevi helpon en urĝaj okazoj. Kaj same ĉiu pli bonstata homo estas konsiderata devigata subteni sian pli malriĉan najbaron, ekde kiam tiu falis en kazon de bezono. Tia helpo ne estas almozo, ĝi estas tio kion jure rajtas ricevi la pli malriĉa de la pli riĉa samklanano aŭ klanĉefo. Oni komprenas la plendon de la politikaj ekonomikistoj kaj juristoj pri la maleblo instrui al la ira kampulo la nocion de moderna burĝa proprieto; proprieto kiu havas nur rajtojn, sed nenian devon, simple ne enkapiĝas al la irlandano. Sed oni komprenas ankaŭ, ke irlandanoj, kiuj kun tiaj naivaj gentideoj subite retroviĝas en la grandaj anglaj aŭ usonaj urboj, inter loĝantaro kun tute aliaj moralaj kaj juraj ideoj, ke tiuj irlandanoj tie facile konfuziĝas komple-

VII La gento ĉe keltoj kaj ĝermanoj

En Skotlando la pereco de la genta ordo okazis ekde la subpremo de la popolribelo de 1745.¹⁰ Ankoraŭ esplorendas, kiun membron de tiu ordo reprezentas la skota klando; sed ke ĝi estas tia, tio ne pridubeblas. En la romanoj de Walter Scott ni vidas tiun altskotan klanon vigle antaŭ ni. Ĝi estas, diras Morgano,

„bonega modelo de la gento en sia organizo kaj en sia spirito, frapanta ekzemplo de la regado de la genta vivo super la gentanoj ... En siaj militetoj kaj en sia sangvenĝo, en la teritoria distribuado laŭ klanoj, en sia komuna grunduzado, en la fidelo de la klananoj al la ĉefo kaj unu al la aliaj ni trovas la ĉie reaperantajn trajtojn de la genta socio ... La deveno validis laŭ patrorajto, tiel ke infanoj de la viroj restis en la klanoj, dum tiuj de la virinoj transiris en la klanojn de siaj patroj.”¹¹

Sed ke en Skotlando antaŭe regis patrinrajto, tion pruvas la fakto ke en la reĝa familio de la piktoj, laŭ Beda, regis la virina heredado. Eĉ peco da punalua familio konserviĝis, kiel ĉe la kimroj, tiel ĉe la skotoj, ĝis en la mezepoko en la rajto je la unua punkto, kiun la klanestro aŭ la reĝo kiel lasta reprezentanto de la antaŭe komunaj edzoj rajtis plenumi ĉe ĉiu fianĉino, se ĝi ne estis aĉetita.¹²

te je moralo kaj rajto, perdas ĉian fortikecon kaj ofte amase demoraliĝis.

10 De 1715 ĝis 1745 la ribeloj de la kamparanoj de la *Highlands* reagis al la subpremo fare de la grund-noblearo kaj de la burĝaro kiuj strebis forpeli ili el iliaj teroj. Parto de la skota nobelaro, zorganta konservi la feŭdan kaj patriarĥan reĝimon de la klanoj, uzis tiujn ribelojn por politika movado celanta postuli la kronon de Anglio por ido de la *Stuarts* (pro tio la nomo de la ribeloj *jakobitaj*). Ilia malvenko en 1745 signifis la finon de la klansistemo kaj akcelis la eksproprietigon de la kamparanoj je sia grundo. [fr. eld.]

11 Morgano, saml., p. 357-358.

12 En la eldono de 1884 sekvas: „La sama rajto – en Nordameriko ĝi okazas multfoje en la ekstrema nordokcidento – validis ankaŭ ĉe la rusoj, kie la granddukino Olga nuligis ĝin en la deka jarcento.

VII La gento ĉe keltoj kaj ĝermanoj

Ke la ĝermanoj estis ĝis la popolmigrado organizitaj en gentoj, estas nedubebla. Ili povas esti ekokupintaj la regionon inter Danubo, Rejno, Vistulo kaj la nordaj maroj nur multajn jarcentojn antaŭ nia erao; la kimbroj kaj teŭtonoj estis ankoraŭ en plena migrado, kaj la suevoj trovis nur en la tempo de Cezaro fiksjajn loĝlokojn. Pri ili Cezaro diras eksplicite, ke ili estis setlintaj laŭ gentoj kaj parencecoj (*gentibus cognationibusque*)¹³, kaj en la buŝo de romano el la gento *Julia* (*gens Iulia*) tiu vorto *gentibus* havas klaran ne fordiskuteblan signifon. Tio validis por ĉiuj ĝermanoj; eĉ la setlado en la konkeritaj romiaj provincoj¹⁴ ŝajnas esti okaz-

La komunismaj mastrumejoj de servutaj familioj, kiuj ekzistis en Francio, speciale en la *Nivernais* kaj en la *Franche-Comté* ĝis la revolucio, simile al la slavaj familiaj komunumoj en la serbaj-kroataj regionoj, estas ankaŭ restaĵoj de antaŭa genta organizo. Ili estas ankoraŭ ne tute formortintaj, oni vidas ekz-e ĉe *Louhans* (*Saône-et-Loire*) ankoraŭ amason da grandaj, sia-spece konstruitaj biendomoj kun komuna centra salonego kaj dormĉambroj ĉirkaŭe, en kiuj loĝis pluraj generacioj de la sama familio.”

13 Cezaro: Pri la gaŭla milito, VI, 22.

14 La sekva teksto ĝis la paragrafo: „Kiel ĉe meksikanoj kaj grekoj ...” (p. 132) estas la versio ampleksigita de Engelso en 1891. Ĝi tekstis en 1884: „okazis ankoraŭ la gentoj. En la alemana popoljuro de la dekoka jarcento oni identigas *genealogia* rekte kun *Markgenossenschaft* [markia komunumo]; tiel ke ni vidas ĉi tie germanan popolon, kaj pli precize refoje suevojn, setlintajn laŭ gentoj, *gentes*, kaj certan distrikton atribuitan al ĉiu gento. Ĉe la burgundoj kaj langobardoj la gento nomiĝis *fara*, kaj la nomo por gentanoj (*faramanni*) estas en la burgunda popoljuro rekte samsignife uzata kun burgundo, kontraste al la romiaj loĝantoj kiuj kompreneble ne estis enprenitaj en la burgundaj gentoj. La disdivido de la grundo okazis do ankaŭ en Burgundio laŭ gentoj. Tiel solviĝas la demando pri la *faramanni*, pri kiu la germanaj juristoj dum cent jaroj vane rompis al si la kapojn. Tiu nomo *fara* por gento verŝajne ne validis ĝenerale ĉe la ĝermanoj, kvankam ni trovas ĝin ĉi tie ĉe popolo de gota kiel ĉe alia de herminona (altgermana) deveno. La lingvaj radi-

VII La gento ĉe keltoj kaj ĝermanoj

inta ankoraŭ laŭ gentoj. En la alemana popoljuro¹⁵ estas konfirmite ke la popolo sur la konkerita tero sude de Danubo setlis laŭ gentoj (*genealogiae*); *genealogia* estas uzata tute en la sama senco kiel poste markia aŭ vilaĝa komunumo. Lastatempe Kowalewski esprimis la ideon laŭ kiu tiuj *genealogiae* estas la grandaj domanaroj, inter kiuj la tero estis disdividita kaj el kiuj evoluas nur poste la vilaĝa komunumo. La samo tiam certe validas ankaŭ pri la *fara*, la esprimo per kiu la burgundoj kaj langobardoj – do ĉe gota kaj ĉe herminona aŭ altgermana popoltribo – signas proksimume, se ne precize la samon kiel per *genealogia* en la alemana jurlibro. Pri kio temas ĉi tie en la realo: ĉu gento aŭ ĉu domanaro, tio estas ankoraŭ pli detale esplenda.

La lingvaj monumentoj lasas dubon pri tio ĉu ĉe ĉiuj ĝermanoj ekzistis komuna esprimo por gento, kaj kiu. Etimologie kun la greka *genos* ekivalentas la latina *gens*, la gota *kuni*, la mezaltgermana *künne*, kaj estas ankaŭ uzata en la sama senco. La fakto ke la nomo por ino devenas de la sama radiko, resendas al la epokoj de la patrinrajto: greke *gyne*, slave *ĵena*, gote *qvin*, malnovnorde *kona*, *kuna*. – Ĉe la langobardoj kaj la burgundoj ni trovas, kiel dirite, *fara*, kiun Grimm derivas el hipoteza radiko *fisan*, generi. Mi preferas reiri al la pli palpebla derivado de *faran*, veturi, migri, kiel nomo por firma grupo de migrantaro kiu kompreneble konsistas el parencoj, nomo kiu kun la fluo de la plurcentjara migrado unua al oriento, poste al okcidento, iom post iom transiris al la gentanaro mem. – Krome gota *sibja*, angla-saksa *sib*, malnovaltgermana *sippia*, *sippa*, [germane]

koj uzataj en la germana lingvo por parenceco estas tre multaj kaj estas aplikataj egalece por esprimoj ĉe kiuj ni rajtas supozi rilaton al gento.

- 15 La alemana popoljuro estas kodekso el la fino de la 6-a jarcento kaj de la 8-a jarcento de la kutimjuro reganta en la alemanaj triboj fikse loĝantaj ekde la 5-a jarcento sur la nunaj teritorioj de Alzaco [aŭ: Elzaco -vl], Svislando kaj sudokcidenta Germanio. Engelso celas ĉi tie la leĝon LXXXI (LXXXIV). [fr. eld.]

VII La gento ĉe keltoj kaj ĝermanoj

Sippe [etna grupo, klano, parenkaro]. Malnovnorde aperas nur la pluralo *sifjar*, la parencoj; la singularo nur kiel nomo de diino, *Sif*. – Kaj fine aperas ankoraŭ alia esprimo en la „Hildebrandpoemo”¹⁶, kie Hildebrando demandas Hadu-
brandon,

„kiu estas via patro inter la viroj de ĉi popolo ... aŭ de kies gento vi estas” (*eddo hêlihhes cnuesles du sis*).

Se iel ekzistis komuna ĝermana nomo por gento, ĝi estis verŝajne gote *kuni*; por tio pledas ne nur la identeco kun la ekvivalenta esprimo de la parencaj lingvoj, sed ankaŭ la cirkonstanco ke de ĝi deriviĝas la vorto *kuning*, reĝo, kiu origine signifis prezidanto de gento aŭ de tribo. *Sibja*, [novgermane:] *Sippe*, ŝajnas ne esti verŝajna, almenaŭ *sifjar* en la malnovnorda signifas ne nur sangparenco, sed ankaŭ boparenca, entenas do la anojn de minimume *du gentoj*¹⁷; *sif* do ne povis esti la esprimo por gento.

Kiel ĉe la meksikanoj kaj grekoj ankaŭ ĉe la ĝermanoj la batalordo, la rajdistaro kiel la kejla kolono de la piedbatalantoj, estis ordigitaj laŭ gentaj organizaĵoj; kiam Tacito diras: laŭ familioj kaj parencecoj¹⁸, tiam tiu neklara esprimo venas de tio ke liatempes la gento en Romo jam delonge ĉesis esti vivanta organizaĵo.

Decida estas tekstero ĉe Tacito, kie tekstas: La patrinfrato konsideras sian nevon kiel sian filon, ja iuj konsideras la sangan ligon inter patrino onklo kaj nevo eĉ pli sankta kaj densa ol inter patro kaj filo, tiel ke, kiam oni postulas ostaĝojn, la fratinfilo estas konsiderata pli granda garantio ol la

16 La Hildebrandkanto estas malnovaltgermana epika poemo el la 8-a jarcento, kies gravaj fragmentoj estas konservitaj. Ĝi estas la plej malnova skribita monumento de la germana lingvo. [fr. eld.]

17 Kursivigo de la aŭtoro (dum fremdvortoj estas ĝenerale kursivigitaj de la tradukinto). -vl

18 Tacito: Ĝermanujo.

VII La gento ĉe keltoj kaj ĝermanoj

propra filo de tiu kiun oni volas ligi. Jen ni havas ankoraŭ vivantan pecon el la patrinrajte organizita, do origina gento, kaj en tio trajton kiu elstarigas aparte la ĝermanojn.¹⁹ Se membro de tia gento donis sian propran filon kiel garantiaĵon de ĵuro kaj se la viktimo mortis ĉe kontraktrompo de la patro, tiam tio estis ties propra afero. Sed se estis la fratinfilo kiu estis oferita, tiam la plej sankta gentrajto estis rompita; la plej proksima genta parenco, devigata protekti la knabon aŭ junulon antaŭ ĉiuj aliaj, aŭ devis ne ostaĝigi lin aŭ li devis plenumi la kontrakton. Se ni alie ne havus spuron de genta konstitucio ĉe la ĝermanoj, tiu ĉi tekstero sufiĉus.²⁰

Eĉ pli decida, ĉar proksimume 800 jarojn posta, estas tekstero el la malnovnorda poemo pri la krepusko de la dioj kaj la mondpereo, de la *Völuspá*. En tiu „Vizio de la antaŭvidistino”, en kiu, kiel Bang kaj Bugge nun pruvis, enmiksiĝis ankaŭ kristanaj elementoj, estas dirite, ĉe la priskribo

19 La aparte densa ligo inter patrina onklo kaj nevo, devena el la epoko de la patrinrajto, kiu troviĝas ĉe multaj popoloj, estas konata ĉe la grekoj nur en la epoko de la herotempo. Laŭ Diodoro (IV, 34 [Diodoro de Sicilio: Bibliothecae historicae quae supersunt, IV, 34, p. 43-44]) Meleagro mortigas la filojn de Testio, la fratojn de sia patrino Altea. Tiu vidas en tiu faro tiom neestingeblan krimon ke ŝi malbenas la murdinton, sian propran filon, kaj deziras lian morton. „*La dioj plenumis, kiel oni rakontas, siajn dezirojn kaj ĉesigis la vivon de Meleagro.*” Laŭ la sama Diodoro (IV, 44) la argonaŭtoj elŝipiĝis sub Heraklo en Trakio kaj trovas tie ke Fineo, laŭ instigo de sia nova edzino, honte mistraktas siajn du filojn generitajn kun sia forpelita edzino, la boreadino Kleopatro. Sed inter la argonaŭtoj estas ankaŭ boreadoj, fratoj de Kleopatro, kiel patrinfratoj de la mistraktatoj. Ili tuj helpas siajn nevojn, liberigas ilin kaj mortigas la gardistojn. (*Rimarko de Engelso*) [La propraj nomoj en la originalo, respektive: *Meleager, Thestius, Althāa, Phineus, Boreade Kleopatira*. -v]

20 En la eldono de 1884 mankas la sekva teksto ĝis la paragrafo: „Cetere la patrinrajto ...” (p. 134).

VII La gento ĉe keltoj kaj ĝermanoj

de la tempo de ĝenerala degenero kaj malmoraleco, kiu enkondukas la grandan katastrofon:

Broedhr munu berjask
munu *systrungar*

ok at bönum verdask
sifjum spilla.

„Fratoj interbatalos kaj fariĝos murdantoj unu la alian, *fratinid-
oj* rompos la moron.”

Systrungr nomiĝas filo de la patrinfratino, kaj ke tiuj neas la sangparencecon unu al la alia, estas por la poeto ankoraŭ pligravigo eĉ de la krimo de fratmurdo. La pligravigo kuŝas en la *systrungar*, kiu emfazas la parencecon ĉe patrina linio; se anstataŭ tio starus tie *syskina-börn*, gefratidoj, aŭ *syskina-synir*, gefratfiloj, tiam la dua linio ne estus pliintensiĝo kompare kun la unua, sed nur malfortigo. Do, eĉ dum la vikinga tempo, kiam la *Völuspâ* estiĝis, la memoro pri la patrinrajto en Skandinavio ankoraŭ ne paliĝis.

Cetere la patrinrajto dum la tempo de Tacito, almenaŭ ĉe ĝermanoj²¹ kiujn li iom pli bone konis, jam estis cedinta al la patrorajto: La infanoj heredis de la patro; kie ne estis infanoj, la fratoj kaj la onkloj de la patra kaj patrina flanko. La allaso de la patrinfrato al heredo rilatas al la ĵus menciita moro kaj pruvas ankaŭ kiom juna la patrorajto tiam ankoraŭ estis ĉe la ĝermanoj. Ankaŭ ĝis profunde en la mezepoko troviĝas spuroj de la patrinrajto. Tiutempe oni ŝajnis ne tre fidi la patrecon, speciale ĉe servutuloj; se do feŭdestro repostulis de urbo fuĝintan servutulon, tiam ekz-e en Aŭgsburgo, Bazelo kaj *Kaiserslautern* la servuteco de la akuzito estis ĵurenda de ses liaj plej proksimaj sangparencoj, kaj pli precize ĉiuj nur de patrina flanko.²²

Kroma restaĵo de la ĝuste formortanta patrinrajto estas

21 En la eldono de 1884 mankas: kiujn li iom pli bone konis.

22 Maurer, „Städteverfassung, I, p. 381.

VII La gento ĉe keltoj kaj ĝermanoj

la por la romano nekomprenebla respekto de la ĝermanoj al la virinoj. Virgulinaj el eminenta familio estis konsiderataj la plej ligantaj ostaĝoj ĉe kontraktoj kun la ĝermanoj; la ideo ke virinoj kaj filinoj povus fali en kaptitecon kaj sklavecon estas al ili terura kaj spronas ilian kuraĝon en la batalo pli ol ĉio alia; ili vidas en la virino ion sanktan kaj profetan, ili elaŭdas ŝian konsilon ankaŭ en la plej gravaj aferoj, kiel ekz-e *Veleda*, la bruktera pastrino ĉe la rivero *Lippe* estis la instiganto de la tuta popolribelo de la batavoj, en kiu *Civilis* ĉe la pinto de ĝermanoj kaj belgoj ŝancelis la tutan romian regadon en Gaŭlujo.²³ En la domo la regado de la virino ŝajnas ĝenerale akceptita; ŝi, la maljunuloj kaj infanoj devas ja ankaŭ fari ĉian laboron, la viro ĉasas, drinkas aŭ pigras. Tiel diras Tacito; sed ĉar li ne diras, kiu prizorgas la kampojn, kaj decide klarigas ke la sklavo donas nur kontribuaj-ojn²⁴, sed ne faras servutlaboron, la amaso de la plenkreskaj viroj devis verŝajne fari la malmultan laboron kiun postulis la kampkulturo.

La formo de edzeco estis, kiel jam supre dirite, para geedzeco iom post iom proksimiĝanta al monogamio. Ĝi ankoraŭ ne estis strikta monogamio, ĉar poligamio de la eminentuloj estis permesata. Ĝenerale oni severe atentis ĉastecon de la knabinoj (male al la keltoj), kaj Tacito parolas ankaŭ kun aparta varmeco pri la nerompeblo de la geedza ligo ĉe la ĝermanoj. Li indikas nur adulton de la virino kiel kaŭzon de disiĝo. Sed lia raporto lasas ĉi tie multon mankhava kaj sen tio multe tro vidigas ke temas pri la virto elmontrata al la senmoralaj romanoj. Unu afero certas: Se

23 La ribelo de la gaŭlaj kaj ĝermanaj triboj sub la komando de *Claudius Civilis* (69-70) estis kaŭzita de la altigo de impostoj, de liveradoj kaj de kreskantaj eksceso de la romiaj oficistoj. Al ĝi aliĝis grava parto de Gaŭlujo kaj de teritorioj de Ĝermanujo sub romia dominado. Post komencaj sukcesoj, la ribeluloj suferis kelkajn malvenkojn kiuj devigis ilin fari la pacon kun Romo. [fr. eld.]

24 En la originalo: „Abgaben”. -vl

VII La gento ĉe keltoj kaj ĝermanoj

la ĝermanoj en siaj arbaroj estis tiuj esceptaj virtuloj, tiam sufiĉis nur malmulta kontakto kun la ekstera mondo por redukti ilin al la nivelo de la ceteraj eŭropaj mezumaj homoj; la lasta spuro de morala severo malaperis meze de la romia mondo eĉ pli rapide ol la ĝermana lingvo. Sufiĉas legi ion de Gregoro de Tours. Ke en la ĝermanaj praarbaroj ne povis regi la rafinita lukso de volupto kiel en Romo, tio estas memkomprenebla, kaj tiel restas al la ĝermanoj ankaŭ tiurilate ankoraŭ sufiĉe da avantaĝo antaŭ la roma mondo, sen ke ni devas fantazii pri seksa sindeteno kiu neniam kaj nenie regis ĉe tuta popolo.

Devena el la genta konstitucio estas la devo heredi la malamikecojn de la patro aŭ de la parenco same kiel la amikecojn; same la *wergeld*, la puno, anstataŭ la sangvenĝo, por mortigo aŭ vundigoj. Tiu *wergeld*, kiu ankoraŭ antaŭ generacio estis konsiderata specife ĝermana institucio, estas nun pruvita ĉe centoj da popoloj kiel ĝenerala mildiga formo de la sangvenĝo fontinta el la genta ordo. Ni trovas ĝin, same kiel la devon je gastamo, interalie ĉe la amerikaj indianoj; la priskribo, kiel la gastamo laŭ Tacito²⁵ estas praktikata, estas ĝis preskaŭ ĉiaj detalo la sama kiel tiu, kiun Morgano donas pri la indianoj.

La akra kaj senfina disputo pri tio, ĉu la ĝermanoj de Tacito estis jam definitive dividinta la kamparon aŭ ne kaj kiel la koncernaj teksteroj interpretendas, apartenas nun al la pasinteco. Ekde kiam la komuna kulturado de la kampoj fare de la gento kaj poste de la komunismaj familiaj komunumoj, kiujn Cezaro ankoraŭ atestas ĉe la suevoj, kaj la posta atribulado de kampoj al unuopaj familioj kun perioda novdistribulado estas pruvita ĉe ĉiuj popoloj, ekde kiam estas konstatite ke tiu perioda redistribulado de la kampaj terenoj en Germanio mem konserviĝis kelkloke ĝis en nia tempo, jam ne necesas plia vorto pri tio. Se la ĝermanoj de la komuna terkulturado, kiun Cezaro eksplicite atribuas al la

25 „Germania”, ĉap. 21.

VII La gento ĉe keltoj kaj ĝermanoj

suevoj (dividita aŭ privata kampo tute ne ekzistas ĉe ili, diras li), en la 150 jaroj ĝis Tacito estis transirintaj al unuopa kulturado kun jara novdistribuado de la grundo, tiam temas pri vere sufiĉa progreso; la transiro de tiu ŝtupo al plena privatproprietio je grundo dum tiu mallonga intertempo kaj sen ajna fremda enmiksiĝo estus simple malebla. Mi legas do en Tacito nur tion kion li diras per sobraj vortoj: Ili ŝanĝas (aŭ nove alidistribuas) la kulturatan grundon ĉiujare, kaj ĉe tio restas sufiĉe da komuna grundo. Tio estas la ŝtupo de kampkulturo kaj de alproprigo de grundo kiu precize kongruas kun la tiama genta konstitucio de la ĝermanoj.

La antaŭan paragrafon mi lasas senŝanĝe tia kia ĝi aperas en antaŭaj eldonoj. Intertempe la demando turniĝis alie. Ekde kiam Kowalewski²⁶ pruvis larĝe disvastiĝintan, se ne ĝeneralan kutimon de la patriarĥa domanaro kiel interŝtupo inter la patrinrajta komunisma kaj la moderna izolita familio, la demando jam ne temas, kiel ankoraŭ inter Maurer kaj Waitz, pri komunproprietio aŭ privatproprietio je grundo, sed pri la *formo* de la komunproprietio. Estas nenia dubo ke en la tempo de Cezaro ĉe la suevoj ekzistis ne nur komunproprietio, sed ankaŭ komuna kulturado por komuna rikolto. Ĉu la ekonomia unuo estis la gento aŭ la domanaro aŭ ia inter ambaŭ troviĝanta komunisma parencecggrupo, aŭ ĉu laŭ la grundkondiĉoj ekzistis ĉiuj tri grupoj, pri tio oni povas ankoraŭ longe disputi. Sed Kowalewski asertas nun ke la stato priskribita de Tacito ne koncernas la markian aŭ vilaĝan komunumon, sed la domanaron; nur el tiu evoluis multe pli poste, pro la kresko de la loĝantaro, la vilaĝa komunumo.

Laŭ tio, la setlejoj de la ĝermanoj en la regiono ekokupita dum la romia tempo kaj sur tiuj poste forprenitaj al la romianoj konsistis ne el vilaĝoj, sed el grandaj familiaj komunumoj, kiuj entenis plurajn generaciojn, kulturis proporciatan terpecon kaj uzis la ĉirkaŭan senkulturejon kun la najbaroj kiel komunan markion. La tekstero de Tacito pri la

26 Kp supre, p. 62.

VII La gento ĉe keltoj kaj ĝermanoj

ŝanĝo de la kulturata grundo estus tiam efektive komprenebla en agronomia senco: La komunumo ĉiujare kulturis alian terpecon kaj lasis la kampojn de la antaŭjaro senkultura aŭ lasis ĝin tute resovaĝiĝi. Ĉe la maldensa loĝantaro restis tiam tamen sufiĉa senkulturejo por superfluigi ĉian disputon pri grundposedo. Nur post jarcentoj, kiam la nombro da domanoj atingis tioman grandon ke la komuna kulturado sub la tiamaj produktadkondiĉoj fariĝis neebla, ili malfondiĝis; la ĝis tiam komunaj kampoj kaj herbejoj estis dividitaj laŭ la konata maniero inter la nun formiĝantaj unuopaj mastrumejoj, unue portempe, poste definitive, dum arbaro, paŝtejo kaj akvoj restis komunaj.

Por Ruslando, tiu evoluo ŝajnas komplete pruvita. Koncerne Germanion kaj duavice la ceterajn ĝermanajn landojn, ne kontestebblas ke tiu supozo multrilate pli bone klarigas la fontojn kaj pli facile solvas la malfacilaĵojn ol la ĝisnuna, kiu interpretas la staton ĉe Tacito kiel vilaĝkomunumoj. La plej malnovaj dokumentoj, ekz-e de la *Codex Laureshamensis*, ĝenerale multe pli bone klariĝas per la domanaro ol per la vilaĝmarkia komunumo. Aliflanke tio kreas siavice novajn malfacilaĵojn kaj novajn unue solvendajn demandojn. Sed en tio nur novaj esploradoj povas alporti decidon; sed mi ne povas nei ke la interŝtupo de domanaro havas tre multan verŝajnecon ankaŭ por Germanio, Skandinavio kaj Anglio.

Dum ĉe Cezaro la ĝermanoj parte ĵus atingis fiksjajn loĝlokojn, parte ankoraŭ serĉis tiajn, ili dumtempe de Tacito jam havas plenan jarcenton da fiksa loĝado malantaŭ si; laŭ tio, la progreso en la produktado de la vivtenado estas evidenta. Ili loĝas en trunkodomoj; ilia vestaĵo estas ankoraŭ arbare natureca: kruda lanmantelo, bestfeloj, por virinoj kaj eminentuloj linaj subvestaĵoj. Ilia nutraĵo estas lakto, viando, sovaĝaj fruktoj kaj, kiel Plinio aldonas, avenkaĉo (ankoraŭ nun kelta nacia nutraĵo en Irlando kaj Skotlando). Ilia riĉaĵo konsistas en brutaro: Sed tiu estas malbonrasa, la

VII La gento ĉe keltoj kaj ĝermanoj

bovoj malgrandaj, malbonaspektaj, senkornaj; la ĉevaloj malgrandaj ĉevaletoj kaj ne konkursuloj. Mono estis malforte kaj malmulte uzata, nur romia. Oron kaj arĝenton ili ne prilaboris kaj ne estimis, fero estis malofta kaj almenaŭ ĉe la triboj apud Rejno kaj Danubo ŝajnis nur ĵus enkondukita, ne mem produktita. La runa skribo (imitaĵo de grekaj aŭ latinaj literoj) estis konata nur kiel sekreta skribo kaj uzata nur por religia sorĉado. Homoferoj estis ankoraŭ kutimo. Mallonge, ni havas ĉi tie antaŭ ni popolon kiu ĵus leviĝis el la meza ŝtupo de barbareco al ties supra ŝtupo. Sed dum la triboj ĉe la limo de la romianoj, per pli facila importo de romiaj industriproduktaĵoj estis malhelpataj en la disvolvado de sendependa metal- kaj teksaĵ-industrio, en la nordoriento, ĉe la Balta Maro, tiaj industrioj tute sendube elformiĝis. La armaĵoj trovitaj en la ŝlesvigaj marĉoj – longa ferspado, ĉenkiraso, arĝenta kasko ktp, kun romiaj moneroj de la fino de la dua jarcento – kaj la ĝermanaj metalaĵoj disvastiĝintaj per la popolmigrado montras propran tipon de ne malalta elformiĝo eĉ tie, kie ili apogas sin sur origine romiaj modeloj. La elmigrado en la civilizitan romian imperion preskaŭ ĉie ĉesigis tiun hejmlandan industrion, escepte en Anglio. Kiom unuece tiu industrio estiĝis kaj evoluis, tion montras ekz-e la bronzaĵaj agrafoj; tiuj trovitaj en Burgundio, en Rumanio, ĉe la Asova Maro kune kun anglaj kaj svedaj eble devenis el la sama laborejo kaj estas same senkonteste de ĝermana origino.

Kun la supra ŝtupo de barbareco kongruas ankaŭ la konstitucio. Laŭ Tacito ĝenerale ekzistis la konsilistaro de la prezidantoj (*principes*), kiu decidis pri malgravaj aferoj, sed preparis pli gravajn por la decido en la popolkunveno; tiu siavice ekzistas sur la malsupra ŝtupo de barbareco, almenaŭ tie kie ni konas ĝin, ĉe la amerikanoj, unue nur por la gento, ankoraŭ ne por la tribo aŭ la tribligo. La prezidantoj (*principes*) distingiĝas ankoraŭ nete de la armegvidantoj (*duces*), tute kiel ĉe la irokezoj. La unuaj vivas parte jam de

VII La gento ĉe keltoj kaj ĝermanoj

honoraj donacoj je bruto, greno ktp de la tribanoj; ili estas elektataj, kiel en Ameriko, plej ofte el la sama familio; la transiro al la patrorajto favoras, kiel en Grekio kaj Romo, la iom-post-ioman transformiĝon de la elekto en heredon kaj per tio la formiĝon de nobela familio en ĉiu gento. Tiu malnova tiel nomata tribnobelaro plej ofte pereis en la popolmiĝo aŭ baldaŭ poste. La armeĝvidantoj estis elektataj sendepende de deveno, nur laŭ sia kapableco. Ili havis multan povon kaj devis efiki per sia modelo; la veran disciplinan potencon ĉe la armeo havis la popolkunveno. La reĝo aŭ tribprezidanto prezidas; la popolo decidas – ne, per grumblado; jes, per aplaŭdo kaj armilbruo. Ĝi estas samtempe tribunalkunveno; ĉi tie oni faras kaj juĝas plendojn, faras mortkondamnojn, ĉe kio la mortpuno estas rezervita nur al malkuraĝo, popolperfido kaj kontraŭnatura volupto. Ankaŭ en la gentoj kaj aliaj subdividoj la tutaĵo juĝas sub prezido de la prezidanto, kiu, kiel en ĉiu ĝermana origina tribunalo, povis esti nur la prezidanto de la proceso kaj demandanto; trovanto de verdikto estis de ĉiam kaj ĉie ĉe la ĝermanoj la tuta loĝantaro.

De la tempo de Cezaro elformiĝis ligoj de triboj; ĉe kelkaj de ili jam ekzistis reĝoj; la plej supera armeĝvidanto, kiel ĉe la grekoj kaj la romanoj, alstrebis jam tiranecon kaj kelkfoje akiris ĝin. Tiaj feliĉaj uzurpistoj estis nun tute ne senlimaj regantoj; sed ili ja komencis jam rompi la katenojn de la genta konstitucio. Dum alie liberigitaj sklavoj okupis subordigitan pozicion, ĉar ili ne povis aparteni al ia gento, tiaj favoratoj ĉe la novaj reĝoj ofte akiris rangon, riĉaĵon kaj honorojn. Io sama okazis post la konkero de la roma imperio ĉe la armeĝvidantoj fariĝintaj nun reĝoj de grandaj landoj. Ĉe la frankoj, sklavoj kaj liberigitoj de la reĝo ludis grandan rolon unue ĉe la kortego, poste en la ŝtato; la nova nobelaro grandparte devenas de ili.

Estas institucio kiu favoris la aperon de la reĝeco: la sekvantaroj. Jam ĉe la amerikaj ruĝhaŭtuloj ni vidis, kiel apud

VII La gento ĉe keltoj kaj ĝermanoj

la genta konstitucio privataj societoj formiĝis proprainciate por militado. Tiaj privataj societoj fariĝis ĉe la ĝermanoj jam konstantaj asocioj. La militestro, kiu akiris famon, kolektis aron da predaĵaj junuloj ĉirkaŭ si, devigataj je persona fideleco al li, kiel li al ili. La gvidanto nutris kaj pridon-acis ilin, ordigis ilin hierarĥie; korpogvardio kaj batalpreta trupo por malgrandaj, preta oficiraro por pli grandaj militiroj. Tiuj sekvantaroj, kiuj certe estis malfortaj kaj aperas tiaj ankaŭ, ekz-e poste ĉe {Odoakar} en Italio, formis tamen jam la ĝermon de la disfalo de la malnova popolibereco kaj pruviĝis kiel tia en kaj post la popolmigrado. Ĉar unue ili favoris la aperon de la reĝa potenco. Sed due, kiel rimarkigas jam Tacito, ili kunteneblis nur per konstantaj militoj kaj rab-ekspedicioj. Rabo fariĝis celo. Se la sekvantara mastro havis nenion por fari en la proksimeco, li migris kun sia viraro al aliaj popoloj, ĉe kiuj ekzistis milito kaj predo; la ĝermanaj helppopoloj, kiuj batalis sub romia flago en grandaj amasoj eĉ kontraŭ ĝermanoj, estis parte kunigitaj de tiaj sekvantaroj. En tio troviĝas jam ĝerme la fenomeno de la landskneĥtoj, la honto kaj malbeno de la germanoj. Post konkero de la roma imperio, tiuj sekvantaroj de la reĝoj konsistigis, apud la neliberaj kaj romaj kortegaj servistoj la due ĉefan konsistigan parton de la posta nobelaro.

Ĝenerale por la ĝermanaj triboj aliancitaj al popoloj regas do la sama konstitucio kiel tiu kiu estis evoluinta ĉe la grekoj de la heroa tempo kaj la romanoj de la tiel nomata reĝa tempo: popolkunveno, konsilistaro de la gentaj prezidantoj, armegvidanto, kiu jam alstrebas veran reĝan potencon. Ĝi estis la plej elformita konstitucio kiun la genta ordo entute povis disvolvi; ĝi estis la modela konstitucio de la supra ŝtupo de barbareco. Se la socio transpaŝis la limojn ene de kiuj tiu konstitucio sufiĉis, tiam la genta ordo pereis; ĝi estis detruita, la ŝtato anstataŭis ĝin.

VIII La ŝtatigo de la ĝermanoj

La ĝermanoj estis laŭ Tacito tre multnombra popolo. Ni ricevas proksimuman ideon pri la grandeco de ĝermanaj unuopaj popoloj ĉe Cezaro; li indikas la nombron de la usi-petroj kaj tenkteroj aperintaj sur la maldekstra rejnborde je 180.000 homoj, inkluzive de virinoj kaj infanoj. Do proksimume 100.000 por unuopa popolo¹, jam konsiderinde pli ol ekz-e la tutaĵo de la irokezoj en ilia florepoko, kiam ili, eĉ ne pli multnombraj ol 20.000 homoj, fariĝis la teruro de la tuta lando, de la grandaj lagoj ĝis Ohio kaj Potomako. Tia unuopa popolo okupas sur la mapo, se ni provas grupigi tiujn loĝantajn proksime de Rejno, pli precize konatajn laŭ la raportoj, mezume proksimume la spacon de prusa administra distrikto, do proksimume 10.000 kvadratkilometrojn aŭ 182 geografiajn kvadratmejlajn. Sed la Granda Ĝermanujo (*Germania Magna*) de la romanoj ĝis la rivero Vistulo, entenas proksimume 500.000 kvadratkilometrojn. Ĉe proksimuma homnombro de la unuopaj popoloj de 100.000 la tuta nombro por *Germania Magna* kalkuleblus je kvin milionoj; por barbara popolgrupo konsiderinda nombro, por niaj kondiĉoj – 10 homoj por kvadratkilometro aŭ 550 por geografia kvadratmejlo – ekstreme malgranda. Sed tio ne estas la tuta kvanto de la tiam vivantaj ĝermanoj. Ni scias ke ĉe la Karpatoj ĝis la Danuba enfluejo loĝis ĝermanaj popoloj de gota tribo, bastarnoj², peŭkintoj kaj aliaj, tiom multnombraj ke Plinio kunmetas el ili la kvinan ĉeftribon de la ĝermanoj kaj ke ili, kiuj jam en la jaro 180 antaŭ nia erao aperis en la soldservo de la makedona reĝo Perseo, avancis en la unuaj jaroj de Aŭgusto ĝis la regiono antaŭ Adrianopolo. Se ni

1 La ĉi tie supozata nombro estas konfirmita de tekstero ĉe Diodoro pri la gaŭlaj keltoj: „En Gaŭlio loĝas multaj popoloj de malsama grandeco. Ĉe la plej grandaj la homnombro estas proksimume 200.000, ĉe la plej malgrandaj 50.000.” (Diodorus Siculus, V, 25) Do mezume 125.000; la gaŭlaj unuopaj popoloj estas, ĉe ilia pli alta evolustato, supozendaj pli multnombraj ol la ĝermanaj.

2 En la originalo, respektive „Bastarner, Peukinter”. -vl

VIII La ŝtatigo de la ĝermanoj

kalkulas por ili unu milionon, ni ricevas kiel verŝajna ĉiom-nombro de la ĝermanoj komence de nia erao almenaŭ ses milionojn.

Post setlado en Ĝermanio la loĝantaro certe pliiĝis kun kreskanta rapideco; la supre menciitaj industriaj progresoj pruvus tion jam sole. La ŝlesvigaj marc-trovaĵoj estas, laŭ la romaj moneroj apartenantaj al ĝi, el la tria jarcento. Tiu-tempe do regis jam ĉe la Balta Maro elformita metal- kaj teksaĵ-industrio, vigla trafiko kun la roma imperio kaj certa lukso ĉe la pliriĉuloj – ĉio ĉi spuroj de pli densa loĝantaro. Sed en tiu tempo komenciĝas ankaŭ la ĝenerala atakmilito de la ĝermanoj sur la tuta linio de Rejno, de la romia lim-remparo kaj de Danubo, de la Norda ĝis la Nigra Maro – rekta pruvo de la ĉiam pli grandiĝanta homnombro preman-ta eksteren. Tiu batalo daŭris trident jarojn, dum kiuj la ĉefa tribo de la gotaj popoloj (kun escepto de la skandinavaj gotoj kaj de la burgundoj) migris al sudoriento kaj konsistigis la maldekstran alon de la granda ataklinio, en kies centro avancis la altgermanoj (herminoj) ĉe la supra Danubo kaj ĉe ilia dekstra alo la iskveonoj, nun nomataj frankoj, avancis ĉe Rejno; la ingveonoj konkeris Brition. Fine de la kvina jarcento la roma imperio troviĝis senforta, sensanga kaj senhelpe malfermita al la enpenetrantaj ĝermanoj.

Ni staris supre ĉe la lulilo de la antikvaj greka kaj roma civilizacio. Ĉi tie ni staras ĉe ĝia ĉerko. La samnivelega rabotilo de la roma mondregado dum jarcentoj trarabotadis ĉiujn landojn ĉirkaŭ Mediteraneo. Kie la greka lingvo ne rezistis, ĉiuj naciaj lingvoj devis cedi al difekta latina lingvo; jam ne estis naciaj diferencoj, jam ne ekzistis gaŭloj, iberoj, liguroj, norikoj, ili ĉiuj estis fariĝintaj romianoj. La roma administracio kaj la roma juro ĉie pereigis la malnovajn gentajn organizaĵojn kaj per tio la reston de loka kaj nacia sendependa agado. La novbakita romaneco ne donis ion anstataŭan; ĝi ne esprimis naciecon, sed nur la mankon de nacieco. La elementoj de novaj nacioj ekzistis ĉie; la latinaj

VIII La ŝtatio de la ĝermanoj

dialektoj de la diversaj provincoj pli kaj pli diferenciĝis; la naturaj limoj, kiuj antaŭe faris Italion, Gaŭlion, Hispanion, Afrikon memstaraj regionoj, ekzistis ankoraŭ kaj ankaŭ sentigis sin. Sed nenie ekzistis la forto kunteni tiujn elementojn en novaj nacioj; nenie estis ankoraŭ spuro de evolukapablo, de rezista forto, por ne paroli pri krea kapablo. La giganta homamaso de la giganta teritorio havis nur unu ligon kiu kuntenis ĝin: la roman ŝtaton, kaj tiu estis fariĝinta, kun la fluo de la tempo, ilia plej granda malamiko kaj subpremanto. La provincoj estis detruintaj Romon; Romo mem fariĝinta provinca urbo kiel la aliaj – privilegiita, sed jam ne reganta, jam ne centro de la mondimperio, eĉ ne plu sidejo de la imperiestroj kaj subimperiestroj, kiuj loĝis en Konstantinopolo, Treviro, Milano. La roma ŝtato estis fariĝinta giganta, komplika maŝino, ekskluzive por elsuĉado de la subuloj. Impostoj, ŝtatservuto kaj ĉiaj liveradoj premis la amason de la loĝantaro en ĉiam pli profundan malriĉecon; tiu premo plifortiĝis ĝis neelteneblo per la ĉantaĝoj de la guberniestroj, impostkolektistoj, soldatoj. Ĝis tien atingis la roma ŝtato kun sia mondregado: Ĝi bazis sian ekzistorajton sur konservado de la ordo interne kaj protekto kontraŭ la barbaroj ekstere. Sed ĝia ordo estis pli malbona ol la plej malbona malordo, kaj la barbaroj, kontraŭ kiuj ĝi pretekstis protekti la civitanojn, estis de tiuj alsopirataj kiel savantoj.

La socia stato ne estis malpli katastrofa. Jam ekde la lastaj tempoj de la respubliko la roma regado celis senindulgan ekspluatadon de la konkeritaj provincoj; la imperia reĝimo ne forigis tiun ekspluatadon, sed male reguligis ĝin. Ju pli la imperio disfalis, des pli altiĝis la impostoj kaj liveradoj, des pli senhonte la oficistoj rabis kaj ĉantaĝis. Komerco kaj industrio estis neniam la afero de la popoldominantaj romanoj; nur en interezuzuro ili superis ĉion kio estis antaŭ kaj post ili. La komercaj elementoj kiuj troviĝis kaj konserviĝis, pereis sub la oficista ĉantaĝo; tio kio ankoraŭ iel sukcesis, falis al la orienta, greka parto de la imperio, kiu trovi-

VIII La ŝtatigo de la ĝermanoj

ĝas ekster nia temo. Ĝenerala malriĉiĝo, malkresko de la trafiko, kadukiĝo de la urboj, reveno de kampkulturo al pli malalta ŝtupo – tio estis la fina rezulto de la roma mondregado.

La kampkulturo, en la tuta malnova mondo la decida produktadbranĉo, refariĝis tia pli ol iam. En Italio, la gigantaj bienkompleksoj (latifundioj), kiuj ekde la fino de la respubliko etendiĝis sur preskaŭ la tuta teritorio, estis ekspluatataj dumaniere. Aŭ kiel brutpaŝtejo, kie la loĝantaro estis anstataŭigita per ŝafoj kaj bovoj, kies flegado bezonis nur malmultajn sklavojn. Aŭ kiel vilaoj, kiuj per amasoj da sklavoj praktikis grandstilan ĝardenkulturon, parte por la lukso de la posedanto, parte por vendo sur la urbaj merkatoj. La grandaj bestpaŝtejoj konserviĝis kaj verŝajne etendiĝis, la vilaaj bienoj kaj ilia ĝardenkulturo estis pereintaj kun la malriĉiĝo de iliaj posedantoj kaj la kadukiĝo de la urboj. La latifundia ekonomio bazita sur sklavlaboro jam ne profitigis, sed ĝi estis tiam la sole ebla formo de granda agrokulturo. La etkulturado estis ree fariĝinta la sole enspeziga formo. Unu vilao post la alia estis dispecigita en malgrandajn parcelojn kaj disdonita al heredaj farmistoj, kiuj pagis certan sumon, aŭ *partiarri*, pli mastrumantoj ol farmistoj, kiuj ricevis sesonon aŭ eĉ nur naŭonon de la jarprodukto por sia laboro. Sed precipe tiuj malgrandaj kampparceloj estis disdonitaj al farmistoj kiuj pagis por tio certan jaran sumon, estis ligitaj al la terpeco kaj vendeblaj kun sia parcelo; ili ja ne estis sklavoj, sed ankaŭ ne liberaj, ne rajtis edziĝi al liberuloj, kaj iliaj edzeco inter si ne estis konsiderataj plenvalidaj edzeco, sed kiel tiuj de la sklavoj kiel nura konkubineco (*contubernium*). Ili estis la antaŭuloj de la mezepokaj servutuloj.

La antikva sklavismo jam ne havis sencon. Nek en la kamparo en la granda kampkulturo nek en la urbaj manufakturoj ĝi donis profiton kiu valoris la penon – la merkato por iliaj produktoj elĉerpiĝis. Sed la malgranda kampkultu-

VIII La ŝtatigo de la ĝermanoj

ro kaj la malgranda metio, al kiuj la giganta produktado de la florepoko de la imperio estis ŝrumpinta, ne havis spacon por multaj sklavoj. Nur por dom- kaj luks-sklavoj de la riĉuloj estis ankoraŭ spaco en la socio. Sed la formortanta sklavismo daŭre sufiĉis por ke ĉia produkta laboro aperis al la libera romano – kaj tio estis nun ja ĉiu – kiel slavlaboro, kiel malinda. Pro tio, unuflanke la kreskanta nombro da liberigoj de superflujaj sklavoj fariĝintaj ŝarĝo, aliflanke la pliiĝo jen de farmistoj, jen de mizeriĝintaj liberuloj (simile al la *poor whites* der la eksaj sklavŝtatoj de Usono). La kristanismo estas komplete senkulpa je la iom-post-ioma formortado de la antikva sklavismo. Dum jarcentoj ĝi partoprenis ĝin en la roma imperio kaj poste neniam malebligis la sklavkomercon de la kristanoj, nek de la ĝermanoj en la nordo nek tiun de la venecianoj en Mediteraneo nek la postan nigrulkomercon.³ La sklavismo jam ne profitigis, pro tio ĝi formortis. Sed la mortanta sklavismo postlasis sian venenan pikilon en la malestimo de la produkta laboro de la liberuloj. Jen la senelira sakstrato en kiu la romia mondo troviĝis: La sklavismo estis ekonomie malebla, la laboro de la liberuloj estis morale proskribita. La unua jam ne povis, la dua ankoraŭ ne povis esti la baza formo de la socia produktado. Kio povis helpi en tiu situacio estis nur kompleta revolucio.

En la provincoj la situacio ne estis pli bona. Ni havas la plej multajn raporton el Gaŭlio. Apud la farmistoj ekzistis ĉi tie ankoraŭ etkampuloj. Por certiĝi kontraŭ perfortoj de oficistoj, juĝistoj kaj uzuristoj, tiuj tre ofte serĉis la protekton, la patronecon, de potenculo; kaj tion faris ne nur unuopuloj, sed tutaj komunumoj, tiel ke la imperiestroj en la kvara jarcento plurfoje ediktis malpermesojn kontraŭ tio. Sed

3 Laŭ la episkopo Liutprand de Kremono en la 10-a jarcento en Verduno, do en la Sankta Germana Regno, la ĉefa industribranĉo estis la fabrikado de eŭnukoj, kiuj estis je granda profito eksportataj al Hispanio por la maŭraj haremoj.

VIII La ŝtatigo de la ĝermanoj

kiel tio profitis al la protektserĉantoj? La patrono faris al ili la kondiĉon ke ili transigu la proprieton de siaj parceloj al li, kontraŭ kio li certigas al ili la vivlongan uzrajton – truko kiun la sankta eklezio memortenis kaj en la 9-a kaj 10-a jarcentoj abunde imitis por pliigo de la dia regno kaj de sia propra grundproprieto. Sed tamen, ĉirkaŭ la jaro 475, la episkopo Salvianus de Marsejlo ankoraŭ indignite impetas kontraŭ tia ŝtelado kaj rakontas ke la premo de la romiaj oficistoj kaj grandaj grundsinjoroj fariĝis tiom neeltenebla ke multaj „romanoj” jam fuĝis en la regionojn okupatajn de la barbaroj kaj ke la tie loĝantaj romaj civitanoj timas nenion pli ol reveni sub la roman regadon. Ke tiutempe gepatroj ofte pro malriĉeco vendis siajn infanojn en sklavecon, tion pruvas leĝo starigita kontraŭ tio.

Pro tio, ke la ĝermanaj barbaroj liberigis la romanojn de ilia propra ŝtato, ili prenis du trionojn de la tuta grundo kaj dividis ĝin inter si. La divido okazis laŭ la genta konstitucio; ĉe la relative malgranda nombro de la konkerintoj tre grandaj terpartoj restis nedividitaj, posedo parte de la tuta popolo, parte de la unuopaj triboj kaj gentoj. En ĉiu gento la kamp- kaj herbej-grundo estis lotumita inter la unuopaj mastrumejoj; ni ne scias ĉu tiutempe okazis ripetaj redividoj, ĉiukaze ili baldaŭ perdiĝis en la romiaj provincoj, kaj la individuaj partoj fariĝis vendebla privatproprieto, *allod*. Arbaro kaj paŝtejo restis nedividitaj por komuna uzado; tiu uzado kaj la maniero de kulturado sur la dividitaj parceloj estis reguligita laŭ malnova kutimo kaj laŭ decido de la tutaĵo. Ju pli la gento loĝis en la vilaĝo kaj ju pli ĝermanoj kaj romanoj iom post iom kunfandiĝis, des pli la parenceco de la ligo cedis antaŭ la teritoria; la gento malaperis en la markia komunumo, en kiu tamen videblas sufiĉe ofte spuroj de la origino el parenceco de la komunumanoj. Ekz-e la genta konstitucio, almenaŭ en la landoj kie la markia komunumo konserviĝis – norda Francio, Anglio, Germanio kaj Skandinavio – nerimarkite transiris en lokan konstitucion

VIII La ŝtatigo de la ĝermanoj

kaj per tio konservis la kapablon de adaptiĝo al la ŝtato. Sed ĝi tamen konservis la naturecan demokratian karakteron, kiu distingis la tutan gentan konstitucion, kaj tiel konservis, eĉ en la al ĝi poste trudita degenero⁴, pecon da genta konstitucio kaj per tio armilon en la manoj de la subprematoj, vivantan ĝis en la plej nova epoko.

Se tiel la sanga ligo en la gento baldaŭ perdiĝis, tio estis la sekvo de tio ke ankaŭ en la tribo kaj en la tuta popolo ĝiaj organoj degeneris sekve al la konkero. Ni scias, ke regado super submetitoj estas ne akordigebla kun la genta konstitucio. Ĉi tie ni vidas tion en granda skalo. La ĝermanaj popoloj, mastroj de la romaj provincoj, devis organizi tiun sian konkeradon. Sed oni povis nek akcepti la amasojn da romanoj en la gentan korpon nek regi ilin pere de tiu. Oni devis meti ĉe la pinto de la unue grandparte plu ekzistantaj romiaj lokaj administraj organoj anstataŭaĵon por la roma ŝtato, kaj tiu povis esti nur alia ŝtato. La organoj de la genta konstitucio devis do transformiĝi en ŝtatajn organojn, kaj laŭ la urĝaj cirkonstancoj tre rapide. Sed la plej proksima reprezentanto de la konkeranta popolo estis la armeĝvidanto. La sekurigo de la konkerita teritorio interne kaj ekstere postulis fortigon de lia povo. La momento estis veninta por transformi la armeestrecon en reĝecon: tio plenumiĝis.

Ni prenu la ekzemplon de la franka regno. Ĉi tie la venkaj salioj akiris ne nur la vastajn romiajn ŝtatbienojn, sed ankaŭ la multajn grandegajn terpecojn kiel plenan posedon, kiuj ne estis distribuitaj al grandaj kaj malgrandaj teritoriaj⁵ kaj markiaj komunumoj, nome ĉiujn grandajn arbarkompleksojn. La unua ago, kiun faris la franka reĝo, transformita el simpla plej supera armeĝvidanto en veran landan suveremon, estis transformi tiun popolproprieton en reĝan havaĵon, ŝteli ĝin al la popolo kaj disdonaci aŭ prunti ĝin al sia sekvantaro. Tiu sekvantaro, origine lia persona militsekvantaro,

4 En la originalo: „Ausartung”. -vl

5 En la originalo: „Gau- und Markgenossenschaften”. -vl

VIII La ŝtatigo de la ĝermanoj

taro kaj la ceteraj subgvidantoj de la armeo, baldaŭ fortiĝis ne nur per romanoj, t.e. romanigitaj gaŭloj, kiuj fariĝis baldaŭ por li nemalhaveblaj per sia skribarto, sia klereco, sia kono de la romia landlingvo kaj latina skriblingo kaj de la landa juro, sed lia sekvantaro pliiĝis ankaŭ per sklavoj, servutuloj kaj liberigitaj kiuj konsistigis lian kortegaron kaj el kiuj li elektis siajn favoratojn. Al ĉiuj ĉi oni unue plej ofte donacis pecojn de la popollando, poste en formo de beneficoj pruntataj unue plej ofte je vivtempo de la reĝo kaj tiel kreis la bazon de nova nobelaro surkoste de la popolo.

Sed tio ne estas ĉio. La vasta etendiĝo de la regno ne estis regebla per la rimedoj de la malnova genta konstitucio; la konsilistaro de la prezidantoj, se ĝi ne delonge estus malaperinta, ne povintus kunveni kaj estis baldaŭ anstataŭigita de la konstanta ĉirkaŭaĵo de la reĝo; la malnova popolkunveno restis por la ŝajno ekzistanta, sed ankaŭ ĝi estis pli kaj pli kunveno nur de la subgvidantoj de la armeo kaj de la nove suprenirantaj granduloj. La liberaj grundposedaj terkulturistoj, la amaso de la franka popolo, estis per la eternaj internaj kaj konkeraj militoj, la lastaj precipe sub Karlo la Granda, tute same elĉerpitaj kaj senhavigitaj kiel antaŭe la romaj terkulturistoj en la lastaj tempoj de la respubliko. Ili, kiuj origine konsistigis la tutan armeon kaj post la konkero de [la posta] Francio fariĝis ties kerno, estis komence de la naŭa jarcento tiom malriĉiĝintaj, ke apenaŭ ankoraŭ ĉiu kvina viro povis aliĝi al la militiro. La armeo, kunvokita rekte de la reĝo, de liberaj kampkulturistoj⁶ estis anstataŭigita de armeo konsistanta el servantoj de la nove akceptitaj granduloj, inter ili ankaŭ servutaj terkulturistoj, la posteuloj de tiuj kiuj antaŭe ne konis alian sinjoron ol la reĝon, kaj ankoraŭ pli frue nenian sinjoron, eĉ ne reĝon. Sub la posteuloj de Karlo la ruiniĝo de la frankaj terkulturistoj kompletiĝis per internaj militoj, malforteco de la reĝa po-

6 En la originalo: „An die Stelle des direkt vom König aufgebottenen Heerbannes freier Bauern“. -vl

VIII La ŝtatigo de la ĝermanoj

tenco kaj laŭ tio okazantaj entrudiĝoj de la granduloj, al kiuj aldoniĝis nun ankaŭ la provincgrafoj nomumitaj de Karlo kaj kiuj strebis al heredo de la ofico, fine per la invadoj de la normanoj. Kvindek jarojn post la morto de Karlo la Granda la franka regno kuŝis same senrezista antaŭ la piedoj de la normanoj, kiel kvarcent jarojn antaŭe la roma imperio je la piedoj de la frankoj.

Kaj ne nur la ekstera senpoveco, sed ankaŭ la interna soci-ordo aŭ pli ĝuste -malordo estis preskaŭ la sama. La liberaj frankaj terkulturistoj estis metitaj en similan situacion kiel iliaj antaŭuloj, la romaj farmistoj. Ruinigitaj de militoj kaj prirabadoj, ili devis serĉi la protekton de la nove akceptitaj granduloj aŭ de la eklezio, ĉar la reĝa povo estis tro malforta por protekti ilin; sed tiun protekton ili devis multekoste aĉeti. Kiel antaŭe la gaŭlaj terkulturistoj, ili devis transdoni la proprieton je sia grundo al la protekta sinjoro kaj rericervis ĝin kiel farmbienon sub diversaj kaj ŝanĝiĝantaj formoj, sed ĉiam nur kontraŭ liverado de servoj kaj de produktoj; kiam ili troviĝis en tiu formo de dependeco, ili perdis iom post iom ankaŭ la personan liberecon; post malmultaj generacioj ili estis plej ofte jam servutuloj. Kiom rapide la pereco de la libera terkulturistaro okazis, tion montras la parcelregistro de *Irminon*⁷, de la abatejo *Saint-Germain-des-Prés*, tiam ĉe, hodiaŭ en Parizo. Sur la vasta, en la ĉirkaŭaĵo dissemita grundposedaĵo de tiu abatejo troviĝis tiam, ankoraŭ dum la vivtempo de Karlo la Granda, 2.788 mastrumejoj, preskaŭ senescepte frankoj kun ĝermanaj nomoj. Inter ili 2.080 liberaj farmistoj⁸, 35 servutuloj⁹,

7 *Irminon*, abato de *Saint-Germain-des-Prés*, ĉirkaŭ 800, starigis inventaron de la havaĵoj de la abatejo. Engelso citas la donitaĵojn laŭ Paul Roth: *Geschichte des Benefizialwesens von den ältesten Zeiten bis ins neunte Jahrhundert*, Erlangen, 1850, p. 378. [fr. eld.]

8 Originale: „Kolonen“. Ili estis tamen herede katenitaj al sia bieno, lat. *colonus*. -vl

9 Originale: „Liten“: servutuloj, duonliberuloj, kiuj estis katenitaj

VIII La ŝtatigo de la ĝermanoj

220 sklavoj kaj nur 8 liberaj subuloj! La praktiko – de Salvi-
anus deklarita sendia – ke la protektsinjoro transskribigis
la terpecon de la kampkulturisto al sia proprieto kaj redonis
ĝin nur por uzado dum vivtempo, estis nun de la eklezio
ĝenerale praktikata. La servutaj servoj, kiuj fariĝis nun pli
kaj pli la kutimo, havis en la romaj *angaria*, devigaj servoj
por la ŝtato, same sian modelon kiel en la servoj de la ger-
manaj markianoj por pont- kaj voj-konstruaĵoj kaj aliaj kom-
unaj celoj. Laŭ la ŝajno, la granda plimulto de la loĝantaro
post kvarcent jaroj estis do tute reveninta al la komenco.

Sed tio pruvis nur du aferojn: Unue, ke la socia grupiĝo
kaj la dispartiĝo de la proprieto en la sinkanta roma impe-
rio komplete kongruis kun la tiama ŝtupo de produktado en
kampkulturo kaj industrio, ke ĝi estis do neevitebla; kaj
due, ke tiu produktadŝtupo dum la sekvantaj kvarcent jaroj
ne esence malaltiĝis nek esence altiĝis, do kun la sama
neceso reproduktis la saman dispartiĝon de la proprieto kaj
la samajn klasojn de la loĝantaro. La urbo perdis en la last-
aj jarcentoj de la roma imperio sian antaŭan dominadon
super la kamparo kaj en la unuaj jarcentoj de la ĝermana
dominado ne reakiris ĝin. Tio premisas malaltan evoluŝtup-
on de la kampkulturo kaj de la industrio. Tiu tuta situacio
produktas nepre grandajn regantajn grundposedantojn kaj
dependajn etkampulojn. Ke tute ne eblis surgrefti al tia
socio unuflanke la roman ekonomion de bienegoj kun sklav-
oj, aliflanke la novan grandan kulturadon kun servutlaboro,
tion pruvas la gigantaj eksperimentoj de Karlo la Granda
kun la famaj imperiestraj villoj, kiuj malaperis preskaŭ sen-
spure. Ili estis daŭrigitaj nur de abatejoj kaj estis fruktodon-
aj nur por tiuj; sed la abatejoj estis malnormaj sociaj organ-
izaĵoj, bazitaj sur senedzeco; ili povis fari ion eksterordinar-
an, sed devis ĝuste pro tio resti esceptoj.

Kaj tamen oni estis progresinta dum tiuj kvarcent jaroj.

al sia bieno kaj devis pagi kaj servi al sia nobelo (mezlatine el
ĝermana radiko: *litus*). -vl

VIII La ŝtatigo de la ĝermanoj

Kvankam ni retrovas ĉe la fino preskaŭ la samajn ĉefklasojn kiel komence, la homoj, kiuj konsistigis tiujn klasojn, tamen fariĝis aliaj. La antikva sklavismo estis malaperinta, ankaŭ la demoralizitaj malriĉaj liberuloj, kiuj malestimis laboron kiel sklavan. Inter la romaj farmistoj kaj la novaj servutuloj staris la franka terkulturisto. La „senutila memoro kaj vana disputo“ de la pereanta romeco estis morta kaj forgesita. La sociaj klasoj de la naŭa jarcento estiĝis ne en la marĉo de pereanta civilizacio, sed en la naskiĝkonvulsioj de nova. La nova generacio, sinjoroj kiel servistoj, estis generacio de viroj, kompare kun siaj romaj antaŭuloj. La rilato inter potencaj grandsinjoroj kaj servantaj terkulturistoj, kiu por la romanoj estis la senelira pereoformo de la antikva mondo, estis por la nova generacio la elirpunkto de nova evoluo. Kaj jen, kiom ajn neproduktivaj tiuj kvarcent jaroj aperas, ili postlasis grandan produkton: la modernajn naciecojn, la novformadon kaj ordigon de la okcidenteŭropa homaro por la venonta historio. La ĝermanoj efektive nove vigligis Eŭropon, kaj pro tio la dissolviĝo de la ŝtatoj de la ĝermana periodo ne finiĝis per subjugiĝo al normanoj aŭ saracenoj, sed per pluevoluado de la protektiĝo¹⁰ al feŭdismo¹¹ kaj per tiom grandega pliiĝo de la popolo ke apenaŭ ducent jarojn poste la fortaj perdoj dum la krucmilitoj estis senprobleme eltenataj.

Sed kio estis la mistera sorĉilo per kiu la ĝermanoj enspiris novan vivforton al la mortanta Eŭropo? Ĉu estis ia mirpotenco ennaskita en la ĝermana popolo, kiel nia ŝovinisma historiografio fantazias al ni? Tute ne. La ĝermanoj estis, speciale tiam, alttalenta arja tribo kaj en plena vivanta evoluo. Sed ne estis iliaj specife naciaj ecoj kiuj junigis Eŭropon, sed simple – ilia barbareco, ilia genta konstitucio.

Ilia persona kapableco kaj braveco, ilia liberemo kaj demokratia instinkto, kiu vidis en ĉiaj publikaj aferoj siajn

10 Originale: „Kommendation“. -vl

11 En la eldono de 1884 la paragrafo finiĝas ĉi tie.

VIII La ŝtatigo de la ĝermanoj

proprajn aferojn, mallonge, ĉiuj ecoj kiujn la romanoj perdis kaj kiuj sole kapablis formi el la ŝlimo de la roma mondo novajn ŝtatojn kaj kreskiĝi novajn naciecojn – kio alia ili estis ol la karakterizaj trajtoj de la barbaro de la supra ŝtupo, fruktoj de lia genta konstitucio?

Se ili transformis la antikvan formon de monogamio, mildigis la viran dominadon en la familio, donis al la virino pli altan pozicion ol kian la klasika mondo iam ajn konis, kio kapabligis ilin al tio, se ne ilia barbareco, iliaj gentaj kutimoj, iliaj ankoraŭ vivaj heredaĵoj el la tempo de patrinrajto?

Se ili almenaŭ en tri de la plej gravaj landoj, Germanio, norda Francio kaj Anglio, transsavis pecon de vera gentkonstitucio en la formo de markiaj komunumoj en la feŭdan ŝtaton kaj per tio donis al la subpremata klaso, la terkulturistoj, eĉ sub la plej rigora mezepoka servuto, lokan kuntentigon kaj rimedon de rezistado, kian trovis preta nek la antikvaj sklavoj nek la modernaj proletoj – al kio tio ŝuldiĝis, se ne al ilia barbareco, al ilia ekskluzive barbara setladmaniero laŭ gentoj?

Kaj fine, se ili povis elformi la jam en la hejmlando praktikatan pli mildan formon de servuteco, en kiun ankaŭ la sklaveco en la roma imperio pli kaj pli transiris, kaj igi ĝin ekskluziva; formo kiu, kiel unue Fourier montris, donis al la subjugitoj la rimedojn por iom-post-ioma liberigo *kiel klaso* (fournit aux cultivateurs des moyens d'affranchissement *collectif et progressif*) donas al la kampkulturistoj rimedojn por ilia *kolektiva kaj progresanta* liberigo); formo kiu per tio situigas alte super la sklaveco, ĉe kiu eblas nur la tuja unuopa liberigo sen transira stato (nuligon de la sklavismon per venka revolucio la antikveco ne konas) – dum efektive la servutuloj de la mezepoko iom post iom trudis sian liberigon kiel klaso –, al kiu ni dankas tion, se ne al ilia barbareco, per kiu ili ne atingis elformitan sklavismon, nek la antikvan laborsklavismon nek la orientalan domsklavismon?

VIII La ŝtatigo de la ĝermanoj

Ĉio vivforta kaj viviga, kion la ĝermanoj enplantis en la roman mondon, estis barbareco. Efektive nur barbaroj kapablas junigi mondon baraktantan en finiĝanta civilizaĉio. Kaj la plej supera ŝtupo de barbareco, al kiu kaj en kiu la ĝermanoj antaŭ la popolmigrado estis ascendintaj, estis ĝuste la plej favora por tiu procezo. Tio klarigas ĉion.

IX Barbareco kaj civilizacio

Ni sekvis ĝis nun la dissolviĝon de la genta konstitucio ĉe la grandaj unuopaj ekzemploj de la grekoj, romanoj kaj ĝermanoj. Ni esploru fine la ĝeneralajn ekonomiajn kondiĉojn, kiuj jam en la supra ŝtupo de barbereco subfosis la gentan organizon de la socio kaj kun la eniro en la civilizacion komplete forigis ĝin. Ĉi tie la Marksa „Kapitalo” estos al ni same necesa kiel la libro de Morgano.

La gento, elkreskinta sur la meza ŝtupo, plu evoluanta sur la supra ŝtupo de sovaĝeco, atingis sian florepokon, tiom kiom niaj fontoj permesas prijuĝi tion, sur la malsupra ŝtupo de barbereco. Ni komencu do per tiu evoluŝtupo.

Ni trovas ĉi tie, kie la amerikaj ruĝhaŭtuloj devas servi al ni kiel ekzemplo, la gentan konstitucion komplete elformita. Tribo ordiĝis en pluraj, plej ofte du¹ gentoj; tiuj originaj gentoj disfalas kun kreskanta popolnombro ĉiu en plurajn filiajn gentojn, al kiuj la patrina gento aperas kiel gentaro; la tribo mem dividas sin en plurajn tribojn, en kiuj ni grandparte retrovas, en ĉiu, la malnovajn gentojn; ligo, almenaŭ en kelkaj kazoj, unuigas la parencajn tribojn. Tiu simpla organizo komplete sufiĉas por la sociaj kondiĉoj el kiuj ĝi estiĝis. Ĝi estas nenio pli ol ties propra, natureca² grupiĝo, ĝi kapablas kompensi ĉiujn konfliktojn kiuj povas estiĝi en tiel organizita socio. Ekstere, la milito kompensas; ĝi povas finiĝi kun la neniigo de la tribo, sed neniam per subjuĝiĝo. Estas la grandiozeco, sed ankaŭ la limigiteco de la genta konstitucio, ke ĝi ne havas spacon por dominado kaj sujuĝiĝo. Interne ankoraŭ ne ekzistas diferenco inter rajtoj kaj devoj; la demando, ĉu partopreno en publikaj aferoj, sangvenĝo aŭ ties repacigo, estas rajto aŭ devo, ne ekzistas por la indiano; ĝi estus por li same absurda kiel la demando, ĉu manĝi, dormi, ĉasi estas rajto aŭ devo. Same ankaŭ divido de la tribo kaj de la gento en diversajn klasojn ne povas okazi. Kaj tio kondukas nin al esplorado de la ekonomia

1 En la eldono de 1884 mankas: „plej ofte du”.

2 En la franca traduko: „sponta”. -vl

IX Barbareco kaj civilizacio

bazo de tiu stato.

La loĝantaro estas ekstreme maldensa: densiĝinta nur ĉe la loĝloko de la tribo, ĉirkaŭ kiu en granda cirklo troviĝas unue la ĉasteritorio, poste la neŭtrala protektarbaro, kiu disigas ĝin disde aliaj triboj. La labordivido estas pure natureca; ĝi konsistas nur inter la du seksoj. La viro militas, ĉasas kaj fiŝkaptas, akiras la krudmaterialon de nutraĵo kaj la ilojn necesajn por tio. La virino prizorgas la domon kaj la preparadon de la nutraĵo kaj la vestaĵon, kuiras, teksas, kudras. Ĉiu el la du estas mastro sur sia kampo: la viro en la arbaro, la virino en la domo. Ĉiu estas proprieto de la iloj preparitaj kaj uzataj de li: la viro de la armiloj, de la ĉas- kaj fiŝkapt-iloj, la virino de la meblaro. La dommastrumado estas komunisma por pluraj, ofte multaj familioj.³ Tio, kio estas komune farata kaj uzata, estas komuna proprieto: la domo, la ĝardeno, la trunkboato⁴. Ĉi tie do, kaj jam nur ĉi tie, validas la „memellaborita proprieto”, kiun juristoj kaj ekonomikistoj imputas al la civilizita socio, la lasta mensoga jura preteksto, sur kiu la hodiaŭa kapitalisma proprieto ankoraŭ apogiĝas.

Sed la homoj ne restis ĉie sur tiu ŝtupo. En Azio ili trovis bestojn kiujn eblis malsovaĝigi kaj, malsovaĝigite, plu bredi. La sovaĝa bubalino devis esti ĉasata, la malsovaĝigita liveris ĉiujare bubalidon kaj krome lakton. Nombro da plej progresintaj triboj – arjoj, ŝemidoj, eble ankaŭ jam turanoj⁵

3 Speciale ĉe la nordokcidenta marbordo de Ameriko, vd Bancroft. Ĉe la Hajdahoj [orig. *Haidahs* -vl] sur la Reĝino-Sarlot-Insulo troviĝas mastrumejoj de ĝis 700 personoj sub unu tegmento. Ĉe la nootkoj [orig. *Nootkas* -vl] tutaj triboj vivis sub unu tegmento.

4 Ankaŭ nomata *pirogo*; temas pri boato konsistanta ĉefe el kavigita arbotrunko. -vl

5 Turanoj: loĝantoj de la Turano (la ebenaĵo inter Kaspia Maro, Arallago, la nordirana limmontaro *Kopet-Dag* kaj la okcidentaj branĉoj de la montaroj Altajo kaj Tienŝano. -vl

IX Barbareco kaj civilizacio

- faris unue la malsovaĝigon, poste jam nur la bredadon kaj flegadon de brutaro sia ĉefa laborbranĉo. Paŝtistaj triboj apartiĝis el la cetera amaso de la barbaroj: *unua granda socia labordivido*. La paŝtistaj triboj produktis ne nur pliajn, sed ankaŭ aliajn nutraĵojn ol la ceteraj barbaroj. Ili havis ne nur la avantaĝon de lakto, laktoproduktoj kaj viando en pli grandaj kvantoj, sed ankaŭ haŭtojn, lanon, kaproharojn kaj kun la kvanto de krudmaterialo pliiĝantajn ŝpinaĵojn kaj teksaĵojn. Per tio, por la unua fojo, ebligis regula interŝanĝo. Sur antaŭaj ŝtupoj nur okazaj interŝanĝoj povas okazi; aparta lerteco ĉe preparado de armiloj kaj laboriloj povas konduki al provizora labordivido. Tiel oni trovis multloke sendubajn restaĵojn de laborejoj por ŝtonaj iloj el la malfrua ŝtonepoko; la artistoj kiuj tie elformis sian lertecon, laboris verŝajne, kiel ankoraŭ la konstantaj metiistoj de hindaj gentaj komunumoj, por la komunumo. Sur tiu ŝtupo, alia interŝanĝo ol tiu ene de la tribo povis neniel estiĝi, kaj eĉ tiu restis escepta okazo. Ĉi tie, male, post apartiĝo de la paŝtistaj triboj, ni trovas ĉiajn kondiĉojn pretaj por interŝanĝo inter la membroj de diversaj triboj, por ĝia elformiĝo kaj firmiĝo kiel regula institucio. Origine tribo interŝanĝis kun tribo, pere de la reciprokaj gentprezidantoj; sed kiam la gregoj komencis transiri en apartan proprion⁶, la unuopa interŝanĝo pli kaj pli oftis kaj fariĝis fine ĝia ekskluziva formo. Sed la ĉefa artiklo, kiun la paŝtistaj triboj cedis al siaj najbaroj, estis bruto; bruto fariĝis varo, en kiu ĉiuj aliaj varoj estis taksataj kaj kiuj estis ĉie volonte prenata interŝanĝe kontraŭ tiuj – mallonge, bruto ricevis funkcion de mono kaj liveris monservojn jam sur tiu ŝtupo. Kun tia neceso kaj rapideco jam ekde la komenco de la varinterŝanĝo evoluis la bezono je monvaro.

La ĝardenkulturo, verŝajne fremda al la aziaj barbaroj de la malsupra ŝtupo, aperis plej malfrue sur la meza ŝtupo ĉe ili, kiel antaŭformo de la kampkulturado. La klimato de la

6 En la eldono de 1884: „privatproprion”.

IX Barbareco kaj civilizacio

turana altebenaĵo ne allasas paŝtistan vivon sen furaĝrezervoj por la longa kaj severa vintro; herbejkulturo kaj grenkulturado estis do antaŭkondiĉo. La samo validas por la stepoj norde de la Nigra Maro. Sed se oni jam produktis grenon por la brutaro, tiam ĝi baldaŭ fariĝis ankaŭ homa nutraĵo. La kulturata grundo restis ankoraŭ triaĵo, komence de la gento, poste por uzado transigita de tiu al la domanaroj, fine⁷ al la unuopuloj. Ili povis havi certajn posedrajtojn je tiu, sed ne pli.

El la industriaj atingoj de tiu ŝtupo du estas aparte gravaj. La unua estas la teksado, la dua la fandado de metaleroj kaj la prilaborado de la metaloj. Kupro kaj stano kaj la el ambaŭ kunmetita bronzo estis la ege plej gravaj; la bronzo liveris uzeblajn laborilojn kaj armilojn, sed ne povis forŝovi la ŝtonilojn; tio eblis nur per la fero, kaj oni ankoraŭ ne sciis akiri feron. Oro kaj arĝento komencis esti uzataj kiel juveloj kaj ornamaĵoj, kaj estis certe jam altvaloraj kompare kun kupro kaj bronzo.

La kresko de la produktado en ĉiuj branĉoj – brutbredado, kampkulturo, doma metio – donis al la homa laborforto la kapablon produkti pli grandan produktaĵon ol necesis por ĝia vivtenado. Ĝi samtempe pliiĝis la laborkvanton por ĉiu membro de la gento, de la doma komunumo aŭ de la unuopa familio. La enpreno de novaj laborfortoj fariĝis dezirinda. La milito liveris ilin: La militkaptitoj estis transformataj al sklavoj. La unua granda socia labordivido sekvigis per sia pliigo de produktiveco de la laboro, do de la riĉaĵo, kaj per sia plilarĝigo de la produktadkampo, sub la donitaj historiaj ĉiomkondiĉoj, necese la sklavismon. El la unua granda socia labordivido estiĝis la unua granda divido de la socio en du klasojn: mastroj kaj sklavoj, ekspluatantoj kaj ekspluatatoj.

Kiel kaj kiam la gregoj transiris el la komuna proprieto

7 En la eldono de 1884 mankas: „al la domanaroj, fine”.

IX Barbareco kaj civilizacio

de la tribo aŭ de la gento en la proprieton de la individuaj familiĉefoj, pri tio ni scias ĝis nun nenion. Sed ĝi certe okazis esence sur tiu ŝtupo. Kun la gregoj kaj kun la ceteraj novaj riĉaĵoj survenis revolucio al la familio. La akirado de vivrimedoj estis ĉiam afero de la viro, estis la viro kiu produktis la akirrimedojn, kiuj estis lia propio. La gregoj estis la novaj vivrimedoj, ilia komenca malsovaĝigo kaj posta prizorgado lia faro. La bruto apartenis do al li, al li la varoj kaj sklavoj interŝanĝitaj per bruto. La tuta kromaĵo, kiun la akirado nun liveris, apartenis al la viro; la virino kunĝuis tion, sed ŝi ne havis parton de la propio. La „sovaĝa” militisto kaj ĉasisto estis antaŭe kontenta hejme per sia dua rango, post la virino; la „pli milda” paŝtisto, insistante pri sia riĉaĵo, ŝovis sin antaŭen en la unuan rangon kaj lasis la virinon en la dua. Kaj ŝi ne povis plendi. La labordivido en la familio estis reguliginta la disdividon de la propio inter viro kaj virino; ĝi restis la sama; kaj tamen ĝi renversis la ĝistiamajn domajn rilatojn, nur ĉar la labordivido ekster la familio fariĝis alia. La sama kaŭzo, kiu certigis al la virino ŝian antaŭan regadon en la domo – ŝia limiĝo al domlaboro -- la sama kaŭzo certigis nun la regadon de la viro en la domo: la domlaboro de la virino malgraviĝis nun apud la akiro de la vivrimedoj de la viro; ties akirado estis ĉio, ŝia domlaboro nun nur sensignifa aldonaĵo. Jam ĉi tie montriĝas, ke la liberigo de la virino, ŝia samrangigo kun la viro, estas kaj restos malebla tiom longe, kiom la virino estas ekskludita de la socia produktiva laboro kaj limigita al doma privatlaboro. La liberigo de la virino ebligis ne pli frue ol kiam ŝi povas partopreni en granda, socia skalo en la produktado kaj kiam ŝi estas nur en sensignifa mezuro okupata de domlaboro. Kaj tio fariĝis ebla nur per la moderna granda industrio, kiu ne nur allasas grandskalan laboron de virinoj, sed vere postulas ĝin, kaj kiu ankaŭ pli kaj pli strebas transformi la privatan domlaboron en publikan industrion.

IX Barbareco kaj civilizacio

Kun la fakta regado de la viro en la domo falis la lasta baro de lia solregado. Tiu solregado estis konfirmita kaj eternigita per la renverso de la patrinrajto, enkonduko de la patrorajto, la iom-post-ioma transiro al la para geedzeco en la monogamion. Sed per tio aperis fendo en la malnova genta ordo; La unuopa familio fariĝis potenco kaj leviĝis minace kontraŭ la gento.

La sekva paŝo kondukas nin al la supra ŝtupo de barbar-eco, en la periodon, en kiu ĉiuj kulturpopoloj travivas sian heroan epokon: la epoko de la ferglavo, sed ankaŭ de la fera plugilboko kaj hakilo. La fero fariĝis serva al la homo, la lasta kaj plej grava de ĉiuj krudmaterialoj – escepte de la terpomo. La fero kreis la kampkulturon sur pli grandaj surfacoj, la kulturebligon de etenditaj arbarpartoj; ĝi donis al la metiisto ilaron de malmoleco kaj tranĉkapablo, al kiu neniam ŝtono, neniam alia konata metalo rezistis. Ĉio ĉi okazis iom post iom; la unua fero estis ofte ankoraŭ pli mola ol bronzo. Tiel la ŝtonarmilo malaperis nur malrapide; ne nur en la „Hildebrandpoemo”, ankaŭ ankoraŭ ĉe *Hastings* en la jaro 1066 oni uzis ŝtonajn hakilojn en la batalo⁸. Sed la progreso okazis nun nehaltigeble, malpli interrompite kaj pli rapide. La urbo, kiu ĉirkaŭis per ŝtonaj muregoj, turoj kaj kreneloj ŝtonajn aŭ brikajn domojn, fariĝis la centra sidejo de la tribo aŭ de la triba ligo; giganta progreso en la konstruado, sed ankaŭ signo de kreskintaj danĝero kaj protektbezono. La riĉaĵo kreskis rapide, sed kiel riĉaĵo de unuopuloj; la teksado, la metalprilaborado kaj la aliaj pli kaj pli apartiĝantaj metioj disvolvis kreskantan diversecon kaj artecon de la produktado; la kampkulturo liveris apud grenon, fruktojn de legumenacoj kaj fruktojn nun ankaŭ oleon kaj vinon, kies preparadon oni estis lerninta. Tiom

8 La batalo, en kiu la normanoj sub Vilhelmo (kiu pro tio ricevis la epiteton „la Konkeranto”) venkis super la saksoj; tiu venko sekvigis la regadon de la franclingvaj normanoj sur la insulo.
-vl

IX Barbareco kaj civilizacio

diversa agado jam ne fareblis de la sama unuopulo; la *dua granda labordivido* okazis: La metio apartiĝis de la kampkulturo. La konstanta pliigo de la produktado kaj kun ĝi de la laborproduktivo altigis la valoron de la homa laborforto; la sklavismo, sur la antaŭa ŝtupo ankoraŭ estiĝanta kaj sporada, fariĝas nun esenca parto de la socia sistemo; la sklavoj ĉesas esti simplaj helpuloj, ili estas nun dekoble⁹ pelataj al la laboro sur la kampo kaj en metia laborejo. Kun la divido de la produktado en la du grandajn ĉefbranĉojn, kampkulturo kaj metio, estiĝas la produktado rekte por interŝanĝo, la varproduktado; kun ĝi la komerco, ne nur interne kaj ĉe la tribaj limoj, sed ankaŭ jam transmare. Sed ĉio ĉi okazas ankoraŭ tre ne evoluinte; la noblaj metaloj komencas fariĝi precipa kaj ĝenerala monvaro, sed ankoraŭ ne stampita, interŝanĝata nur laŭ la ankoraŭ ne maskita pezo.

La diferenco inter riĉuloj kaj malriĉuloj¹⁰ aperas apud tiu de liberuloj kaj sklavoj – kun la nova labordivido nova divido de la socio en klasoj. La propriet-diferencoj inter la unuopaj familiĉefoj detruas ĉie la malnovan komunisman domanaron, kie ĝi ĝis tiam konserviĝis; kun ĝi la komunan prilaboradon de la grundo por la komunumo. La kampgrundo estas transdonita por uzado al la unuopaj familioj unue por tempo, poste unufoje por ĉiam, la transiro en plenan privatproprieton okazas iom post iom kaj paralele kun la transiro de la para geedzeco en monogamion. La unuopa familio komencas fariĝi la ekonomia unuo en la socio.

La pli densa loĝantaro devigas al pli densa kunteniĝo interne kiel ekstere. La ligo de parencaj triboj fariĝas ĉie neceso; baldaŭ ankaŭ jam ilia kunfandiĝo, per tio la kunfan-

9 En la originalo: „zu Dutzenden” – dekduoble, supozeble en la senco de „multoble” kun proksimuma nombro de dek aŭ dek du. -vl

10 En la originalo: „von Reichen und Ärmeren”, „de riĉuloj kaj pli malriĉaj homoj”. -vl

IX Barbareco kaj civilizacio

diĝo de la disaj tribaj teritorioj al ĉioma teritorio de la popolo. La armeĝvidantoj de la popolo – *rex, basileus, thiudans* – fariĝas nemalhavebla, konstanta oficisto. La popolkunveno aperas tie, kie ĝi ankoraŭ ne ekzistis. Armeĝvidanto, konsilistaro, popolkunveno fariĝas la organoj de la genta socio plu evoluinta al arma demokratio. Arma – ĉar la milito kaj la organiziĝo por milito fariĝis nun regulaj funkcioj de la popola vivo. La riĉaĵoj de la najbaro incitas la avidon de popoloj, ĉe kiuj la akiro de riĉaĵoj aperas jam kiel unu el la plej gravaj vivceloj. Ili estas barbaroj: rabado estas de ili konsiderata kiel pli facila kaj eĉ kiel pli honora ol perlabori. La milito, antaŭe nur farata kiel venĝo por atakoj aŭ por etendo de la teritorio fariĝinta nesufiĉa, fariĝas nun nur por rabo, fariĝas konstanta metia branĉo. La minacaj muregoj ne staras vane ĉirkaŭ la fortigitaj urboj: En iliaj fosaĵoj oscedas la tombo de la genta konstitucio; kaj iliaj turoj leviĝas jam en la civilizacion. Kaj same okazas interne. La rabmilitoj altigas la povon de la plej supra armeĝvidanto kaj tiun de la subĝvidantoj; la kutima elekto de la posteuloj en la samaj familioj transiras, precipe post enkonduko de la patrorajto, iom post iom en la unue toleratan, poste pretenkatan, fine uzurpatan heredon; la bazo de hereda reĝeco kaj de hereda nobeleco estas farita. Tiel la organoj de la genta konstitucio iom post iom deŝiriĝas de sia radiko en la popolo, gento, gentaro, tribo, kaj la tuta genta konstitucio transformiĝas en sian malon: El organizaĵo de triboj por libera ordigo de siaj aferoj ĝi fariĝas organizaĵo por prirabado kaj premado de la najbaroj, kaj laŭ tio ĝiaj organoj el instrumentoj de la popolvolo fariĝas memstaraj organoj de dominado kaj premado kontraŭ la propra popolo. Sed tio neniam estus ebla, se la avido je riĉaĵo ne dividintus la gentanojn en riĉulojn kaj malriĉulojn, se ne „la diferenco je proprieto ene de la sama gento transformintus la unuecon de la interesoj en antagonismon de la gentanoj” (Markso) kaj se la etendiĝo de la sklavismo jam ne komencintus konsideri la perlaboradon de la vivtenado kiel agadon indan

IX Barbareco kaj civilizacio

nur por sklavoj, kiel pli hontindan ol rabo.

Per tio ni atingis nun la sojlon de la civilizacio. Tiu malfermiĝas per nova progreso de la labordivido. Sur la plej malsupra ŝtupo la homoj produktis nur rekte por sia propra bezono; la iel okazantaj interŝanĝoj estis okazaĵaj, koncernis nur la hazarde aperantan abundon. Sur la meza ŝtupo de barbereco ni trovas ĉe la paŝtistaj popoloj en la brutaro jam posedon kiu, ĉe certa grandeco de la gregoj, liveras regule abundon super la propra bezono, samtempe labordividon inter paŝtistaj kaj la postrestintaj triboj sen gregoj, per tio du produktadŝtupojn kiuj ekzistas unu apud la alia kaj per tio la kondiĉojn de regula interŝanĝo. La supra ŝtupo de barbereco liveras al ni la pluan labordividon inter kampulturo kaj metio, per tio la produktadon de ĉiam kreskanta parto de la laborproduktoj rekte por interŝanĝo, per tio la rangaltiĝon de la interŝanĝo inter unuopaj produktantoj al vivneceso de la socio. La civilizacio firmigas kaj kreskigas ĉiujn ĉi jam ekzistantajn labordividojn, nome per akriĝo de la kontraŭeco de urbo kaj kamparo (ĉe kio la urbo povas ekonomie domini la kamparon, kiel en la antikveco, aŭ inverse la kamparo la urbon, kiel en la mezepoko), kaj aldonas trian labordividon, propran al ĝi: Ĝi kreas klason, kiu jam ne okupiĝas pri produktado de la produktoj – la *komercistojn*. Ĉiuj ĝistiamaj ĝermoj de klasiĝo koncernis ankoraŭ ekskluzive la produktadon; ili dividis la homojn partoprenantajn en la produktado en gvidajn kaj plenumajn aŭ en produktantojn de granda kaj de malgranda skalo. Ĉi tie, unuafoje, aperas klaso kiu, sen iel ajn partopreni en la produktado, konkeras la produktadon ĝenerale kaj submetas la produktantojn ekonomie; kiu fariĝas nepreterirebla peranto inter po du produktistoj kaj ekspluatas ilin ambaŭ. Sub la preteksto forpreni de la produktisto la penon kaj la riskon de interŝanĝo, etendi la vendon de la produktoj al malproksimaj merkatoj, fariĝi per tio la plej utila klaso de la

IX Barbareco kaj civilizacio

loĝantaro, elformiĝas klaso de parazitaj, veraj sociaj parazitaj, kiu deĉerpas la kremon de la hejma kiel de la fremda produktado kiel rekompenco por tre malgrandaj realaj faroj, rapide akiras gigantajn riĉaĵojn kaj laŭ tio socian influon kaj estas pro tio en la periodo de civilizacio alvokita al ĉiam novaj honoroj kaj ĉiam pli granda regado de la produktado, ĝis kiam ĝi fine aperigas ankaŭ mem sian propran produkton – la periodajn komercajn krizojn.

Sur la nun pritraktata evoluŝtupo la juna komercistaro tamen ankoraŭ eĉ ne antaŭsupozas la grandajn aferojn kiuj atendas ĝin. Sed ĝi estiĝas kaj igas sin nemalhavebla, kaj tio sufiĉas. Sed kun ĝi elformiĝas la *metalmono*, la stampita monero, kun la metalmono nova rimedo de dominado de la neproduktanto super la produktanto kaj ties produktaĵo. La varo de la varoj, kiu entenas en si kaŝite ĉiujn aliajn varojn, estis malkovrita, la sorĉilo kiu povas transformiĝi laŭplaĉe en ĉian dezirindan kaj deziratan aĵon. Kiu havis ĝin, tiu regis la mondon de produktado, kaj kiu havis ĝin antaŭ ĉiuj? La komercisto. En lia mano la kulto de la mono estis certa. Li zorgis pri tio ke montriĝu kiom ĉiuj varoj, per tio ĉiuj varproduktistoj, devis adori ĵeti sin en la polvon antaŭ la mono. Li pruvis praktike, kiom ĉiuj aliaj formoj de riĉaĵo fariĝas mem nura ŝajno fronte al tiu enkorpiĝo de riĉaĵo mem. Neniam plu la potenco de la mono aperis en tiom origina krudeco kaj perforto kiom en tiu ĝia juneca periodo. Post la varaĉeto per mono venis la mona antaŭpago, kun tiu la interezo kaj la uzuro. Kaj nenia leĝaro de posta tempo ĵetas la ŝuldanton tiom senkompate kaj sensave antaŭ la piedojn de la uzura kreditoro kiel la malnovatena kaj malnovroma – kaj ambaŭ estiĝis sponte, kiel kutimrajtoj, sen alia devigo ol la ekonomia.

Al la riĉaĵo je varoj kaj sklavo, apud la monriĉaĵo aldoniĝis nun ankaŭ la riĉaĵo je grundproprietato. La posedrajto de la unuopuloj je la grundparceloj translasitaj al ili de la gento aŭ de la tribo nun tiom firmiĝis ke tiuj parceloj apartenis

IX Barbareco kaj civilizacio

al ili heredpropriete. La ĉefa strebado de la unuopuloj en la lasta tempo estis al liberiĝo el la rajto de la gentanaro je la parcelo, kiu fariĝis por ili katenon. Ili ja perdis la katenon – sed baldaŭ poste ankaŭ la grundproprieton. Plena, libera proprieto je grundo, tio signifis ne nur eblecon tute kaj senlime posedi la grundon, tio signifis ankaŭ la eblecon aliproprigi ĝin. Tiom longe, kiom la grundo estis proprieto de la gento, tiu ebleco ne ekzistis. Sed kiam la nova grundposedanto definitive demetis la katenon de la plej supera proprieto de la gento kaj de la tribo, li ankaŭ disŝiris la ligan kiu ĝis nun ligis lin nedisigeble kun la grundo. Kion tio signifas, estis al li klarigata per la mono inventita samtempe kun la privatproprieto. La grundo povis nun fariĝi varo, kiun oni vendas kaj hipotekas. La grundproprieto estis apenaŭ enkondukita, kiam ankaŭ la hipoteko jam inventiĝis (vidu Atenon). Kiel la hetajrismo kaj la prostituado kroĉiĝas al la kalkanoj de la monogamio, tiel ekde nun la hipoteko al la kalkanoj de la grundproprieto. Vi volis la plenan, liberan, forcedeblan grundproprieton, nu bone, vi havas ĝin – tu l'as voulu, George Dandin! [Vi volis ĝin tia, George Dandin!]¹¹

Tiel, kun la etendo de la komerco, kun mono kaj monuzuro, grundproprieto kaj hipoteko rapide progresis la koncentriĝo kaj centriĝo de la riĉaĵo en la manoj de malmultnombra klaso, apud tio la kreskanta malriĉiĝo de la amasoj kaj la kreskanta amaso de la malriĉuloj. La nova riĉec-aristokratio, se ĝi jam ne dekomence identis kun la malnova triba nobelaro, ŝovis tiun definitive en la fonon (en Ateno, en Romo, ĉe la ĝermanoj). Kaj apud tiu divido de la liberuloj en klasojn laŭ riĉeco okazis speciale en Grekio giganta pliiĝo de la nombro de sklavoj¹², kies deviga laboro fariĝis la bazo sur kiu la superstrukturo de la tuta socio leviĝis.

11 Molière: Georges Dandin, Akto V, sceno 9. [fr. eld.]

12 Pri la nombro en Ateno vd supre p. [117]. En Korinto ĝi estis dum la florepoko de la urbo 460.000, en Eginio 470.000, en ambaŭ kazoj la dekoblo de la loĝantaro de liberaj civitanoj.

IX Barbareco kaj civilizacio

Ni rigardu nun, kio sub tiu socia ŝanĝego fariĝis la genta konstitucio. Fronte al la novaj elementoj, kiuj estis kreskintaj sen ĝia helpo, ĝi staris senhelpe. Ĝia antaŭkondiĉo estis, ke la membroj de gento, aŭ de tribo, estis kunigitaj sur la sama teritorio, priloĝis ĝin ekskluzive. Tio ĉesis jam delonge. Ĉie gentoj kaj triboj estis intermiksitaj, ĉie loĝis sklavoj, protektparencoj, fremduloj meze inter la civitanoj. La loksida vivo, atingita nur ĉe la fino de la meza ŝtupo de barbareco, estis ĉiam denove rompita per la moviĝemo kaj ŝanĝo de loĝloko necesaj por komerco, ŝanĝo de vivtena agado kaj ŝanĝo de grundproprietulo. La membroj de la gentaj organizaĵoj jam ne povis kunveni por okupiĝi pri siaj propraj komunaj aferoj; nur malgravaj aferoj, kiel religiaj festoj, estis ankoraŭ iel-tiel prizorgataj. Apud la bezonoj kaj interesoj, por kies prizorgado la gentaj organizaĵoj estis kompetentaj kaj kapablaj, estiĝis el la fundamenta ŝanĝiĝo de la kondiĉoj de vivtena agado kaj el la sekvanta ŝanĝiĝo de la socia divido novaj bezonoj kaj interesoj, kiuj ne nur estis fremdaj al la malnova genta ordo, sed kiuj ĉiel ruinigis ĝin. La interesoj de la metiistaj grupoj estiĝintaj el la labordivido, la apartaj bezonoj de la urbo kontraste al la kamparo, necesigis novajn organojn; sed ĉiu el tiuj grupoj konsistis el homoj de la diversaj gentoj, gentaroj kaj triboj, kaj inkludis eĉ fremdulojn; tiuj organoj devis do esti ekster la genta konstitucio, apud ĝi, kaj per tio kontraŭ ĝi. – Kaj tiu konflikto montriĝis siavice en ĉiu genta organizaĵo, kaj atingis sian kulminon en la kuneco de riĉuloj kaj malriĉuloj, uzuristoj kaj ŝuldantoj en la sama gento kaj la sama tribo. – Aldoniĝis la amaso de la nova loĝantaro fremda al la gentaj komunumoj, kiu povis, kiel en Romo, fariĝi potenco en la lando kaj krome estis tro multnombra por esti iom post iom akceptata en la sangparencaj gentoj kaj triboj. Fronte al tiu amaso la gentaj organizaĵoj staris kiel fermitaj, privilegiitaj organizaĵoj; la origina natureca demokratio estis transformita al malica aristokratio. – La genta konstitucio estis ja elkreskinta el socio kiu ne konis internajn kontraŭecojn, kaj estis

IX Barbareco kaj civilizacio

ankaŭ adaptita al tia. Ĝi ne havis devig-rimedojn krom la publikan opinionon. Sed ĉi tie socio estiĝis kiu pro ĉiuj siaj ekonomiaj vivkondiĉoj devis dividiĝi en liberulojn kaj sklavojn, en ekspluatantaj riĉuloj kaj ekspluatataj malriĉuloj, socio, kiu ne nur ne povis repacigi tiujn kontraŭdirojn, sed devis ĉiam pli akriĝi ilin. Tia socio povis ekzisti nur aŭ en konstanta malkaŝa batalo de tiuj klasoj unu kontraŭ la alia aŭ sub regado de tria potenco, kiu, ŝajne staranta super la kontraŭantaj klasoj, subpremis ilian malkaŝan konflikton kaj lasis la klasbatalon elbataliĝi, se entute, sur ekonomia kampo, en tiel nomata leĝa formo. La genta konstitucio ĉesis vivi. Ĝi estis detruita de la labordivido, kaj de ties rezulto, la divido de la socio en klasojn. Ĝi estis anstataŭigita per la ŝtato.

Supre ni jam detale rigardis la tri ĉefajn formojn, en kiuj la ŝtato leviĝas el la ruinoj de la genta konstitucio. Ateno montras la plej puran, plej klasikan formon: Tie la ŝtato fontas rekte kaj precipe el la klasaj kontraŭdiroj, kiuj disvolviĝas ene de la genta socio. En Romo la genta socio fariĝas fermita aristokratio meze de multnombra plebo, kiu staras ekster ĝi, estas senrajta, sed havas devojn; la venko de la plebo detruas la malnovan gentan konstitucion kaj starigas sur ties ruinoj la ŝtaton, en kiun genta aristokratio kaj plebo baldaŭ komplete dissolviĝas. Ĉe la ĝermanaj venkintoj de la roma imperio fine la ŝtato fontas rekte el la konkero de fremdaj teritorioj, por kies regado la genta konstitucio ne havas rimedojn. Sed ĉar kun tiu konkero ligiĝas nek serioza batalo kun la malnova loĝantaro nek progresinta labordivido; ĉar la ekonomia evoluŝtupo de la konkeritoj kaj tiu de la konkerintoj estas preskaŭ sama, la ekonomia bazo de la socio restas do la sama, pro tio la genta konstitucio povas plu ekzisti tra multaj jarcentoj en ŝanĝita, teritoria formo kial markia konstitucio kaj eĉ en la postaj nobelaj kaj patri-

IX Barbareco kaj civilizacio

ciaj gentoj, kaj eĉ en terkulturistaj gentoj, kiel en Ditmarŝo¹³, juniĝi dum kelka tempo en mildigita formo.¹⁴

La ŝtato estas do neniel de ekstere trudita potenco; ĝi ankaŭ ne estas „*la realeco de la morala ideo*“, „*la bildo kaj la realeco de la racio*“, kiel Hegelo asertas.¹⁵ Ĝi estas pli ĝuste produkto de la socio sur certa evoluŝtupo; ĝi estas la konfeso ke tiu ĉi socio evoluas en nesolvebla kontraŭdiro kun si mem, dividiĝis en nepacigeblaj kontraŭecoj kiujn forigi ĝi estas senpova. Sed por ke tiuj antagonismaj klasoj kun kontraŭaj ekonomiaj interesoj, ne elĉerpigu sin mem kaj la socion en senfrukta batalo, ŝajne super la socio staranta potenco fariĝis necesa, kiu devas moderigi la konflikton, teni ĝin ene de la limoj de la „ordo“; kaj tiu potenco, estiĝinta el la socio, sed metante sin super ĝin, ĉiam pli fremdiĝanta al ĝi, estas la ŝtato.

13 En la originalo: „Dithmarschen“, regiono en la nordgermana (nuntempe federacia) lando Ŝlesvig-Holŝtejno, situanta ĉe la okcidenta bordo de la Norda Maro. [-vl] Tiu regiono havis apartan evoluon. Prokismume je la mezo de la 12-a jarcento, ĝiaj loĝantoj, plejparte liberaj terkulturistoj, konkeris iom post iom sian sendependecon kaj konservis ĝin praktike de la komenco de la 13-a jarcento ĝis meze de la 16-a jarcento. La loka nobelaro fakte malaperis en la 13-a jarcento. La konstituciaj unuoj de la lando estis kampkulturaj komunumoj kiuj regis sin mem, kies bazo estis ofte la iamaj gentoj. En 1559 la trupoj de la reĝo de Danlando kaj de la duko de Holŝtejno sukcesis rompi la rezistadon en Ditmarŝo, sed la konstitucio de la komunumoj kaj ilia aŭtonoma administrado persistis ĝis en la dua duono de la 19-a jarcento. [fr. eld.]

14 La unua historiografiisto, kiu havis almenaŭ proksimuman ideon pri la esenco de la gento, estis Niebuhr, kaj tion – sed ankaŭ siajn rekte kunprenitajn erarojn – li dankas al sia kono de la ditmarŝaj gentoj. [en la originalo: „dithmarsischen Geschlechtern“, en kiu la aŭtoro, kiel en multaj aliaj lokoj, uzas la vorton „Geschlecht“ en la senco de gento, kvankam ofte ankaŭ en la senco de generacio. -vl.]

15 Hegelo: *Principoj de la jurfilozofio*, §§ 257 kaj 360.

IX Barbareco kaj civilizacio

Kompare kun la malnova genta organizaĵo, la ŝtato karakteriziĝas unue per la divido de la ŝtatanoj *laŭ la teritorio*. La malnovaj per sangligoj estiĝintaj kaj kuntenataj gentaj organizaĵoj, fariĝis, kiel ni vidis, nesufiĉaj, grandparte ĉar ili antaŭkondiĉas ligo de la membroj je difinita teritorio kaj tiu ligo jam delonge ĉesis. La teritorio restis, sed la homoj fariĝis moviĝemaj. Oni prenis kiel elirpunkton do la teritorian dividon kaj igis la civitanojn uzi siajn publikajn rajtojn kaj plenumi siajn publikajn devojn tie, kie ili ekloĝis, sen konsideri genton kaj tribon. Tiu organiziteco de la ŝtatanoj laŭ la lokeco estas al ĉiuj ŝtatoj komuna. Pro tio ĝi ŝajnas al ni natura; sed ni vidis, kiom da akraj, longaj kaj komplikaj bataloj necesis, ĝis kiam ĝi povis en Ateno kaj Romo anstataŭi la malnovan organizitecon laŭ gentoj.

La dua estas la institucio de *publika forto*, kiu jam ne rekte kongruas kun la loĝantaro organizanta sin kiel armita forto. Tiu aparta, publika forto necesas, ĉar mem aganta armita organizo de la loĝantaro fariĝis malebla ekde la divido en klasoj. La sklavoj apartenas ankaŭ al la loĝantaro; la 90.000 atenaj civitanoj estas fronte al la 365.000 sklavoj nur privilegiita klaso. La popolarmeo de la atena demokratio estis aristokratia publika forto fronte al la sklavoj kaj bridis ilin; sed ankaŭ por bridi la civitanojn, necesis ĝendarmaro, kiel supre rakontite. Tiu publika forto ekzistas en ĉiu ŝtato; ĝi konsistas ne nur el armitaj homoj, sed ankaŭ el aldonajoj, malliberejoj kaj ĉiaj devigaj institucioj, pri kiuj la genta socio sciis nenion. Ĝi povas esti tre malgranda, preskaŭ ne ekzistanta en socioj kun ankoraŭ ne evoluintaj klas-kontraŭdiroj kaj en izolitaj regionoj, kiel iam kaj ie en Usono. Sed ĝi fortiĝas en la mezuro laŭ kiu la klasaj kontraŭdiroj ene de la ŝtatoj akriĝas kaj laŭ kiuj la ŝtatoj limantaj unu apud la aliaj fariĝas ĉiam pli grandaj kaj popolriĉaj – sufiĉas vidi nian hodiaŭan Eŭropon, kie klasbatalo kaj konkurenco je konkero altigis la publikan forton tiom ke ĝi minacas vori la tutan socion kaj eĉ la ŝtaton.

IX Barbareco kaj civilizacio

Por konservi tiun publikan forton, necesas kontribuaĵoj de la civitanoj – la *impostoj*. Tiuj estis tute nekonataj de la genta konstitucio. Sed ni havas hodiaŭ multajn spertojn pri ili. Kun la progresanta civilizacio ankaŭ ili jam ne sufiĉas; la ŝtato tratas kambiojn pri la estonteco, prenas pruntojn, faras *ŝtatŝuldojn*. Ankaŭ pri tio la malnova Eŭropo havas sufiĉe malagrablajn spertojn.

La oficistoj, en posedo de la publika forto kaj de la rajto je impostkolektado, prezentiĝas nun kiel organoj de la socio *super* la socio. La libera, volema respekto, kiun la genta konstitucio ricevis, ne sufiĉas al ili, eĉ se ili povus havi ĝin; kiel reprezentantoj de potenco fremdiĝinta al la socio ili devas esti respektataj pere de esceptaj leĝoj, kaŭze de kiuj ili ĝuas apartan sanktecon kaj nevundeblon. La plej fia policervanto de la civilizita ŝtato havas pli da „aŭtoritato” ol ĉiuj organoj de la genta konstitucioj kune; sed la plej potenca reĝo kaj la plej granda ŝtatisto aŭ armeestro de la civilizacio povas envii la plej malgravan gentprezidanton pro la netrudita kaj senkontesta respekto kiun tiu ĝuis. Tiu staras meze de la socio; la alia estas devigata voli prezenti ion ekster kaj super ĝi.

Ĉar la ŝtato estiĝis el la bezono bridi klasajn kontraŭecojn, sed ĉar ĝi samtempe estiĝis meze de la konflikto de tiuj klasoj, tial ĝi estas ĝenerale ŝtato de la plej potenca, ekonomie reganta klaso, kiu pere de ĝi fariĝas ankaŭ politike reganta klaso kaj per tio akiras novajn rimedojn por teni la subpremitan klason malsupra kaj por ekspluati ĝin. Tiel la antikva ŝtato estis antaŭ ĉio ŝtato de la sklavposedantoj por subpremi la sklavojn, kiel la feŭda ŝtato organo de la nobelaro por subpremi la servutajn terkulturistojn kaj la moderna reprezenta ŝtato instrumento de ekspluatado de dunglaboro fare de la kapitalo. Tamen esceptokaze okazas periodoj, dum kiuj la batalantaj klasoj estas proksimume samfortaj, tiel ke la ŝtatpotenco kiel ŝajna peranto dum momento ricevas certan sendependecon rilate al ambaŭ. Tiel

IX Barbareco kaj civilizacio

la absoluta monarĥio de la 17-a kaj 18-a jarcentoj, kiu balancas nobelaron kaj burĝaron unu kontraŭ la alia; tiel la bonapartismo de la unua kaj nome de la dua franca imperio, kiu uzis la proletaron kontraŭ la burĝaro kaj la burĝaron kontraŭ la proletaro. La plej nova faro tia, ĉe kiu dominantoj kaj dominatoj aperas same komikaj, estas la nova germana regno de Bismarka nacio: Ĉi tie oni balancas kapitalistojn kaj laboristojn unu kontraŭ la alian kaj trompas ambaŭ favore al la komplete kadukiĝintaj prusaj kampnobe-
loj.

En la plej multaj historiaj ŝtatoj la rajtoj konceditaj al la civitanoj estas krome graditaj laŭ la havaĵo, kaj per tio malrekte esprimiĝas ke la ŝtato estas organizaĵo de la posedanta klaso por protekto kontraŭ la ne posedanta. Tiel jam en la atenaj kaj romaj havaĵklasoj. Tiel en la mezepoka feŭda ŝtato, kie la politika pozicio gradiĝis laŭ la grundposedo. Tiel en la elektosistemo de la modernaj reprezentaj ŝtatoj. Tiu politika agnosko de la poseddiferenco estas tamen ne esenca. Male, ĝi signas malaltan ŝtupon de la ŝtata evoluo. La plej alta ŝtatformo, la demokratia respubliko, kiu en niaj modernaj sociaj kondiĉoj fariĝas pli kaj pli neevitebla neceso kaj kiu estas la ŝtatformo en kiu la lasta decida batalo inter proletaro kaj burĝaro nur povas esti elbatalota – la demokratia respubliko – scias oficiale jam nenion pri poseddiferencoj. En ĝi la riĉeco uzas sian povon malrekte, sed des pli certe. Unuflanke en la formo de rekta koruptado de la oficistoj, por kio Usono estas klasika modelo, aliflanke en la formo de alianco de registaro kaj borso, kiu plenumiĝas des pli facile, ju pli la ŝtatŝuldoj kreskas kaj ju pli akcisetoj koncentras ne nur la transporton, sed ankaŭ la produktadon mem en siaj manoj kaj siavice trovas sian centron en la borso. Por tio, krom Usono, la plej nova franca respubliko estas frapanta ekzemplo, kaj ankaŭ la filistra Svislando tiurilate ne postrestas. Sed ke por tiu frateco de registaro kaj borso ne necesas demokratia respubliko, tion pravas

IX Barbareco kaj civilizacio

krom Anglio ankaŭ la nova germana regno, ĉe kiu ne direblas kiun la ĝenerala voĉdonrajto levis pli alten, Bismarkon aŭ Bleichröder¹⁶. Kaj fine la posedanta klaso regas rekte per la ĝenerala voĉdonrajto. Tiom longe, kiom la subpremata klaso, do ĉi-kaze la proletaro, ankoraŭ ne estas matura por liberigi sin mem, tiom longe ĝia plimulto konsideros la ekzistantan sociordon kiel la sole eblan kaj estos politike la vosto de la kapitalisma klaso, ĝia ekstrema maldekstra alo. Sed en la mezuro laŭ kiu ĝi maturiĝas por sia mememancipiĝo, en tiu mezuro ĝi konstituas sin kiel propra partio, elektas siajn proprajn reprezentantojn, ne tiun de la kapitalistoj. La ĝenerala voĉdonrajto estas tiel la gradmezurilo de la matureco de la laborista klaso. Ĝi ne povas esti kaj ne estos pli en la nuntempa ŝtato; sed tio ja sufiĉas. En la tago kiam la termometro de la ĝenerala voĉdonrajto montros la bolpunkton ĉe la laboristoj, ili same kiel la kapitalistoj scios kion fari.

La ŝtato do ne ekzistas deeterne. Socioj ekzistis kiuj sukcesis sen ĝi, kiuj havis nenian ideon pri ŝtato kaj ŝtata potenco. Sur certa ŝtupo de la ekonomia evoluo, kiu estis nepre ligita kun divido de la socio en klasojn, per tiu divido la ŝtato fariĝis necesa. Ni proksimiĝas nun rapidpaŝe al evoluŝtupo de produktado, sur kiu la ekzisto de tiuj klasoj ne nur ĉesis esti neceso, sed fariĝas ankaŭ pozitiva malhelpo por la produktado. Ili falos, same neeviteble kiel ili antaŭe estiĝis. Kun ili nepre falos la ŝtato. La socio, kiu nove organizos la produktadon surbaze de libera kaj egala asociado de la produktantoj, translokos la tutan ŝtatmaŝinon tien, kie ĝi tiam devas esti: en la muzeon de antikvaĵoj, apud la ŝpinradon kaj la bronzan hakilon.

16 Otto von Bismarck, 1871 - 1890, ĉefministro de la Reĝlando Prusio kaj poste kanceliero de la Germana Imperio; Gerson von Bleichröder, 1822 - 1893, germana bankisto, mone apoganta la politikon de Bismarko. -vl

IX Barbareco kaj civilizacio

La civilizacio estas do, laŭ la supra dirito, la evoluŝtupo de la socio, sur kiu la labordivido, la el tiu fontanta interŝanĝo inter unuopuloj kaj la varproduktado, kiu kuntenas ambaŭ, plene disvolviĝas kaj ŝanĝegas la tutan antaŭan socion.

La produktado de ĉiuj antaŭaj sociaj ŝtupoj estis esence komuna, kiel ankaŭ la konsumado okazis sub rekta disdivido de la produktoj ene de grandaj aŭ malgrandaj komunismaj komunumoj. Tiu komuneco de la produktado okazis ene de la plej striktaj limoj; sed ĝi okazis kun la regado de la produktantoj super sia produktadprocezo kaj sia produkto. Ili scias kio la produkto fariĝas: Ili konsumas ĝin, ĝi ne forlasas iliajn manojn; kaj tiom longe kiom la produktado fariĝas sur tiu bazo, la produkto ne povas superi la produktantojn, ne povas produkti la fantomon de fremdaj potencoj fronte al ili, kio okazas en la civilizacio regule kaj neeviteble.

Sed en tiun produktadprocezon ŝoviĝas iom post iom la labordivido. Ĝi subfosas la komunecon de la produktado kaj alproprigo, ĝi levas la alproprigon fare de unuopuloj al plejparta regulo kaj produktas per tio la interŝanĝon inter individuoj – kiel, tion ni esploris supre. Iom post iom la varproduktado fariĝas la dominanta formo.

Kun la varproduktado, la produktado jam ne por la propra konsumo, sed por la interŝanĝo, la produktoj nepre ŝanĝas la manojn. La produktanto fordonas sian produkton en la interŝanĝo, li jam ne scias kio ĝi fariĝas. Ekde kiam la mono, kaj kun la mono la komercisto, aperas kiel peranto inter la produktantoj, la interŝanĝprocezo fariĝas ankoraŭ pli komplika, la fina sorto de la produktoj ankoraŭ pli malcerta. Estas multaj komercistoj, kaj neniu el ili scias kion faras la alia. La varoj iras nun jam ne nur de mano al mano, ili iras ankaŭ de merkato al merkato; la produktantoj perdis la regadon super la ĉiomproduktado de sia vivsfero, kaj la

IX Barbareco kaj civilizacio

komercistoj ne ricevis ĝin. Produktoj kaj produktadoj falas al la hazardo.

Sed la hazardo estas nur la unua poluso de kunteksto, kies alia poluso nomiĝas neceso. En la naturo, kie ankaŭ la hazardo ŝajnas regi, ni delonge pruvis sur ĉiu kampo la internan neceson kaj leĝecon kiu trudiĝas en tiu hazardo. Sed kio validas pri la naturo, tio validas ankaŭ por la socio. Ju pli socia agado, serio da sociaj okazaĵoj, fariĝas tro granda por konscia kontrolo de la homoj, kreskas al ili super la kapon, ju pli ĝi ŝajnas esti lasita al la pura hazardo, des pli en tiu hazardo trudiĝas, kvazaŭ per naturneceso, la leĝoj propraj kaj iminentaj al ĝi. Tiaj leĝoj regas ankaŭ la hazardojn de la varproduktado kaj de la varinterŝanĝo; ili staras fronte al la individuaj produktantoj kaj interŝanĝantoj kiel fremdaj, komence eĉ ne konataj potencoj, kies naturo nur pene esplorendas kaj deĉifrendas. Tiuj ekonomiaj leĝoj de la varproduktado modifiĝas kun la diversaj evoluŝtupoj de tiu produktadformo; sed ĝenerale la tuta periodo de la civilizacio troviĝas sub ilia regado. Kaj ankoraŭ nuntempe la produkto regas la produktanton; ankoraŭ nun la ĉiomprodukto de la socio estas reguligata ne de komune pripensita plano, sed de blindaj leĝoj kiuj trudiĝas kun elementa forto, lastinstance en la fulmotondroj de la periodaj komercaj krizoj.

Ni vidis supre, ke sur sufiĉe frua evoluŝtupo de la produktado la homa laborforto kapabliĝas liveri konsiderinde pli grandan produkton ol necesan por vivteni la produktanton, kaj kiel tiu evoluŝtupo estas esence la sama, sur kiu aperas labordivido kaj interŝanĝo inter unuopuloj. Nun ne daŭris longe ĝis kiam la granda „vero” malkovriĝis, ke ankaŭ la homo povas esti varo; ke la homa forto¹⁷ estas interŝanĝebla kaj uzebla, per tio ke oni transformas la homon en sklavon. Apenaŭ la homoj komencis interŝanĝi, ili estis jam mem interŝanĝataj. La aktivo fariĝis pasivo, egale

¹⁷ En la eldono de 1884: „laborforto”.

IX Barbareco kaj civilizacio

ĉu la homoj tion volis aŭ ne.

Kun la sklavismo, kiu sub la civilizacio ricevis sian plenan disvolviĝon, okazis la unua granda divido de la socio en ekspluatanta kaj ekspluatata klasoj. Tiu divido daŭris dum la tuta civilizita periodo. La sklavismo estas la unua, de la antikva mondo esence propra formo de ekspluatado: al ĝi sekvas la servuteco en la mezepoko, la dunglaboro en la nova tempo. Tiuj estas la tri grandaj formoj de sklaveco¹⁸ karakterizaj por la civilizacio; malkaŝa, kaj lastatempe vualita, sklaveco iras ĉiam apud ĝi.

La ŝtupo de varproduktado, per kiu la civilizacio komenciĝas, estas ekonomie markita per la enkonduko 1. de la metalmono, per tio de la monkapitalo, de interezo kaj uzuro; 2. de komercistoj kiel peranta klaso inter la produktantoj; 3. de la privatproprietoj kaj de la hipoteko kaj 4. de sklavlaboro kiel antaŭreganta produktadformo. La familiformo kongrua kun la civilizacio kaj kun tiu definitive ekreganta estas la monogamio, la regado de la viro super la virino, kaj la individua familio kiel ekonomia unuo de la socio. La resumo de la civilizita socio estas la ŝtato, kiu en ĉiuj tipaj periodoj estas ekskluzive la ŝtato de la reganta klaso kaj restas en ĉiuj okazoj esence maŝino por bridati la subprematan, ekspluatatan klason. Krome estas karakteriza por la civilizacio: unuflanke la fiksiĝo de la kontraŭeco de urbo kaj kamparo kiel de la bazo de la tuta socia labordivido; aliflanke la enkonduko de testamentoj, per kiuj la proprietulo povas disponi pri sia proprietulo eĉ trans sia morto. Tiu institucio, kiu rekte atakas la malnovan gentan konstitucion, estis en Ateno nekonata ĝis Solono; en Romo ĝi estas jam frue enkondukita, ni ne scias kiam¹⁹; ĉe la ĝermanoj la

18 En la originalo: „der Knechtschaft”, de „servisteco” kun kromsignifo de sklaveco, servuteco. -vl

19 La „Sistemo de la akiritaj rajtoj” de Lasalo temas en la dua parto ĉefe pri la frazo laŭ kiu la roma testamento estas tiom aĝa kiel Romo mem, ke por la roma historio neniam „ekzistis

IX Barbareco kaj civilizacio

pastroj enkondukis ĝin, por ke la naiva ĝermano povu senprobleme postlasi sian heredaĵon al la eklezio.

Per tiu baza konstitucio la civilizacio realigis aferojn al kiuj la malnova genta konstitucio absolute ne kapablis rezisti. Sed ĝi realigis ilin per tio ke ĝi movis la plej fiajn instinktojn kaj pasiojn de la homoj kaj disvolvis ilin surkoste de ĉiuj liaj ceteraj dispozicioj. La plata avido estis la movanta animo de la civilizacio ekde ties unua tago ĝis hodiaŭ, riĉaĵo kaj ree riĉaĵo kaj trifoje riĉaĵo, riĉaĵo ne de la socio, sed de tiu unuopa malnobla individuo, ĝia sola decida celo. Se ĉe tio la kreskanta evoluo de la scienco kaj en ripetaj periodoj la plej alta floro de la arto okazis sub ĝi, tio ja nur ĉar sen tiuj la plena atingo de riĉeco de nia tempo ne estus ebla.

Ĉar la bazo de la civilizacio estas la ekspluatado de klaso fare de alia klaso, tial ĝia tuta evoluo moviĝas en konstanta kontraŭdiro. Ĉiu progreso de la produktado estas samtempe malprogreso en la situacio de la subpremata klaso, t.e. de la granda plimulto. Ĉiu bonfaro por la unuaj estas nepre malbonaĵo por la aliaj, ĉiu nova liberigo de unu klaso estas nova subpremado por la alia klaso. La frapantan pruvon por tio liveras la enkonduko de la maŝinaro, kies efikoj estas nun mondvaste konataj. Kaj se ĉe la barbaroj la diferenco de rajtoj kaj devoj, kiel ni vidis, ankoraŭ apenaŭ fareblis, la civilizacio ja klarigas la diferencon kaj kontraŭecon de la du eĉ al la plej granda stultulo, per tio ke ĝi atribuas al unu

tempo sen testamento”; ke la testamento estiĝis en antaŭroma tempo el la kulto de la mortintoj. Lasalo, kiel kredanta malnovhegelano, deduktas la romajn jurajn dispoziciojn ne el la sociaj kondiĉoj de la romanoj, sed el la „spekula nocio” de la volo, kaj venas ĉe tio al tiu tute malhistoria aserto. Oni ne povas miri pri tio en libro, kiu surbaze de la sama spekulativa nocio venas al la rezulto ke ĉe la roma heredo la transigo de la havaĵo estis pura flankafero. Lasalo kredas ne nur siajn iluziojn pri la romaj juristoj, speciale en la pli frua tempo; li eĉ superas ilin.

IX Barbareco kaj civilizacio

klaso preskaŭ ĉiujn rajtojn, al la alia, male, preskaŭ ĉiujn devojn.

Sed tio ne devas esti. Kio estas bona por la reganta klaso, estu bona por la tuta socio, kun kiu la reganta klaso identigas sin. Ju pli do la civilizacio progresas, des pli ĝi estas devigata kovri la malbonaĵojn, kiujn ĝi nepre kreas, per la mantelo de amo, por beligi aŭ por fornei ilin, mallonge, enkonduki konvencian hipokritecon, kiu estis konata nek al antaŭaj sociaj formoj nek eĉ al la unua ŝtupo de la civilizacio kaj kiu fine kulminas en la aserto: La ekspluatado de la subpremata klaso estas farata de la ekspluatanta klaso sole nur en la intereso de la ekspluatata klaso mem; kaj se tiu ne komprenas tion, sed eĉ ribelas, tio estas la plej kanajla sendankemo kontraŭ la bonfarantoj, la ekspluatistoj.²⁰

Kaj nun fine la juĝo de Morgano pri la civilizacio:

„Ekde la apero de la civilizacio la kreskado de riĉeco fariĝis tiom giganta, ĝiaj formoj tiom diversaj, ĝia aplikado tiom komplementa kaj ĝia administrado tiom lerta en la intereso de la proprietuloj, ke tiu riĉeco, fronte al la popolo, *fariĝis ne superebla potenco. La homa spirito staras konsternite kaj fascinite antaŭ sia propra kreaĵo.* Sed tamen venos la tempo kiam la homa racio fortiĝos por regado super la riĉeco, kiam ĝi determinos la rilaton de la ŝtato al la proprieto kiun ĝi protektas, kiel la limojn de la rajtoj de la proprietuloj. La interesoj de la socio absolute antaŭas la individuajn interesojn, kaj ambaŭ metendas en justan kaj harmonian rilaton. La nura ĉasado de riĉaĵo ne estas

²⁰ Mi komence intencis meti la brilan kritikon de la civilizacio, kiu troviĝas dise en la verkoj de Charles Fourier, apud tiun de Morgano kaj mian propran. Bedaŭrinde mankas al mi la tempo por tio. Mi rimarkigu nur, ke jam ĉe Fourier monogamio kaj grundproprieto estas konsiderataj ĉefaj trajtoj de la civilizacio kaj ke li nomas ilin milito de la riĉulo kontraŭ la malriĉulo. Ankaŭ ĉe li troviĝas jam la profunda kompreno ke en ĉiuj mankhavaj socioj dividitaj en kontraŭdiroj unuopaj familioj (les familles incohérentes) estas la ekonomiaj unuoj.

IX Barbareco kaj civilizacio

la fina destino de la homaro, se la progreso restas la leĝo de la estonteco, kiel ĝi estis por la pasinteco. La tempo pasinta ekde la komenco de la civilizacio estas nur eta ono de la pasinta vivtempo de la homaro; nur eta ono de la ankoraŭ estonta. La dissolviĝo de la socio staras minace antaŭ ni kiel fino de historia kariero kies sola fina celo estas la riĉeco; ĉar tia kariero entenas la elementojn de sia propra neniigo. Demokratio en la administrado, frateco en la socio, egaleco de la rajtoj, ĝenerala edukado inaŭguros la venontan pli altan ŝtupon de la socio, kiun sperto, racio kaj scienco konstante alstrebas. *Ĝi estos revivigo – sed en pli alta formo – de la libereco, egaleco kaj frateco de la malnovaj gentoj.*²¹

21 Morgan, *Ancient Society*, p. 552.

Frederiko Engelso: Nove malkovrita kazo de grupedzeco

Aldonaĵo¹. Laŭ: *Die Neue Zeit*, n-ro 12, 11-a jaro, I-a volumo, p. 373 – 375

Karl Marx/Friedrich Engels: Werke [MEW], (Karl) Dietz Verlag, Berlin, volumo 22, 3-a eldono 1972, senŝanĝa represo de la 1-a eldono 1963, Berlino/GDR, p. 351 – 354.

Vide al la lastatempa neado de la grupedzeco fare de certaj raciismaj etnografiistoj, la sekvanta raporto estas interesa, kiun mi tradukas el la *Russkije Vjedomosti* (Rusa Gazeto) de Moskvo, 14-a de oktobro 1892 (laŭ malnova kalendaro). Ĉi tie ne nur konstatigas la grupedzeco, t.e. la rajto de la reciproka seksrilato inter serio de viroj kaj serio de virinoj eksplicite kiel plene valida, sed ankaŭ formo de ĝi kiu dense rilatas al la punalua geedzeco de la havajanoj, do al la plej evoluinta kaj plej klasika fazo de grupedzeco. Dum la tipo de punalua familio konsistas el serio de fratoj (korpaj kaj pli malproksimaj), kiuj estas edzoj de serio de korpaj kaj pli malproksimaj fratinoj, ni trovas ĉi tie sur la insulo Saĥalino ke viro estas edzo de ĉiuj edzinoj de siaj fratoj kaj kun ĉiuj fratinoj de sia edzino, kio, el virina vidpunkto, signifas ke lia edzino rajtas libere seksumi kun la fratoj de sia edzo kaj kun la edzoj de siaj fratinoj. La diferenco disde la tipa formo de la punalua geedzeco estas do nur tiu ke la fratoj de la edzo kaj la edzoj de la fratinoj ne estas nepre la samaj homoj.

1 La fonto de Engelso estas la raporto publikigita en la n-ro 284 de *Ruskije Vjedomosti* de la etnologo Lev Jakovlevič Sternberg pri la rezultoj de studado de la vivmaniero kaj de la socia reĝimo de la giljako, loĝantaro ĉe la enfluejo de la rivero Amuro kaj en la norda kaj meza parto de la insulo Saĥalino. Engelso reprenis kun kelkaj modifoj aŭ precizigoj la artikolon de Sternberg. [fr. eld.]

Krome rimarkindas ke ankaŭ ĉi tie konfirmiĝas tio kion mi diris en „Origino de la familio”, 4-a eld., p. 28-29²: Ke la grupedzeco tute ne aspektas tia kian la bordelfantazio de nia filistro imagas; ke la grupgeedzoj tute ne praktikas la saman voluptan vivon publike, kiun li praktikas sekrete, sed ke tiu geedza formo, almenaŭ en la ekzemploj kiujn ni ankoraŭ hodiaŭ renkontas, distingiĝas en la praktiko disde malstrikta pariga geedzeco aŭ de poliginio nur per tio, ke la moro permesas serion da kazoj de seksrilato kiu alie estas severe punata. La fakto, ke la praktika uzado de tiuj rajtoj iom post iom formortas, pruvas nur ke tiu geedzeca formo mem estas formortonta, kion konfirmas ankaŭ ĝia maloft-eco.

Cetere la tuta priskribo estas interesa per tio ke ĝi ree pruvas, kiom similaj, kaj eĉ identaj estas la sociaj institucioj de tiaj prapopoloj troviĝantaj sur sufiĉe sama evoluŝtupo. La plejparto de tio kio estas dirita pri la mongoloidoj de Saĥalino ĝustas por dravidaj triboj de Hindio, por pacifikaj insulanoj tempe de ilia malkovro, por amerikaj ruĝhaŭtuloj. La raporto tekstas:

„En la sesio de la 10-a de oktobro” (malnova kalendaro; 22-a de oktobro de nova kalendaro) „la antropologia sekcio de la Socio de Amikoj de Naturscienco en Moskvo, N. A. Jantĉuk antaŭlegis interesan komunikaĵon de s-ro Sternberg pri la giljako, malmulte esplorata tribo de la insulo Saĥalino, kiu staras sur la ŝtupo de sovaĝeco. La giljako konas nek kampkulturon nek potfaradon, ili nutras sin ĉefe per ĉasado kaj fiŝkaptado, ili varmigas akvon en lignaj trogoj per enĵeto de ardantaj ŝtonoj ktp. Aparte interesaj estas iliaj institucioj koncerne familion kaj genton. La giljako nomas patro ne nur sian korpan patron, sed ankaŭ ĉiujn fratojn de sia patro; la edzinojn de tiuj fratoj same kiel la fratinojn de sia patrino li nomas ĉiujn siaj patrinoj; la idojn de ĉiuj ĉi 'patroj' kaj 'patrinoj'³ li nomas siaj fratoj kaj fratinoj. Tiu nomado ekzistas, kiel konate, ankaŭ ĉe la irokezoj kaj

2 En tiu ĉi eldono: p. 49-50. -vl

3 En *Ruskije Vedomosti*: de ĉiuj nomitaj parencoj.

aliaj indianaj triboj de Nordameriko, kiel ankaŭ ĉe kelkaj triboj en Hindio. Sed dum ili ĉe tiuj jam de longa tempo ne kongruas plu kun la realaj kondiĉoj, ĝi servas ĉe la giljako por nomi *ankoraŭ hodiaŭ validan staton*. Ankoraŭ hodiaŭ ĉiu giljako havas *edzan rajton pri la edzinoj de siaj fratoj kaj pri la fratinoj de sia edzino*; almenaŭ la uzado de tiaj rajtoj ne estas konsiderata io malpermesata. Tiuj restaĵoj de la grupedzeco surbaze de gento memoras pri la konata punalua geedzeco, kiu ekzistis sur la Sandviĉaj Insuloj ankoraŭ en la unua duono de nia jarcento. Tiu formo de familiaj kaj gentaj kondiĉoj estas la bazo de la tuta genta ordo kaj socia konstitucio de la giljako.

La gento de giljako konsistas el ĉiuj – proksimaj kaj malproksimaj, realaj kaj nominalaj – fratoj de sia patro⁴, el ties patroj kaj patrinoj (?), el la idoj de siaj fratoj kaj el siaj propraj idoj⁵. Estas kompreneble ke tiel konsista gento povas enteni grandegan amason da homoj. La vivo en la gento okazas laŭ jenaj principoj. La geedzeco ene de la gento estas strikte malpermesata. La vidvino de mortinta giljako transiras laŭ decido de la gento al unu liaj korpaj aŭ nominalaj fratoj⁶. La gento zorgas pri vivtenado de ĉiuj siaj ne laborkapablaj samgentanoj. „Ĉe ni ne ekzistas malriĉuloj”, diris giljako al la raportanto, „kiu bezonas subtenon, tiun nutras la *ĉal* (gento).” La gentanoj estas krome unuigitaj per komunaj oferceremonioj kaj festoj, komuna tombejo ktp.

La gento garantias al ĉiu sia ano vivon kaj sekurecon kontraŭ agreso de negentanoj; kiel represalio estas uzata la sangvenĝo, kies praktiko sub la rusa regado tamen tre maloftiĝis. La virinoj estas tute esceptataj de la sangvenĝo. – En unuopaj, cetere tre maloftaj kazoj la gento adoptas ankaŭ anojn de aliaj gentoj. Estas ĝenerala regulo, ke la havaĵo de mortinto devas ne eliri el la gento; tiurilate ĉe la giljako regas laŭvorte la kon-

4 En *Ruskije Vedomosti*: el ĉiuj fratoj de sia patro (ĉiugradaj) (anstataŭ: el ĉiuj – proksimaj kaj malproksimaj, realaj kaj nominalaj – fratoj de sia patro).

5 En la revuo: de ĉiuj fratoj de lia patro (ĉiugradaj). [fr. eld.]

6 En *Ruskije Vedomosti*: fratoj (ajngradaj) (anstataŭ: korpaj aŭ nominalaj fratoj).

Frederiko Engelso: Nove malkovrita kazo de grupedzeco

ata preskribo de la dek du *tabulo*⁷: *Si suos heredes non habet, gentiles familiam habento* – se li ne havas proprajn heredantojn, tiam la gentanoj heredu. Nenia grava evento okazas en la vivo de giljako sen partopreno de la gento. Antaŭ ankoraŭ ne tre longa tempo, antaŭ du aŭ tri generacioj, la plej maljuna gentano estis la prezidanto de la komunumo, la „*starost*” de la gento; nuntempe la rolo de la genta plejmaljunulo limiĝas preskaŭ nur al gvidado de religiaj ceremonioj. La gentoj estas ofte malkoncentriĝintaj tra lokoj tre malproksimaj unu de la alia, sed ankaŭ en la diseco la gentanoj daŭre memorigas sin inter si, gastigas sin reciproke, donas al si reciprokajn helpojn kaj protekton ktp. Sen la plej ekstrema urĝo la giljako neniam forlasas siajn gentanojn aŭ la tombojn de sia gento. La genta reĝimo tre precize stampis la tutan spiritan vivon, la karakteron, la morojn, la instituciojn de la giljakoj. La kutimo pritrakti ĉion komune, la neceso konstante interveni en la interesojn de la gentanoj, la solidareco ĉe la sangvenĝo, la devigo kaj la kutimo de kunloĝado kun dek aŭ pli da samuloj en grandaj tendoj (jurtoj), mallonge, iel esti ĉiam inter la popolo, ĉio ĉi donis al la giljako socieman, malfermitan karakteron. La giljako estas eksterordinare gastama, li ŝatas gastigi kaj siavice gastari. La bela moro de gastamo montriĝas aparte okulfrape dum malfacilaj tempoj. En jaro de malfeliĉo, kiam la giljako havas nenion por manĝi, nek li nek liaj hundoj, li ne etendas la manon por almozo, li iras sentime gastigi kaj estas tie nutrata, ofte dum sufiĉe longa tempo.

Ĉe la saĥalinaj giljakoj, krimoj pro avido okazas kvazaŭ neniam. La giljako konservas siajn valoraĵojn en provizdomo kiu estas neniam ŝlosita. La giljako estas tiom sentema je honto, ke, ekde kiam oni pruvis al li hontindaĵon, li iras en la arbaron kaj pendumas sin. Mortigo estas tre malofta kaj okazas preskaŭ ekskluzive en kolero; sed neniukaze el avida intenco. En rilato kun aliuloj la giljako montras honestecon, fidindecon kaj skrupulecon.

Malgraŭ sia longa submetiĝo sub la manĉuroj, kiuj nun fariĝis ĉinoj, malgraŭ la malbona influo de la koloniado⁸ de

7 Vd piednoton 2 sur paĝo 133. -vl

8 En la *Ruskije Vedomosti*: de la nomada loĝantaro (anstataŭ: la

la Amur-regiono, la giljakoj konservis en morala rilato multajn virtojn de primitiva tribo. Sed la sorto de ilia socia ordo estas neevitebla. Ankoraŭ unu aŭ du generacioj, kaj la giljakoj de la kontinento estos komplete rusiĝintaj kaj ili alproprigas al si kun la bonfarojn de la rusa kulturo ankaŭ ties difektaĵojn. La saĥalinaj giljakoj, pli aŭ malpli foraj de la centroj de rusa koloniado, povas esperi pli longan sendifektan konserviĝon. Sed ankaŭ ĉe ili la influo de la rusa najbareco eksenteblas. Ili iras pro la komerco en la vilaĝojn, ili iras al Nikolajevsko por laboro, kaj ĉiu giljako, kiu de tia laboro revenas en sian hejmlokon, kunportas la saman etoson, kiun la laboristo el la urbo kunportas en sian rusan vilaĝon. Kaj krome la laboro en la urbo kun siaj ŝanĝiĝantaj ŝancoj pli kaj pli neniigas tiun originan egalecon, kiu estas ĉefa trajto en la senarte simpla ekonomia vivo de tiuj popoloj.

La artikolo de s-ro Sternberg, kiu entenas ankaŭ raportojn pri la religiaj ideoj kaj kutimoj kaj pri iliaj juraj institucioj, aperos komplete en la „Etnografia Revuo” (*Etnografiĉeskoje oboĵenije*⁹).”

koloniado).

- 9 *Etnografiĉeskoje Oboĵenije*: trimonata revuo de la etnografia sekcio de la Societo de la Amikoj de la Natursciencoj, de Antropologio kaj de Etnografio ĉe la Universitato de Moskvo, kiu aperis de 1889 ĝis 1916. La artikolo de Sternberg aperis en la n-ro 2 de la jaro 1893. [fr. eld.]

Rimarkoj de la tradukinto

Al Dirk Brinkmann mi dankas valorajn helpojn kaj konsil-ojn por la tradukado de tiu ĉi libro.

Kiel mi indikis jam piednote, necesis ĉe ĉiu uzo de la vortoj *Deutsche, Deutschland, deutsch* decidi ĉu temas pri germanoj, Germanio, germana, aŭ pli ĝermanoj, Ĝermanujo, ĝermana, ĉar la aŭtoro uzis, kiel kutime en tiu epoko, por la nocioj de ambaŭ radikoj la saman radikon *deutsch-* (german-). Similaj du- aŭ eĉ plur-senceco troviĝas ankaŭ en aliaj vortoj, ekz-e *Geschlecht*, kiu havas jen la sencon de sekso, jen de gento, jen de popolo, jen de generacio, ĉe kio en kelkaj teksteroj la decido inter la lastaj tri ne estis ĉiam evidenta, kaj la komparo kun alilingvaj tradukoj ankaŭ ne donis ĉiam konvinkan interpreton, kaj tiam la tradukisto devis interprete decidi. Eble – kaj espereble – sagacaj legantoj donos pri tio, kaj pri aliaj eventualaj mankoj, indikojn por estonta reeldono de tiu ĉi libro.

Similaj decidoj estis plej ofte farendaj pri la germanaj vortoj pri Usono respektive Ameriko.

Pluraj piednotoj, kiuj ne troviĝas en la germana originalo, estas prenita el la angla aŭ la franca eldono; plej ofte temas pri fontindikoj aŭ aliaj klarigoj. Krome mi enmetis plurloke piednotajn klarigojn por nocioj ne nepre internacie konataj. Tiuj piednotoj estas markitaj per fontindiko inter rektaj krampoj, ekz-e [fr. eld.] signifas „el la franca eldono” respektive [-vl] „de la tradukinto”.

Anstataŭ *grupa geedzeco* mi uzis ĝenerale *grupedzeco*.

Kursivigo de fremdvortoj estas ĝenerale de la tradukinto, aliaj kursivigoj de la aŭtoro; esceptoj estas markitaj en piednoto.

Bonan legadon deziras

Vilhelmo Lutermano, Pedro Betancourt, januaro 2010

Monda Asembleo Socia (MAS) ...

... estas asocio fondita en la jaro 2005 de Esperantistoj kiuj, inspiritaj de la artikoloj de la gazeto (reta, laŭokaze papera) *Le Monde diplomatique en Esperanto* (<http://eo.mondediplo.com>) volas ne nur legi, sed ankaŭ diskuti kaj agi.

Ĝi estas strikte bazdemokratia, travidebla (por siaj membroj), progresema organizaĵo, kiu funkcias nur pere de retroŝto kaj Interreto. Ĝi partoprenas en la Mondaj kaj laŭeble regionaj Forumoj kaj referencas en sia statuto por sia agado la tekstojn kunigitajn en la sekvapaĝe listigita libro „Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj ...”. Aliĝo kaj membreco estas senpagaj. MAS estas kunlaboranta fakasocio de la Universala Esperanto-Asocio (UEA).

Ĝia retejo: <http://mas-eo.org> enhavas ĉiujn interesajn informojn pri MAS, kaj krome multajn legindajn artikolojn, tradukitajn aŭ memverkitajn de la membroj.

Ĉiu membro rajtas ne nur publikigi en la repaĝo de MAS siajn tekstojn, sed ankaŭ publikigi librojn en la eldonejo de MAS, kondiĉe ke li havas aŭ trovas la rimedojn por presado - ĉar aliĝo kaj membreco estas senpagaj, MAS ĝenerale ne disponas pri la rimedoj pagi al verkemuloj la eldonadon de libroj.

Tamen, ĝis nun eldoniĝis jam pluraj libroj - jen en la vico de ilia apero:

- **C. F. Ramuz: Aline** (novelo de la franclingva svisa aŭtoro en traduko de nia fama René de Saussure, reeldonita post la unua eldono en 1911), 2007

- **Arturo Ŝniclo: Rondo (Dek dialogoj); La fianĉino (Skizo), kun eseoj pri verkoj de Ŝniclo de Hartmut Scheible**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2007

- **Karlo Markso: Salajro, prezo kaj profito** (prelego pri bazaj ekonomiaj fenomenoj antaŭ internaciaj delegitoj de la laborista movado), trad. de Vilhelmo Lutermano, 2007

- **Kubaj infanrakontoj**, trad. de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kun ilustraĵoj de Danny Daniel Pereyra, 2007

- **Koffi Gbeglo: Esperantuĵismo**, 2008

- **Johano Besada: Eseoj**, 2008

- **Karlo Markso: Nerefuteblaj citaĵoj**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2008

- **Fidel Castro Ruz: Dialogo de civilizacioj** (2 paroladoj), trad. de Amparado Cisnero, 2009

- **Dominique Vidal: Kiel Israelo elpelis la palestinanojn**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

- **Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, Universala Deklaro de Homrajtoj, Konsilantaro pri Homrajtoj, Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, Internacia Traktatoj pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, Konvencio pri la Rajtoj de la Infano, Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj, Protokolo pri abolo de mortpuno, Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj** - trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

- **Karlo Markso: Dunglaboro kaj kapitalo**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

- **Karlo Markso: Pri liberkomerco, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

- **Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

- **Eddy Raats: La longa vojaĝo. Travivaĝoj de etulo**, 2009

- **Dania Rodríguez García: Ni interŝanĝu; La nova leterportistino; Du kaj la fantazio**. Tri infanteatraĵoj. Elhispanigitaj de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kaj Vilhelmo Lutermano, 2009

- **Kien Ĉinio? Dek du analizoj el diversaj landoj kaj vidpunktoj**, tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, 2009

- **Karlo Markso: La mizero de la filozofio**, respondo al J.B. Prudono: „La filozofio de la mizero”; kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso; **Pri J. B. Prudono**. Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, 2009

- **Oktobra Revolucio kaj la sekvoj - Moshe Lewin: La Oktobra Revolucio rezistas al la historio; Hansgeorg Conert: Bazoj kaj evoluo de la sovet socio; Robert Steigerwald: Socialismo kaj ŝtato - dek tezoj**, tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, 2009

- **Jörg Goldberg k.a.: Ekonomia krizo - Analizoj n-ro 1**, Elgermanigoj de Vilhelmo Lutermano, 2009

- **Salim Lamrani (komp.): La terorismo de Usono kontraŭ Kubo - La Kuba Kvinopo**, tradukoj de div. MAS-anoj, 2009

- **Ekonomia krizo - Analizoj n-ro 2**, Elgermanigoj de Vilhelmo Lutermano, 2009

- **La homo kaj lia naturo. La bildo pri la homo en la kapitalisma socio kaj en marksismaj sciencoj**, Eseoj elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, 2009

- **Karlo Markso: La kapitalo, Kritiko de la politika ekonomio, Unua volumo, Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj unua ĝis naŭa**, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, 2009

- **Frederiko Engelso: Pri la origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, 2010 (tiu ĉi libro)

La libroj de MAS akireblas ĉe la kutimaj librovendejoj en Esperantuo, precipe ĉe tiuj de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de la Flandra Esperanto-Ligo (FEL).

Frederiko Engelso: Pri la origino de la familio, de la privata
proprieto kaj de la ŝtato

Elgermanigo de Vilhelmo Lutermano

Monda Asembleo Socia (MAS)

2010

Presita en Germanio en la jaro 2010

ISBN 978-2-918300-16-8